



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 115 (Ninth Year) Melburno (Melbourne), Australio. 10 Januaro 1930.

## AN IMPORTANT ANNOUNCEMENT.

Replying on the 27th November, 1929, to an enquiry made by the New Zealand Esperanto Association regarding the teaching of Esperanto by departmental teachers to children of the primary schools outside of ordinary school hours, the Director of Education, Wellington, N.Z., stated:—

"I have to acknowledge receipt of your memorandum of the 22nd inst. and in reply have to say that, subject to the by-laws of the Education Board, a teacher might form in his school an Esperanto class for his pupils out of school hours. Of course, attendance at such a class would be subject to the approval of the pupils' parents.

"Subject also to the by-laws of the Board, the school may be used out of school hours, on such terms as the Committee (School) may prescribe."

The position as outlined by the Director of Education must be regarded as most satisfactory. It now appears to be a comparatively easy matter for Esperantist teachers to form an Esperanto class in their respective schools, out of school hours. Fourteen teachers have enrolled as members of the N.Z.E.A. Are we to have 14 classes?

## FIRST NEW ZEALAND ESPERANTO CONGRESS.

A Mark of Progress.

The First New Zealand Esperanto Congress has been arranged to take place, under the auspices of the New Zealand Esperanto Association, at Wellington on the 17th and 18th of January.

An attractive and utilitarian congress programme has been provided, as is reflected in the following outline:—

**Friday, 17th January.**—2 p.m.: Formal opening of congress and N.Z.E.A. business session. Even-

ing: Propaganda meeting.

**Saturday, 18th January.**—Forenoon: Free. Afternoon: Sightseeing tour. Evening: Social and supper; formal closing of congress.

The primary object of the congress is to propagate and to prove to the public that Esperanto is advancing in the Dominion. In addition, the N.Z.E.A. past and future activities will be reviewed; and Esperantists will be afforded opportunities of meeting each other and using the language of Zamenhof. The advent of the congress raises Esperanto to a point never previously reached in the Dominion, and the event should be an epoch-making one in the history of the movement in New Zealand. Although arranged at short notice, the gathering at Wellington, it is anticipated, will be an outstanding success, and merely a forerunner to larger things.

**Christchurch, Novzelando.** — Ferion ĝis Februaro la loka Societo ĝuos post la 9a de Dec-o. Bone meritita post laboro-plena kaj sukcesa jaro! Ankaŭ ĉesos pro la sama kaŭzo la "Stela Rondo" (Infana Klaso).

S-ro N. Bell, M.A. denove parolis de radiejo 3YA je la 19a de Nov-o. Li pritraktis Esp-gramatikon.

La fina amikec-vespero estis aranĝita ĉe la domo de nia prezidanto, s-ro Bell, M.A., je la 26a de Nov-o, kiam la ĉeestantoj ricevis pluan okazon uzi praktike nian lingvon.

**Wellington, N.Z.**—Sub aŭspicioj de la Nov-zelanda Esperanto-Asocio, la Unua N.Z. Esperanto-Kongreso okazos en tiu ĉi urbo dum la 17-18a de Jan-o, (vidu aliloke raporton angle). Per la kongreso, helpata de la gazetaro, oni esperas efike propagandi la lingvon tra la Dominio, samtempe provizi ĝuodonan kaj riĉan programon al la partoprenantoj.

## POR KOMENCAĴOJ.

Iu kamparano havis kun la najbaro grandan malpacon, kiu daŭris jam dum multaj jaroj. La najbaro ne plu volis toleri la ĉikanojn de la kamparano kaj tial li minacis, ke li la aferon transdonos al la juĝisto. Ĉar la kamparano konsciis, ke li estas malprava, li timis la juĝiston kaj tial volis la aferon lerte eviti. Li iris al la urbo kaj vizitis tie faman advokaton. Al li la kamparano ĉion rakontis. „Kara amiko“, diris la advokato, „via afero estas tre malfacila, ĉar vi ne estas prava, sed se vi al mi pagos mil ŝilingojn, mi al vi helpos.“ La kamparano konsentis kaj la advokato donis al li la konsilon, ke li dum la proceso nenion respondu krom „Ho, ho!“, kion ajn oni demandas. Venis la tago de la proceso. Juĝisto demandis: „Kial vi ĉikanas vian najbaron?“ „Ho, ho!“ „Kial vi ŝtelis lian kaprion?“ „Ho, ho!“ Kial vi mortigis lian hundon, surpaŝis lian kampon, pelis viajn kokinojn en lian ĝardenon?“ „Ho, ho, ho, ho, ho, ho!“ „Do respondu precize!“ „Ho, ho!“ Post longa sensukcesa demandado diris la juĝisto: „Vi vidas, ke la kamparano estas freneza kaj tial mi devas lin liberigi.“ Kun granda ĝojo iris la kamparano al la hejmo. Unu tagon post la proceso venis la advokato, kiu tiel bone konsilis al la kamparano, por la rekompenco. „Kara sinjoro, mi iras por la mil ŝilingoj.“ „Ho, ho!“ „Do mi petas, donu al mi la sumon!“ „Ho, ho!“ „Memoru, ke nur mia konsilo helpis al vi en tiu por vi malfavora afero!“ „Ho, ho!“ „Pro dio, kompatu min, donu al mi la monon“, plendis jam la advokato. „Ho, ho!“ „Mi vidas, ke vi estas tute impertinenta fripono!“ „Ho, ho!“ Kolere foriris la advokato sen mono kaj aŭdis post si la malican ridadon de la kamparano. Tiel trompis la ruza kamparano la faman advokaton, ĉar tiu ĉi donis al li trompan konsilon.

La amo estas neniel ligita kun la intelekto. En juna virino ni amas aferojn tute aliajn ol la intelekton: ni amas ŝian belecon, sian petolemon, konfidemon, karakteron, ŝiajn malperfektaĵojn, ŝiajn kapricojn, kaj Dio scias, kion plu, kio ne estas eldirebla. Sed ni ne amas ŝian intelekton. Ni ŝatas ĝin, se ĝi estas brila, kaj per ĝi junulino multege povas pligrandigi sian valoron antaŭ niaj okuloj. La intelekto eble ankaŭ taŭgas, por katene

fiksi nin, kiam ni jam ekamis. Sed la intelekto ne kapablas entuziasmigi kaj vekti en ni pasion.

—Goethe—

## EN GREKUJO.

Estas nun du ĉefaj centroj de E-movado: en Areno (de 1 jaro 1924) kaj en Saloniko (de 1 jaro 1928).—Antaŭ tiu tempo estis la E-movado tre malforta. En la jaro 1926, estis refondita „Helena E-Asocio“, kies oficiala organo estas „Lingvo internacia“ kun tekstoj greka kaj esperanta.—Esperanto estas instruata en grekaj element-kaj mez-lernejoj, en komercaj lernejoj kaj eĉ en vesperaj universitataj kursoj lingvaj. Ankaŭ la gazetaro greka favore traktas E-on kaj multe helpas al ĝia propagando.—Ĉefulo de E-movado en Grekujo estas Dro Anakreon Stamatiadis, diligenta E-verkisto.—Ankaŭ skoltoj en Ateno havas sian kurson kaj universitataj studentoj fondis sian „Studentan E-Grupon“.—En Saloniko gvidas E-movadon J. Spatharis, prez-o de Salonika Esperanto-Societo.—Ankaŭ en multaj aliaj urboj ekzistas vico da viglaj batalantoj por nia lingvo.

## IU MOTORO POR FUNKCII BEZONAS BENZINON. VIA ORGANANO POR PROSPERI BEZONAS KOTIZON. ĈU VI PAGIS LA VIAN? SE NE..... DORMU MALTRANKVILE.....

Edzo: Ankoraŭ nova robo! Kiel mi pagos por tio?

Edzino: Mi ne scias. Mi estas edzino, ne financa konsilistino.

Mia edzino estas anĝelino.

Vi estas tre bonŝanca. La mia ankoraŭ vivas.

## LA MARO.

La maro estas la plej granda el ĉiuj tombejoj, kaj la tieaj endormuloj dormas sen monumentoj.

Ĉiuj aliaj tombejoj, en ĉiuj landoj, montras ian signon de diferencigo inter la granduloj kaj la malgranduloj, la riĉuloj kaj la malriĉuloj; sed en la oceana tombejo la reĝo kaj la krudulo, la princo kaj la kamparano estas egale honorataj.

Super ĉiuj ruliĝos la samaj ondoj; per la kantado de la oceano la sama rekviemo estas farata je ilia honoro.

Mantell.

**MAPO DE ITALUJO.**

Ni ricevis de la Esperanto-Turisma Servo, Vicenza, Via Burci 5, Italujo, belan landkarton dulingvan kun la loknomoj de urboj, en kiuj troviĝas UEA delegitoj. Taŭgas ĝi bone por murdekoracio utila. Sendota kontraŭ pago de 10 liroj. Ankaŭ mapo de Eŭropo kun platglobo k kongresurboj, 10 liroj, aŭ la du haveblaj por 15 liroj.

**A POINT OF COMPLAINT.**

It is regretted that voices complaining of certain abbreviations used in S.K. have reached the Redakcio. A word of explanation may be appreciated by readers. Apart from the limited use of "k" for "kaj," a practice followed by several German and Russian Esp. gazettes, and an occasional shortening of frequently occurring words in stereotyped contexts, such as "lern." for "lernantoj(n)," we have had but little recourse to that word-clipping and use of other truncating devices that characterise any living language.

In book reviews, or language notes, such a form as "AFGHIR" after, say, "sport", means that the root is found in the "angla, franca, germana, hispana, itala, kaj rusa" languages. The use of "O.K.L.," "F.K." etc., for "Oficiala Klasika Libro," "Fundamenta Krestomatio" and other works was fully explained in the first "notaro" printed in this paper.

We hasten, however, to give assurance that henceforth there will be no ground for further complaint on this score.—Red.

**AL NIAJ SUBTENANTOJ—KAJ LA ALIAJ.**

Dankante al la fideluloj pro la jenaj abonpagoj ni devas firme altiri atenton de ankoraŭ nepagantoj al la terure mallonga listeto ĉi-suba. Indiferentuloj sciu, ke ili respondecas pri tre grava afero, nome, la daŭra aperado de la **ununura ligilo** inter la Esperantistoj en la suda duonsfero monda, La Suda Krucio. Ili vekiĝu el sia morta letargio! S-ino O'Leary, 4/6 nov. '29; s-ino Purnell (pro d-ro B.) 9/- dec., '30; L. Illingworth, 4/6, dec., '30; f-ino Tricker 2/- dec., '29; W. Waterman 4/6, junio, '31; s-ino Trundle 4/-, nov., '30.

**QUERY CORNER AND CORRESPONDENCE.**

Under this head are invited questions on Esperanto history and language. Contributions in the form of short articles, verselets, sketches, etc., are appreciated.

Domaĝi: The root contains the ideas

"antaŭbedaŭri, ne voli elspezi, ne voli perdi, ne voli difekti, ne voli ĉagreni (dolorigi) la sentojn aŭ aĵojn de alia persono." Do not use it in the sense of "damage" (difekti). See Millidge. F.K. 68/17, "La imperiestro, domaĝante ŝian riĉan veston..." (not wanting to have her dress spoiled). Ham. 109/11. 2 Kor. ix, 7, 2 Sam. 12/4. The root is also used in translating the English "What a pity!" (Kia domaĝo!), Ham. 51/18, 19. Kabe.

Bubo in M. "Flamvorta Alvoko" leaves us cold.

B. in A. S. K. goes to Japan, and to some 15 other countries.

To All: There will be no translation by Mr. Gordon in Jan. number, owing to holidays.

Volgo in B. "Jen vi havas!" (La Revizoro 5/12, 99/1) is not a literal translation of the Russian, which means "Here's a St. George's day for you, old woman!" This is a very common expression, referring ironically to an unpleasant surprise, for on St. George's Day, 1648, the serfs were deprived of the right of migration. In English it means, "There you are!", "Here's a go!", "Now you're in for it!" and so on.

B. in Tam. What difference is there between "laborilo nia" and "nia laborilo"?

The word-order in Esperanto is not absolutely free, but compared with those of national tongues it is almost so. Compare the difference between "tute ne" and "ne tute." If I say of our society that "nia laborilo estas la amo," I mean that love is our sole, or at least our chief, instrument of, or motive for labor. But if I say that "laborilo nia estas la amo," I then convey the meaning that love is one of a number of instruments at our disposal.

**RUSA ANEKDOTO.**

Maljuna vilaĝano ĵus venis al la urbo kaj ekveturis en sia ĉaro tra la ĉefstrato. Deĵoranta policano tuj baris al li la vojjon, ĉar ne estis permesate, ke krudaj kamparanaj veturiloj aperu en la belaj urbaj stratoj. Por esti pli impona, la severa ordogardisto maldelikate traktis la kamparanon, eĉ kelkfoje pugnobatante lin.

— Malsaĝulo! — ekkriis la atakita maljunulo, — ĉu ne estas vi, kiu precipe devus prizorgi la ĝentilecon?

La policano konsideris sin ofendita kaj vokis la ofendinton al tribunalo. Venis la tago de l' juĝo. La proceso komenciĝas.

— Juĝato, ĉu vi konfesas vian kulpon? — alparolas juĝisto la vokiton.



— Pri kio do? — tiu rediras.

— Nu, ĉar publike vi nomis la plendanton per ofenda vorto "malsaĝulo".

— Ha! do, ĉu mi ne rajtas ajnan individuon opinii malsaĝa, se ĝuste tiela en realeco ĝi estas?

— Certe vi tion rajtas opinii, tamen laŭte elparoli ĝin estas tute alia afero, kiun malpermesas nia leĝo, — edife komentis la juĝisto.

— En tiu okazo, sinjoro juĝisto, mi pentas pri mia kulpo kaj mi petas de la plendanto pardonon, ĉar neniel mi supozis pri ekzisto de simila leĝo.

Sekvas interpaciĝo de la procesantoj, kaj la juĝisto anoncas, ke la juĝato povas foriri.

— Sed antaŭ ol foriri, — la maljunulo reparolas neatendite, — estu permesate al mi peti de vi iun klarigon.

— Vi povas, — sekvis la konsenta respondo.

— Por ke mi ne estu devigata refoje viziti la tribunalon pro nescio pri la leĝoj, bonvolu informi min pri jeno: se eventuale mi renkontos nun iun veran malsaĝulon, ĉu almenaŭ mi rajtos nomi lin saĝulo?

— Ho, tute senriske, ĉar tio neniel kontraŭas nian leĝaron.

— Do vi kuraĝigas min per via kompetenta klarigo kaj tial mi dankeme adiaŭas vin, respektigata saĝulo . . .

—Arbeiter-Esperantist.

### PRAKTIKO DE ESPERANTO.

Fragmento el la libro Hector Hodler, lia vivo kaj lia verko, eldonita de Universala E-Asocio, Geneve.

Ekzistas Esperantistoj, kiuj opinias, ke Esperanto estos venkinta, kiam per registara dekreto ĝi estos devige instruata en la ĉiulandaj lernejoj. Ili konsideras la tutan problemon nur el tiu vidpunkto. Nu, tio tute ne sufiĉas. Se samtempe kun la instruado en la lernejoj, oni ne aranĝas praktikajn servojn, per kiuj la lernintoj povos tuj utiligi la ĵus akiritan scion, oni atingos mizeran rezultaton. En ĉiuj gimnazioj de la mondo oni nuntempe instruas la latinan lingvon. Praktike ĝi estas senutila, krom al la kleruloj sin okupantaj pri filologio, al la katolikaj pastroj kaj . . . al la profesoroj de latina lingvo. Ĉar la lernintoj ne havas la okazon ĝin uzi, ili forgesas ĝin kelkan tempon post la eliro el la gimnazio. Certe, la latina lingvo estas multe pli malfacila ol Esperanto, sed oni aliparte dediĉas al ĝia studado multe pli da tempo. En la mezepoko la latina lingvo ne estis pli facila ol nun; tamen preskaŭ ĉiuj intelektuloj uzis ĝin, skribis en ĝi siajn verkojn,

parolis ĝin. Nuntempe oni ĝin instruas al pli multaj homoj ol antaŭe, sed ĝi estas multe malpli utila. Tio montras, ke ne sufiĉas instrui lingvon en la lernejoj, por ke ĝi estu vivanta lingvo, praktike uzata.

La klopodoj por instigi al la uzado de la lingvo estas do ne malpli gravaj ol la propagando. Al la vorto „uzado“, oni kompreneble ne devas doni tro mallarĝan, nek tro materian sencon. Spirita utileco ne estas malpli ŝatinda ol materia. Al la turisto, kiu uzas ĝin dum vojaĝo eksterlande, Esperanto estas utila; ĝi estas utila al la komercisto, kiu per ĝi trovas novajn klientojn, sed tio estas nur la plej konkretaj kazoj. Esperanto estas ankaŭ utila al la persono, kiu per ĝi korespondas kun eksterlandanoj kaj tiamaniere plivastigas sian spiritan horizonton, ekkonas fremdajn morojn, kondiĉojn, ideojn; ĝi estas utila ankaŭ al tiu, kiu ŝatante la lingvon mem, tradukas en ĝin kaj tiel pliakrigas sian lingvosenton kaj pliriĉigas siajn kapablojn. Esperanto ja multmaniere povas esti utila, sed tiun utilecon ĝian oni devas sentigi al la varbitoj kaj pligrandigi. Ni konstante devas serĉi, kiel oni povas igi nian lingvon pli lerninda, ĉar pli utila.

### ESPERANTO, A LITERARY LANGUAGE.

The international language must possess all the resources of the national tongues. It must meet satisfactorily all claims made upon it. Of Esperanto we may then say, either it is fitted to clothe every conceivable thought, or it is not a living language. The civilised man uses a speech-medium from which has been moulded a multi-varied literature; the I.L. must be, in such potentialities, as rich as any national language, or all of them.

A language is not formed of different blocks of words or phrases readily distinguishable as belonging to this or that section of human society. We do not, in reality, detach from the main vocabulary a commercial sub-language, a scientific sub-language, a literary sub-language, all three devoid of commonly used forms. The classification into common, commercial, scientific and literary has relation to what is only a very small number of words, expressions and phrase constructions proper to this or that special calling. One would find hardly 100 words or expressions that could be designated, for instance, as wholly commercial, and science uses only a relatively



meagre terminology. On the other hand, does a very marked difference exist between the language of the street and that of literature? Omitting some few words and constructions peculiar to poetry and exalted prose, do we not find that the content of the two is the same? One could easily cite many a page deemed to be of literary value which presents perhaps only ten words unused by the people. This is even truer of French than English, for in the former, owing to its relatively limited vocabulary, the distinction between *le style noble* and *le style familier* is less strongly marked than in the latter. French cleaves closer to the parent Latin, words from which are more readily popularised, and are free from that slightly pedantic flavor that clings to the same roots in English.

So, if the I.L. possesses the clarity, precision and flexibility necessary to express fittingly our every-day needs and impressions, there is little need to fear that it will fail to meet the claims of literature, which is much less specialised than most people believe. It is difficult to understand the attitude of those who hold that Esperanto is an excellent medium for all but literature.

Apart from the nature of the thought, which depends on the writer or speaker, the literary power of any language is found in its elements and in their arrangement. Now, are not the elements of Esperanto those of the national tongues, or rather those chosen elements that have become the common property of the leading civilisations? Does their nature change, or do they lose something of their literary value, when transplanted to Esperanto soil?

It has been said that the rule of using the logical and precise expression, a rigid rule in Esperanto, must necessarily render language deficient in color and life; that it must impart to language the plainness of a physiognomy having no character of its own. Now, we will not grant that looseness of terminology is an absolute condition of color and life in literary style. We were taught the contrary principle. Besides, does not common sense inform us that a loose, imprecise or untrue expression detracts not only from its expressiveness, but also in great measure from its beauty? If by eliminating idiom and using logical forms of expression the physiognomy of a language loses its peculiar properties to the point of becoming colorless and insipid, then it must be confessed

that English ceases to be English, and no longer possesses literary charm when it displaces loose idiom in favor of precise forms of expression, as it is constantly doing. Color and energy in style are not dependent on the use of idioms, much less in the use of imprecise words; a composition free from idiom can be much more vivid than one in which idioms swarm, and the peculiar physiognomy, the special genius of a language, is not to be traced to such. Esperanto is the only tongue which, as it were, takes its orders from logic alone. Expression in it is not constantly hindered, as in other tongues, by strange or rigid word order and by the caprices of custom. Comparison, hyperbole, metaphor, original arrangement, a wisely free word order, are rights exercised by it when use of such would result in clear and faithful presentation of ideas. This being so, can Esperanto be other than a literary language?

The many translations and original pieces in Esperanto prove beyond doubt that the idioms of national tongues can be translated under a form comprehensible to all peoples, in such a way as to leave untouched the strength or beauty of the authors' thought.

In Hamlet, in The Iliad, in Boris Goudonov, in La Edziĝo de Figaro (Beaumarchais), Alegorioj el la Naturo (Gatty), Fabiola (Wiseman), in For la Batalilojn (von Suttner), in La Faraono (Prus), in La Vendetta (Balzac), in Petro Schlemihl (Chamisso) and many others is presented to the world a rich mine of idiom from the world's culture tongues so translated that the most sceptical must surely be convinced. Such a confession was made by a professor of English, who had held that an I.L. was impossible. Being compelled to acknowledge the existence of Esperanto, he sought refuge in what he claimed to be the incapacity of an artificial language to express subtle thought-nuances. His argument lay chiefly in idiom. "Never," said he, "could Esperanto be a satisfactory medium for the translating of a masterpiece." He learnt the language, and began to read Zamenhof's translation of Hamlet. He admitted that his only aim was to find means to justify his attitude to Esperanto. He read the English original, checking it with the Esperanto translation, certain that he would note defects at every page. Great, therefore, was his surprise when he felt himself forced to

the conclusion that the translation was not only a faithful rendering, but in an incredibly successful degree had appropriated the color and richness of the original. After a detailed examination of other texts of Shakespeare, he voiced his conviction that Esperanto filled the literary role at least as well as any national tongue. It brings to its task, as each of them does, its own marked genius. The fact that its literary character is logical and precise in no way renders it weak and vapid.

Esperanto possesses the richness, flexibility, precision and euphony for the full expression of ideas in the worlds of commerce, science and everyday life, and now bids fair to carve for itself no mean niche in the Temple of Literature. The facts revealed in the 40 years' history of the language warrant one in believing that it is an instrument capable of meeting any demand that any hitherto unexplored field of inquiry may make upon it. For it is, in truth, the living language of a living people.

—(ROBO, after an essay by de Beaufront.)

ERARO: Linio 14 de "Insula ĝardeno Edena" (p. 128) "prospektivo" (devas esti, "perspektivo").

### AUSTRALIA.

#### A GENERAL ACCOUNT

(G. S. Browne, M.A.: Nelson, Publishers).

In looking over the above book the avid reader of Esperanto-literature will perhaps be moved to inquire mentally concerning the reception accorded a similar publication of last year, an original piece of Esperanto with the title "Aŭstralio, Lando kaj Popolo." Just how far have orders from Australian samideanoj pushed up the sale-cipher of this brightly produced volume from the enterprising printery of Ferd. Hirt, Leipzig?

But let it pass. The Australian has here in English a complete yet concise treatment of all the characteristics of his country and the multifarious activity of them that people it—a compendium of facts geographical, industrial, social, educational, historical. The book is richly illustrated with well-chosen photographs and four colored plates, and the author is to be congratulated on the pointed eloquence he has imparted to his carefully arranged statistics.

The design of this notice, however, is primarily to interest the "correspond-

ing" Esperantist, who must for long have felt the need for such an aid. With this book at his elbow there will be for him no more irritating lapses into abstracted pen-chewing, no more vague fumblings through cumbersome tomes at the reference library, for he will have within reach a source of wealth, for all practical purposes inexhaustable, wherewith to satisfy the questionings of the most studious young German, "preparing a thesis on Australia for his doctorate."

The pithily written chapters on the aborigines and on social life, translated into Esperanto, would make informative reading for the non-English-speaking Esperantist.

Price 3/6, at Wayfarer's Bookshop, Exhibition-st, Melb.

### POINTS IN THE ADVANCE.

We have learned since last issue—

That war literature's best seller, "All Quiet on the Western Front," is on sale in Esperanto dress through "Heroldo de Esp-o," Brussellerstr., Koln, at 5s. and 7s.

That the State of Lichtenstein has issued official p. cards with Esperanto text.

### ABOUT S.A.T.

Many an Esperantist feels himself far from the political or sociological convictions of La Sennacia Asocio Tutmonda (S.A.T.) (The Universal Non-National Association), but it is impossible for him to ignore its existence and increasing gravity in the Esperanto movement. It has just closed its 9th world congress, in Leipzig. Although 1102 persons paid their congress fees, through various hindrances only 662, from 22 different lands, actually took part. Needless to say, Esperanto was the sole language used in the sittings. The next congress will be held in London, August 1930.

From the year-report we learn that on 1st July, 1929, there were 5336 members. Its book co-operative has published 33 works in 90,000 copies, all told. Of these in 1927-28 more than 15,000 were sold, and in 1928-29 almost 18,000. The Esperanto reader, "Petro," was the best seller with 6,300 in 1928-29. The value of books sold in that year was about L655. S.A.T.'s weekly Esperanto organ, "Sennaciulo," has about 4000 subscribers. The "Complete Esperanto Dictionary" (entirely in Esp-o) will leave their co-operative, it is hoped, at the end of the year. It is printed up to F inc., that is, 120 pages. 1428 copies, value about L427, have been pre-ordered.

**INTERNAĈIA KANTARO.**

La "Internacia Kantaro" de Paul Bennemann, eld. de Ferd. Hirt (Leipzig) estas unika en sia speco k pro amplekso k pro laŭnacia reprezenteco. Kantulaj rondoj en Esp-ujo nun subtenu tiun entreprenon, aĉetante ĉi-kolekton riĉevastan, pliŝvelan je 78 novaj kantoj ol la malnova eldono. Inter alie, aldoniĝis strofaroj el la java, jida, maoria kantotrezoro, entute la vortoj de 139 orelkaresaj arioj de 55 popoloj, krom 7 Esp-aj k 3 koncertarioj. En sia "antaŭparolo al la 16-20 milo" la kompilinto korpetas ĉiuj Esp-muzikfakulon ekinterrilatiĝu kun li por celo plenkompletigi la kantaron ĝis vera universaleco; precipe li volas helpojn el landoj ankoraŭ ne sin esprimantaj en lia kolekto.

Estas vere mirige, ke la nomo de s-ro Bennemann kiel tut- aŭ kuntra dukinto sidas ĉepiede de pli ol 30 kantoj, ĉiu eltirita el malsama lingvo, inter ili strofoj el la malmulte de eŭropanoj scipovataj japana, ĥina, maoria, java! Kvankam ni nek volas nek povas aserti, ke ne estas plenkorekta la tradukaĵo el multaj lingvoj nur de unu homo, ni tamen sugestius, ke la "internacieco" de la enhavo povus esti eĉ pli frape almontrata se la koncernaj tradukintoj estus samlingvaj kiel la kantaŭtoroj. Sed tion oni ne tro rimarku: verŝajne s-ro B. ne sukcesis trovi tiom da kunlaborantoj, kiom li serĉis, spite kion li ja elmetis meritan verketon. Ĝi estu spirita agordilo inter la vaste semata samcelanaro, ĉe kiu ĝi trovu tujan debiton. Gravrimarke—la muzika parto aĉetebliĝos post ne longe. Mendu ĉe AEA. Teksto, prezo 1½ ŝil.—(Robo)

**ANSTATAŬA EDZINO.**

(a wife by proxy) de Erica Maxwell  
**ANONCO DE "HEROLDO DE ESPERANTO."**

Ĉi tiu romano, tradukita el la angla lingvo, estas tre moderna kaj streĉas la intereson de la leganto de la komenco ĝis la fino. Ĝia scenejo estas Ruslando, Anglujo, la oceano kaj Aŭstralio.

Erica Maxwell (pseŭdonimo de s-ino Lillian M. Pyke), kiu mortis en 1927, estis fervora amikino de Esperanto, kiu

aktive helpis nian movadon. En ŝia ĝardeno en Melbourne (Viktorio, Aŭstralio) ofte kunvenis aro da gesamideanoj. En diversaj verkoj kaj gazetartikoloj ŝi propagandis Esperanton, kaj en la supre nomita romano donas al nia lingvo eĉ gravan rolon.

Bofrato de s-ino Lillian M. Pyke, s-ro G. Pyke estas fervora samideano, Li estas ankaŭ bone konata al eŭropaj esperantistoj pro tio, ke li vizitis kelkajn universalajn Esperanto-kongresojn. Krom tio li verkis kelkfoje „Leteron el Aŭstralio“ por Heroldo.

La romano estas tradukata de angla samideano s-ino M. Sampson. La granda pliparto estas jam tradukita; mankas nur kelkaj ĉapitroj. Do, post nelonge ni povos komenci la publikigon. Ni esperas, ke la nova romano plaĉos al niaj legantoj kaj, precipe, ankaŭ al niaj legantinoj.

—Redakcio de "Heroldo."

**KRONIKO.**

PERTH, Okc. Aŭst.—Diskutante pri kongrese ni konstatas ke Esp-o en O.A. plivigliĝas rezulte de propagando farita ĉe la ĉefurba kongreso.

F-ino Barclay baldaŭ forlasos Perthon por tramonda vojaĝo; adiaŭonte anojn ŝi invitis ilin ĉeesti sian domon.

Tri grupoj funkcias ĉe kunvenoj de la „Westralian Esp-o Society“, gvidataj de s-ro Unwin, Saar k Byatt. Studema spirito troviĝas ĉiu-grupe. S-ro Dunn lekciis pri Esp-o k Bahaismo, kiu lasta rigardas nian lingvon kiel unu el ĝia celaro.

Nia energia sek-iino klopodas starigi bibliotekon, k antaŭdankas tiujn, kiuj donacos bv. E-librojn.

**Brisbano (Kvinslando-Queensland).**

—La jarkunveno de la societo havis lokon en 26 nov. sub prezido de f-ino Rose Macpherson. Alestis malmultaj anoj: jen pruvo de kontenteco pri la administrado de la societo dum la pasinta jaro. La sek-io (f-ino Carrick) prezentis la jarraporton, kiu montris moderan progreson kaj bonan financan situacion. Tion ĉi la societo aparte ŝuldās al sia sindona kaj laborema sek-iino.

Oni elektis novan estraron: la listo

**HAROLD PUDNEY**

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcianta fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

**7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.**

**Specialisto pri Fontanplumoj**

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—



aperas sur la lasta paĝo de ĉi tiu numero.

Propaganda parolo de s-ro W. L. Baker antaŭ unu klubo de Metodista Eklezio en la kvartalo Lutwyche.

Parolo pri vojaĝo, kun lumbildoj, en la kunveno de la societo, de s-ro Hyde. La kliŝojn kaj la projekcian lanternon la societo ŝuldas al la afabla pruntego de s-ro A. McLeod.

### KONIGU NIAN LINGVON.

Unu simpla kaj efika propaganda metodo, kiun oni uzas en Brisbano, meritas esti uzata en aliaj lokoj. La Esperanto-societo proponis al la Regna Biblioteko, kaj al la bibliotekoj de "School of Arts" kaj Laborista Eduka Asocio (WEA) tutjaran abonon al la revuo "International Language," kondiĉe, ke tiuj institucioj konservu la revuon en sia publika legoĉambro inter la aliaj revuoj, kiujn ili ricevas. Oni akceptis la proponon, kaj kun malmulta penado la societo tenas la aferon de Esperanto antaŭ la atento de konsiderinda sekcio de la legema publiko, kiu estas por ni vere la plej grava sekcio de la popolo.

Ne nur Esperanto-grupoj, sed ankaŭ izolaj samideanoj, povus same fari en sia urbo aŭ urbeto. La kosto de "International Language" estas nur 2ŝ 6p. jare; ĝi enhavas gravan propagandan materialon en Angla lingvo; kaj unu simpla abono efike donas reklamon por nia lingvo dum tuta jaro.

### GRUPFONDO ĈE COBURG.

Danke helpon k subtenon de ĉi-tiea filio de la Aŭstralia Laborista Partio k la ŝtata lernejo (n-ro 484) nova E-ta grupo estas fondita en Coburg (antaŭurbo de Melburno). Kiam ni petis de la ALP okupadon de ilia ĉambrego ili tre kompleze tion jesis. Sed pro tio, ke ankaŭ loĝioj ktp jam luis la ĉambregon ni povis ĝin uzi nur ĉiun duan jaŭdon. La unua kunveno okazis la 12an de sep-o, k inter aliaj bonekonataj E-tistoj ĉeestis s-ino k s-ro Rawson, kiu lasta faris trafan alparolon pri la historio k progreso de E-to. Komence de okt-o ni an-kalkulis 30 lern., kiuj, sentante deziron pli ofte kunveniĝi, faris peton al la komitato de loka ŝtatlerno por grupejo. Senhezite ĉi tion ili disponigis al ni. La grupo funkcias senkotize. Ni dankas s-ron Perkins, de Melb. E-Klubo, pro lia valora helpo kiel instruanto, k s-ino Hintze (samkluba), kiu de tempo al tempo presigis lokjurnale raportojn pri nia progreso, per tio gajnante kelkajn novajn lernu-

lojn. Por pluinformo sin turnu al la gvidanto, Geo. Burns, 1 Bourke-st, Coburg, Vic.

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.*

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 116 (Ninta Jar) Melburno (Melbourne), Australio. 10 Februaro 1930.

## THE FUTURE OF "LA SUDA KRUCO"

### URGENT CALL FOR HELP.

Owing to the critical financial position in which the Redakcio finds itself, and the obvious necessity for keeping before the Esperantists of Australia and New Zealand a monthly vehicle of information as to their activities, it has become necessary to consider seriously our course of action for the immediate future.

Despite careful economy 1929 closed with a deficit of some fourteen pounds. This fact has, to the editor's mind, rendered it imperative to take one of two paths. The first is, that friends of "La Suda Kruco" guarantee yearly a sum of money as a permanent fund to be devoted to its continued production. Judging from the experience of 1929 the sum needed for the present year is twenty pounds. A promise of £6/10/- has already been given, and by 20 March next it is believed that the money will be guaranteed. Every movement of the Redakcio will be governed by the will to economise and use faithfully the resources entrusted.

The second alternative is to issue a reduced "S.K." as supplement to the excellent English propaganda magazine "International Language." Such a supplement would contain a full chronicle of club activity and news of purely local character. "International Language" contains striking propaganda articles in English, current "points in the advance" of Esperanto throughout the world, and pages for learners, which would more than offset the elimination of such matter from "S.K." The success of this venture, the only practicable one if the appeal for £20 fails, would depend directly on all present "S.K." subscribers, groups and clubs according to their unhesitating support. It would be an experiment only, the success or failure of which would rest in the hands of the readers. That our only link, "La Suda Kruco," either in its present form or that of a chronicle sheet, should pass through failure of adequate response, would be a deadening blow to the movement here.

Say, by the support of your steady subscription, "It shall not be!"

LA REDAKCIO.

### FIRST NEW ZEALAND CONGRESS.

#### A Triumph for Esperanto.

An important page in the history of Esperanto in New Zealand was written at Wellington on the 17-18 January when the first New Zealand Esperanto Congress was held. In every way the gathering of Dominion Esperantists was a success, and although the congress was of short duration, much valuable work was accomplished. Everyone who took part will long cherish memories of the pleasant hours

spent at Maoriland's initial congress, for the two days, from the congress-members' viewpoint, were really a visit to Esperantujo with Esperanto being used on all sides. A wonderful spirit of friendship pervaded the congress, at the conclusion of which many regretful farewells were taken, and during the proceedings everyone appeared to recognise that the congress itself, above all, was undertaking the important duty of placing Esperanto firmly and strikingly before the New Zealand public and Government, and those in

authority, and was demonstrating in no uncertain manner that the ideal for which many New Zealanders, apart from other peoples, have for long worked and suffered had at last advanced to such strength as to arrange a national meeting of Esperantists. Such was the duty and such was the result. The newspaper mention in Wellington alone measured eight feet—which included excellent reports of the meetings, especially of the public lectures—and reports were telegraphed through the Press Association to every newspaper in the Dominion.

Attended by members and representatives of the clubs at Auckland, Christchurch, Wellington, Masterton, and Hamilton, U.E.A. delegates of Auckland, Wellington and Fielding, and by Esperantists from various parts of the Dominion, including several pioneers with 20 to 25 years' (and more) association with the language, the congress was held under the auspices of the New Zealand Esperanto Association, founded last year. About 50 persons took part, but a good number of Esperantists throughout New Zealand joined as absent members, and many others forwarded letters and telegrams of greeting. Many fine donations were made to the congress funds.

Mr. C. J. Adcock, president of the N.Z.E.A. formally opened the congress in Esperanto at 2 p.m. on January 17th, and after delegates, pioneers, and visitors had been welcomed a N.Z.E.A. business session at which the Press was present was commenced, Mr. Adcock delivering his presidential address. The annual report, presented by the secretary (Mr. W. King) and the financial statement tabled by the treasurer (Mr. E. Jack), were adopted, both documents being a testimonial of solid progress. The Press published much of the information contained in the report.

Club delegates then outlined the work of their clubs and the position of Esperanto in their towns. The speakers were as follows: Mr. Adcock (Hamilton), Mr. More (Christchurch), Mr. Jack (Wellington), Mr. Dewar (Masterton) and Mr. Russell (Auckland). The election of officers of the N.Z.E.A. followed, the existing Executive-President, Mr. C. Adcock (Drury); Vice-presidents, Mrs. E. Watkin (Auckland), Mr. L. E. Dust (Wellington), Mr. J. Russell (Auckland), and Mr. N. Bell, M.A. (Christchurch); Hon. Treasurer, Mr. E. Jack (Wellington); Masterton Club Delegate, Mr. A. Dewar; and Hon. Secretary, Mr. W. King (Wellington)—were unanimously

re-elected en bloc, and a hearty vote of thanks for their services during the past year was carried. Other business included adoption of new rules, exploration of questions relative to incorporation, and the inauguration of an examination committee. The meeting decided to hold the Second Congress at Auckland during Easter, 1931.

In the evening propaganda meeting was held, which proved very successful. In the absence of the Mayor, the Deputy Mayor, Councillor M. Luckie, presided. In addition to the two splendid speakers who addressed the audience—Mr. C. Adcock and Mr. F. Combs, M.A. (headmaster of Wellington school)—Mr. Luckie himself delivered an address from the chair which greatly enhanced the effectiveness of the meeting, particularly in view of the fact that the Press reported the speakers' remarks. A resolution was unanimously passed, amid applause, directing the attention of the Government to the advantages of Esperanto, and asking for the language to be taught officially in the schools of New Zealand.

The second day was devoted to the entertainment of congress members, who, after being photographed, began a sight-seeing tour of Wellington and the adjoining bays. The congress program was brought to a close with a social evening, at which Mr. W. Edmanson was loudly applauded for his Esperanto recitation, "How Rubenstein played the piano," and Mr. Adcock for ably demonstrating the famous "Ĉe" method of teaching Esperanto. On behalf of Mrs. A. Chapman-Taylor, of New Plymouth, who attended the congress with great enthusiasm despite her 84 years, Mr. W. King handed to the secretary of the Wellington Esperanto Club (Mr. Bertram Potts) for propaganda purposes, a large and valuable collection of world post-cards, including a personally autographed card of Dr. Zamenhof and photographs of the Doctor in various meetings. Mrs. Chapman-Taylor thoroughly merited the thanks which Mr. Potts tendered her when replying, for the collection represented ten years' work—a work commenced about 25 years ago.

With a fitting speech Mr. Adcock formally closed the First Congress, all rising to sing "La Espero" and the National Anthem. An informal meeting of the U.E.A. delegates who attended the congress was held the following afternoon, Mr. L. Dust (Wellington) presiding. Conducted in Esperanto, the business consisted mainly of con-



sidering means of extending the U.E.A. membership and delegate system in New Zealand, and of assisting to blot out the unfortunate deficit of the world congress held at Vienna in 1924.

## ORIGINALA VERKARO

De Zamenhof

### VALOREGA KOMPILO

Tre bedaŭre nia gazeteto ne disponas pri inda lokspaco por ĝusta takso kaj taŭge frazriĉa laŭdo, kion nepre meritas ĉi tiu bela monumento al genia homo. La kompilinto, d-ro J. Dietterle, kaj la fidela firmo Ferd. Hirt kaj Filo ricevu plenan konfirmon de sia agado per senhezita aĉetvolvo de la Esp-ista mondo. Ses partoj formas la verkon. 1. Antaŭparoloj. 2. Gazet-artikoloj. 3. Traktaĵoj. 4. Paroladoj. 5. Leteroj. 6. Originalaj Poemoj. Sub tiuj rubrikoj estas kolektita preskaŭ ĉio nun havebla al la kompilinto, ekster "tio, kio rilatas la Esperanto-lingvon nur koncerne gramatikon kaj vortaron." Piednotoj klarigas aŭ atentigas pri strangaj formoj kaj arkajkaĵoj. "Oni devas ĉiam rememori, ke la stilo de Zamenhof komence ne estis tiel perfekta, kiel en la postaj periodoj, kaj ke li komence uzis vortformojn, parolturnojn ktp., kiujn li ne plu uzis poste." Jen frutekstaj formoj jam mortintaj el la uzado: "malgraŭ l' intenco; progresigi l' aferon; ju (sen "pli"); uzado ĝin (de ĝi); la plej parte artikoloj; aludo (kvanteto) de vino; beletristo (la homo); rimarku ankaŭ "viando (karno), sofizmo, voĉi, centri (transitiva verbo), propagatoro, reportera (raportisteca), plano (en senco de "nivelo," A. plane) proceso (procedo), tia-ĉi, partizano, signoj de poŝto (postmarkoj?), modifikacio, renegato." En la cetero preskaŭ senmakula teksto aperas du-trifoje supezebla preseraro "(ne)orportuna."

Lia modesteco brilas el sekvantaj: "Por igi la kritikistojn tute apartigi la aferon de la aŭtoro, mi publike diramem. ke mi ne estas multege instruita lingvisto, ke mi estas tute senmerita kaj ne konata en la mondo. Mi scias, ke mia konfeso malvarmigo; multajn por la afero, sed mi volas, ke oni juĝu ne l' aŭtoron, sed la verkon." Tion skribis modela tradukinto el sep lingvoj!

Zamenhof estis samtempe sinceranime naiva kaj mondafere sagaca. La unua montriĝas ĉe lia projekto kolekti nomojn de dek milionoj de homoj promesantaj lerni Esp-on, kaj lia kredo ke la mondo skribos "Gete," "Bajron" anstataŭ "Goethe," "Byron."

La dua en lia konsilo al iu, ke tiu forĵeti la vortojn "direktoro de bjuro demanduma tutmonda," "ĉar tia tro laŭta titolo metus malbonan lumon sur vin kaj ankaŭ sur nian aferon." La leteroj pri la Hachette kontrakto montras sur Zam., kiel homon just-sente defendanta la rajton sian. Lia ansopiro al unueco-konkordo kaj forta suspekto al reformemo estas sciatablaj el la aserto, "Pro la unueco kaj senkonfuza ordo, kiuj estas por nia afero tiel gravaj, la libroj instruaj devas esti pedante konservativaj eĉ en la plej malgranda bagatelo!" Ankaŭ el la iom stranga frazo, "la eksperimentojn reformatorajn mi ĉiam tenis por danĝeraj por nia afero." Pludire, "Vi scias, kiel longe mi batalis kontraŭ reformado...sed bedaŭrinde la afero ne dependas de mi!

Ni ridetas pro la neĝuste elektita metaforo: "El gutoj fariĝas maro; sed se ĉiu konservos sian guton en sia poŝo..."; "utileco palpebla." Ni admiras la facile trafajn esprimojn: faktaj prenitaj el la aero" (groundless assertions); "nudavortaj (outspoken) malamikoj"; "la demando komencis ricevadi tute alian vidon"; "nin ĵetos" (luktarta termino figure uzata); "longa - parole"; "sinteni - povanta," "sensubtena," "sesa regna potenco" (the sixth estate).

De O.V. la leganto ricevas pensbildon de modesta, aminda geniulo, de homo honesta en ĉiu trakto, de entuziasmulo kiu tamen volis ke lia invento tratabu propran vojon per propra merito, de persista laboranto, kiu kun premitaj dentoj neniam lasis al si la koraferon rezigni pro deprimio. Tra la tuta libro iluminas lia animo, devige elvokanta profundan respekton eĉ de tiuj, kiuj ne persone lin konis. Tiu amo, kiun sentis ĉiu koro kontaktiĝinta kun la lia, estis la daŭra fonto el kiu ŝprucadis la flama fervoro kaj neŝancela fido de tiuj alte privilegiitaj homoj, kiuj kun li laboris.

Al ĉiu povanta elspezi 15 ŝilingojn libroaĉete, ni tre konsilas ke tiu konservu la verkon kiel ĉiamkonsulteblan amikon.

600 Pĝ. Pere de BEA.—(ROBO).

### POINTS IN THE ADVANCE.

Since the last issue we have learned— That the people's paper in Iceland, "Althjúbladid" almost every day prints an Esperanto chronicle.

That in Canton has been founded an Esperanto library with a capital of 6,000 dol.

That in the girls' school and technical school in Kiheku (Japan)

English has been displaced by Esperanto.

That 145,000 French francs has been collected for "La Maison de l'Esperanto" (Esperanto House) in Paris, an institute for the propagation of our language.

That in Persia, where a third of the intelligentia are Bahaists, Esperanto is striding ahead.

That at Kameoka and Ajabe (Japan), Oomoto townlets, the populations speak Esperanto!

That the Kommissar of Posts in U.S.S.R. has authorised two more Esperanto stamps.

That in Nijni-Novgorod (U.S.S.R.) 570 people, in 27 classes, have begun to learn Esperanto.

That Primo de Rivera, the Spanish dictator, visited an Esp. exposition and spoke very favorably of the language.

### UNUA NOV-ZELANDA ESP. KONGRESO.

Tre sukcesa afero.

WELLINGTON, 19an de jan-o. Grava paĝo en la historio de E-to en N.Z. verkiĝis ĉi-tie la 17-18an de jan-o, kiam la unua E-ta Kongreso sukcese okazis. Nia lingvo frape estis elmetata antaŭ la okuloj de la registaro, diversfakaj aŭtoritatuloj kaj la publiko. La gazetaro donis libere spacon (ok futojn entute) al la kunvenoj, precipe al la publikaj paroladoj, kaj raportoj telegrafe flugadis per la Pres-Asocio al ĉiu ĵurnalo en la Dominio.

Ĉeestis la kongreson membroj kaj reprezentantoj de la kluboj ĉe Auckland, Christchurch, Wellington, Masterton kaj Hamilton, delegitoj UEA el Wellington, Auckland kaj Feilding, kaj E-tists el diversaj partoj de N.Z., inter kiuj troviĝis pioniroj de 20-25-jara laborado por E-to. La lastjare fondita N.Z.E.A. ĉion aranĝis. Ĉirkaŭ 50 homoj partoprenis, kun la simpatio de sufiĉe granda nombro de forestaj aliĝintoj. Donacoj tre helpaj eniris la kason.

S-ro C. Adcock, prez. de NZEA, malfermis kongreson la 17an de jan. Jarraporto kaj bilanco akceptiĝis kiel atestoj de solida progreso.

Vespere propaganda kunveno, tre sukcesa. Urbokonsilisto Luckie prezidis. S-roj Adcock kaj F. Combs, M.A. (ĉefinstruisto ĉe lernejo en Wellington) donis brilajn alparolojn, kiujn la Preso raportis. Ĉiĉesvoĉe oni rezoluciis, ke oni altiru atenton de la registaro al la utiloj de E-to, kaj petu permeson oficiale lerni ĝin en la N.Z.-a instruejoj.

La duan tagon ĉiuj amuziĝis. S-ino A. Chapman-Taylor, kiu alestis kongreson malgraŭ sia 84-jara aĝo, sindone donacis valoran kolekton de tutmondaj p. kartoĵoj, inkluzive unu aŭto-grafita de Zamenhof kaj kelkaj nepozaj fotoj de la doktoro. Antaŭ 25 jaroj ŝi ekis arigi ilin, kaj dum 10 jaroj ame laboris super tiun plezuratan taskon.

Postkongresa kunveno de UEA, tute en E-to. Oni konsideris, kiel pligrandigi UEA-membraron kaj delegitaron en N.Z., kaj helpi forigi la deficiton de la viena kongreso de 1924.

La Dua Kongreso havos lokon en Aucklando Paskon 1931.

### KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro George Gordon, F.B.E.A.; sekretariino: f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, E.10., Melbourne.)

### TRADUKO 5.

#### INSULA ĜARDENO EDENA.

(daŭrigata)

La tempo pasas tre agrable por la loĝantoj en tiu izolita loko, kaj sciigoj pri la zorgoj kaj turmentoj de la ekstera mondo nur obtuze penetras en ĝin kvazaŭ tra vualo. Pro la eterna somero, reganta (2) ĉion, la vivado en tiu malproksima klimato estas tre agrable kaj forte efikas por enestigi en homon (8) tiun misteran, nedifineblan "ion," nomatan la allogo (3) de la tropikoj. (Fino)

#### MAJMULTE KONATA INDUSTRIO.

(el "The Press," Christchurch, Nov-Zelando).

Nur malmultaj homoj povas akiri aŭtentikan informon pri industrio propra sole al la suda parto de Nov-Zelando kaj al Tasmanio, kaj kiu donas okupon al tre pli ol tricent Maorioj dum du-tri monatoj ĉiujare. La industrio estas kaptado de "mutton-birds" (t.e. "ŝafaĵbirdo." Puffinus brevicaudus. 4). Kiam en Februaro de la jaro mil-okcent-sesdek-kvara la Maoriaj posedantoj (5) cedis al la Nov-Zelanda registaro Stewart Island (stjuart ajland) kune kun ĉiuj apudaj insuloj grandaj kaj malgrandaj, kelkaj el la insuloj samtempe estis rezervitaj, sub la protektado de la registaro, por la kaptado de "mutton-birds" de la Maoriaj vendintoj (5) kaj iliaj heredontoj (5). Ĉiu insulo havas propran historion. Okazas multa (12) eksciteco kiam oni disputas pretendatan rajton de iuj indiĝenoj al birdkaptado, ĉar la Maorioj gajnas multe da mono dum siaj ĉiujaraj vizitoj en

AN IMPORTANT DUTY

In order that the Editor may obtain a true reflection of the will of all those who receive "La Suda Kruco," he asks urgently that, by March 20th, (N.Z. members till 30th March) he may have before him a representative array of slips, on each of which is written the assertion favored.

- (1) I am willing to support "La Suda Kruco" by regular payment of the usual subscription.
- (2) I am willing to guarantee yearly the sum of £...s...d. to a fund for its permanent publication.
- (3) I am wishful of "La Suda Kruco" appearing henceforth as chronicle supplement to "International Language."

la insuloj. La koncernataj (2) homoj argumentas pri antikvaj intertribaj malpacoj, pri ĉefoj kaj parencecoj de tempo datumanta jam ĝis tricent jaroj antaŭe. En fruaj jaroj okazis multaj kvereloj (6), kiam Maorioj ne havantaj (2) heredan rajton de prapatroj insistis birdkapti sur la insuloj, sed en la jaro mil-naŭcent-deka speciala tribunalo, sidanta (2) en Invercargill (inverkargil), faris juĝon pri tio, kiuj estas rajthavantoj (5). Poste en la jaro mil-naŭcent-dudek-dua tribunalo sidis por difini la interesojn de tiuj, kiujn ne kontentigis la juĝo, farita (2) en la jaro mil-naŭcent-deka. Tiu tribunalo aljuĝis rajton al ĉiuj, kiuj povis apogi sian pretendon per kaj (7) heredeco kaj multjara kaptado. La industrio floris jam longe antaŭ la enveno de Eŭropanoj en Nov-Zelandon (8). Tiam la sudinsulaj Maorioj interŝanĝadis (9) la kaptitajn birdojn kontraŭ produktoj de nordinsulaj Maorioj kaj en malpli fruaj jaroj kontraŭ varoj (13) de la multaj balenkaj fokokaptaj ŝipoj, kiuj en tiu tempo vizitadis (9) Bluff kaj Stewart Island. Nuntempe la Maorioj ricevas po (10) ok ĝis dek pencoj por birdo, tial la plej spertaj kaj aktivaj homoj inter ili povas perlabori po (10) ĝis kvin funtoj sterlingaj en tago dum la birdkaptada sezono.

La supra diritaĵo klarigas, ke nur certaj Maorioj kaj iliaj (11) edzinoj kaj infanoj estas permesataj viziti la la insuletojn.—(daŭrigota).

NOTARO.

1. Skriberaro—En Suda Kruco, p<sup>o</sup> 110. L34. Anstataŭ "inĉoj" legu "coloj." 2. Adjektiva participo. Notaro 1/6.—3. "allogo" (ne "allogon," ĉar ĉi tie la substantivo estas predikata). Cox 109.—4. Notaro 4/8.—5. Substantiva participo. Notaro 1/9.—6. "kvereli," to quarrel. Vorto aprobita de la Lingva Komitato.—7. "both... and." kaj...kaj, aŭ "ne nur sed ankaŭ."—8. Akuzativo post "en," into. Cox 67 (2). Mill.—9. Sufikso -ad ĉi tie esprimas kutimon. Cox 270 (1). Mill.—10. Notu, ke "po" ne signifas "per"

sed "at the rate of." Cox 259 (22 aŭ 23). Mill.—11. "iliaj" (ne "siaj") edzinoj, ĉar tio estas parto de la subjekto de la frazo. Cox 135.—12. aŭ "multe da." — 13. "varoj," wares, goods, commodities. Vorto aprobita de L.K.—14. Ĵus eldoniĝis bonega lernolibro "Step by step in Esperanto" de C. M. Butler, tre lerta verkisto. La prezo en Londono estas 2ŝ. 6p. Ofte en ĉi tiuj notoj mi faros referencojn al ĝi, uzante la mallongaĵon "But."

KRONIKO.

Perth, O.A.—La ĉi tiea societo bone progresas. Laŭ jarraporto prezentita de energia sekretariino s-ino Sainsbury la anaro jam kreskis ĝis sesdek. Tri grupoj funkcias, kaj lernantoj faras kontentigan antaŭen-iron. F-ino Barclay kaj s-ro Wallace bonvole donacis librojn kaj gazetojn E-tajn por pliriĉigi la bibliotekon. S-roj Saar kaj Casey, f-ino Byatt kaj s-ino Easter instruas diversajn grupojn.

Antaŭ ne longe vizitis nin s-ro O'Donohue, antaŭe estimata prezidanto de Sidneja Esp-a Societo. Oni elkore lin bonvenigis. Vizitantoj ĉiam estas bonvenaj.

Post libertempo denove funkcias la "Westralian Esperanto Society." Meznombro da geanoj ĉeestis. Tri grupoj studadas:— 1. Elementary; 2. Intermediate; 3. Advanced. Ĉiu el la studantoj montras viglan inteligentan intereson pri la celo; pro tio la instruistaro kuraĝigas. Je la naua kaj tri-dek minutoj lecionoj ĉesas kaj la geanoj ĝuas muzikon, kantadon kaj amikan interparolon, ĝis la deka. 1. kaj 2. grupoj uzas la lernolibron de Helen Fryer, 3. grupo uzas "Cox's Commentary." Ĉiam la instruistaro kuraĝigas studantojn paroli esperante.

S-ro Saar faris paroladon, esperante, pri "la vivado ĉe Eucla." Li laboris tie tri jarojn tial la faradoj kaj okazoj inter la kelkaj geloĝantoj ĉe plej soleca telegraf-stacio apud la suda marbordo treege interesis la aŭskultantaron. La venontan kunvenon S-ro Caine parolos esperante pri la "Vivo de Zamenhof."



**Melbourne, Vic.**—En decembro kelke da anoj de la Melb. Esp. Societo sidis por la ekzamenoj.

La traduka rondo, je la dua mardo, daŭras kaj progresas, kaj s-ro Hudson ree gvidas ĝin post sia reveno.

Dum la pasintaj du monatoj, s-ro Hudson regalis la anojn per rakontoj pri sia restado en Hindujo. En la paroladoj li sekvis la vojiradon de sia vojaĝo kaj jam priparolis Bombay; Poona en la montoj; Mt. Abu, kiu estas notinda pro bela templo; kaj Udaipur, vera indiĝena ŝtato. Ĉe Amber oni konservas multekostajn tapiŝojn, kaj manuskriptojn en sanskrita lingvo, kiuj valoras tre grandan sumon. Oni starigis en Amber pli bele grandiozan monumenton pro la sankta elefanto ol pro la reĝino. Agra estas la urbo, kie troviĝas la Taj Mahal, tiu mirinda kaj grandioza konstruaĵo el blanka marmoro kun belege farita mozaiko, interne kaj ekstere. Neforgesebla spektaklo.

### FOUND BY ESPERANTO! Through an Australian.

When, one Sunday in last Spring, I was about to post a letter to my Australian correspondent, Rojo Worrall, of Abbotsford, N.S.W., I chanced to meet my neighbor, A. Loffler. Hearing the word "Australia" his face fell, and he told me of his brother's migration to that country in 1913 and of his sudden cessation in 1919 in writing home. He, together with his family, was very anxious to learn of the missing lad, but neither the consulates nor the police headquarters in the various cities could give any information on the matter. Moved by his story I seized the opportunity of mentioning Esperanto as a possible means of regaining touch with the lost migrant. Months passed, months of difficult searching, but at last, thanks to the untiring persistence of my Australian friend, the missing one was finally traced, for on 18th October I was able to hand to Loffler a communication from his brother, by this time given up as dead.

To my Australian friend, Rojo Worrall, who sacrificed many a free hour in this search, I render sincere thanks. My German friend, too, thanks him, not only for the recovery of his long-sought brother, but also for the fact that now he is an enthusiastic Esperantist.

(Trans. of letter by Willy Falke, member of Esp-grupo Neumark, Germ. to "Heroldo de Esperanto").

### AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitancas al la jenaj fideluloj. J. Parker, 4/6, nov., '30; f-ino M. Bush, 1/-; C. Wittenbach, 4/6, dec., '30; P. Paris, 5/-, dec., '30; F. Williams, 4/6 dec., '30; P. Holmes, 4/6, jan., '31; anonco de tiu sama, feb., '31, 30/-; Melb. Esp. Soc., donaco, 6/6; f-ino M. Helm, 4/6, junio, '30; W. Horne, 4/6, jan., '31; S. Clarke, 4/6, jan., '31 and 2/6 donaco; F. Thomas, 4/6, feb., '31; A. Saar, donaco 20/-; H. Hutton, 9/-, julio, '31; F. Bury (donaco) 5/-; W. Edmanson, 10/-, okt., '31; s-ro Johns, 5/-, dec., '30; s-ino McNab, 5/-, dec., '30.

### APPRECIATION BY "HEROLDO"

Says the "Heroldo de Esp-o": En la kvina kontinento Aŭstralio aperas **La Suda Kruco**. Kvankam ĝi estas gazeteto, kiel la redakcio mem nomas ĝin, vi certe konsentas kun mia opinio, ke en la suda duonglobo ni nepre bezonas ankaŭ Esperanto-organon, kaj ni ĝojus, se kreskus inter niaj antipodoj tiel la movado mem kiel ankaŭ la necesa gazetaro. „La Suda Kruco“ donas en sia oktobra numero unue daŭrigon de la historio de Esperanto, kaj en artikolo „Vojoj al mondlingvo“ estas fiksitaj kvar punktoj, kiuj povas konduki al tiu celo: 1. la kunfandiĝo de ĉiuj lingvoj; 2. la laŭgrada kultura kaj ekonomia hegemonio de unu lingvo super la aliaj; 3. akcepto de iu nacia lingvo por tia rolo, kaj 4. adopto per la potencoj de neŭtrala kreita helplingvo.

## SUBTENU LA SAMIDEANAJN METIISTOJN !

PERCY HOLMES  
Elektristo Kaj Radiisto.

Lumiloj, gladiloj, purigiloj, motoroj, ventumiloj sperte instalitaj kaj riparitaj. Se via radia aparato ne bone funkcias, tuj sciigu al P. Holmes, 212 Noone str., Clifton Hill.

Memoru—Por ĉio elektra.

Telefonu: JW 4017.

### KION FARAS ICK?

Respondo de s-ro Merchant.

Sur pĝ 116 sub "Budapest kaj la ĵurnalaro" ni plendis al I.C.K. pri la ignoro de Aŭstralio de la kabloservoj eŭropaj, en tio ke nenio venas al ni kable pri la universalaj Esp. kongresoj. Al nia plendo s-ro J. Merchant rekomenditeletere bildigas por ni la aferstaton. Skribas li:

"Unu el la plej fruaj laboroj kiujn mi mem entreprenis post mia elekto al la prezidanteco de ICK, estis peni plibonigi la aranĝojn ĉe niaj universalaj kongresoj por transsendo de novaĵoj al la div. landoj. En Budapeŝto s-ro Kreuz mem prenis sur sin la devon plifaciligi la laboradojn de la vizitantoj kiuj deziras fari raportojn ktp. Mi kredas ke ankoraŭ nenia plendo estiĝas pri liaj aranĝoj.

"Due, ni en ICK faris ĉion laŭpove por interesigi la presposedantojn en nia afero sed kvankam la lokaj ĵurnaloj multe helpis nin per bonegaj ĉiutagaj raportoj, la Presagentejoj ne opiniis ke nia afero estas suface grava por transsendi raportojn eksterlanden. Tial, raportoj devis esti transsenditaj je nia propra kosto. Ni havas treege malgrandan sumon da mono je nia dispono kaj tute ne posedas la rimedon sendi telegrame raportojn al la diversaj landoj. Mi mem pagis el mia propra poŝto por la sendado de kelkaj raportoj al la ĵurnaloj en mia loka urbo kaj ili estis presitaj, sed oni ne povas atenti la saman agon parte de ĉiuj kongresanoj. Multaj el niaj anoj volonte farus la laboradon senpäge por vin helpi per raportoj sed ili ne povas pagi la koston de la transsendado telegrafe.

"Se vi skribos al BEA por ricevi tujajn raportojn telegrafe pri la U.K. en Oxford, BEA volonte aranĝos tion por vi kondiĉe ke via societo aŭ ĵurnalo pagus por la sendado. Se vi nur deziras ricevi raportojn pere de la ordinara poŝto, kompreneble BEA mem pagus la koston.

"Kredu min, ke nia ŝajna malatento pri via asocio kaj lando ne estas nia kulpo. Estas ĉiam la manko de la monrimedoj. Post tralego de la rapor-

to pri la laborado de ICK dum la pasintaj dekdu monatoj, vi certe miros pri la grandaj laboradoj entreprenitaj je tiel malgranda kosto. Eĉ mi, kiu scias ĉion pri la afero, preskaŭ ne povas kompreni kiamaniere nia Ĝenerala Sekretario sukcesas fari tiom multe kiam li nur havas je sia dispono kelkajn milojn da frankoj.

"Eble vi iom plibone komprenos la pozicion kiam mi diras ke dum la pasinta jaro mi ricevis de s-ro Kreuz pli ol 2000 kopiojn de leteroj kiujn li, kun la helpo de nur unu helpantino, skribis al diversaj samideanoj pri mil kaj unu diversaj aferoj.

"Estas nia sincera deziro fari helpon al ĉiuj demandantoj sed kiam la plenumo de la demandoj kostas monon ni bedaŭrinde devas deteni nin, ĉar ni nepre devas limigi niajn servadojn al nia kaso.

Sincere la via.

J. MERCHANT,

Prez de ICK kaj de BEA.

### LA LIBRO PRI KIU PAROLAS LA MONDO.

La libro, kiu priskribas la militon, en plena realeco, sen plibeligo, kaj kiu pro tio estas plej bona propagandilo por la paco.

La plej aktuala libro de l'nuntempo en Esperanto.

La eldonejo de Heroldo estas aperigonta, okaze de la nunjara Librotago (je la 15-a de decembro), la faman verkon de Erich Remarque: „En Okcidento nenio Nova“ (All Quiet on the Western Front) en la Esperanta prilaboro de kvar spertaj samideanoj: ĉefred. Jung, red. Berger, Prof. D-ro Ellinger kaj instr. Hoffmann.

La verko de Remarque estas, kiel oni scias, la plej aktuala libro de la nuntempo—la libro, pri kiu parolas la mondo. En germanujo ĝi atingis dum mallonga tempo eldonnombron de 3 miliono da ekzempleroj, krom tio ĝi estas jam tradukita en dudeko da aliaj naciaj lingvoj.

Kio estas la sekreto por tiu tute unika sukceso de la libro de Remarque? Ĉar ĝi priskribis la militon tia, kia ĝi estis, en plena realeco, sen

### HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcianta fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

### Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

plibeligaj aŭ idealigaj aldonoj. Al la centmiloj kaj centmiloj da frontsoldatoj germanaj, francaj, anglaj kaj alilandaj ĝi refreŝigis la memoron pri la teruraĵoj travivitaj persone de ili, kaj entute en ĉiuj legantoj, kiuj ne estas en la katenoj de l' nacia ŝovinismo, ĝi elvokas flaman protestsenton kontraŭ tia abomeninda hombuĉado, kia estas la milito. Multo troviĝas en la libro de Remarque, kion ni esperantistoj povas plene akcepti kaj substreki. Pro tiu ĉi tendenco oni jam konsideris proponi ĝin por la Nobel-premio de Paco.

Estas kompreneble, ke tiatendenca libro trovis ankaŭ multajn kontraŭulojn en la naciista tendaro, sed tio kaŭzis nur plifamiĝon kaj ankoraŭ pli grandan disvastiĝon de la jam sen tio mondfama kaj tutmonde disvastigita libro.

La eldonejo de Heroldo devis fari grandajn streĉojn financajn kaj alispecajn por ebligi la eldonadon de tia aktuala kaj mondfama libro en Esperanto. Ni esperas ke la esperantistaro rekompencos nian kuraĝon per multnombra aĉeto de la libro okaze de la nunjara Librotago. Certe tiuj, kiuj ankoraŭ ne legis la romanon de Remarque en sia nacia lingvo, volonte ekkonos la verkon en la Esperanta traduko; sed ankaŭ tiuj, kiuj jam posedas nacilingvan eldonon, havos grandan profiton, komparante la Esperantan tradukon kun la nacilingva eldono kaj konstatante per tio la bonegan taŭgecon de la internacia lingvo eĉ por la traduko de tiel malfacile tradukebla verko, enhavanta multajn esprimojn ĝis nun tute nekutimajn en la literaturo de iu ajn popolo.

La libro estos presita sur bona blanka papero kaj enhavos laŭeble la portreton de la aŭtoro kaj malgrandan biografion. La prezo estos por la broŝurita eldono rmk. 5.— kaj por la bindita eldono rmk. 7.—

The following paragraph recently appeared in the "New Zealand Methodist Times," the editor of which, the Rev. Percy Paris, is a keen Esperantist:—"Internacia Metodista Ligo Esperantista, has been formed by Esperantists of the Methodist Church in Germany. Its purposes are (1) to spread the Esperanto language among the Methodists of the world; (2) to work together with other Christian Societies for mission work in Esperanto; (3) to translate or create and distribute Christian literature in Es-

peranto. All Methodist Esperantists are requested to join and help. Please address—Cyrill Jotow, 180 Ginnheimer Landstrasse (Prediger - Seminar), Frankfurt a.M., Germany."

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinlando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.





# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 117 (Tenth Year)

Melburno (Melbourne), Australio. 10 Marto 1930.

## BILL KING!

You've heard of the N.Z.E.A.,  
 And how its praises ring,  
 But do you know the dinkum truth  
 About a man named King?  
 He burns the midnight oil and works  
 Right through the dreamy night;  
 He does not care a tinker's curse—  
 He don't pay for the light!  
 He types and bangs night after night  
 While burglars elsewhere creep;  
 It does not trouble him at all  
 If other folks can't sleep!  
 He goes like mad—life is so short—  
 He acts like one obsessed.  
 He must have killed a Chinaman  
 For Bill King cannot rest!  
 He bangs the keys, the table creaks,  
 The houses sway and shake!  
 The police believe that he's the cause  
 Of Murchison's earthquake!  
 The mail comes to his house each day  
 Within a heavy sack;  
 Bill King just gives a hearty laugh  
 When postmen break their back!  
 When midnight sounds with shud-  
 dering clang  
 And ghosts in corners lurk  
 A devil enters into Bill—  
 The imp of Still More Work!  
 And when his head drops on his chest  
 And he begins to doze,  
 He pops dead matchsticks 'tween the  
 lids  
 So that his eyes won't close!  
 When Bill King dies and doctors come  
 To take a last X-ray  
 Upon his heart they'll find, I'm sure,  
 The sign "N.Z.E.A."  
 We're proud of our N.Z.E.A.,  
 We know it's going to win  
 Dominion-wide renown—because  
 Bill King is the king-pin!  
 B.P., Wellington.  
 1st Esperanto Congress,  
 18/1/30.

## ELTIROJ EL "ORIGINALA VERKARO DE L.L. ZAMENHOF"

..En la fino ni devas diri ankoraŭ kelkajn vortojn pri la financaj rimedoj de nia afero. Ili estas bedaŭrinde tre malgrandaj, kaj tio ĉi forte malrapidigas nian energian progresadon, por kio antaŭ ĉio estas necesa **mono, mono kaj mono**. Preskaŭ la tuta financa pezo de nia afero kuŝas nur sur la ŝultroj de unu oferema amiko, kiu kovras ĉiujn deficitajn. Ni petas la amikojn de nia afero pli forte subteni ĝin finance kaj peni altiri al ĝi **financajn fortulojn**....  
 (Prospekto, "La Esperantisto", 1893; O.V. 11. 67)

La plej malforta flanko de nia afero estas tio, ke ĝis nun ni ne havas ankoraŭ eĉ unu **riĉan** homon, kiu povus subteni nian aferon materiale. La tuta nia afero ĝis nun kuŝas sur la ŝultroj de personoj, kiuj havas bonan volon sed ligitajn manojn kaj neniujn rimedojn. Dume nia afero, por progresadi rapide, postulas grandajn rimedojn. Oni devus dissendi en la mondon grandan nombron da lernolibroj kaj agitantaj broŝuroj, oni devus donadi anoncojn, eldonadi verkojn k.c. Estas sendube, ke se ni havus materialajn rimedojn, nia afero irus cent fojojn pli rapide. Tial ni petas niajn amikojn peni, kiom ili nur povas, altiri **riĉulojn** al nia afero. Ankaŭ homoj kun konataj nomoj aŭ okupantaj gravajn situaciojn en la societo estas por nia afero tre gravaj; kvankam jam nun inter la amikoj de nia afero trovas sin kelkaj personoj tre altaj kaj influaj sed, pro kaŭzoj ne kompreneblaj al ni, ili bedaŭrinde sin ĝenas ankoraŭ ne sole fari ion publike por nia afero, sed eĉ elmeti malkaŝe sian nomon. La plej grandan utilon al nia afero alportos tiu, kiu

inklingos por ĝi iun riĉulon, kiu volus preni sur sin la tutan materialan flankon de nia afero. (Artikoletoj, "La Esperantisto," 1891).

.....Mi ne scias, kiaj estas viaj planoj por la estonteco, sed mi pensas ke antaŭ ĉio vi devas per ĉiuj fortoj peni fondi solidan kason, ĉar por sukcesoj en nia afero, tiel same kiel por milito, "estas necesaj tri objektoj; **mono, mono, kaj mono.**"

### REVUO DE REVUOJ de kribranta redaktisto.

Por interesi ne nur legantojn de alilandaj gazetoj sed ankaŭ la redaktistojn de tiuj, ni altiras atenton al jena takso. Ĉi tiu kritiko estas farita tute laŭ vidpunkto de homo serĉanta informojn pri Esp-a progreso kaj alispecajn represindaĵojn. Estas vere ke iuj malgrandaj gazetoj frape superas laŭ enhavoriĉo la amplekse pli imponajn.

Bonvenu al "Esperanto-Praktiko" pro ĝiaj valoraj lingvaj studoj. La eta "Socialisto" (Vieno) duone germanlingve verkita, enhavas en Esp-o trafajn traktojn pri lingvuzo, sed bedaŭre kun germanaj vortkomparoj, kio nebligas por ni represon. La "Litova Esperanto-Revuo," alte havinda nur pro sia kolumno de "Esp-o progresoj," elĉerpinda fonto sufiĉe ĝisdata. La belarte "Oomooto" eldonoj estas interesaj preskaŭ nur por tiuj ŝatantaj la koŝmecan religipensadon. Notoj pri la kinofila mondo donas plezurajn momenton. "La Belga Esp-isto," netforme aperigata tute en Esp-o, enhavas ĉiam legindan literaturaĵon kaj reklamojn de laŭtnomaj firmoj. Svenska Esp. Tidningen kaj "Nagasaki Junularo" estas preskaŭ tute nacilingvaj, tial neutilaj por ni. Ĉu ne la estiminda red. de "Dordrechta (Dordrechta?) Esp-isto" iom kompaktigis sian cetere bravan organon urban? "La Pola Esp-isto" kalkulas inter siaj verkistoj bone konatajn nomulojn en nia movado. Respektinda legaĵo. "Arbeiter-Esperantist," germanlingva, portas supleme "La Lernanton," sennaciecan sed simplastilan materialon por iomeprogresintaj. "Kataluna Esp-isto" supoze laŭ bontrovo ankaŭ aperas vestita preskaŭ tutkorpe per naci-idiomo. Same ĉe la trafe redaktata "L' Esperanto" de Italujo. "Orienta Revuo," impona, klare redaktata, ĉiam briligas la okulojn, sed post iom venas amara sento, ĉar ni sentas absolutan malpovon deĉifri ĉe vorteton el la sendube valoraj studoj japanlingve verkitaj. "La Verda Lumo," el Ŝanhaja E. Asocio, pleje hinlingva. "Hispana Esperanto," ŝat-

ata pro siaj librocenzoj kaj Esp. mondinformoj, kvankam ĉi-lastaj estas ordinare iom neaktualiĝintaj. Poezio ornamas ofte ĝiajn paĝojn. Kelkfoje ni vidas en ĝiaj prozaĵoj solecismojn kaj neglatan stilon. La bonegaj "La Movado" kaj "Heroldo" kompreneble estas por ni ĉefaj fontoj de informo. "La Bulgara Esp-isto" kaj "La Progreso" povus pli brili.

Ni interŝanĝus "Austria Esp-isto," "La Nova Epoko," "Marto," "Paris-Esperanto," "La Rejna Stelo." (Red).

### DU AMOJ.

(De Lord Alfred Douglas)

Dolĉa junulo malĝoja kaj ĝemanta, vi kial vagas ĉi belajn regnojn? Mi petas, diru vere vian nomon? Li diris: "Mia nomo—Amo." Jen tuj l' unua turnis sin al mi, "Mensogo," kriis, "Li nomiĝas Honto. "Mi estas amo; sola restis mi en ĉi ĝardeno bela, ĝis li venis kun trudo nokte. Mi estas vera Amo; plenigas mi per reciproka flamo la korojn de knabinoj kaj de knaboj." Ĝemante tiam diris la alia: "Laŭ via vol'! Mi estas tiu Amo, "kiu ne kuraĝas diri sian nomon."

El la Angla tradukis.—A. Delsudo.

### HEROLDO DE ESPERANTO SEMAJNA—INTERNACIA SENDEPENDA

Informofonto nepre aktuala, interesa.

Rakontoj, artikoloj, ilustraĵoj

Abonprezo: 15 germ. rmk.

Ĝus komencis la pri-Australia romano

"Anstataŭa Edzino"

de Lilian Pyke

Petu specimenon! Brusseler str  
94. Koln, Germanl.

### ESPERANTO EN FILMARTO!!

"Paramount" ĝus faris novan serion da parol- kaj kantantaj filmoj en 13 lingvoj. Ĉiu estis unuope farita, en koncernata lingvo, kaj elmontras famajn geaktorojn kaj aliajn personojn el diversaj mondpartoj. Esperanton ankaŭ oni uzis en ĉi tiu peno liveri al ĉiuj popoloj filmojn en komprenataj lingvoj. La filmoj estas unu- kaj du-partaj, kaj lingvoj uzitaj estas hispana, portugala, angla, finna, Esperanto, franca, itala, rusa, japana, sveda, germana, ĉeĥoslovaka kaj kimra. (Film Weekly, Sydney, 30/2/30.)

### TONGUE-TIED TALKIES.

Says the Musical News: "The talkies cannot remain international in the same sense as the dumb screen. Most of the world's darlings will for

the future, unless the old silent style of cinedrama continues to prevail—have to revert to the comparative obscurity of mere national darlings. Pola Negri will find herself more at home in a land that can understand her when she speaks. Gloria Swanson may be less congenial to the Czecho-Slovakians when she tries to tell them in words what the silent screen conveyed in brief texts. If the talkie is to become as international as the pantomimic play of the older cinema, either the tardy Esperantists will have to get terribly busy or the international language of music will bring us very soon to the definite stage of cineopera.... indeed...opera seems to be the one sure road for the talkies."

To those who regard as a foregone conclusion the acceptance by the world of English as the universal talkie language we would recommend a brief consideration of an enquiry opened by the Swedish newspaper "Dagens Nyheter" (Sept., 1929). Five Swedish language teachers, interviewed by the paper, strongly criticised the English of the talking films. Said Lector Erik Wellander: "My experience has taught me that of all European tongues English is the most difficult to comprehend, for its pronunciation is not clear. Both French and German are, in this relation, clearer than English. To make matters worse, the American dialect of the films, by reason of its extremely ear-baffling enunciation, directly hinders the progress of him who is trying to learn English."

Lector G. Lene (Stockholm) shares the opinion that the sound film is undoing the work of the teachers of English. "The talkie will give no help to the learner of English. Listening to "The Jazz Singer" I was compelled the whole time to sit with the program before my eyes, in order to understand anything of the spoken words. The American dialect used seems the bar to comprehension by foreign students of English, and I fear that its influence will be detrimental to such."

And Dr. Brilioth reminds us that the American dialect soundfilms have not succeeded even in England. The speech of Americans is constantly receding from standard English, and, in his opinion, it is only a question of time for the English language, as spoken on both sides of the Atlantic, to show the same degree of difference as is seen, for instance, between the

tongues of Sweden and Norway. In Sweden the talkie is enjoyed only by the few who have for years been fortunate in understanding spoken English; for the learner of that language it is of little use in its present stage, for the schools teach only the "King's English" of the educated Londoner."

In the judgment of many who have studied the principles governing language evolution, the phonetic simplicity of Esperanto is such that after some 40 years of international usage the danger of disintegration into dialects has assumed a position of relative remoteness. As a London writer in Dec. "International Language" testified; "I have spoken with Esperantists of more than forty nationalities, from Russians to Japanese, and Yankees to Finns, in all grades of proficiency, from the comparative beginner to the expert, and of all grades of education; and in every case I have understood them, and they me, with ease. The differences in vowels, consonants, rhythm and sentence construction were slight, and caused us no trouble. The second fact is that when a little time ago I went to an Esperanto Congress in Edinburgh, I had far more difficulty in understanding the English-speaking Scots than in understanding Esperantists from the ends of the earth. Esperanto is now being broadcast in nearly every European country, as well as Japan and U.S.A., and every broadcast is intelligible to the Esperantists everywhere."

This unity has been conserved by several factors, chief among which are (1) The essential simplicity of Esperanto itself; (2) The wise establishment of a language Committee, whose function it is to observe tendencies in the evolving tongue, to recommend usage calculated to ensure both unity and healthy expansion, to stamp as official those roots that general acceptance has already sanctioned; (3) Free circulation of international gazettes read from Kobe to Copenhagen; and (4) The consciousness on the part of all who speak Esperanto that simplicity and immediate comprehension form the one thing needful, a consciousness that keeps them ever on guard against the intrusion of national idioms.

Esperanto calmly awaits its undoubted trial at the "talkies"; its unchallenged successes in many another field have imparted to those who love it a confidence that will carry them to the full achievement of victory.



### GVIDLIBRO PRI MONTECATINI KAJ REGIONO (ITALUJO).

Jen turista kaj komerca direktilo nedubinde valora, dukolumne presita en itala kaj esperanto. Plena de reklamoj tiulokaj, kaj plenliste enhavanta adresojn de komercistoj, hoteloj k.c. la libreto 100-paĝa estas vere necesa por la tien-irona esp-isto. La legaĵo tute ne estas seka, sed estas bonguste kompilita de iu amanta la historion de sia regiono kaj interesan rakonton.

Lingve oni misuzas inter aliaj "asiston" (helpon); novaj radikoj estas "fasĉino" (allogpovo), primeco, targo, preposta, ascendo, termolejo. Priokupi (sin).

Interesitoj sin turnu al A. Paolet, S. Vito al Tagliamento, Italia. (Robo).

### ICELAND AND ESPERANTO.

As an example of the utility of Esperanto at the International Labor Bureau, we cite the case of the Iceland Co-operatives. The Bureau had many times endeavored to get information concerning the co-operative movement in Iceland, but without result. In despair, the chief of the co-operative service at the Bureau sent a letter in Esperanto to the Universal Esperanto Association in Geneva, asking that it be forwarded to its delegate in Iceland.

The result was complete success, for a detailed statement on the Iceland co-operatives was received by the Bureau, which was gratified to announce the position in its current publications and to complete on this point that part of its year-book given to co-operative organisations.

This new development has led to the Bureau's printing in its Bulletin a regular Esperanto page on co-operative matters, and sending this to all those co-operatives with whom it is in contact. A fruitful correspondence has already resulted from this departure, for the service at the Bureau has at its disposal a rich array of informative matter received in this way.

And so, with growing official recognition, Esperanto functions as the instrument of international communication.

Translated from "l'Eclaireur de Nice."

### YAKUTSK DEKTRI! A Radio Problem.

It is common knowledge that the ever-growing number of radio stations is making their certain identification a matter of real difficulty.

Last year the "Radio Magazine"

(Paris) published the result of an inquiry conducted by wireless amateurs in an effort to find the best medium for stations to convey their identity to foreign listeners. A system of call signs, unmistakable and simple in character, is urgently needed. So many and varied were the systems proposed that the magazine despaired of arriving at a satisfactory solution to the problem by means of its pages. Whereupon "La Maison de l' Esperanto," an association founded in Paris to facilitate relations for foreigners handicapped by the language barrier, decided to venture on a large-scale experiment. It believed the difficulty as to call-signs could be removed if the announcers, after giving the name of their stations, would add immediately after the name a number, assigned to it as a fixed designation, such numbers to be given in Esperanto.

Thanks to the help of L'Ecole Supérieure des P.T.T., La Maison de l' Esperanto was able to organise a public competition by radio, for which it set aside as prize money the sum of 5,000 French francs.

For two weeks it was announced at intervals that on 28 July a public competition on the reception of Esperanto numerals would be conducted over the air; that from the Eiffel Tower that day a list of twelve names of European stations would be dictated, a numeral in Esperanto to follow each name; that all the competitors needed to do was to send to the Maison de l' Esperanto, in figures, the list of the 12 numbers heard by them. In order to prepare the public for this competition the Maison de l' Esperanto gave a five-minute radio lesson on Esperanto numerals four times in the fortnight.

Here is the result of that experiment. Of the replies received 43% were correct; 32% erred in only one figure. One may, therefore, conclude that the non-Esperantist public can, after a few short preliminary lessons, understand and transcribe figures delivered in Esperanto.

This result was communicated to the French press and to the radio journals, all of which showed much interest in the matter. Surely this success calls for similar experiments in other European countries, with the object of dealing internationally with the undoubted barrier to immediate and unmistakable identification of the multitudinous broadcasting stations now operating throughout the world.

**A COMPLETE FILE OF "S.K."?**

For bibliographical purposes the Redakcio would greatly appreciate a line from any reader of "La Suda Kruco" who possesses a complete file of the paper from No. 1. Is there such a one? Thank you!

**LA NUNA KRIZO ĈE LA SUDA KRUCO.**

Voĉo el Sidnejo.

Skribas s-ro F. T. Simon: Denove grava financa krizo endanĝerigas ekzistadon de nia eta Suda Kruco. Kio nome putras ĉe nia Aŭstralia Esperantujo, ke eĉ ne tiel malgranda, relative facile produktebla gazeto povas daŭrigi sian bonfaradon? Simple, neagemo de legantoj!

En niaj manoj kuŝas bonega informkaj reklamilo—gazeto kiu utilas multcele en kaj ekster ĉi tiu vasta, potenca lando, sed ŝajne oni tion ne pripensas. Konsideru kiamaniere la modesta, 8-paĝa, sola Esperanta ĵurnalo kunligas diversajn grupojn en Aŭstralio kaj Nov-Zelando; konsideru kiamaniere novaĵo atingas legantojn pri lokaj aferoj same interesaj por ni kiel pli poste alvenantaj Eŭropaj sciindaĵoj; konsideru kiamaniere ni informas la Esp-istaron tutmonde pri niaj laŭblaj faroj; konsideru kiamaniere ni interesas la eksteran mondon pri nia alloga kontinento; konsideru centon da aliaj kaŭzoj, kiuj devus igi nin elpuŝi krimon, "La Suda Kruco devas ne malaperi!" Vekiĝu kaj subtenu kion vi nun havas!

Kelkiuj diras, ke estas jam tro da Esp. gazetoj. Tute ne, gesinjoroj, tiuj kiuj ekzistas jam montris sian taŭgecon kaj valoron. La Suda Kruco ekzistas jam naŭ jarojn kaj estas konata en Esp. rondoj ĉie. Verdire ĝi ne rolas grandĵurnale, sed estas sufiĉe grava por meriti daŭrigon. Ĝi donas fortecon al la movado, kaj ja pli ol senhavulan enterigon ĝi indas.

Ĉe ni aŭstralianoj kaj nov-zelandanoj sole restas solvo de nuna krizo. Ĉu vi nur disponas je kvar ŝilingetoj kaj duono unu fojon en ĉiu jaro? Ĉu vi povas tion pagi akurate? Ĉu vi povas instigi aliajn interesitojn (ankaŭ neesperantistojn) aboni por tiel malgranda sumo? Se tio estas malfarebla..... finfine ni lasu La Suda Kruco pereji, se ne, vekigi por streĉi vian eblon!

Flamiĝu en ĉi tiu tempo de bezono, disaŭdigu urĝan neceson helpi, rekomendu en via grupo ke ĉiu alestanto fariĝu abonanta, faru ion ajn, sed nepre sen tempoperdo!

(La redakcio danke ricevas promeson de s-ro Simon garantiĝi du funtojn jare ĝis la krizo estos forpasinta).

**GRATULON!**

Ni ĝojkore gratulas al Melburnanoj f-ino Hilda Dawes, s-roj Norman Perkins kaj A. Walford pro sukceso ĉe la diploma ekzameno de BEA.

**LA SUFIKSO -IG.**

La sufikso -ig estas ofte uzata ne-logike. Multfoje oni vidas "sonorigi, interesigi, terurigi, lokigi, konvinkigi, limigi, ĉagrenigi, finiĝi" anstataŭ la korektaj "sonori" (Ekz. 34), interesi, teruri (Marta 20/8, Ps. 27/1), loki (Marta 34/13), kolori (Rab. de Bah. 33/5), konvinki, limi (Marta 124/3, 153/9), ĉagreni, fini, ĉar ĉi tiuj verboj estas transitivaj. Estas vere ke iufoje en la fruaj verkoj de Zamenhof oni trovas "kolorigi," "limigi," tamen poste li uzadis la plibonajn (laŭ principo de sufiĉo) formojn sen -ig.

Oni povas transitive verbigi substantivajn radikojn per simpla ŝanĝo de fina O en I, kiel ĉe "koloro" (kolori), "krono" (kroni), "broso" (brosi); tial ni legas "brunruĝe koloritaj seĝoj" (Rab. de Bah. 33/5). Estas domaĝe ke ĉe Eliro xxv, 5, kie Zamenhof skribis "ruĝe koloritaj" la Bibli-reviziantoj ŝanĝis ĝin en "ruĝe kolorigitaj."

Oni povas transitive verbigi adjektivajn radikojn per uzo de -ig jenmaniere:— "bela" (beligi), "riĉa" (riĉigi).

**QUERY CORNER.**

Under this head are invited questions on Esperanto history, language and literature.

**St. in O.**—"Malpezkora" is clear and therefore good Esp-o. At the 5th Congress Zamenhof said "Kun koro iom peza." Compare "facilkora."

**Banto.**—"Lingvaj Respondoj" (57) informs us that "certa" has also the sense of "iu difinita," as in German, Russian, Polish and other tongues.

**Pedanto.**—"Suvreno" is the golden coin worth £1. Up to now "pundo" has been only rarely used, although it appears in "The Edinburgh Pocket Dict.," without authority.

**B. in To.**—The adding of -e to such adverbs in no way changes the meaning, and is only a point of personal style, adopted perhaps for rhythm or euphony.

**Memkonu.**—To translate "know thyself." "Konu vin mem," "Tre konu vin mem," or "Elkonu vin mem." See Kabe's "Vortaro," "Laŭ Sokrato la memkono estas la plej malfacila afero."

**Ajnulo.**—"Ajn" seems superfluous after "ĉiu," except possibly to accent „ĉiu." We think you would search

in vain Zamenhof's works for an example.

**Memoro in E.**—It is claimed that the first monument in a foreign country to a living man is that to Zamenhof in Franzenbad (Czecho-slovakia) 31 May, 1914.

**Pom in T.**—It is unnecessary to apply rigidly the rules of grammar when forming compounds, unless an ambiguity can arise by not doing so. One says "urbodomo," "pulsobato," not "urbadomo," "pulsabato," etc. Zam. wrote "unuenaskito" (Eliri 11/5), a noun formed by changing the final letter of "unuenaskita" (Eliri 4,22/23).

**Jes. in Bm.**—A "romano" is a novel in the English sense of the word. A "novelo" is a short fictitious story. "Stuffy," aermanka (Marta 76/23), premaera (118/18).

### AGENTS FOR S.K. WANTED!

The Redakcio would gladly hear from any willing to act as agents for La Suda Kruco in all places where Esp. societies are found. Such practical well-wishers, having received the number of copies asked for, would have the opportunity of prompting sales of our gazette at the meetings, either by disposing of single copies or enrolling new subscribers. This would be a highly valued aid at the present juncture, and would go far, perhaps, to stabilise our position. Antaŭdankon!

### RADJO KAJ ESPERANTO.

Esp-istoj sentas en si kontenton pro tio ke finfine prosperis al s-ro R. Rawson jam ricevadi preferatan hortempon sur la disaŭdiga programo de 3LO, nome, unu sabaton en ĉiu monato, je la 7.45a vespere. Notu pri 12a de aprilo kaj 10a de majo. La misordiĝo akompananta la pasintjaran ŝanĝon de la radjeja direkcio kaŭzis al nia peretera propagandisto iom da ĉagreno, nun feliĉe anstataŭata de konfida espero. En 1928 li respondis al 1,000 leteroj de interesitoj. Radjo estas ja grava flanko propaganda.

### ĈU VERE?

La plej alta falakvo en la mondo estas la Sutherland-falakvo en Nov-Zelando, kies akvo falas 1900 futojn.

Eĉ la dioj ne povas turni en malvenkon la venkon de tiu homo, kiu jam sin mem venkis.

Volas korespondi kun seriozaj pensantoj tutmondaj.

Curto Baste, Oliva, 28 (Sagrera) Barcelona, Hispanujo.

### ON COLLABORATION.

Short Esperanto articles and sketches, original or translated, dealing with some form of Australian activity, or describing some episode or characteristic of this country's varied life, would be thankfully received by the Redakcio for possible publication. The aim is to make the content of "La Suda Kruco" as diversely interesting and representative as possible, which end can be reached only by the willing collaboration of those conscious that success is rigidly conditioned by a common offering of time and travail.

### KRONIKO.

**Melbourne, Vic.**—Frue en la jaro, vizitis la Melb. Esp. Societon s-ro C. Clarke, prezidanto de la Canberra Esp. Societo; f-ino Naomi Byatt el Perth, W.A., kiu donis informon pri la tiea kongreso; kaj el Sidnejo, s-ro Thompson, iama sekretario de la Aust. Esp. Asocio.

En februaro kelkaj Esperantistoj vizitis la Ĉefan Telefonejon, kiu havas la plej grandan mane funkciigatan komutilaron en la mondo. La vizito estis tre interesplena, tiom pli ĉar la gvidanto povis paroli Esperanton.

S-ro P. Hudson daŭrigis sian paroladon pri vojaĝo en Hindujo, kaj montris du tre bele ĉizitajn pletojn el tiu lando. Post restado en Agra li vojaĝis al Delhi kaj survoje vidis amason da pavoj. Ĉe Delhi troviĝas vidinda turo konstruita antaŭ 400 jaroj, kaj ekster la urbo oni povas vidi la lokon kie okazis la kronado de Eduardo VII. Poste, s-ro Hudson vizitis Kalka kaj

## SUBTENU LA SAMIDEANAJN METIISTOJN!

### PERCY HOLMES

Elektristo Kaj Radiisto.

Lumiloj, gladiloj, purigiloj, motoroj, ventumiloj sperte instalitaj kaj riparitaj. Se via radia aparato ne bone funkcias, tuj sciigu al P. Holmes, 212 Noone str., Clifton Hill.

Memoru—Por ĉio elektra.

Telefonu: JW 4017.



Simla, en la montoj, kien la registaro iras dum somero. Ne estas uzata tie ia veturilo krom la rikshaw. Ankaŭ, sin trovas tie "Wild Flower Hall" kiun posedis la mortinta Lordo Kitchener. La domegon oni nun uzas kiel hotelo.

**Wellington, Novzelando.**—La loka klubo rekomencis agi por la kuranta jaro la 4an de Feb-o. Kuraĝige estas noti enskribon de sep novaj anoj—kredible rekta rezulto de la okazo niaurbe de la Unua N.Z. Kongreso. Je la kunveno en la lla de la sammonato, s-ro W. King (Sek. de N.Z.E.A.) transdonis al la klubo pro s-ro Geo. Gordon donacon de legindaĵo. La kunvenoj klubaj ankoraŭ konsistas el du horoj: unua por instruo, dua por praktikado de Esp-o per programeroj nialingvaj. La N.Z.E.A., kies ĉefsidejo estas en nia urbo, eldonis propagandilon en 3,000 ekzempleroj.

**Christchurch, N.Z.**—Je la 10a de Feb-o s-ro N. Bell, M.A. denove brodkastis pri Esp-o el radiejo 3YA. La jarkomenca kunveno okazis je la 11a de Feb-o.

**Masterton, N.Z.** — Post mallonga ĉesigo pro la festa periodo, la ĉi-tiea klubo denove ekfunkciis la 10an de Feb-o per komunakunsido. 16 anoj partoprenis. Akceptinte tre kontentdonan jarraporton oni elektis jenajn oficistojn:—Patrono, s-ro G. R. Sykes, M.P.; prez., s-ro Johns; vic-prez., s-ino McNab; sekretariino, s-ino L. Payne (8 Bruce Street); instruanto, s-ro A. Dewar. Dum la jaro la klubo kunvenos ĉiulunde je la 7.30a horo.

#### KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A., sekretariino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, E.10., Melb.)

#### TRADUKO 6

#### MALMULTE KONATA INDUSTRIO

(daŭrigata)

Tiuj en la nombro de ĝis tricent kvindek iras la insuletojn ĉirkaŭ la unua semajno en Marto, ĉar kontraŭleĝe estas loĝi sur ili aŭ viziti ilin esceptinte en la birdkaptada sezonon.

La Maorioj ekloĝas, ĉiu sur sia difinita insulo, ekipinte (2) sin por trimonata izoleco. La "domoj" preskaŭ ne meritas tiun nomon, ĉar la plimulto el ili estas "whares" kaj rapide konstruitaj barakaĉoj, tamen sufiĉe fortaj por ŝirmi la loĝantojn kontraŭ la pli rigora vetero.

La birdkaptada sezono estas el du partoj, kies unua parto komenciĝas la unuan tagon de Aprilo, en kiu dato la Maorioj komencas elfosi la birdidojn el iliaj kavernetoj en la tero. De ĉirkaŭ la dudek-kvina ĝis la dudek-oka de Aprilo ili ŝtopas ĉiujn kavernetojn bezonantajn (3) atenton por konservi ilin por la sekvanta sezono pro tio, ke la birdoj ne volas reveni al difektitaj kavernetoj. Nesama estas la metodo kapti birdojn en la dua parto de la sezono. Jam ĝis (4) tiam la junaj birdoj sufiĉe kreskis por iri el la (5) kavernetoj kaj etendi la flugilojn. La Maorioj en noktoj uzas torĉojn por allogi la birdojn, kiujn tiam ili senpene kaptas kaj mortigas. Estas diversaj manieroj por mortigi la birdojn, sed ordinare la indiĝenoj ekbatas ilin per bastono aŭ eĉ mordas la kolon. La kaptado ĉesas la tridekan (6) de Aprilo.

La moro de la "mutton-birds" estas stranga. En la lastaj tagoj de Septembro ĉiuj vizitas la insuletojn kaj purigas la kavernetojn por la venonta (3) sezono. Poste ili revenas por demeti la ovojn, nur po (7) unu por ĉiu birdo. La ido elkoviĝas ĉirkaŭ kristnasko, kaj tiam la gepatroj komencas serĉi mangaĵon por ĝi. Fine la ido fariĝas bulo de graso, kiu estas sufiĉa nutraĵo por subteni la vivon ĝis la birdido maturiĝas kaj povos zorgi pri si. Tiam la gepatroj foriras al lokoj sur la okcidenta bordo de Atlantika Oceano (8). La junaj birdoj ne povas sekvi ilin ĝis la tria semajno en Majo. Rimarkinde estas, ke la nekaptitaj (3) junaj birdoj povas realiĝi al la pliaĝaj, kiuj foriris el la insuletoj antaŭ ol ili. Kiam la birdoj vizitas la insuletojn en la sekvanta sezono la junaj birdoj alvenas antaŭ ol la pliaĝaj, kio montras, ke ili posedas seneraran instinkton pri loko kaj direkto. Preskaŭ en ĉiu sezono la birdoj reiras al la samaj kaver-

## HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

## Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

netoj. La Maorioj, broginte (2) la kaptitajn birdidojn, senpene ilin senlanugigas (9) kaj poste salas (9) kaj metas (9) en sakojn el mara vegetaĵo po dek ĝis cent birdidoj en sako. La nombro en sako iagrade dependas de la stato de la birdoj; mezgranda sako enhavas ĉirkaŭ kvardek ĝis kvardek kvin.

—(FINO)

#### NOTARO 6.

1. Preseraro. Traduko 4, L22; post "tridek" enskribu "kvin."—2. Adverba participo. Cox 211,c.—3. Adjektiva participo. Notaro 1/6.—4. "jam ĝis tiam" estas la ekvivalento de "by then." Kp. "mi jam ĝis nun (by now) trovis tiun, kiu malaperis" (Mart. 160/30). Kp. ankaŭ Ham. 118/29.—5. "la" ofte estas uzata anstataŭ poseda pronomo, kiam pro la kunteksto la senco estas klara. Ekz. 5. Cox 100.—6 "po" ne havas la signifon de la Angla "per" sed de "at the rate of." Ekz. 14/15, 14/16.—7. aŭ "je la trideka." Cox 68 (3b).—8. Mi pensas, ke tiu diro de la aŭtoro estas erara.—9. Rimarku la uzon de aktiva anstataŭ pasiva formo por eviti kunmetitan verbtempon. Notaro 1/4.

#### AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitanças al la jenaj fideluloj:—F. Simon, 5/-, junio, '30 kaj donaco 15/-; C. Adcock, 5/-, marto, '31; O. Behncken, 5/-, feb., '31; s-ro Archer, 4/6, feb., '31; W. Holloway, 4/6, feb., '31; f-ino L. Saw (donaco) 10/-; f-ino M. Bush, 4/6, feb., '31.

#### POINTS IN THE ADVANCE.

Since last issue we have learned—

That the "Anglo-Belgian Trade Journal" now publishes from time to time articles in Esperanto.

That M. Leon Berard, an ex-minister of Public Instruction in France, who was celebrated for his famous interdiction of Esperanto in French schools, has confessed his conversion to our language.

That the Ministry of Public Instruction in Greece has authorised the teaching of Esperanto in secondary schools.

That the Soviet Esperanto-Union has printed 30,000 Esperanto text-books and 20,000 dictionaries preparatory to its winter course.

That in Graz (Styria), Esperanto is now taught in the chief schools. Some 300 pupils attend the courses.

That the director of The International Labor Office, Mr. A. Thomas, informed a questioner that he was wholly favorable to Esperanto and that

the results attained by the use of that tongue at the Office were satisfactory.

That the Austrian Ministry of Traffic and Commerce has decided to print again its Esperanto prospectus.

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Novpreĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio*  
*Fondita en Julio 1920.*

---

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

---

**N-ro 118 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Australio. 10 Aprilo 1930.**

---

## ART AND ESPERANTO.

"A fitting medium, maybe, for science and commerce, but not for art, and beauty, and the things of the spirit." How often is this asserted by people who have not heard a word of Esperanto. This type is, however, shrinking in number as a result of radio broadcasting, which has brought to the homes of millions the ear-caressing euphony of our language. It is well to remind those concerned that only speakers with correct and pleasing Esperanto enunciation should be chosen for this form of propaganda.

Rather piqued by the frequent mention of Esperanto in radio programs, a certain "malsamideano" was heard to say, "We have a better world language than Esperanto—and that is Art. When the world hears by radio a sonata by Beethoven it needs no other auxiliary language."

True it is that music is a powerful factor in bearing upon the human spirit a consciousness of its oneness, but a few words of explanation as to the author or artist are helpful, a desideratum that calls for a spoken I.L. for world-broadcasting.

Were it not for the regrettable fact that comparatively few people can undertake foreign travel, architecture, sculpture and painting also could be for the peoples a common treasury of international culture, because the language of these is immediately understood by the eyes. Up to now the cinematograph has not helped much in this relation, but we may hope that plement to radio-audition, will bring the world before even the poor man's eyes.

All the arts are inter-related. In order to form a universal culture more is needed than the exercise of eye and ear. Thought and feeling find outlet

to expression in Literature, a form of art which, because of language diversity, might be likened to a thing of beauty in fragments among the peoples of the earth.

Here then is one of the highest uses of Esperanto—to make it possible for every people to bring its contribution to humanity's Treasury of Art-endeavor, not only in the form of translations from their masters but also by original literature on the unfolding of art and history in their respective countries.

With what relief the student of men and manners greets the light that Esperanto brings to bear on the folk life of this or that small nation, on its costumes and customs, its care for historic edifices and other witnesses to man's desire to clothe with permanence his concepts of the lovely. We follow with sympathetic interest such solicitude, for it is good to feel that we, too, share in the common possession of that beauty wherewith highsouled men have garlanded the world. We are brought to confess that no nation has a monopoly of a given form of art, that it is, indeed, difficult to rank any one people as the possessor of treasures that mark it as most appreciative of the beautiful.

Who would to-day seriously affirm that Esperanto is no medium for the expression of feeling? Had this been true it long ago would have fallen to sleep in the tomb-yard of dead systems. Instead of which, the language is athrill with all the vigor of life.

It has been Dr. Privat's task of the last two winters to explore the interplay of human emotions and the capacity of Esperanto for expressing it. The result of his enquiry will soon appear in print. What are his conclusions? That the feelings or emo-



tions of man are in a state of constant flux and flow. In their eternal refusal to remain unexpressed they are, as it were, ever leaping against and breaking down the vain restraints of language. New words are constantly needed to clothe the eternal procession of thought pictures set up in the mind by man's ever-restless faculty to conceive ideas that defy the meagre limits of the available terminology.

This line of language evolution is clearly seen in Esperanto, in which the fantasies of highly imaginative writers are finding successful and striking expression. In this way is being created a rich treasury of word forms derived from a comparatively slender stock of root words by the process of blending the various roots into compounds. This practice of word combination, unfettered by usage or idiom, makes of Esperanto a language for all purposes infinite in its possibilities of expression, a uniquely fitting mirror of the mind wherewith to reflect, as far as is humanly possible, the subtlest motions of the spirit.

We need have no fear that Esperanto will break down in some exigency of the future. Its ability to assimilate what it needs from the word-wealth of the world, its readiness to appropriate the best forms of expression that the collective mind of a dominant civilisation has hammered out, ensure to its onward march an undisputed road. (Expansion of essay by Dr. Privat in January "Esperanto."—Robo.)

#### ESPERANTO ON THE MARCH.

Since last issue we have learned

That at Preschen, a village in Bohemia, candidates for office of policeman must speak Esperanto.

That at Brussels 400 grammar-books of Esperanto have been distributed to the police.

That the Belgian Institute of Esperanto has just published Belgian literary anthologies in Esperanto, one originally written in French, the other in Flemish. They comprise over 600 pages.

That the "New York Times" has interviewed M. Ernest Archdeacon, president of the French Society for the Propagation of Esperanto, on the progress of Esperanto in Europe.

That M. Andre Baudet, fervent Esperantist, has been re-elected President of the Paris Chamber of Commerce.

That a complete bibliography of International Language (560 pages) has been published by the U.E.A. It

claims to be a uniquely detailed treatment of the history and evolution of the idea that culminated in Esperanto.

That the Social Democratic Party in Finland has placed itself behind the Esperanto movement.

That the Swedish Telegraph Service and the Stockholm Tramway Board have opened official Esperanto courses, with the aim of aiding foreign visitors to the coming Stockholm Exposition.

That the BEA sold 101 "Originala Verkaro de d-ro Zamenhof" at 15/-, in 3 months.

That in 1930 more than 1500 Esperanto broadcasts were made in Europe from 68 stations in 15 countries.

That 1000 "All Quiet on the Western Front" in Esperanto were sold in 2 months.

That Oxford University has followed Cambridge, in forming an Esperanto Society. It has received official recognition from the Univ. authorities.

#### KURSO PER TRADUKADO.

We much regret that owing to our not receiving copy from New Zealand, Mr. Gordon's translation course must be omitted from this issue.

#### GRATULON.

al s-ro Stanley Bishop, kiu sukcese kaj honore eltenis ĉe la diploma ekzameno BEA. Brave!

#### El "Originala Verkaro."

El letero al Vladimir Majnov. 3.viii. 1889. Estimata amiko! .....El Aŭstralio, kiom mi memoras, mi ricevis leterojn internaciajn el Melbourne kaj el unu urbeto proksime de Sydney; sed de tiuj sinjoroj mi ne ricevis nek formalan promeson nek adresojn, kvankam iliaj leteroj estis skribitaj tre varme.....—L. ZAMENHOF.

#### OUR ADDRESS

Is "La Suda Krucio," 731F, P.O., Elizabeth-str., Melbourne.

#### AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitanças abonojn kaj akceptas kun vera korsalto la sindonajn donacojn al nia kaso parte de jenaj fideluloj:—F-ino E. Carrick, 4/6, marto, '31; kaj 3/- donaco; H. Byatt, 40/- (garantiaĵo); Hobart grupo, 30/-; D. Guilbert, 20/- donaco; s-ino Lloyd, 4/6, junio, '31 kaj donaco 1/6; E. Pryke, 4/6, marto, '31; prof-o R. Woodhouse, 4/6, marto, '31; H. Davies, 4/6, marto, '31; f-ino C. Bridge, 4/6, marto, '31; f-ino J. Orr, 4/6, marto, '31; R. Pike, 4/6, marto, '31; f-ino A. Bennett, 4/6, okt., '30; R. Clarey, 4/6, aprilo, '31 kaj 10/-

donaco; s-ino Butler, 5/-, aprilo, '32; f-ino H. Conwell, 4/6, majo, '31 kaj 2/6 donaco; s-ino Purnell donaco 10/-; A. More, 5/-, julio, '31; Christchurch Club, 5/-, julio, '31; f-ino Trice, 4/6, marto, '31.

### SKRIBU TUJ!

al la oficejo, por ke vi ricevu  
S E N P A G E

kaj afrankite la specimenojn de la  
ESPERANTA GAZETO

"O O M O T O"

antaŭ ol vi ĝin abonos.

Oomoto Propaganda Oficejo  
Kameoka, Kioto-fu, (Japanujo)

### THE GUARANTEE FUND.

Gratefully the Redakcio acknowledges receipt of promises from the following wellwishers of our gazette: Mr. H. Byatt, £5; Mr. F. Simon, £2; Miss L. Saw, 5/6; Mrs. Trundle, 10/-; Miss Conwell, 2/6; Mr. N. Perkins, £1.

### FULL FILES OF "LA SUDA KRUCO."

We have learned that Mrs. Purnell, and Miss Hopton, Esperantists of long standing, and faithful friends of S.K., have complete files of our little gazette. We congratulate these ladies on their care in conserving this publication intact, and commend the interest in our work that prompted it.

### LARGE-HEARTED MOVE BY SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

The above society has forwarded to us the sum of £2/13/-, proceeds of a dance held on the eve of 27 March, as an expression of its good will to La Suda Krucio in its fight for an assured position on the list of firmly established Esperanto gazettes. Thanks are specially forwarded to Miss J. Orr and Messrs F. Simon, Rutland and Torr, for their generous attitude and active interest in this matter. We wish bon voyage to our "sambatalanto," Mr. Rutland, who has left for Oxford, where he will attend the Universal Congress.

### KRONIKO.

**Sidnejo, Nov-sud-kimrujo.** — La 9an de aprilo, per vaporŝipo Orontes, forvojaĝos nia estimata samideano, s-ro V. Rutland, por reprezenti la Sidnejan E. Societon ĉe la kongreso en Oksfordo. Je la ĉiumonhata danco de la klubo la 27an de marto la anoj lin adiaŭis, kaj donacis oran horloĝeton por manradiko. Ĉeestos la kongreson ankaŭ tri aliaj sam-oj—gesroj. Hart kaj s-ro Barnett.

En marto, laŭ aranĝita sesmonata programo de la SES, parolis jenaj sam-oj: s-ro E. Pryke, pri Muzikinstrumentoj; f-ino H. Anderson pri Du Libro; kaj s-ro I. Serišev pri La Stato de Moderna Japanino. Aparte interesa estis la lasta temo, pro tio ke s-ro Serišev antaŭ ne longe vivis trijaron en Japanujo kaj el sperto do povis paroli.

Marte la klubo enregistris feliĉsente plurajn membrojn novajn; en unu vespero klubaniĝis kvar ges-roj. Unu ĵus aliĝinta, profesoro R. Woodhouse, portas valoran forton al nia klubo, ĉar krom fakto, ke li antaŭlonge studis E-ton en Dublino kaj Londono, li posedas belan kantvoĉon, per kiu li ĉarmis nin, kantante ĉe la lastaj du festvesperoj.

La 17an de aprilo ekzameno por la BEA diplomo havos lokon. Iuj verdsteluloj vizitante Sidnejon por paska ferio, certiĝu, ke ni bonvenigus ilin elkore. Espereble ili partoprenos en la ekzameno.

**Perth, Okcidenta Aŭst.**—Spite de tre varmega vetero ĉe ni, la fidelaj anoj ĉiam ĉeestas la kunvenojn por ekzercaĉi sin je nia lingvo. Nin vizitis f-ino Hibberd, kiu ĵus alvenis de Anglujo, ŝi estas ano de Croydon-apud Londono Societo, kaj intencas resti en O.A. En la nomo de nia societo s-ro Saar bonvenigis la vizitanton. F-ino Hibberd taŭge respondis per mallonga parolado, per kiu ŝi transdonis saluton al nia grupo de la Croydon anoj.

**Melbourne, Vic.**—S-ro P. Hudson reedonis plezuron al Societanoj per plua rakonto de vojaĝimpresoj en Hindujo. Li komencis priskribon de Amritsar en la nordo, urbo kies konstruaĵoj estas sole el brikoj. Vidindaj ĉi tie estas granda tapiŝfabrikejo en kiu laboras 800 homoj; kaj la "Ora Templo," kiu staras sur insulo meze de akvujo. Li revenis de Amritsar ĝis Lahore kaj de tie al Rahal Pindi. De tiu urbo li veturis aŭtomobile laŭlonge de tre serpenta vojo al Murree, kiu troviĝas sur monto je alto de 6700 futoj. Bela panoramo estas videbla de tiu loko, kiun li lasis por sekvi la riveron Jehlam ĝis Baramura, kiu sin trovas apud rivero. Je distanco de cent mejloj, belaj altkreskaj poploj kreskas ĉe la bordoj de la rivero. Li poste vizitis Srinagar, kiu estas la ĉefurbo en la bela distrikto Kashmir. Estas reĝa palaco tie, kaj en la ĉirkaŭaĵo oni povas vidi la belan spektaklon de lago kun amaso de diverskoloraj lotusoj facile naĝantaj sur la supraĵo. Sur la kanaloj troviĝas multe da boatoj, sur kiuj oni konstruas ĉambrojn. Ĉi tiuj meblitaj kvazaŭdomoj estas lueblaj je malalta luprezo kaj multaj familioj loĝadas en ili. S-ro

Hudson finis la interesan rakonton per monstro al delikata skatolo el alabastro tre lerte ĉizita.

Gratulojn al jenaj gesamideanoj, kiuj sukcesis en la ekzamenoj ĉe la Melb. Esp. Soc. antaŭ Kristnasko.—S-ro Bishop gajnis la diplomon kun honoro. F-inoj Mitchellson, H. Bostock, kaj Kensley, Mervyn Bishop kaj s-ro P. Holmes (kun honoro) sukcesis en la Unua Ekzameno. Gratulojn ankaŭ al la instruantoj pro la 100% sukceso.

### QUERY CORNER.

Under this head are invited questions on Esperanto history, language and literature.

S-ino L.P. in M.—Good! Keep on with reproduction of "Suda" pars.

S-ro B. in B.—Your use of "pagenda" is correct. The suffix -end (used by some writers, but not yet approved by the Language Committee) has the meaning of "kio nepre devas esti —ata (ita)." "Kartago estas detruenda!" (It is imperative that Carthage be destroyed!)

Bek. in To.—The principle of one word one meaning is not and never was a feature of Esperanto, although some writers have claimed the contrary.

P. "Strofo," a verse of the Bible, a hymn, a poem, etc., but "verso" means a line of poetry.

Nov. in C.—The first edition of the New Testament was the translation of one man, Rev. C. Rust, revised, as to the Esperanto only, by Alfred Wackrill. The present edition, the labor of several scholars, would seem to be more faithful to the original Greek and more trustworthy in every respect.

### U.E.A. MEMBERSHIP.

Germany leads with 1403 members, Czechoslovakia second with 1361, then comes Britain, 745, France 633, and Holland 449. Australia has 132.

### BOOKS PRIZED BY THE AKADEMIO (1914-30).

"Estu homo," by Charles Wagner, translated by S. Meyer; "Rikke Tak Tak," by H. Conscience, trans. Pose-naer; Luyken's "Mirinda Amo" (original); Balzac's "La Vendetta," trans. Merckens; "Rolandkanto," trans. Dr. Noel; "Herman and Dorothy" (Goethe), trans. Kuster; "Idoj de Orfeo," (original), by Bulthuis; Baghy's "Preter la Vivo"; Petolfi's "Johano la Brava" (trans. Kalocsay); "Kataluna Antologio"; Baghy's "Dancu Marionetoj!" Haggard's "Luno de Izrael" (trans. Butler and Payson).

### PRI VIA VORTKONO.

Bedaŭrinde estas al ni neeble speciale klarigi ĉiujn vortojn, kiujn la unu aŭ alia leganto ne komprenas, precipe se ni ne scias, en kiu artikolo ili aperis. Leganto de aktuala Esperanto-gazeto aŭ -libro devas posedi sufiĉe ampleksan vortaron novtempan. Krom tio li devas mem iom pripensi pri la signifo. Ofte iu ŝajne nekonata vorto estas nura kunmetaĵo (ekz. rest-ero, dom-alta, fig-aro, anal-isto) aŭ ĝi estas preseraro (otero anst. etero, saŭkta anst. sankta k.a.); kelkfoje la kunteksto klarigas la sencon. Sed ekzistas vortoj aŭ esprimoj (sciencaj, teknikaj kaj similaj), kiujn eĉ la redakcio ofte ne komprenas. Ni devas ĉe tio fidi la fakkonon de niaj sciencaj, teknikaj aŭ similaj kunlaborantoj. Cetero, kiel ni jam foje rimarkis, ĉu oni ĉion komprenas, kio estas presita en la nacia lingvo? Eĉ tute perfekta esperantisto renkontas esprimojn, kiuj restas al li nekompreneblaj. Pro tio neniu (nek komencanto nek progresinto) rezignos entute la legadon de gazeto aŭ libro.—El "Heroldo de E."

### LA SKRIBMASINO DE MIA PATRO.

Ĝi staris sur kverka tableto apud fenestro en nia manĝoĉambro. Vespere ĝi estis alŝovata al la lumo de l' supertabla lampo. Tage ĝi laboradis nur dum kelkaj horoj, sed ĝia vera vivo komenciĝadis vespere. La frapbrudo de ĝiaj etaj klavoj estis por mi kvazaŭ lulkanto; io mankis al mi kaj la dormo forkuris dum maloftaj vesperoj, kiam ĝi staris silenta.

Ĝi estis mia bona, honesta amiko. Mi al kutimiĝis al ĝia unutona melodio, en kiu la frapadon de l' klavoj interrompatis bela sonoro, anoncanta finiĝon de la linio, kaj grinco de la tirilo; ĝian lignan kovrilon miaj pupoj ĉiam opiniis tre oportuna veturilo.

Mi preskaŭ ne memoras la tempon, en kiu ĝi ekokupis la lokon en nia domo. Fluis jaroj—ĝi ĉiam laboradis senlace, estante ne nur maŝino, sed preskaŭ amiko de mia patro. Amiko neniam senpacienciĝanta, neniam malesperanta, sed ĉiam fidela, ĉiam esperiga.

Komence mi estimis ĝin, kiel aĝan, seriozan amikon de la familio. Poste mia rilato fariĝis pli intima. Mi stariĝadis apude kaj kun intereso rigardis la laboradon de ĝia meĥanismo. Fine mi kuraĝis sidiĝi sur tabureto kaj ekfrapi la klavojn, ĝojante, ke la literoj estis multe pli belaj ol tiuj, kiujn skribis en kajero mia mallerta mano. Sed mia unua vera



ĝojo estis, kiam mi maŝinskribis ekzercon kaj fiere montris ĝin al mia instruistino. Mi estas certa, ke nur tial ŝi ne tre admonis min pro eraroj, kiuj en alia okazo kaŭzus ŝian severan mallaŭdon.

Mi kreskis, pasadis de pupoj al fabeloj, de fabeloj al ĉiam pli realaj rakontoj, ĝi — la maŝino — senĉese laborante, rakontadis per sia unutona voĉo ĉiam la saman historion.

Dum unu vintra vespero, kiam post pacienca, sepjara laborado mia patro finis ian gravan verkon, en nia loĝejo bruus gajaj ridoj, gratuloj, babiloj. La maŝino staris trankvile, silente en sia anguleto. Kaj en mian infanan cerbon venis la penso, ke se mi estus la maŝino, mi sentus min ofendita pro tiu forgeso dum tiu solena vespero, kiun mi ja helpis alproksimigi. Sed la senviva maŝino estis pli alta ol homaj koleroj kaj ĵaluzoj, kaj jam la sekvintan tagon ĝi kantis per sia kutima melodio novan kanton de laboro.

Tiel ĝi senlace laboradis dum multaj jaroj—sed pasis la feliĉa tempo. Ĉiam pli ofte ĝi staris silenta ripozanta kontraŭ sia volo kaj kontraŭ la volo de l' homo, kies koron dolorigis la okazintaĵoj de l' ekstera mondo.

Venis la momento, ke rigidiĝis la fingroj, kiuj movigadis ĝiajn etajn klavojn... Ĝi staris en sia anguleto, kovrita per nigra kovrilo. Ĝi staris trankvila, indiferenta, nenion sentanta—la maŝino.

Monatoj pasadis. Sur la kverka tableto la maŝino staris—fermita. Longe mi hezitis, antaŭ ol mi kuraĝis levi denove la kovrilon. Kaj ŝajnis al mi tiam, ke mi levas kovrilon de ĉerko...

Mi ekfrapis — resonis la klavoj. Malrapide, malkuraĝe, kvazaŭ kun miro, kiel homo, kiu vekiga post longa dormo kaj demandas, kie li estas, kiuj estas tiuj, kiuj lin ĉirkaŭas. Kaj ĝiaj senvortaj sonoj ŝajnis vortoj de kunsento, eble la plej kortuŝaj...

Dek jaroj pasis. La malnova maŝino staras sur sia tableto. Kompare kun la lastaj sistemoj ĝi ne prezentas grandan valoron. Mankas kelkaj gravaj aranĝoj kaj stenotipistoj rigardas ĝin komplete, preskaŭ malestime. Mi tamen respektas ĝin. Kaj kiam mi deprenas la kovrilon, kvazaŭ ridetas la amika vizaĝo kaj antaŭ, la okuloj hele brilas la surskribo, ĉizita sur la maŝino: "Ni laboru kaj esperu."

#### LA TAKTO

Kio estas takto? Ĉar la granda Esperanta Vortaro ne jam aperis, ni

malfermu la Vortaron de Kabe. Ni trovas la jenan difinon:

**Takto.**—Arto konvene agi kaj paroli kun aliaj personoj, konforme al la cir-konstancoj.

Mankas ekzemplo. Sed ni opinias, ke la jena povas servi:

Plumbisto eniris en banĉambron, en kiu sinjorino, forgesinte ŝlosi la pordon, sin banis. La plumbisto trankvile eliris, dirante: "Pardonu, sinjoro, mi ne sciis, ke vi estas tie ĉi."

#### NOBLA KAJ MALAVARA AGO DE ZAMENHOF.

Estis en septembro 1909, en Valencio, post la Universala Kongreso de Barcelono. En la Palace Hotel, kie loĝis D-ro Zamenhof, ia familio sin prezentis al li kun la peto, ke li operaciu je la okuloj malsanulon, jam kuracitan sen sukceso de aliaj kuracistoj. La familio petis, petegis la Majstron, ke li esploru la malsanulon. D-ro Zamenhof devis pro tia granda insistado kaj en bonfara celo plenumi tian peton, sed li trovis sin en la embarasa situacio, ke li estas fremda kuracisto ne havanta operacian ĉambron, nek la necesajn ilojn. Feliĉe samideano okulisto, D-ro Aguilar Blanch, proponis sian ĉambron kaj ilojn al D-ro Zamenhof, kiu faris tre sukcese la petitan operacion.

La familio plej kore dankis kaj demandis pri la honorarioj. D-ro Zamenhof rifuzis ion akcepti. La familio kyazaŭ ofendiĝis pri tio, ke li ne volas akcepti la rekompencan por la altrudita operacio, kaj la insistado de la familio estis tiel prema, ke D-ro Zamenhof devis akcepti sian honorarion. Li tuj donacis ĝin por la kaso de la Valencia Esperantista Grupo.

—El "La Movado."

#### LA ĈEKOJ DE RUDYARD KIPLING.

Oni scias, ke la aŭtografoj de Rudyard Kipling havas grandvaloron komercan. Tial Kipling volonte subskribas ĉekojn, kiam li devas pagi malgrandajn sumojn, kaj li kontente konstatas, ke multaj posedantoj de liaj ĉekoj ne iras por postuli la pagon de la sumoj, kiuj estas ŝuldataj al ili.

#### LA TEMPO MATURIGAS.

Unu el la iomete konataj lingvaj projektoj, kiu aperis antaŭ kelkaj jaroj, nome "occidental," jam forte malantaŭenmarŝas. La red. de la sola occidentala gazeto en la lasta n-ro sciigas al sia legantaro, ke la gazeto, dum 1929 aperinta monate, en tiu ĉi jaro aperos nur en ĉiu dua monato.—Kiom longe ankoraŭ?

## DETRUO DE MARBIRDOJ PER OLEA FORJETAJO.

Kun la alveno de oleobrulaj ŝipoj venis ankaŭ terura minaco por la birda vivo de la maroj. La ŝipoj malsargas en la maron sian uzitan oleon, dikan gudrecan substancon. Ĝi rifuzas subiri, kaj kolektiĝas sur la supraĵo de la akvo en grandaj masoj, kiuj flotas tien-reen, portante morton al fiŝa kaj birda vivo. Kiam la birdoj kontaktiĝis kun tiu substanco ili ne plu havas ŝancon de vivo. Ĝi algluiĝas al ilia plumaro, tiel ke ili povas nek naĝi, nek flugi, nek havigi al si nutraĵon, kaj ili disbatiĝas de la ondoj ĝis la morto finas ilian turmenton.

En 1926 la marpotencoj okazigis Konferencon en Washington pri la temo, Olea malpurigo de la maro, kaj oni redaktis konvencion kiu pledis por leĝo malpermesanta eligon de eluzita oleo en regiono malpi ol 50 mejlojn malproksima de iu ajn marbordo. Tiu konvencio tamen ne estis subskribita.

La Reĝa Societo por la Protekto de Birdoj opinias, ke la plej kontentiga solvo estas instalado de ole-apartigilo sur ĉiu oleobruliga ŝipo, kaj multaj britaj ŝipkompanioj jam faris tiun paŝon. Tiuj maŝinoj apartigas la oleon de la bilĝo, pretigante la oleon por refoja uzo, tiel ke nur la nemalutila bilĝo pumpiĝas en la maron. La bezono por instalado de ole-apartigiloj fariĝas ĉiutage pli urĝa. Kun celo direkti publikan opinion al tiu demando, la Reĝa Societo por la Protekto de Birdoj preparis glumarkojn kun la vortoj: "Insiste petu, ke la ŝipposedantoj instalu oleon apartigilon, por savi la marbirdojn" en lingvoj angla, franca, germana, itala, hispana, kaj Esperanta. La Societo volonte sendos al iu provizon, se tiu sciigos al 82 Victoria-st., London, S.W.1., la kvanton utiligeblan.

### MODELA TEKSTO.

El Fund. Krestomatio, kvina eldono, p. 268.

Ĉiuj ideoj, kiuj estas ludontaj gravan rolon en la historio de la homaro, havas

ĉiam tiun saman egalan sorton: kiam ili ekaperas, la samtempuloj renkontas ilin ne sole kun rimarkinda obstina malkonfido, sed eĉ kun ia malklarigebla malamikeco. La pioniroj de tiuj ĉi ideoj devas multe batali kaj multe suferi: oni rigardas ilin kiel homojn frenezajn, infane malsaĝajn, aŭ fine eĉ rekte kiel homojn tre malutilajn. Dum la homoj, kiuj okupas sin je ĉia plej sencela kaj plej senutila sensencaĵo, se ĝi nur estas en modo kaj konforma al la rutinaj ideoj de la amaso, ĝuas ne sole ĉiujn bonojn de la vivo, sed ankaŭ la honoran nomon de instruituloj aŭ utilaj publikaj agantoj. La pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion krom moko kaj atakoj... la unua renkontita gazeta felietonisto skribas pri ili spritajn artikolojn... kaj la publiko, kiu ĉiam iras kiel anaro da ŝafoj post la kriemuloj, ridegas kaj ne faras al si eĉ por unu minuto la demandon, ĉu ekzistas eĉ guto da senco kaj logiko en tiuj spritaj artikoloj".—ZAMENHOF.

### RECENZO.

#### Kengott's Esperanto Course.

The author, Mr. Kengott, of Texas University, asserts that this 180 pp. book is a practical Esp-o course for beginners, based on sound pedagogical principles and written by a teacher of academic standing, actually engaged in the teaching of modern languages. Although not "complete"—no beginners' course is complete—it truthfully claims to furnish the student with the essentials for a sound working knowledge of Esp-o. Much opportunity is provided for mental gymnastics in an effort to prevent mere parrot-like rendition of what has possibly been absorbed but not digested. The principle of reviewing the material of previous lessons in the form of questions asked by the teacher is not an original feature, but obviously a sound one. The index and vocabulary given are helpful.

After reading that Dr. E. Privat and P. Stojan, L.K. painstakingly and cautiously examined the proof-sheets, one feels diffidence in venturing any adverse criticism. Indeed, there is little

## SUBTENU LA SAMIDEANAJN METHISTOJN !

PERCY HOLMES

Elektristo Kaj Radiisto.

Lumiloj, gladiloj, purigiloj, motoroj, ventumiloj sperte instalitaj kaj riparitaj. Se via radia aparato ne bone funkcias, tuj sciigu al P. Holmes, 212 Noone str., Clifton Hill.

Memoru—Por ĉio elektra.

Telefonu: JW 4017.

to query in this latest production of our tireless Texan pedagogue, and nothing to seriously challenge.

Mr. Kengott informs the learner that E is pronounced as in "angelic," U as in "ruse," and H as in "loch," or Spanish "jota." True, the book is designed primarily for Americans, but we would remark that Englishmen pronounce "loch" as "lock," and few indeed have any idea of the sound of "jota." 20. Ili loĝas en la sama strato, tiel, ke (tial), P. ofte povas viziti ilin. 33. Blovas milda venteto, tiel, ke (tial), oni ne suferas pro tro ega varmo. 30. Komunikas ekzaktan ideon (donas precizan ideon); 31. facile, eas(il)y (why parentheses?); homo, "a human being" rather than "man"; 61. signoj (simptomoj); 80. La besteto opiniis, ke la leono volis (as) (is wishful, or, had wished?) ĝin mortigi. It seems a pity that Mr. K. runs counter to the Lingva Komitato in that he uses "Meksiko" instead of "Meksikio" or "Meksiklando" for the country. Does he pronounce "depost" with stress on the penultimate? If not, should he not use "de post"? That it is not advisable for any but experts to form further words in "um" is good advice. 122. "Pundo" for the English pound sterling is rare. We are more accustomed to "monfunto" or "funto sterlinga." "Enuiga" means "tedious, boring," cp. teda. The author renders both words "tiresome." "Aktuale" does not mean "actually." 125. havigu (al vi); 127. (poŝt) markojn.

It is interesting to learn that Spanish is perhaps the most logical national language, that in Esperanto all adjectives, with the sole exception of derivatives of "Esperanto," are written with a small initial. Does Mr. K. overlook Zamenhof's Biblical usage of capitals for adjectives formed from place—and personal names? Would our author not counsel capitals in writing derivatives of little-known place names (ex. Paria marmoro—Parian marble)? 140 brill(i)ant; 145, "his Lordship" would be translated "lia lorda moŝto," if reference is to a British peer.

An honest piece of work, the sole

barrier to the wide use of which in Britain may be found in its price—one dollar—(ROBO).

### INTERLERNEJA KORESPONDO Grava alvoko al instruistoj kaj gejunuloj.

Laŭ iniciato de "Cooperation Intellectuelle," fondiĝis en Parizo "Comite Permanent de la Correspondence Scolaire Internationale." Aliĝis Germanujo, Anglujo, Ameriko, Franclando, Italujo, Rumanujo kaj Svislando. La korespondado okazis ĝis nun en la naciaj lingvoj.

En decembro 1929 oni starigis komitaton en Nederlando por kunlabori. La celo estas individua korespondado inter lernantoj ĝis 21-jaraj. Tiu ĉi komitato konsentis ankaŭ en Esperanto peradi korespondataĵojn.

Nun ni povos montri al tiu ne-Esperanta komitato, ke per Esp-o la korespondado plej multe efikas, ke en tuta mondo jam estas infanoj kaj gejunuloj, kiuj kapablas rekte interrilati.

Instruistoj kaj gejunuloj, mi petas vian helpon! Sendu leteron al s-ino M. Nieuwenhuis, Jan van Goyenstraat 44, Leiden, Nederlando kaj aldonu: Nomon, sekson, lernejon, adreson, profesion de patro aŭ edukanto. Ankaŭ la temon pri kiu vi deziras korespondi.

De la partopreno dependos, ĉu oni daŭrigos aldoni Esperanton por la korespondo. Montru, ke ni ekzistas!

—Julia Isbrucker. Hago.

### LA UNUA ESPERANTA FILMETO

La Unua Esperanto-Parolanta Filmo estas farita de "Paramount-Famous-Lasky - Corporation," Times Square, New York, U.S.A., kiu anoncas, ke en Usono ĝi havis plenan sukceson. Ĝi aperos en ĉiuj Eŭropaj landoj, en Aŭstralio, Japanujo, Brazilo ktp.

Estas grave, ke en ĉiuj landoj oni sciigu pri la datoj, kiam tiu ĉi filmo estos prezentata. Tion oni povas fari ĉe la loka Paramount-Oficejo aŭ kinematografejo.

Samideanoj, vizitu amase tiun unuan Esperanto-parolantan filmon kaj poste nepre skribu aprobeleteron al la produktinto de la filmo esperante en New

### HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparas ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

### Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.



York, laŭ supra adreso, ĉar en baldaŭa estonteco la Paramount-Filmkompanio intencas fari aliajn Esperanto-filmojn, kio ja dependas de la kvanto de la apobleteroj.

*La filmo estas farita en formo de parolantaj aktualaĵoj (news reel).*

## ĈU LA MORTO FARAS FINON AL ĈIO?

### Stranga spertaĵo de pastro.

Pastro F. C. Spurr, Baptista predikisto, asertas, ke li sendis sian okjaron filon kaj ties patrino, por refortiĝi ĉe feriloko en Lincolnshire (Anglujo). Post tio li vizitis kinematografejon, kie li ĉe 4.45a horo sentis iun tuŝi sian manon, kaj jen mirigate li vidis la filon en plej proksima al li sidloko. Sentante sin timkonfuzita, li iris hejmon. Tiam ekkrakis fulmotondro, dum kiu li ricevis telefonan komunikon, ke lia filo ĵus droniĝis. Ĉe la enketo li sciigis, ke la knabo eniris la maron ĉe 4.20a horo p.t. kaj drone mortis ĉe 4.45a.

"Kiel honesta Anglo mi rakontas ĝin," aldonis s-ro Spurr. "Jam 25 fojojn mi havas nerefuteblan ateston, ke li vivas kaj bone fartas sur la alia bordo. Kompreneble, ni ne povas rajte prediki tian, kiel la religion. Sed se mi estus devigita kredi, ke en la Universo la homo, kun lia malsaĝo volupto kaj pekeco estas la plej alta estaĵo krebbla, mi tre volonte mortus kun blasfemo sur la lipoj."

—El la Angla trad. (Robo).

## TO NEW ZEALAND SUBSCRIBERS.

It would be much appreciated were our N.Z. friends kindly to bear in mind the fact that only money-orders are readily cashable in Australia. The sending of Postal Orders or paper money involves certain difficulty or financial loss to those acting for La Suda Krucio.

Al s-ro M. en S. Peterburg.—Via energia laborado estas tre laŭdinda; sed via faremeco estus multe pli utila por nia afero, se vi uzus ĝin en alia maniero. Anstataŭ la personoj, kiujn vi gajnis por nia afero kaj kiuj nenion faras, estus pli utile se vi povus gajni unu aŭ kelkajn riĉulojn, kiuj volus ion fari por nia afero. La plej bedaŭrinda fakto en nia afero estas tiu, ke ni ne havas ankoraŭ inter niaj amikoj eĉ unu riĉulon, kiu povus kaj volus ĝin subteni. En nia tempo sen rimedoj materialaj ĉia afero povas progresi

nur tre malrapide, kaj ĉiu paŝo kostas doloron kaj suferon. (Respondoj al la amikoj "La Esperantisto," 1890).

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino; S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikadojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Me'burna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinlando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34. Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del. U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

Oficiala Organizaĵo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 119 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 Majo 1930.

## ESPERANTO IN THE NEW RUSSIA.

From "Russia Today and Yesterday," p.p. 185/6, by Dr. E. J. Dillon, author of "Russian Characteristics," and "The Eclipse of Russia"; formerly professor of comparative philology, Univ. of Kharkoff, and editor of Odesskia Novosti"; private adviser to Count Witte, 1903-14; Russian correspondent of the "Daily Telegraph," 1889-1914.

"Long epistles, well worded in Russian, were received in Moscow from Japanese scholars, men of letters, journalists and students. But they were not all indited in the language of Pushkin and Dostoievsky. Many letters were couched in an artificial language employed down to the Revolution mainly by collectors of stamps, postcards and coins, but which, owing partly to the exertions of Madame Kameneva and her fellow-workers, has spread over vast stretches of the globe as a facile means of communication between proletarians sundered from each other by mountain ranges and seas. And it has come to pass that today Soviet Russia can boast that it has 16,000 registered Esperanto linguists. Numerous Chinamen and Koreans are said to have perused works of Lenin, Tolstoi and Turgenjev in Esperanto. Writing in Esperanto in the "North American Review" a quarter of a century ago, I foretold the conquest of the world for certain specific objects by the unaesthetic medium of communication invented by Zamenhof, and its employment by latter-day proletarians is at once incongruous and felicitous. It will surprise many readers to learn that the study of Esperanto occupies fourth place in those Soviet schools in which non-Russian languages are taught; the

first place being taken by English, the second by German, and the third by French. In the factories there are already circles which for nearly two years have been corresponding with factory workers abroad by means of Esperanto. The Smolensk Young Communist party keeps up a continuous intercourse in this language with the communists of the East. Numbers of country newspapers publish letters in Esperanto which they receive from soldiers, sailors and workers in different parts of Europe. The pioneer in Odessa corresponds with children abroad and receives letters, not only from Europe, but also from America, Japan and China, likewise in Esperanto, giving extracts from their poems and revolutionary songs. Workers in Soviet factories despatched to Scandinavian countries their "wall news" written in Esperanto, part of which made a deep impression on the foreign workers, who replied in eulogistic terms congratulating them on their advancement, and assuring them that they would march in line with their Soviet comrades. The factory workers and members of the Red Army are especially keen to learn Esperanto, and by way of keeping their knowledge from growing rusty several congresses recently pronounced their discussions in Esperanto. As a means of inter-communication Esperanto is making such progress that it has to be reckoned with as one of the most important factors in the new Russia."

### SCIU

Ke linio "televizion as a satisfactory com-" mankaŝ en la unua kolumno de la aprila numero de S.K.

Ke pro presista fuŝo "Lidja Zamenhof en Pola Esperantisto" forestas de la piedo de "La Skribmaŝino de mia Patro" samnumere.

**T. C. MASARYK.**

(Ricevita per la ĉs. Konsulo en Sidnejo).

La prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Respubliko, T. G. Masaryk, atingis la 7-an de marto nunjara sian 80-an jaron. Li naskiĝis en malriĉa sudmoravia familio, en kiu kuniĝis sango slovaka kun sango ĉeĥa. Liaj samlandanoj vidas en tio veran simbolon kaj antaŭdestinon: Masaryk estis destinita kunigi ambaŭ branĉojn de la ĉeĥoslovaka nacio, disigitajn antaŭ la reakiro de ŝtata sendependeco per politika landlimo, t.e. la ĉeĥan (boĥeman), vivantan en Bohemio, Moravio kaj antaŭe aŭstria parto de Silezio sub regado de l' antaŭmilita Aŭstrio, kaj slovakon, regatan de la estinta Hungarujo. La universitatajn studojn kaj la komencon de sia universitata kariero faris Masaryk en Vieno. Poste li eniris la universitaton de Praha.

Masaryk dediĉis sin al detala studado de eŭropaj nacioj, kaj jam en la naŭdekaj jaroj li gajnis varman simpatiecon de sudslavoj per sia deklaro favora al Bosnio kaj Hercegovino, kaj de popoloj per kondamno de la kontraŭpola reĝimo en Ruslando. Lia detala historia studo de la propra nacio rezultigis vicon da sciencaj verkoj en kiuj li formulis la filozofion de la historio de l' ĉeĥa nacio.

La milito, kruela konsekvenco de la eksterlanda politiko aŭstria-hungara, elpelis Profesoron Masaryk el lia patrujo. Li elmigris kaj starigis por si programon de batalo kontraŭ la monarkio je la flanko de la okcidenteŭropaj kaj usona demokratioj. Kiel elmigrinto kaj ĉefo de la ĉeĥoslovaka revolucio li faris dum kvar militjaroj vojaĝon ĉirkaŭ la mondo proklamante la bezonon neniigi la Habsburgan monarkion. El Svisujo li vojaĝis al Parizo, de tie al Londono, en printempo de 1917 en la revolucion Ruslandon kaj fine trans la tutan Siberion kaj Japanujon li atingis Usonon. Sub lia direktado kaj kun helpo de eksterlandaj ĉeĥoj, precipe de D-ro Beneš kaj Stefanik, estis kreata el la estintaj aŭstrohungaraj militkaptitoj de ĉeĥoslovaka nacieco multcentmilkapa armeo ĉeĥoslovaka, partopreninta en Italujo, Francujo kaj Rusujo la batalojn kontraŭ la t.n. „centraj potencoj“ (Aŭstrio, Germanujo, Bulgarujo kaj Turkujo).

La laboro de Masaryk estis kronata de plena sukceso: la nacio ĉeĥoslovaka kaj ĝia revolucia armeo, batalanta por sendependeco kaj memstareco de sia nacio, estis jam dum la mondmilito rekonita de la aliancaj ŝtatoj kiel nacio sampartia kaj kune militanta; sekve de tio Masaryk povis la 18-an de oktobro 1918 proklami la ĉeĥoslovakon sende-

pendecon kaj formiĝon de provizora registaro. Pro siaj meritoj je reatingo de la ĉeĥoslovaka sendependeco la 28-an de oktobro 1918, Masaryk estis elektata prezidanto de la respubliko; tiun ĉi oficon li povas okupi dumvive.

Masaryk ne ĉesis labori sur la kampo de literaturo kaj scienco eĉ dum kaj post la milito. Inter liaj verkoj el tiuj periodoj aktualiĝas precipe lia verko „La nova Eŭropo“, en kiu li dum la milito formulis kaj priargumentis la bezonon de postmilita reorganizo de Eŭropo, kaj „La tutmonda revolucio“, en kiu li detale pritraktas sian agadon dum la mondmilito. Lia antaŭmilita „Rusujo kaj Eŭropo“ estas rigardata kiel vera klasikaĵo.

Legantoj scias jam, ke li favoras Esperanton, konsiderante ĝin unu el la rimedoj por unuigi la homaron.

D-ro A. Hartl.

**CHRISTCHURCH, N.Z.**

Esperantema gazeto.

S-ro N. Bell sciigis, ke unu tagĵurnalo en Christchurch aperigos monate Esperantan kolumnon. Ankaŭ, li disaŭdigas ĉe la radjejo en ĉiu sessemajno.

**BALLOT "RESULT."**

Ten per cent of those on the "roll" returned slips (vide no. 116). While such a response falls far short of that representative expression sought, we feel that the prevailing opinion of readers is against any suggested amalgamation with another paper. Voting: (1) 14, (2) 7, (3) 2.—(Red.)

**MODELA TEKSTO.**

Antaŭ ĉio (kaj tio ĉi estas la plej grava) ni devas labori diligente kaj ne malvarmiĝante por la afero kaj tute ne zorgante tion, kion diras aŭ faras aliaj. Estas multaj, kiuj, komprenante bone la utilecon de l' afero, alfalas al ĝi en la komenco tre varmege, certe kredante, ke post kelkaj monatoj la tuta mondo jam estos plena de la lingvo internacia; sed kiam post kelka tempo ili vidis, ke la mondo estas ankoraŭ trankvila, ke la plej granda parto de l' mondo eĉ ankoraŭ ne scias pri la afero, ke la gazetoj ne alportas ĉiutage sensaciajn novaĵojn pri la irado de l' afero, —ili tute malvarmiĝis por la afero. De la efemera laboro de tiaj amikoj la afero ne sole nenion gajnas, sed kontraŭe, ĝi nur perdas. Sed efektivaj amikoj de l' afero ne rigardas, ĉu la afero jam faris multon da bruo kaj ĉu ĝi estas jam sufiĉe "en modo"; profunde kredante, ke la afero estas utila kaj havas estontecon, ili laboras sen-



brue, sed diligente kaj konstante, ĉiu en sia urbo, en sia lando kaj laŭ siaj fortoj. —kaj danke la laboron de tiuj ĉi amikoj mi esperas, ke l' afero baldaŭ kaj sen bruo vastiĝos en la tuta mondo. (Zamenhof, Aldono al la Dua Libro 1888).

### ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That the late Dr. John Buchanan of Scotland, has left by will £4000 for the establishment of a lectorate of Esperanto at the University of Liverpool, and for prizes to be awarded to registered Esperanto students at other universities. A further £1000 has also been bequeathed by him to the British Esperanto Association.

### “JAM” KAJ “ANKORAŬ.

Malgraŭ klopodado de la redakcio englitis en la lastan tekston de S.K. ofte renkontata eraro, uzo de “jam” anstataŭ “ankoraŭ” en certaj frazoj havantaj en si nenian ideon de stata ŝanĝo. Sub “Takto” troviĝas “ĉar la granda Esperanta Vortaro ne jam aperis.” La verkinto tre supozeble volis komprenigi, ke “la E.V. ankoraŭ ne aperas.” Sed se li korekte esprimis la penson sian, uzante la formon “ne jam aperis,” ni devas bedaŭrege ricevi la baton, sciigi, ke la direkto de la “Granda Vortaro” ŝanĝis la decidon eldoni la verkon!

Sed ekzemplo laŭte parolas. “Ĉu vi jam trovis vian horloĝon?” (ĉu via stato de perdinteco ŝanĝis jam en staton de trovinteco?); “Mi ĝin ankoraŭ ne serĉis” (nenia ŝanĝo de stato). “Mi jam ne vizitos vin” (signifas ŝanĝitan intencon). Forte konsilata estas, fundstudi ĉi tiujn du vortojn.

### SOVETA PEDAGOGIA REVUO.

De Moskvo 11, “Dvorec Truda,” ĉambro 558, ni ricevis kelkajn ekz. de supra gazeto, dediĉita al klerigado de la nova Rusujo. La red. tre petas, ke ni kontaktigu ĉitiejajn instruistojn kun lia eldonaĵo, kiu laŭ lia certigo donas veran bildon de la nuna batalo por likvidi la teruran heredaĵon de malklero, kiun devis akcepti la sovet-registaro en 1917. La kajeroj estas tradukitaj de membro de Lingva Komisiono de Soveta Esperantista Unio, kaj enhavas kelkajn formojn ecajn je la proletaria literaturo. Unu el la kajeroj speciale pritraktas la demandon “lernejo kaj religio.” Religio estas samklasigita kun alkoholismo, diboĉado kaj malsanitar-eco, kio estas, laŭ konvinko de multaj eĉ cetera aprobantaj la bolŝevikan pro-

gramon, ekstrema paŝo malsaĝpolitika. Linioj, kiaj la jenaj, renkontas al forta ĉuo flanke de almenaŭ konsiderinda parto de okcidentaj instruistoj: “ĉiuj konoj kaj scipovoj estas akiritaj per eksperimenta, esplora metodo, kaj la religio kaj ĉio bazita sur aŭtoritateco kaj formala kredo, estas la plej serioza malhelpaĵo por ekposedo de ĉi tiu materialo.” Diskutinda estas la pure materialisma edukbazo soveta. Ĉu fakte, ke “sendiula” scienc esploristo faras la plej grandajn eltrovojn? La nomoj Newton, Kelvin, Lodge inter oceano da tiaj, tre pridubigas jeson al tiu propozicio. Cetere, povas esti, ke la kredo ne tre influas la marŝon de l' scienco. Ekster tiu akre disputata demando, supozeble estas, ke en vastaj rondoj oni sentas admiron al la brava lukto, kiun entreprenis sub treega ŝarĝo la sovetaj gvidistoj, firmintencante forbalai sklavecojn de la estinteco.

Iom la atenta leganto sentas ankaŭ mankon de paĝoj pritraktantaj la amarajn faktojn pri senhejmaj vaginfanoj kaj la putrigadon de la rusa popolo pro libera vodkovendado.

La stilo lingva estas flua ĝenerale, nur unu-du linioj ŝajne trorapide verkiĝis. “la samaj kun (kiel) la simio”. En kio kuŝas diferenco inter “uzino” kaj “fabrik(ej)o,” “kulto” kaj “konfeso” kaj “sekto”? Ni rimarkas iom ofte la germanecan sintaksajon: “Ĉiuj ĉi faktoj atestas pri ofensivo de la organiziĝintaj sub standardoj de la eklazio klasmalamikoj...” La soveta lingva komisionano pensas bone, enkonduki “dominanta,” “metodika” (?), “stabila” (firma), “subordi,” “selekti,” “noci” (It. nuocere, to hurt, to prejudice). Ie li uzas “tiel aŭ alie,” ie “tiel aŭ aliel” samsence: “batalo por kreo (krei) la blankan homon de Dio”: “anti” uzata prefikse. Malgraŭ la nudvorta prezento de la soveta intenco koncerne la lernejon, aŭ pliĝuste pro tiu malkaŝeco, ni rekomendas la kajerojn al ĉiu pedagogiema. Tre interese kaj kondona enrigardo en vivon de popolo faranta flamkoloran paŝon de l' historio. Prezo 25 kopekoj.—(Robo).

### ESPERANTO A BRIDGE.

In 1919 a London paper “The Future” offered a prize of money for the best translation of a piece of English into Italian. Samideano W. Phillimore, although ignorant of the Italian language, won the prize, and this is how he did it. He put the English into Esperanto, and then sent this translation to a correspondent in Italy, who translated it into Italian. This was sent by Mr. Phillimore to

"The Future." After the awarding of the prize to him, our samideano wrote to the editor, explaining the case, and leaving it to his judgment to alter the decision in favor of some other translator. He made it clear that he entered the competition only to demonstrate the fitness of Esperanto as a translation medium. The editor, however, sent the money to Mr. Philimore, who divided it with his Italian correspondent.

Here is a recent instance of how Esperanto can bridge two languages. The Norwegian Odd Arnesen's book on the polar flight of the "Italia," an impressive volume, richly illustrated, has appeared in a Czech translation by Otto Ginz. The preface makes it clear that the translation was made possible by Esperanto. Ginz used the Esperanto manuscript of Jens Schjerve of Oslo, which furthermore is now forming the text for a translation into Japanese. Ginz's work is both a model rendering into Czech, and a striking advertisement for Esperanto.

#### ANONCO.

Esp. Grupo dez. interŝ. p.k.il. (p.m. bildfl.) p.m. let. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata! A. W. Zinke, Chemnitz, Rottluff 118, Germanlando.

#### PAROLO DE LINCOLN.

Oratorita ĉe dediĉo de la tombejo en Gettysburg, Penn., Usono, la 19an de novembro, 1863.

Antaŭ okdek sep jaroj niaj prapatroj naskis sur ĉi tiu kontinento novan nacion generitan en libereco kaj dediĉitan al la propozicio, ke ĉiuj homoj estas kreitaj egale.

Jam ni estas okupitaj pri granda civila milito, kiu provas, ĉu tiu nacio, aŭ iu nacio tiel generita kaj tiel dediĉita, povas longe daŭri. Ni estas kunvenintaj sur granda batalkampo de tiu milito. Ni estas alvenintaj por dediĉi parton de tiu kampo, kiel finan ripozlokon por tiuj, kiuj ĉi tie donis sian vivon, por ke tiu nacio vivu. Tute dece kaj taŭge estas, ke ni faru ĉi tion. Sed, laŭ pli larĝa senco, ni ne povas dediĉi, ni ne povas konsekri, ni ne povas sanktigi ĉi tiun teraĵon. La kuraĝaj viroj, vivaj kaj mortintaj, kiuj batalis ĉi tie, jam konsekris ĝin tiel verege, ke estas ekster nia malforta povo, aldoni al aŭ forpreni de ĝia sankteco. La homaro ne multe rimarkos aŭ longe tenos en memoro, kion ni diras ĉi tie, sed ĝi neniam forgesos, kion ili faris ĉi tie. Estas por ni vivuloj, sur ĉi tiu loko sin plibone dediĉi al

la ankoraŭ nefinita laboro, kiun ili ĉi tie batalinte tiel noble jam progresigis. Estas plibone, ke ni ĉi tie sin dediĉu al la granda tasko ankoraŭ restanta antaŭ ni; ke de ĉi tiuj honorataj mortintoj ni prenu al ni pli da sindediĉo al tiu celo, por kiu ili ofere donis la finan plenmezuron de sindediĉo; ke ni ĉi tie fidele ĵuru, ke ĉi tiuj falintoj ne estu vane mortintaj; ke sub Dio ĉi tiu nacio havu renaskon de libereco, kaj ke regado de la popolo per la popolo, por la popolo, ne pereu de sur la tero.

#### ESPERANTO ON THE MARCH. Enthusiasm in Northern Europe.

Thanks to the revolutionised teaching methods of the Rumanian priest Andre Che, Esperanto has during the last few months, scored smashing victories over indifference and scepticism in Sweden. Che, who was invited by the Swedish Esperanto Federation two years ago to demonstrate his "direct method" to the public, is now ably supported by brilliant disciples, his countryman Tiberio Morariu; an Indian, L. Sinha; a Norwegian, R. Bugge-Paulsen; and two Estonians, Henrik Seppik and Mdme Pahn, who as a result of Che's convincing success were also invited by the Federation. The victories are the culmination to a well-planned campaign, in which Esperanto was, as never before, taken right to the public. The Indian Sinha in a 12 months' itinerant lecture tour addressed over 25,000 people in Esperanto, his message being translated immediately for the non-Esperanto part of the audiences. It is estimated that some 50,000 attended lectures delivered in Esperanto, while not fewer than 15,000 have begun to learn the language. The Swedish press featured Esperanto in thousands of articles.

Two years ago the Swedish teaching bodies regarded Esperanto with indifference. Personal appeal, however, induced 20 teachers to enter the first Che course, in Stockholm. Such was Che's success that today the State subsidises the training of teachers in Esperanto, and it has been proposed to make the Swedish Esperanto Institute a Government institution. The Esperanto Tourist Commission has been formed also, to which the great Stockholm Exposition of 1930 has entrusted the whole of its advertising in Estonia. The Commission is expecting thousands of E-tists to visit the Exposition. Six courses have been established for tramwaymen in Stockholm, and the language is taught also

in the State Telegraph Service. So this summer one can ring up "Exchange" there in Esperanto!

An Esp-ist, Herr Frey, has been sent with high official credentials by the Austrian Tourist Agency in Vienna to tell forth in the tongue of Zamenhof the holiday attractions of Austria. He will give addresses throughout Sweden, Norway and Denmark.

As we go to press we learn that at Orebrö, a small town of some 28,000 inhabitants, 430 persons have joined the Morariu course opened there.

(From "Heroldo de Esperanto.")

### FANFARONULO.

La plej altaj societoj malfermas por mi siajn pordojn.

Jes, por ĵeti vin eksteren!

**KURSO PER TRADUKADO**  
(kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A., sekretario, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melbourne E.10.)

### TRADUKO 7 LA CIGANA VIVMANIERO

Romaneco de stranga raso  
(el "The Sun," Melbourne.)

Ĉar la registaro metis Ciganojn en la klason de homoj netaŭgaj por Aŭstralianeco, aro el dek sep homoj el tiu raso en la pasinta jaro celantaj (2) surlandiĝi kaj loksidiĝi (3) en Aŭstralio estis, laŭ ordono de la ministro de enlandaj aferoj, devigitaj reveturi al Unuigitaj Ŝtatoj sur la vaporŝipo Aorangi.

Jam en la reĝado de la Brita reĝo Henry (4) oka oni malaprobe rigardis Ciganojn. Tiu monarĥo estis la unua, kiu persekutis ilin, kaj post li reĝinoj Mary kaj Elizabeth ĝisiris dekreti mortpunon kiel rimedon por senigi la landon je Ciganaj bandoj.

Nova lando estas paradizo invite vokanta (2) tiajn nekcontentulojn kaj vagemulojn, kiuj havas ŝtelistajn morojn similajn al tiuj de niaj plej antikvaj prapatroj. Aŭstralio, simile al Unuigitaj Ŝtatoj, altirus Ciganojn, ĉar ili deziras landon ne tro multehoman, por ke ili povu kamploĝi kie ajn plaĉos al ili tiel fari, tamen landon nek tro maldense loĝatan nek tro malriĉan, ĉar ili dependas de la prosperado de aliaj homoj por la vivrimedoj.

En Unuigitaj Ŝtatoj sin trovas Ciganojn en grandaj bandoj. Malnovaj dokumentoj sciigas (5), ke ilia ekzilado de Anglujo okazis precipe en la tempo de Britaj kolonioj en la nuna Usono. Tie la vagemaj Ciganaj familioj nun

veturas per aŭtomobiloj, kaj eĉ la malmultaj, kiuj loĝas en domoj kaj kies vivmaniero ŝajne estas normala, vagadis tra seso aŭ pli da landoj antaŭ ol loksidiĝi.

En multaj landoj sin trovas Ciganojn —rajdantaj azenojn en Arabujo—pedirantaj en Anglujo—en karavanoj en Hispanujo—en la foirejoj de Rumanujo—sin kaŝantaj en la montaj regionoj de Tirolo kaj Svislando—kamploĝantaj en fjordoj de Svedujo kaj Norvegujo—senmone interŝanĝantaj objektojn kun Laplandanoj en la regiono de la norda cervo—de ĉiu malŝatataj, tamen pretendantaj (7) esti raso el reĝoj kaj reĝinoj sen egaluloj en la mondo.

Precipe (8) pro tio, ke multaj homoj konsideras la vortojn "cigano" kaj "fivagulo" sinonimaj (9) ankaŭ pro tio, ke la Ciganoj nur laŭhazardo gajnas vivrimedojn kaj ĉie sin trovas suspekterigardataj, George Borrow diras, ke pri neniu alia raso en la mondo estas pli granda kampo por teoriado kaj konjektado. La verkoj de Borrow "The Romany Rye," "Gipsies in Spain," "Romano Lavo-Lil" kaj aliaj distingas tiun aŭtoron kiel la plej bonan aŭtoritaton pri la Ciganoj. Li plue diras:—Ilia moraleco estas tiel stranga, ke ĝi verŝajne ne tre edifus tiun parton de la socio ordinare nomatan (10) la bonorda (11).

La plimulto de esplorantoj pri la Ciganoj, iliaj moroj, kutimoj kaj lingvo konsentas pri tio, ke ili estas idaro de primitivaj triboj de Hindujo, aŭ elpelitaj (2) aŭ elmigrantaj (2) el tiu lando frue en la dek-kvara jarcento.

(daŭrigota).

### NOTARO 7.

1. Preseraro. Traduko 6. En la lasta linio de kol. 1, "sezono" (sezono).—2. Adjektiva participo. Notaro 1/6.—3. "loksidiĝi". Vorto uzita de Grabowski en "Sinjoro Tadeo," iv, 14. Por unu signifo de "settler," aŭ "loksidiĝinto" aŭ "loksidanto" estus bona.—4. Estas bone ne esperantigi nomojn de modernaj personoj.—5. "old records showing." Tiu Angla gramatika formo estas "nominativo absoluta," kiun ne posedas Esperanto. Por traduki oni devas ŝanĝi la frazkonstruon por ebligi la uzon de verbttempo. Cox 211, b. L.R.pĝ 67.—"pretendi" signifas "to claim," neniam "pretend" en la senco de "ŝajnigi".—8. La longa Angla frazo "chiefly" ĝis "than the gipsies" estas komplika. Pro simpleco en traduko bone estas dividi ĝin.—9. Predikata adjektivo. Oni subkomprenas "esti" antaŭ "sinonimaj." Cox 107 b.—10. "nomatan" rilatas al "parton."—11.



"respectable." Zam. uzas "bonorda" rilate al persono, vesto, k.t.p.

### ATESTO DE EMINENTA RUMANO.

La konata verkisto kaj apostolo de la humanitarismo en Rumanujo, s-ro Eugen Relgis, kiu ĉiuokaze apogis nian movadon ĉu per artikoloj en la gazetoj, ĉu per helpo en sferoj de li alireblaj—kiu afable donis la permeson ke oni traduku liajn verkojn en Esperanto, kaj kies "Humanitaristaj Principoj" jam aperis en nia lingvo, persone ĉeestis la rumanan jarkongreson en Braşov, kie li alportis al ni sian varman saluton per jenaj vortoj:

Kiel literaturisto skribinta miajn verkojn en la lingvo rumana—la sola kiun mi, kiel multaj aliaj, ne pro ia selekto, sed dank'al nura hazardo, funde konas kaj regas—mi salutas antaŭ ĉio la junan literaturon esperantistan, kiu ne konsistas nur el tradukaĵoj, sed kiu estas rekta esprimo de la homaj sentoj kaj ideoj.

Esperanto faris sian ekzamenon pri matureco, kaj ĝin konfirmis ne nur la fakto ke ĝi povis traduki la verkojn de Shakespeare, de Goethe aŭ de Victor Hugo; ne nur la fakto ke ĝi povis pritrakti ankaŭ problemojn pri filozofio aŭ scienco pura: la ekzamenon pri matureco sukcesigis tiuj poetoj, romanverkistoj aŭ dramaturgoj, kiuj skribis siajn verkojn rekte en Esperanto. Ilia pensaro kaj iliaj sentoj estis redonataj en formoj, kiujn ni akceptis ne kiel artefaritaj kreaĵoj, sed kiel klara esprimo de nova literaturo komencanta konkeri la merititan lokon inter la universaj literaturoj.

La esperantistaj literaturistoj havas la maloftan privilegion eviti la certe deformantan operacion de la tradukiĝo. Ili lasis, je komenco de la 20-a jarcento, skribajn dokumentojn en lingvo vere universala per sia spirito kaj sia destino:

Kiuj ajn estos la bataloj por la suprematio inter la diversaj internaciaj lingvoj, ŝajnas al ni ke la venko de nun estas certigita al Esperanto.

Ne nur ĉar Esperanto havas multnombrajn organizaĵojn, centon da gaze-

toj kaj revuoj, bibliotekojn kun libroj diversspecaj—ne nur ĉar Esperanton legas kaj parolas milionoj da homoj el ĉiuj mondpartoj: la pernombra sukceso fariĝus iluzia, se la lingvo Esperanto (konsiderata de iuj ironiuloj kiel lingvo sen gramatiko) estus fiksiĝinta de la komenco en formoj definitivaj. La merito de Zamenhof konsiderinde pligrandiĝis pro tio, ke li komprenis, ke lingvo ne povas ekzisti se ĝi ne estas viva organismo. Lingvo ne povas havi antaŭe difinitajn kadrojn: ĝi stoniĝus, kiel ekzemple la latina lingvo—ĝi estus seka, nepraktika.

Zamenhof ne monopolis la rajtojn pri absoluta patreco, sed li transdonis al la Esperantista Akademio la taskon konservi al Esperanto la sukcon de la vivo, ĝin riĉigante senĉese kaj donante al ĝi tiun flekseblecon, tiun naturan vigecon, kiun havas la kulturaj lingvoj. Tio estas garantio, ke ankaŭ Esperanto kaj ankaŭ ĝia literaturo havas brilan estontecon.

Tial ni, verkistoj uzantaj nacian lingvon, sentas nin solidaraj kun la Esperantaj verkistoj. Solidareco pli ol profesia. Ni restas konvinkitaj ke finfine alvenos la tempo, kiam la literaturistoj skribantaj rekte en Esperanto estos en la unua vico de la universala atento—kaj ke la verkisto franca, angla, germana, hinda aŭ rumana, kiu estos tradukata en Esperanto vidos en tio plej altan honorigon kaj solenan prezentiĝon antaŭ aeropago solena.

EUGEN RELGIS, en "La Movado."

### BLANKULO SOVAGE VIVANTA.

La miriga rakonto pri William Buckley.

Unu tagon, anareto de homoj ĉe Port Phillip (en ŝtato Viktorio), laborante ĉe ĝardeno kultivo, ekvidis apud si tre altstaturan figuron. Ĝi estis malstrikte vestita per didelfa pelto, havis haŭtkoloron iom tre plipalan ol tiu de la indiĝenoj kiuj lin akompanis. La surprizitoj miregis pro tiu stranga aperaĵo kaj tre eble ankaŭ iom pritimis ĝin.

"Kiu vi estas?" ili demandis. La veninto nur balancis la kapon nekom-

## SUBTENU LA SAMIDEANAJN METIISTOJN !

PERCY HOLMES

Elektristo Kaj Radiisto.

Lumiloj, gladiloj, purigiloj, motoroj, ventumiloj sperte instalitaj kaj riparitaj. Se via radia aparato ne bone funkcias, tuj sciigu al P. Holmes, 212 Noone str., Clifton Hill.

Memoru—Por ĉio elektra.

Telefonu: JW 4017.

prenante. Ŝajnis, ke longe li serĉis manieron informi pri io. Jen li subite montris sur la brakon, sur kiu estis videbla tatuajo "W.B." La rigardantoj sugestis al si ĉiujn de ili konatajn nomojn, kiuj komenciĝas per tiuj literoj. Estis facile konstati pri la tresupozebleco de "W" por William, kaj ili jam pripensis la eblecon de Burgess por la "B," kiam la strangulo ekbalbutis "W—William B—Buckley" (elp. ŭiljem bokli). Donante al li panon ili aŭdis lin diri "bread" (pano).

Nur malrapide revenis lia patra lingvo al lia memoro, ĉar jam 30 jarojn li ne ĝin parolis, kaj prituŝante sian historian li senkonscie ekuzis ofte la lingvon de la indiĝenoj.

Hodiaŭ, la 27an de decembro, 1929, jam pasis 126 jaroj de kiam li forkuris la kolonieton de kapitano Collins fonditan en 1803 ĉe Sorrento. Buckley, kiu estis sendita el Anglujo kiel punlaborulo, sukcesis forkuri sekrete kun kelkaj samsortuloj, sed post du semajnoj unu el tiuj malespere decidis reiri en malliberecon. Pri la ceteraj Buckley povis nenion pridiri. Li estis treege malparolema, probable pri tio, ke li estis tro malinteligenta ion rememorigi al si. Nur malmute li informis siajn demandantojn, krom nur tio ke li ne sciis, ĉu la indiĝenoj, kun kiuj li rekontiĝis, bonvenigos aŭ rostos lin por manĝi. Sed malgraŭ lia timo ili amike sin kondukis kontraŭ li, donis edzinon, kiu poste lin forlasis por aliĝi al aliulo, kaj pro tiu peko la tribo ŝin mortigis. Buckley diris, ke dum la unua jardeko tiaviva li ĉiam timis, ke rivalaj tribanoj lin mortigos. Tridek jarojn li vivis samkiel sovaĝa indiĝeno.

Iam boato aliris Port Phillip por hejtoligno. Ekvidinte ĝin Buckley enkuris la maron direkte al ĝi kun krio, "Mi estas blankula homo," sed la maristoj, teruritaj de lia aspekto, remegis for de li returne al la ŝipo.

Pri Buckley oni tre ofte esprimis tro nemeritan kompaton. Kvankam li akre suferadis; devis satiĝi per indiĝenaj manĝoj; loĝaĉi en krudaj ŝirmejoj laŭnigrule, li tamen ne suferis tiom, kiom suferus inteligenta homo. S-ro Fawcner priskribis lin "bulo da materio, pro

senmenseco nekapabla doni ian utilan informon."

Komence oni pensis enoficigi lin kiel paciganton inter la indiĝenoj kaj la blankulaj kolonianoj, sed ankaŭ por tio li montriĝis preskaŭ netaŭga, ĉar nur unu fojon li inklinigis la indiĝenojn ne ataki la blankulojn.

Finfine oni sendis lin al Hobart (Tasmanio), kie, ricevanta pension de 52 funtoj jare, li deĵoris kiel pordisto ĉe la Fabriko por la Punlaborulinoj. En 1839 li edziĝis kun vidvino, "kiun," skribis samtempulo, "ni ofte vidis promeni kun ŝia neparolema edzo, kies brakon ŝi nur malfacile povis tuŝatingi. Sendube ŝi vidis ion amindan en tiu viro, kiu ŝajne tiel forte malŝatis kuneston kun siaj kunhomoj."

Li mortis en 1856, havanta aĝon de 76 jaroj, kaj estas tre strange ke li aldonis absolute nenion al la jama kono pri la moroj kaj pensoj de la aŭstralia indiĝeno. La silento de la "bush" (sovaĝejo) ŝajne ĉirkaŭvolvis lin kiel vualo, kaj lia miriga vivmistero restis en li neniam elrakontita.

Rimarkinda fakto ankaŭ estas ke la ununura homo, kiu havis similan vivsperton, nome iu James Morrill, vivinta pli ol 20 jarojn kun la kvinslandaj nigruloj, ankaŭ ne kapablis doni ian informon pri tio. Same neparolema kiel Buckley, li silentis preparoli sin eĉ longe post alveno de blankuloj en lian regionon, kaj iam penante fareti tion, li nur povis sufoke elgorĝigi balbutsonojn.

### AL NIAJ SUBTENANTOJ

Danke ni kvitancas le jenajn abonojn kaj donaco kaj esperas, ke tiuj, al kiuj la Redakcio sendis urĝan peton, decidus reaboni, tiel akirante al si konscion esti plenumintaj gravan servon al la movado tra Aŭstralazio. F-ino Chisholm, 4/6, aprilo, '30; J. Skurrie, 4/6, feb., '31; G. Kvarnstrom, 4/6, sep., '30; J. Cossar, 4/6, marto, '31; D. Calnan, 4/6, marto, '31; Sidneja E. Klubo, rezultajo el danco, donacis 53/-; P. Leahy, 9/-, julio, '30; Vendo de s-ino Sainsbury, 2/4; f-ino E. Lanyon, 4/6, julio, '29; f-ino Gwenneth Lanyon, 4/6, okt., '30; W. McPherson, 4/6, jan., '32;

## HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE,

## Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

MELBOURNE.

s-ino C. Blainey, 4/6, junio, '30; D. Thomson, 4/6, feb., '31; Wellington Esp. Club (anonco kaj abono), 10/6, feb., '31.

### PLAYS IN ESPERANTO.

An English dramatic critic recently visited a little theatre in Blackfriars to see a performance by English amateurs in Esperanto. The director of this unusual presentation was Mlle. de la Bruyere. She is a missionary of Esperanto, and was a friend of Dr. Zamenhof, the founder. Mr. F. T. Grein, who was one of the guests of this lady, in the "Illustrated London News" has written about his impressions and the result of a talk which he had on the subject of this world language and the theatre. He writes that he was astonished to hear that London already possesses a flourishing Esperanto club; that even among the professional actors there are some who speak it fluently, and the demand is such as to warrant further performances not only of translations, but of plays written by English authors in the world language.

He asked Mlle. de la Bruyere to tell him something more about this growing movement in our midst, especially so far as it might affect the world of the theatre.

This year she stated that the society was determined to take a step forward. They wished to show that Esperanto was artificial in nothing but theory; that it was capable of expressing the finest shades of thought, and was at the same time one of the most musical of languages. Esperanto would take its place beside the other languages of the world, its elder sisters, when they had created the Esperanto Theatre. The beginning must of necessity be modest, but the possibilities were almost infinite; their task was to make known the masterpieces of the world, even in the countries most distant from their own, by means of Esperanto. And to make known, too, the authors already writing in Esperanto—Julio Baghy and K. de Kalocsay, of Hungary; Raymond Schwartz, of Paris; Jean Forge, of Poland, and many more, and to encourage the growth of the new culture which is springing up.

The twenty-second Universal Esperanto Congress will be held in Oxford in August. About 1500 delegates are expected from more than forty countries. At this congress a play, representative of the English stage, will be

presented by a cast drawn from many countries before what must surely be the most cosmopolitan of all audiences.

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinlando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.





# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 120 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Australio. 10 Junio 1930.

## ON LEARNING FRENCH.

Arnold Bennett has confessed in the London "Evening Standard," his difficulties in mastering French. Coming from a man of his intellect, with his opportunities for study, the article is of unusual importance, comments "International Language." After he had been studying the language for more than twenty-five years, and had acquired a reputation as an authority on French literature, he found he was unable to take part in conversations in France:

"He speaks French like a native."

Phrase frequently heard, but hardly ever true. More romantic lies are told about the speaking of French than about even the catching of fish. Now here is a plain tale:—I began to learn French at the age of nine. At twenty-two I put myself to some trouble and learnt to read French currently. Soon I was regarded in Fleet-street as a quite a fair minor authority on French literature. At the age of thirty-five I went to live in Paris, alone, and I discovered that I could neither understand ordinary French conversation nor make myself understood in the same. I had then been studying French for over a quarter of a century, and had been writing about French literature for over a decade. I decided that something must be done. I did it.

Most of us who have learnt French have had a similar disappointment, and have felt that "something must be done." But very few of us have been able "to do it." Even after Mr. Bennett had taken the necessary steps to become fluent, he met further disappointment:

The number of pure - blooded Englishmen who can "talk French like a native" is so small as to be negligible. I have never met one. I remember once, when I had ac-

quired terrific volubility in colloquial French, and could teach French slang to Frenchmen, and fancied myself enormously, a Frenchman saying to me: "Whatever you do, don't lose your English accent. It is adorable." A blow! To this day I rarely read a page of French without coming across a phrase that I do not comprehend, nor see a play without missing phrases. So much for speaking and understanding French.

It is pertinent to compare the experiences of Mr. Bennett with those of a very ordinarily endowed individual who learns Esperanto. In the first place it is necessary to remember that he cannot live amongst people always speaking the language. He will master the grammar and syntax in from three to nine months; at the end of nine months he will have a vocabulary sufficient for all purposes of everyday life, for travel and reading. At the end of six months he will speak the language haltingly, but well enough to make his needs understood everywhere. Fluency in conversation will take him from one to two years, according to the flexibility of his tongue and opportunities for practice. After a year's study, which should include a good deal of reading, he should never meet a phrase, except in difficult verse, which he does not immediately comprehend. Compare this with the study of French (or, for the foreigner, English, which as regards pronunciation and idiom is probably somewhat more difficult than French), and the folly of pressing the claims of a national language as the international medium will be obvious.

As with her Shakespeares and Beethovens, Nature is not prodigal with her super-poliglots. Only here and there in a century are ambulating lexicons such as Schleyer and Mezzofanti sent

to astonish their generations.

Lenin, while in Siberia, translated a book from English into Russian; but on arriving in London was depressed to realise that the swirl of spoken English that assailed his ears conveyed nothing to him. Professor T. Cart, of the Paris Sorbonne, an English scholar, gave similar testimony after his visit to the Esperanto Congress in Cambridge in 1907. Carlyle, although he had to give years to reading French documents and newspapers for his "French Revolution," left Louis Blanc none the wiser for his voluble discharge of fractured French, delivered in the accent of Craigenputtock.

Surely these instances, taken with the above frank testimony of one of England's front-rank men of letters, should inspire the unconvinced with the judgement rightly to appraise the empty assertion of superficial thinkers that a national language could serve as a bond of understanding among the world's peoples.—(Ed., "S.K.")

### BENGALAJ FABELOJ.

Jen ankoraŭ dua libreto enmorigita de rimarkinda disĉiplo de instruisto Ĉe, Lakshmiswar Sinha, juna hindo nun vojaĝanta Svedujon. Dediĉita al "la avino", amata fabelisto de l'infantagoj, la 39-paĝa verketo konsistas el tri mallongaj rakontoj. Kvankam nia hinda apostolo de Esperanto tute ne pretendas uzi plumon de l' kreanta majstro, sed li eldiras simple, korekte, per frazeta lingvaĵo tion, kion eterne amas la etularo. Taŭga leglibro por nelonge komencintaj. Rimarku tamen: 11, atento (tento); 25, neĝusta uzo de "promen'" (marŝ'); 28, demandis (al si); 30, barbiri (la ungojn!); murmuris por si mem (kp.: "parolis antaŭ min", En Okc. Nenio Nova). Prezo unu ŝil. Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1.—(Robo).

### THE "BES ADRESARO."

The modest aim of those publishing the above booklet is "to collect the names and addresses of all Esperantists." Although they have yet a long way to go before they can congratulate themselves on having enrolled even the 126,500 organised users of the language, whose existence was with certitude ascertained by Dr. Dietterle, the BES address-book, with its 1120 registrations from over 40 countries, is justified in its claim to usefulness. It has proved to be for many an excellent supplement to the UEA year-book. Price 1/- from BES Adresaro, Bohema Esperanto Servo, Potštejn, Czechoslovakia.

### POR LA INFANOJ.

#### Neatendita Vizito.

Estis proksime al Maidenwell (mejd-nuel), en la kvinslanda sovaĝejo antaŭ multe da jaroj, kiam familio de kolonianoj ekokupis krudan ŝtipkabanon per arbŝelo tegmentitan. Ĉio estis laŭ tia pionira stato, kia ordinare karakterizas tre novan enloĝigon, kiam oni estas devigata prokrasti kaj improvizi ĉiamaniere.

Estis nur unu-du semajnojn post alveno de tiuj gesinjoroj Hopeful (esp. Esperplenaj), kiam ilia nevino, agrabla junulino deknaŭjara, venis viziti ilin, per la ĉefa vojo al Blackbutt (elp.: blakbot) kaj poste per laciga kaleŝveturo tra terure malebena regiono, sur mallarĝa apenaŭ laŭsekvebla vojeto.

Tiom da ektimigaj surprizoj la knabino spertis dumvoje, ke ŝi, profitante okazon de kelktempa foresto de siaj parencoj en la arbaro la sekvantan matenon sin sidigis sur la terplankon de la kabano, intencante skribe rakonti siajn aventurojn. Ŝi starigis antaŭ si tablon aŭ seĝon, kaj tiel sidis, kun pordo plene malferma. Pardonu! efektive pordo ja ne ekzistis, ankoraŭ la dometanoj tian ne konstruis.

Nu, la ĉarma fraŭlino ĵus skribis la vortojn: Unu fojon, kiam la kaleŝaĉo ĉirkaŭiris abruptan angulon, mi vidis eke...." jen iguano longa je du metroj enkuriŝ kaj la granda, skvamkovrita, inkubiga reptilio glitiris rekte trans ŝiajn genuojn, disĵetante la skribilaron kaj renversigante la fraŭlinon malgraŭ ĉi ties ekkriego.

Kiam la onklino eniris la kabanon duonminuton poste, ŝi trovis la nevinon sternita en kvazaŭmorta sveno, dum okulvideble embarasita iguano rigardis ŝin kiel se ĝi bedaŭras sian malpovon apliki provizoran kuracon.

#### La Stelo, Kiu Ne Volis Trembrili.

Ĉu vi iam elrigardis en la grandan stelplenan ĉielon en la nokto, kaj vidis la steleton, kiu ne trembrilas?

Kaj ĉu vi scias, kial li ne povas trembrili? Li mem estas kulpa pri tio, sed tio nur pli malĝojigas la aferon, ĉu ne?

Kompreneble, vi scias, ke kiam la steloj trembrilas, tio efektive signifas, ke ili dancas.

La steloj dormas en la taghoroj, sed tuj kiam mallumiĝas ili ekeliras unuope kaj komencas danci, kaj ju pli mallume fariĝas, des pli gaje ili dancas. Poste la luno, kiu estas la reĝino de ĉiuj steloj, aperas kaj malrapide iras trans la tutan ĉielon, observante zorge, por certigi sin, ke ĉiuj steletoj dancas konvene.

Sed iam estis unu steleto, kiu tute ne volis danci—kompreneble, tiu estis knabeto-stelo, ĉar knabinetoj-steloj ĉiuj amas danci, same kiel amas danci teraj knabinetoj—kaj kiam en unu nokto la luno demandis al li, kial li ne dancas, li nur klinis la kapon, dirante, “Ĉar tion mi ne volas fari.”

Nu, kompreneble, ke la luno tre koleriĝis, ĉar tio ne estas konvena maniero respondi al ĝentila demando de iu, tial ŝi diris, “Oni devas vin puni, kaj la puno estas, ke neniam plu vi havos kapablon danci.”

Kaj tiu steleto jam nun tute maljuniĝis kaj ofte sopiras danci kune kun ĉiuj ceteraj steloj, sed tion li ne povas fari, tial li nur sidas malgaje rigardante la feliĉajn stelojn trembrilantajn —mi volas diri dancantajn—ĉirkaŭ li.

Ĉu vi iam vidis lin? Li estas konstante tie; dum vi enliĝas hodiaŭnokte serĉu lin, elrigardante el via fenestro, kaj mi estas certa, ke vi tre kortuŝiĝos pro la kompatinda steleto, kiu trembrili ne povas.

—Trad. el la angla M. Purnell.

### “THE NEWSPAPER OF TO-MORROW.”

In this book Mr. Harold Herd forecasts great developments: “The Press will have an opportunity of satisfying the needs of millions of people eager for culture—there may be scope for a daily world newspaper, published in the morning in London, reaching 220,000,000 English-speaking people in the evening, and with an Esperanto edition for other languages.—The Printers’ Register, March 6th.

The World Message of the Children of Wales will be broadcast this year for the ninth time on 18th May. The official text is printed among other languages in Esperanto. Those interested should communicate with the Rev. M. Davies, 10 Museum Place, Cardiff.

### ESPERANTO IN TURKEY.

A group has been founded at Soke, a town near Smyrna, and from several points in Anatolia comes news of isolated Esperantist activities, writes a correspondent in Istanbul. There are Zamenhofans in Ardahan and Ĉildir, in the Kars vilayet, near the Russian border. The movement, however, is hampered by lack of textbooks and reading matter in the new Turkish script. It is hoped that the Esperanto “key” now being prepared by the local group will soon be ready to hand over to the International Central Committee for printing.

### LA PACA MONDO DE VIRINOJ.

Liu Jen-Hon. Trad. Iĉio Sun. 22pp., prezo ne montrita. Ĉe Feminisma Mondpaca Asocio, 71 Rue Marcel Tilot, Shanghai. Interesa kaj originala proponaro, sed lingvaĵo neglata kaj kelkloke nekorekta. Konsilinde, ke oni verku kun pli da zorgo.

### TRANSLATION CIRCLE.

Owing to an error on the part of the Redakcio no translation from Mr. G. Gordon, F.B.E.A., appears in this issue. Translation No. 8 will, however, be printed without fail in next month’s “Suda.” We ask the kind pardon and patience of those concerned.

### ESPERANTO NOTES TO APPEAR IN CHRISTCHURCH “STAR.”

A column of Esperanto notes, of interest to students of the auxiliary language, is being contributed to the “Star” monthly by Mr. N. M. Bell, M.A., D.B.E.A., who is tutor of the recently - formed W.E.A. Esperanto Class.

The articles appear on the first Tuesday of each month.

### CORRECTION.

The late Mr. Buchanan bequeathed £100, not £1000, to the B.E.A. The other figure (£4000) is, however, quite correct. We regret the error, which, we assure readers, was not ours.

### INDIĜENAJ VIVMANIERO KAJ MOROJ.

\* Alparolante la porpacan societons-ino McKenzie, ĝis lastatempe servinta en la presbiteriana misiejo ĉe Auruken, norda Kvinslando, donis vivsimilajn vortbildojn kaj nudvortan prezenton de la indiĝena vidpunkto. Ŝi diris, ke sur malvasta peco da marbordo, longa 120 mejlojn, regione de la misiejo, vivadas ok triboj, el kiuj ĉiu posedas propran ĉasterejon.

Kvankam nature nomada, ili vagadas nur inter limoj de la triba landparto, de kiu ili aparte tenas en respektego sian sanktan toteman grundon.

La veno de blankuloj kun siaj brutaroj sur multajn nigrulajn ĉasterejojn ne nur senigis la indiĝenojn de ilia porviva rimedo, sed ankaŭ profanis sanktajn grundojn. La homnatura kaj neevitebla sekvo de tio estis, ke la nigruloj lancadis brutojn apartenantajn al blankuloj, kaj el tio sekvis longa malpacado. Tamen multe da indiĝentoj servis kiel laboristoj ĉe brutbienoj, kaj nuntempe, pro plifeliĉa interrilato, ili ĝuas bonegan protekton sub la gemastroj de tiuj bienoj, ĉe kiuj ili laboras.



Multaj indiĝenaj moroj, malgraŭ ilia ŝajna strangeco, efektive estas saĝe elpensintaj kaj sanefikaj. La indiĝeno havas malordinare sagacan, komplikan kaj strangan edziĝ-sistemon, fundamentitan sur ekonomia bazo, laŭ kiu, baldaŭ post ĉiu nasko, oni aranĝas inter samtribanoj pri tio, kiu devas esti estonta edzo aŭ edzino de la naskiĝinto. La periodo, dum kiu ĵus naskinta virino sidas aparte, rememorigas pri la antikva hebrea moro.

Indiĝenaj infanoj facile fariĝas lertaj sovaĝejistoj kaj rapide lernas diversajn indiĝenajn dialektojn, krom la angla lingvo. La alparolanto, kvankam pridubante ĉiaman veremon de la indiĝenoj, diris, ke ili tre volas respondi demandojn laŭ maniero dezirata de demandinto, kaj tio tentas ilin mensogeti. Plue ili malŝatas ies troan scivolemon, tial ili emas malverdiri por eliĝi el embarasa trodemandado.

### UNIFORMITY OF SPOKEN ESPERANTO.

Radio station Lyon-la-Doua (France) recently arranged for five Esperantists of different nationalities to broadcast each a verse of an Esperanto poem by Zamenhof, and listeners were invited to divine their land of origin. It is not astonishing that the sharpest-eared succeeded in naming only two, for the simple sounds of Esp-o are uniformly taught over the globe, and undue influences of national speech peculiarities guarded against.

In spite of such evidence, we still meet those who claim that the peoples speak Esperanto each in its own way. It goes without saying that more often than not such objectors have never heard Esperanto spoken, and what is more, do not wish to. They are cursed with the pitiable mentality of the willingly deaf, the "stoppers of ears" typified for all time by the Hebrew prophet.

—Trans. "La Movado."

### HIRUNDLIBRO.

El la germana de Ernst Toller, trad. Helene Wolff.

Vere libreto dediĉita de bestadoranto al la hirundo. Persekutata suferige de la samkreituloj, la verkanto sin turnas por medito-konsolo al la bestaro, kiu samkiel li sentadas la kruelan pezpremon de la homa mano. Sur Pĝ 34/35 ni legas tre simpatian alparolon al la Bestoj. Li, "reĝigato de l' homaro," volas gvidi ilin en fantazia revolucio kontraŭ iliaj homaj turmentantoj.

Verkita de viro enkarcerigita pro

politiko, la libro en senrimaj versoj pensigas la poeziamanton pri la kaosa stilo de la usona poeto Walt Whitman. Ŝajnas ke nepre nur tiuj povantaj taksu meriton de modernforma psika poezio ŝatos la ĉi-libron; ni diras tion pro ĝia sendube riĉepensa sed malfacile komprenata esprimi-stilo. Tamen simplaj linioj karesas nian senton de l' belo: En la nesto

Enlitigite en blankaj lanugaj plumoj  
Kuŝas.

Kvin brunpunktitaj ovoj.

Kvin festaj temploj de ĝermanta vivo.

Malridante oni rimarkas kelkajn vortojn por multaj tute strangajn, sen ia piednoto klariga. "gelinta rigido" (It. gelare); "kvadro" (It. quadrello?); transo; firsto (?); gapanto, elancanta, kranki, dompti, ĝangalo (ĵangalo); drola (F. drole?); devota. Kio signifas "antaŭenkrablas unu ido"? Rimarku "duoble kaptito," "etfratineto," kaj la pensnuancon de "best-esteco" kompare kun "besteco."

Kortuŝa prozaĵo pri homa kruelo sur p. 60 kaj bonstila skizo de hirunda amo al ido, 63. Arte presita la libro kartonita kostas 2ŝ. 6p. per AEA.

(ROBO).

### ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That one or another of original Esperanto works of Julio Baghy, the Hungarian stylist, have been translated into thirteen languages.

That the Annual Conference of Woman Teachers (G. Britain) passed a strong resolution favoring Esperanto as a second language for all schools.

That the H.M.V. record of Hungarian folk-songs in Esperanto, accompanied by orchestra (Cat. no. A.M. 2152.), "En la Drinkejo," can be obtained from B.E.A. for 5/-, plus 1/- postage.

That the Russian Govt. has published a calendar for 1930 in six languages, one of which is Esperanto. The number was 1,500,000.

That there is a Chair of Esperanto in the commercial faculty at the Zagreb (Jugo-Slavia) University.

That the Swedish Govt. unanimously voted 2900 krone (about £168), as it did last year, for Esperanto courses organised by the teachers' federations.

That La Sennacia Asocio Tutmonda in its 235-page yearbook announces that it has now 6329 members.

That the Soviet Esp. Union, from July to December last year, sold £1500 worth of Esp. books.

That "Charlie's Aunt" will be performed in Esperanto at the Oxford Congress.

That the first Esperanto "talkie" (Metro-Goldwyn Mayer) has been presented at the "Coliseum," in Barcelona. It consists of a 15-minute conversation between an American and a Belgian lady. The pronunciation is excellent. It has also been shown at Birmingham (Eng.).

### LA UNUA ESPERANTA TUT-MONDA BRODKASTO?

S-ro C. Sharpe, en Merredin, Okc. Aŭstralio, skribas, ke laŭ lia kredo la irlanda radjejo 2RN, Dublino, la unua disaŭdigis tut-esperantan paroladon al la mondo. S-ro R. Mortished ĝin parolis, kaj la ĉi-landa samcelano aŭdis la tutan klarege.

### SENDU "S.K." ALILANDEN!

Precipe al la korespondanta Sudkrucano ni adresas jenon, kun espero, ke, akceptinte la sugestion, li samtempe faru por si faciligon de laboro kaj donu bezonatan subtenon al nia gazeto. Jam du-tri homoj sendas al alilandaj plumamikoj ekzempleron de S.K. de ili ekstre abonatan. Ĉu ankaŭ vi ne tiel faru, per unu bato atingante du celojn?

### "NEDERLANDA PROTESTANTO"

La 22an de Marto okazis en Amersfoort ĝenerala kunveno de Protestantaj Kristanoj, por fondi nederlandan unuiĝon, kiu celas propagandi kaj disvastigi Esperanton, speciale inter la samreligianoj en Nederlando kaj ekster ĝi, kaj utiligi la internacian lingvon por ĉiuj kristanaj celoj.

La Unuiĝo estas bazita sur la konfeso, ke Jesuo Kristo estas la sola Savinto de la mondo. Pli ol 100 personoj jam aniĝis.

La entuziasmo kun kiu la Unuiĝo estas fondita, montras, ke tio ĉi estas nepre oportuna kaj eĉ bezona.

Ĉio estas granda gajno por la Esp. movado entute, kaj bela sukceso aparte por la Kristanoj.

Samreligianoj, kiuj simpatias kun ĉi tiu Unuiĝo, estas petataj, sciigi sian adreson al: la Prezidanto: H. C. van Leeuwen, Lernejestro, WIJHE, Hollando; aŭ al la Sekretario: L. Woudenberg, Hildegondestr, 25 Bussum, Holland.

### ESPERANTO EN LA NOVA RUSUIO.

En sia ĵus eldonita libro "Russia Today and Yesterday" (Rusujo hodiaŭ kaj hieraŭ) n.185/6, d-ro E. J. Dillon, aŭtoro de "Rusaj Karakteraĵoj," "La

Eklipso de Rusujo"; iama profesoro de kompara filologio en la universitato de Ĥarkov, kaj redaktoro de "Odesskia Novosti"; privata konsilisto al grafo Witte 1903-14; rusa korespondanto de "Daily Telegraph" (Londono) 1889-1914, skribis jene:

"Longaj leteroj, bone verkitaj ruslingve, estis ricevitaj en Moskvo el japanaj instruituloj, literaturistoj, ĵurnalistoj kaj studentoj. Sed ne ĉiuj estis skribitaj en la lingvo de Puŝkin kaj Dostoievskv. El ili multajn oni verkis en iu artefarita lingvo, kiu ĝis la revolucio estis uzita pleje de homoj kolektantaj poŝtmarkojn, poŝtkartojn kaj monerojn. Nun, parte pro penado de s-ino Kameneva kaj ŝiaj kunlaborantoj, tiu lingvo jam tre vaste disuziĝis tra la mondo, kiel facila interkomunikilo inter si por tiuj proletarioj apartigitaj de maroj kaj montaroj. Hodiaŭ Rusujo povas fiere anonci, ke ĝi havas 16,000 de enregistritaj Esperanto-uzantoj. Oni diras, ke multaj ĥinoj kaj koreanoj legas Esperante presitajn verkojn de Lenin, Tolstoj kaj Turĝenev. Pritraktante Esperanton en "La Nord-Amerika Revuo" antaŭ ĉ. 25 jaroj, mi antaŭdiris, ke por certaj nomitaj celoj la neestetika interkomunikilo inventita de Zamenhof konkeros la mondon. Multaj legantoj sentos miron, sciigante, ke studo de Esperanto okupas kvaran rangon en tiuj sovetaĵ lernejoj, kiuj instruas nerusajn lingvojn; la unuan okupas la angla, la duan la germana, kaj la trian la franca. En la fabrikejoj laboras rondoj, kiuj jam preskaŭ du jarojn korespondas kun alilandaj fabrikejaj laboristoj per Esperanto. La Smolensk-a junkomunista rondo daŭre interŝanĝas pere de tiu lingvo komunikojn kun ekstrem-orientaj komunistoj. En multaj eksterurbegaj ĵurnaloj aperadas Esperanto-lingvaj leteroj al ili senditaj de soldatoj, militmaristoj kaj laboristoj el diversaj partoj de Eŭropo. Iu "pioniro," ekzemple en Odeso, korespondante kun infanoj alilandaj, ricevas ne nur el Eŭropo, sed ankaŭ el Ameriko, Japanujo kaj Ĥinujo, leterojn en Esperanto, kiuj donas elĉerpaĵojn el tiulandaj poemoj kaj revoluciaj kantoj. Laboristoj en sovetaĵ fabrikejoj iam ekspedis al skandinavaĵ landoj siajn "murgazetojn" en Esperanto, kaj linioj el tio faris profundan impreson sur la alilandajn laboristojn, kiuj respondis per laŭdoj, gratulante la rusojn pro ties progreso, kaj certigante, ke ili marŝos laŭtakte kun siaj sovetaĵ kamaradoj. Precipe laboristoj kaj membroj de la Ruĝa Armeo fervoras posedi Esperanton, kaj por esti ĉiam flue parolpretaj,

ili en Esperanto faris diskutojn ĉe kelkaj lastatempaj kongresoj. Kiel interkomprenigilo, Esperanto faras tiom da progreso, ke jam oni devas taksrigardi ĝin, kiel unu el la plej gravaj elementoj en la evoluo de la nova Rusujo."

### ESPERANTO "FILMETO" IN AUSTRALIA.

We have learned that the film has been sent to 16 countries, among them Australia. If more Esp. films are to be made it is essential that every Esp-ist see this presentation, and write expressing approbation to the Paramount—Famous Lasky Corp., Times Square, N. York—in Esperanto! List of theatres and times of showing can be had from head-offices of "Paramount" in the different countries. Clubs are asked to advertise the film as widely as possible.

### SENPAGAJ TAGMANĜOJ POR LERNEJANOJ?

La konferenco de la Aŭstralia Laborista Partio postulas kelkajn gravajn ŝanĝojn je la edukplano de ŝtato Nov-Sud-Kimrujo. Inter aliaj estas jenaj: Senpaga lerneja materialo (porinfanaj skribilaro, skribkajeroj ktp.), geknaboj vizitadu lernejon ĝis la dekseca jaro, pli da stipendioj, krompagado al instruistoj studentaj kariere, revizio de la lernobjektaro kun celo forigi imperialisman tendencon, kaj enkonduko de Esperanto kiel deviga.

Ni sentas plezuron legante pri tiu entuziasmo por Esperanto ĉe la laboristaj gvidantoj, sed ĉu vere sufiĉe da instruistoj troviĝus en okazo se oni enkondukis Esp-on devige en la lernejaron? Supozeble, ke la instruistaro devus submetiĝi je intensa klerigado pri Esperanto. Ni ŝatus leterojn de tiuj pedagogoj havantaj intereson pri ĉi tiu demando.

### GRATULON

al s-ino Marion Purnell, kiu jam atingas la okdekan jaron de sia aĝo, kaj ankoraŭ radias fervoron por la objekto de ŝia multjara amlaboro.

### F-INO SINNOTTE EN JAPANUJO.

S-ro K. Takahaŝi, Sizuoka, ĵus ricevigis ĉe nin la jenan interesan informon:—"F-ino Sinnotte, mia malnova korespondantino, venis al nia lando. En Kioto kaj Tokio ŝi estis entuziasme akceptita de gesam-oj. Tie ĉi en nia urbo la estro de la urba biblioteko tre volis bonvenigi ŝin kaj peti de ŝi publikan paroladon. Mi detale skribis al ŝi pri la plano kaj petis ŝian konsenton, sed bedaŭrinde ŝi, tro humile, rifuzis, dirante, ke ŝi estas tute ordinara homo kaj ne meritas esti paroladisto antaŭ la publiko, dum mia deziro estis, ke ŝi nur rakontu kvazaŭ ĉe tekunveno diversajojn pri Aŭstralio. Ŝi jam nun estas en ŝipo sur Pacifika marego."

### AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitancas jenajn abonojn, samtempe instigante al tiuj, kiuj ankoraŭ restas nepagantaj, ke ili bonvole faru la negravan klopodaĵon, iri al la poŝt-kesto por sensuldiĝi. Antaŭdankon! J. Hills, 9/-, nov., '31; pastro Downey, 21/-, marto, '34; H. Facer, 5/-, majo, '31; f-ino de Novak, 5/-, aprilo, '31; S. Bishop, 4/6, julio, '31; per f-ino Blyth, 5/-; f-ino V. Newnham, 4/6, aprilo, '31; f-ino F. Ludis, 5/-, majo, '31.

### KRONIKO.

Denove kun peza koro la redaktoro, ne havante enmane ian kronikaĵon de tri ŝtatoj, iras en presejon por avizi, ke ekaperiĝu la Suda Krucio por junio. Estas amare sentata ĉi tiu manko de koncerna kunlaborado, kio daŭre nepovigas nian gazeton kontentige sian rolon plenumi—disiradi kiel vere ĉiufanka informilo Esp-a por la tuta Aŭstralazio.

Melbourne, Vict.—Per plua rakonto ni sekvu s-ron R. Hudson de kiam li lasis la belan distrikton de Kashmir, kiu estas 6000 futoj super la maro. Li revenis al Raĥal Pindi kaj de tie veturis ĝis Peshawar, kie estas granda bazaro. La urbo estas ĉirkaŭita de montoj, kaj

## SUBTENU LA SAMIDEANAJN METIISTOJN !

PERCY HOLMES  
Elektristo Kaj Radiisto.

Lumiloj, gladiloj, purigiloj, motoroj, ventumiloj sperte instalitaj kaj riparitaj. Se via radia aparato ne bone funkcias, tuj sciigu al P. Holmes, 212 Noone str., Clifton Hill.

Memoru—Por ĉio elektra.

Telefonu: JW 4017.



belaj floroj kaj fruktoj kreskas abunde. Inter ĉi tiu montaro en neŭtrala regiono troviĝas la fama "Kyber Pass." Poste s-ro Hudson vojaĝis suden al Cawnpore kaj Lucknow, kie okazis la granda ribelo en 1857. Moskeoj, tomboj, kaj palacoj estas vidindaj en la urbo. La sankta urbo Benares estis poste vizitata, apud la rivero Ganges, en kiu ĉiu Hinduo devas ĉiutage sin bani antaŭ ol manĝi. En Benares estas 400 temploj, kaj kupolo farita el oro beligas la "Oran Templon," kie deĵoras 300 pastroj. Du rimarkindaj temploj estas "Templo de la Bovinoj" kaj "Simia Templo," kie troviĝas multe da simioj, kiuj netime manĝas el la manoj de la vizitantoj. Multaj el la stratoj estas mallarĝaj, kaj en kelkaj la kvin-ses-etaĝaj konstruaĵoj konverĝas je la supro kaj sekve la stratoj estas tre mallumaj. La interna beleco de la palacoj troviĝas en la muraj ornamaĵoj, kaj vastaj salonoj kaj vestibloj, ĉar la cambregoj mem estas nemeblitaj krom per tapiŝoj kaj kusenoj. La vizito de s-ro Hudson estis dum la pluvsezono kaj li transpasis la Ganĝon sur ponto de boatoj, ĉar pro la pluvo la rivero estis larĝa je  $\frac{1}{2}$  mejlo.—Calcutta—La "Victoria Memorial" el blanka marmoro estas la plej bela konstruaĵo en Hindujo, kaj staras en la mezo de bela gardeno. La "Marmora Palaco" estas rezultato de kurioza sorto de homo, kiu aĉetis terpecon, kaj, fosinte ĝin, li trovis trezoron. El la valora "trovitaĵo" li donis trionon al la registaro, tenis trionon por si mem, kaj per la alia triono li konstruis palacon, en kiu li montras belajn artaĵojn. Lasinte Calcutta s-ro Hudson iris tra Saliguri ĝis Darjeeling, 800 futoj super la maro. En la ĉirkaŭaĵoj de la urbo troviĝas multe da tegardenoj, kaj la stratoj estas tiel mallarĝaj ke oni povas veturi nur en ricksha.

Dum la monato, juna Esperantisto, s-ro Thos. King, el Belfast, Irlando, venis al Melburno, kaj vizitis la samideanojn ĉe ambaŭ kluboj.

**Auckland, Nov-Zelando**—"Esperanto kaj Paco," jen temo, kiun s-ro C. Adcock, prez. de NZEA, priparolis antaŭ lokaj paclaborantoj en kunveno la 6an

de majo. Ili atentoplene lin aŭskultadis, kaj postfine dankon esprimis. S-ro Adcock saĝe semis, direktante la okulojn de tiuj idealistoj al nia lingvo pacocela.

S-roj Russell kaj Wheeler ankoraŭ brodkastas el 1YA. La lekcionoj estigas multe da intereso.

En aprilo nin vizitetis s-roj King, hon. sek. de NZEA, kaj s-ro B. Klari-cich, el Wairoa.

**Masterton.**—Grupanoj pasigis agrablajn vesperojn la 15an de aprilo, kiam okazis speciale aranĝita programo. Ĉirkaŭ 50 personoj partoprenis. S-ro parlamentano G. Sykes, kiu prezidis, atentotene paroladis pri la pasinta jar-sesdeko. Deklamojn kontribuis f-inoj Bates kaj Drew, s-ino L. Payne, s-ro Johns kaj V. Engstrom. S-ro J. Johns, grupprez., ludis sakfajlon, kaj f-ino Brewster lin akompanis per danco. S-ino Pavlinovich paroladete priatestis, kiom utilis al ŝi Esp-o dum vojaĝo de Ĉeĥoslovakio al Nov-Zelando.

Pasintmonate la grupo enskribis du novajn anojn—kuraĝiga plupaŝo en tiu ĉi malgranda urbo. Malgraŭ, ke nia kampo por propaganda laboro estas nur malfacile fruktigata, ni "semas kaj semas konstante": s-ino Payne aperigas okulfrapajn eltiraĵojn el "La Suda Kruc" kaj aliaj gazetoj, kaj s-ro Franks provizis al iu redaktoro detalojn pri sia praktika uzo de Esp-o koresponde kun transmara samprofesiano, kiujn la redaktoro presigis en grava kolono. La gazeto ne estas grande abonata, sed estas grave, ke ĉiu N.Z. redakcio ricevis ekzemplerojn, per tio informiĝanta pri Esp-a progreso.

**Rangataua, N.Z.**—S-ro T. Murdie, kiu antaŭnelonge interesiĝis en Esp-o nun klopodas starigi klubeton aŭ klason sialoke. Sukceson!

**Christchurch, N.Z.**—Je la 15a de aprilo la Christchurch Esp-Societo enkorpiĝis kun klaso sub aŭspicioj de WEA (Laborista Eduk-Asocio) kaj jam de tiam estas nomata "La WEA Esperanto-Kursoj." Tio estas por rajti profiti la postmortan donacon de 500 monfuntoj al Esp. klaso en nia urbo La kursoj havas sek-iinon, kaj s-ro N. Bell, M.A., gvidas. En la inaŭguracia

## HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 **EQUITABLE PLACE,**

## Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

**MELBOURNE.**

vespero, kiam ĉeestis dudeko da geanoj, s-ro Manning, sek-io de WEA., priparolis la WEA-on, kiel edukperilon por socie-ĉiurangaj personoj, kaj volis sukceson al la kursanoj. Post nelonga parolo pri Esp-o kiel pormonda beno, s-ro Bell tuj komencis instrui la gramatikan fundamenton kaj per nigratabulo provizis lecionon.

La infanklaso—La Stela Rondo—ree funkcias. Ĉiu aneto povas deklami la unuan strofon de La Espero. Rondanoj arde laboras, celante interŝanĝi skribaĵojn ktp. alilande.

En marto s-ro Bell vizitis radiejon 3YA kaj brodkastis. Li samfaris la 5an de majo. La "Radio Record" publikigis lian martan lecion!

**Sidnejo, N.S.K.**—Laŭ sesmonata programo de la S.E.S., la jenaj samideistoj informodone parolis en aprilo: S-ro H. Matashin pri Milito kaj ĝiaj sekvoj, kaj s-ro H. Davies pri Aŭstralio.

Ekzameno por la diplomo de la B.E.A. okazis je la 17a de aprilo, kaj je la 24a la ĉiumonata festvespero.

Letero de s-ro Hart sciigas, ke li kaj la edzino ĝuas la vojaĝon al Londono, kaj flugigis saluton al la ĉilanda samcelanaro.

Je la lasta aferkunveno de SES la 1an de majo, oni diskutis eblecon okazigi E. kongreson en Sidnejo pasklibertempe 1931. Pludetala informo baldaŭ.

**Brisbano (Kvinslando).**—La societa agado daŭras sen rimarkindaj sukcesoj; sed ĉefa afero estas tio, ke ĝi daŭras.

Dimanĉon (18 majo) la societo kampfestis en Samford, en pentrinda loko apud rivero. Tamen, pro kunesto de diversaj neesperantistoj, oni ne multe parolis esperante.

Pro konversacia ekzerco, la sekretario aranĝis imitan marveturon. La ŝipestro kaj sipsekretario unue dungis la ŝipanojn, farante al ili diversajn demandojn pri ilia sperto je navigado, hejtado, ktp., kaj poste eldonis biletojn al la pasaĝeroj, kiuj devis klarigi la celon de sia vojaĝado, la specon de kajuto kaj cetere. Tiu ĉi ekzercado montrigis tre utila al la komencantoj, kiuj eklernis diversajn novajn vortojn. En la proksima kunveno de la societo oni daŭrigos la "marveturon"; la pasaĝeroj eble aranĝos la kutiman sursipan koncerton, kaj la ŝipo poste trafos rifon kaj pereos.

Per la alveno de sinjoro F. T. Simon, eks-prezidanto de la Sydney' a Esperanto-societo, kiu de nun loĝos en nia urbo, la Brisbana movado forte gajnos.

La konataj entuziasmo kaj energio de sinjoro Simon multe akcelos la movadon en ĉi tiu urbo.

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 121 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Australio. 10 Julio 1930.

## TEN YEARS OLD !

### Birth-month of "La Suda Kruco."

It is with pride that we are able to announce with this number that "La Suda Kruco" has reached its tenth birthday, having been founded in July, 1920.

The way along which it has passed and is passing bears many thorns, and its rock-strewn declivities call for care in passing them, but it is not, we are glad to say, a path unrelieved by here and there an umbraged glade in whose coolness fresh courage has been taken to face again the dust and heat of further travel.

In other words, while the task of editing "La Suda Kruco" has, from the beginning, been accompanied by a seldom-ceasing anxiety as to the permanent establishment of the paper, its several editors have never been without the cheering assurances given from time to time of the faithful support of not a few imbued with zeal for the "Suda's" welfare.

We enter upon the next decade in the spirit of sober optimism. The recent appeal was answered by guarantees to the sum of ten pounds. This, with an awakened interest on the part of the clubs in furthering, with steady determination, the fortunes of the paper should relieve the Redakcio of any immediate financial difficulty. A matter yet to be satisfactorily arranged is the organising of healthy selling "agencies" for S.K. in the club rooms of every city. Could not the paper be prominently displayed at every meeting and its claims on the support of members urged? Yes, much remains to be done before the goal—the guaranteed existence of "La Suda Kruco"—is reached.

While undulations of encouragement have reached us from clubs or indivi-

duals in W.A., N.S.W., Tas., and N.Z., from Queensland and S.A. we hear little or nothing. We would that these states join their strength to that of the rest in a concerted effort to end the uncertainty that must characterise the life of the S.K. until such time as the organised Esperantists of Australia shall guarantee it financially as their official organ.

True it is that we are passing through a period of industrial depression that is being felt keenly in some homes, but when we look on the densely packed tiers at the many theatres, or watch the surging throngs storm the various sport stadiums, we feel it within reason to ask, is it not possible for the Australasian Esperantist to deny himself for the sake of the "Suda"—to the extent of a penny a week?

Those that provide the life-blood of our national organ, and guide its destinies, are conscious of high honor, in that they are sharers of the same mighty impulse that moved La Majstro. They are sustained by a unshakable faith in Esperanto, that is winning its way surely throughout the world, and is destined sooner or later to occupy in the affairs of men the importance of electricity and the railroad.

May all of us, on this anniversary, dedicate ourselves afresh to the noble task our loved leader himself so gloriously entered upon but in sorrow left unfinished.

Ne tre facila estos nia vojo kaj ne malmulte ankaŭ ni suferos; sed batalante, kun plej granda ĝojo senhalte ni laboros kaj esperos.

## FONETIKA. LITERADO.

Ni ricevis de s-ro George Higgle, Rothesay, Scotland, gazetojn presitajn interalie en Esperanto kaj en Pitmana fonetika literado.



### A STEP FORWARD.

All those who wish success to La Suda Kruco in its battle for a place in the journalistic sun that sheds its rays on life in the Esperanto world, will be pleased to learn of the reason behind the appearance of extra New Zealand news matter this month.

The N.Z.E.A., for a certain small but assured subsidy, has agreed to adopt the S.K. as its official bulletin, sent free of cost to all N.Z.E.A. members three times a year. The gazette will thus find its way into the hands of over 200 Dominion Esperantists who hitherto have not been registered as regular subscribers.

This decision is significant, for it represents a step forward on the difficult road that, we trust, will eventually bring us to the satisfactory position of having solved, once for all, that dreary problem—the founding of a truly official organ.

We earnestly ask all those N.Z. "samcelanoj" who are reading this their first "Suda" to enrol themselves forthwith as full subscribers to our little paper, and so support what we sincerely believe to be a vital necessity for the conservation and spread of Esperanto throughout Australasia.

—La Redakcio.

### KRONIKO.

AUCKLAND, New Zealand.—The annual meeting of the Auckland Esperanto Society took place on 7th May in the New Church Hall. Mr. J. Russell, D.B.E.A., one of the earliest New Zealand Esperantists, presided over a good attendance. The following officers were elected for the new year:—President, Mr. J. Russell, Vice-pres., Mr. E. Clarke; Treasurer, Mrs. E. Watkin; Organiser, Mr. G. Wheeler; Committee, Rev. F. Woolloxall, B.A., Messrs M. Marinovich, and G. Day; Secretary, Mr. J. Lauder (Purewa Camp, St. Helier's Bay Rd.).

The Society will meet each Monday at 7.30 p.m. in the New Church Hall, Newton Road, the Church authorities generously permitting the free use of two rooms in the hall. For this practical exhibition of true brotherhood the authorities are to be heartily commended.

The president of the N.Z.E.A., Mr. C. Adcock, of Drury, visited the Society in May and demonstrated the celebrated "Ĉe" method of teaching. A teacher by profession, Mr. Adcock is admirably capable in this special field.

CHRISTCHURCH, N.Z. — Esperanto continues to enjoy a prominent

position in the "Cathedral City" of New Zealand, as the following indicates:—

**Esperanto Society.**—Owing to the formation of the Esperanto Class under the auspices of the Workers' Educational Association, made possible by the bequest (£500) of the late Mrs. Ensom, the Society members have suspended their own meetings and now meet weekly at the W.E.A. class in order to help it forward. This class has an average attendance of about a dozen, although twice that number are on the roll. At each meeting the Linguophone textbooks are used and, with a view of obtaining correct pronunciation, Prof. J. Findlay's discs are played, members usually singing the words of the song "Samideana Trinkkanto." There are good prospects of another class being formed at the local Y.M.C.A.

**Radio.**—Mr. N. M. Bell, M.A. continues to deliver his six-weekly broadcast on Esperanto from station 3YA, these proving to be valuable propaganda. The last talk took place on June 16, at 7.30 p.m.—during a very popular session of the station's programme.

**"Star" Column.**—Arrangements have been made for the appearance in "The Star" of a monthly Esperanto column. Two full columns (May and June) have been published.

**"Star" Circle.**—Over 30 children are receiving tuition and are progressing well in this study class arranged by "The Star." Mr. A. More ably fills the position of tutor.

**Propaganda.**—The W.E.A. class secretary (Mr. E. Kalin, 107 Antigua St.) has circularised all school-teachers and churches in the Christchurch district, and also the Chamber of Commerce.

HAMILTON, N.Z.—On the 19th May, Mr. C. Adcock visited this town and lectured on Esperanto to the Rotary Club, comprising about 40 members, who received him most enthusiastically. In view of the keen interest displayed in the subject, the Club granted the speaker an extension of 15 minutes—an infrequent occurrence—and after the lecture Esperanto textbooks and literature were distributed to all specially interested. Mr. Adcock also addressed the local Esperanto Club, which, as a result, has renewed activities after a brief halt, and will now meet monthly. A translation course has been inaugurated.

MASTERTON, N.Z.—The roll of the Esperanto Group of Masterton now contains 17 members. Under the guidance of Mr. A. Dewar the class has

made splendid progress, as is reflected in the volume of correspondence undertaken by the students, who now possess correspondents in Germany, Persia, Italy, Jugoslavia, Czechoslovakia, Spain, Sweden and Russia. Can any other N.Z. club better this list? Our active secretary (Mrs. L. Payne, 8 Bruce St.) continues to "spread the light" of Esperanto by means of regular and striking paragraphs in the local newspaper, this being in no small way responsible for our prosperous state.

WELLINGTON, N.Z.—The Wellington Esperanto Club, which meets every Tuesday evening in the Y.M.C.A., is the most virile of the Dominion Esperanto clubs, due chiefly to its harmonious and energetic executive. The present club was founded nearly three years ago, and, after the usual vicissitudes of young clubs, has settled down to serious propaganda and study.

Meetings open at 8 p.m. by the secretary reading, in Esperanto (the official language of the club), the minutes of the previous meeting. A translation is made in English. Members then go to their classes.

The teachers are Mr. E. Jack (President), Miss Coralie Smythson (Vice-president), Mr. L. Dust, D.B.E.A. and Del. of U.E.A., and Mr. B. Potts, F.B.E.A. (Secretary—34 Argentine-av., Miramar). Each teacher uses a separate blackboard and tuition proceeds until 9 p.m. One teacher takes the beginners to the seventh lesson in the lesson book; another takes from lesson eight to fifteen, and so on. Students advance from class to class, this providing an incentive to progress.

The second half of the evening is devoted to an all-Esperanto programme organised by the secretary, in which addresses are given in Esperanto by fluent speakers. The students are encouraged to give readings, and short comedies written by either the vice-president or the secretary are regularly presented, the roles including as far as possible the younger students who are sufficiently advanced.

The evenings are interesting, and visitors are invariably impressed with the attractive procedure and with the Esp-o fare provided. Reports, prepared by the secretary, appear regularly in the local newspapers and thus good publicity work is being done.

SIDNEJO, N.S.K.—S-ro G. Chapple de Sydney jam vojaĝas per vaporŝipo Moreton Bay al Anglujo kaj Eŭropo.

Lastnumere ni sciigis, ke oni diskutis eventualan okazigon de Esp. kongreso

en Sidnejo proksiman paskon, 1931. Oni celas samtempigi ĝin kun la oficiala malfermo de la giganta havena ponto, ĉar tiam multe da vizitantoj troviĝos en Sidnejo, tial bonokaze estos por ni reklami Esp-on.

Sed jam sciante estas, ke oni ne lokmetos la finlastan vinkton antaŭ jarfino 1931, eĉ pli estonte. La jara aferkunveno de SES (la 19an de junio) do decidis prokrasti la aferon, atendante fikson de difinita dato por la malferma soleno.

Samkunvene la plimulto el la jamaj oficistoj re-elektiĝis jene: Prez.-s-ro E. Pryke, D.B.E.A.; Vicprez.-oj, fino G. J. Orr, D.B.E.A.; prof. Randal Woodhouse, s-ro Feconya; sekretario, s-ro L. Pfahl; kasisto, s-ro H. Davies; helpsek., f-ino Fleming; bibliotekisto, f-ino F. Smith; kont-ekzamenisto, f-ino Harrison.

PERTH, W.A.—En junio s-roj Pyke kaj Hussey trapasis tra Perth, vojaĝante Oxfordon, por ĉeesti la mondkongreson Esp-an. Pro tio, ke nia societo tro malfrue sciigis pri ilia alveno, ĝi malfeliĉe ne povis havigi al si plezuron, renkonti tiujn bonekonatajn E-istojn. Tamen, ni volas al ili tre ŝatatan vojaĝon kaj sendanĝeran revenon.

Dimanĉesperon (15an) s-ano estimata s-ro Alex Saar, vicprez. de nia societo, faris informoriĉan paroladon el 6WF pri "Esperanto, kio ĝi estas." Li parolis dudek minutojn al vasta aŭskultantaro. Espereble, ke oni daŭrigos ĉi tiajn radi-elsendojn dum la vintro.

MELBOURNE, Viktorio: Invitite de la Melburna E. Klubo, la Esp-istaro kunveniĝis la 28an de majo, por diri bonvojaĝon al s-roj J. Pyke kaj G. Hussey, kiuj ekiris unu semajnon poste, por ĉeesti la E. Kongreson en Oxford. Ĉeestantoj ĝuis programon de kantoj, konkursoj, ŝaradoj ktp.

Ĉe la Societejo s-ro Skurrie interese paroladis pri E. kantoj. Lia manuskripto enhavis multe da tre belaj kantoj, el kiuj kelkajn li mem tradukis, kaj la vortoj kaj muziko formas libron havindan kaj utilan.

La unua danifesto en la jaro okazis la duan de junio, kaj dank'al bona vetero, gaja muziko kaj festa humoro kontentige sukcesis. La komitatanoj faris belajn rozojn el papero, kaj tiu, kiu tenis la bonŝancan floron gajnis premion.

S-ro Hudson daŭrigis la rakonton pri sia hinduja vojaĝo. Li atingis Darjeeling, kiu estas sur kape neĝkovritaj montoj. Veturante ĉirkaŭaĵe, li vidis grandan soldatejon, kien, pro la saniga aero, la soldatoj iras, por resaniĝi.

Budda templo estas vidinda konstruaĵo en la najbareco. Elefantoj, tigroj, pumoj kaj brunaj ursoj vagas en la regiono. Post reveno al Calcutta, kie li restis kvin tagojn, li surŝipiĝis kaj veturis 90 mejlojn laŭlonge de rivero Hugli, kiu estas larĝe unu mejlon je sia enmariĝo. Post tri tagoj la ŝipo atingis Rangoon, la ĉefurbo de Burmo. Li rimarkis tie kelkajn kuriozaĵojn, ekzemple: la radoj de la ŝarĝveturiloj estas naŭ futojn altaj, kaj homoj, anstataŭ ĉevaloj, tiras veturilojn. En Rangoon sidas tre bela parko kaj lago Viktoria. Ĉi tiu urbo estas rimarkinda pro sia grandnombro da pagodoj kaj temploj, preskaŭ ĉiuj konstruitaj el tektona ligno. Li veturis vagonare ĝis Mandalay, kie sin trovas fortikaĵoj, palacoj ktp. En la tre ebena kamparo oni ĉie vidas la rizkulturon.

### AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Kun vera danko ni kvitancas jene abonojn ktp. de fideluloj. F-ino L. Saw abono k donaco, julio, '31; diversaj vendoj 7/10; C. O'Dwyer, 4/6, dec., '30; C. Clarke, 4/6, majo, '31; H. Leighton, 4/6, junio, '30; s-ino Wilson, 5/-, junio, '31; f-ino L. Irwin, 4/6, junio, '31; J. McDonald, 4/6, majo, '31; F. McLeod, 4/6, aprilo, '31; M. Cecich, 4/6, aprilo, '31; E. Hubner, 4/6, aprilo, '31; f-ino M. Cullington, 10/-, aŭg., '31; L. Hiob, 5/-, majo, '31; J. Mader, 5/-, aŭg., '31; Brisbane E. Club, 5/6 anonco, majo, '31; J. McGuigan, 5/-, majo, '31; W. King donaco k abono, 10/-; N.Z.E.A., subvencio, £3/7/6; J. Galloway, 9/-, marto, '31; P. Dean, junio, '32; D. Guilbert, 4/6, junio, '31; E. Chung Gong, 4/6, julio, '31; f-ino A. Ryan, 4/6, junio, '31.

### S-ro P. Dean Eŭropon!

El vaporŝipo Orvieto venas adiaŭsaluto de N.Z-a samcelano P. Dean, kiu bondeziras per ĝi la aŭstralazian E-istaron. Li revenas sian hejmlandon Jugoslavio. Fidela Zamenhofano, arde li disportas la sanktan flamon.

### TO THOSE OVERDUE.

We would draw the attention of all lapsed or overdue subscribers to the urgent need, at least from our point of view, of fulfilling their obligation to a gazette which, at no small cost of time and money, is regularly sent to them. We trust that the considerable number to whom reminders were recently forwarded will see that their contribution to the common task reaches us without undue delay.

### KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A.; sekretariino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melb., E.10.).

### TRADUKO 8.

### LA CIGANA VIVMANIERO.

(daŭrigata)

Iu montro al ilia Hinduja deveno troviĝas en la fakto, ke ili nomas ĉiun transmaran landon Hindi Tem, kaj "Hindi" en la Hindustana lingvo signifas "Hindo".

La Cigana lingvo, kiun ili ĵaluze konservas, estas malmultvorta, treege antikva, kaj enhavas ne multe pli ol dek kvarmil (1) vortojn (8), el kiuj la plimulto ŝajnas esti el Hinda deveno, kaj la cetero estas stranga miksaĵo deveninta (4) de diversaj orientaj kaj okcidentaj idiomoj. Kelkaj vortoj estas Arabaj kaj multaj estas Persaj.

Rilate al siaj karakteriza feliĉeco kaj amo al la naturo kaj dolĉaj sonoj la Ciganoj estas enviindaj. Vivante kiel kuniklo pelata (4) de unu komuna tero al alia, ili tenas sian facilcorecon sub ĉiaj kondiĉoj.

### FORMORTANTA RASO LA AŬSTRALIA INDIĜENO.

(el "The Argus" de Melbourne.)

Verŝajne estas, ke neniu donis pli multan tempon nek pli simpatie interesis sin pri la Aŭstraliaj indiĝenoj ol profesoro Sir Baldwin Spencer. En la tempospaco inter la jaroj mil-okcent-naŭdek-kvara kaj mil-naŭcent-dudek-sesa (1) li vizitis la pli sovaĝajn regionojn de Aŭstralio, celante aldoni al la komuna scio pri la indiĝenoj. Li gajnis la fidon de la nigruloj, kaj pro tio ili permesis lin (2), vidi kaj eĉ fotografi iliajn plej sekretajn ceremoniojn. Ŝajne nenio restis kaŝita antaŭ (3) li. La rezultojn de sia penplena esplorado li donis (2) al la publiko en kelkaj libroj, plejparte verkitaj kunlabore kun la estinta sinjoro F. Gillen.

Sir Baldwin Spencer ĵus publikigis pluan verkon, nomitan "Wanderings in Wild Australia" (Vagadoj en sovaĝaj regionoj de Aŭstralio), entenantan, (4) ĝeneralan priskribon pri la pli sovaĝaj partoj de la kontinento, ĝia vegetaĵaro, bestaro kaj geologia historio.

En la interno de Aŭstralio ankoraŭ sin trovas indiĝenoj vivantaj (4) en tiel sama (5) primitiva maniero, kiel vivis la homoj en la ŝtonepoko. Ĉie, kie la trakontinentaj vojaĝlinioj kuntuŝiĝas



kun tria teritorio, kaj ĉie, kie kontaktiĝas blankuloj kaj la tieaj indiĝenoj, ĉi ties (10) ĉarmo multe malpliĝas. En la granda terspaco inter la montoĉenoj McDonnell (makdonel) kaj la plej orientaj kolonietoj de Okcidenta Aŭstralio, kaj en iuj (9) nealireblaj partoj de la duoninsulo Cape York (kep jork) ankoraŭ sin trovas triboj, ne ricevintaj (4) la dubprofitojn de la civilizacio. Sir Baldwin Spencer en la daŭro de kelke da monatoj vivis en ĉiutaga kontakto kun certaj (9) triboj en tiuj partoj, kaj oni devas respekti liajn opiniojn, ne nur pro lia sciencista merito sed ankaŭ pro tio, ke li neniel celis profiton por si.

Li ne konsentas kun la ĝenerala kredo, ke la indiĝena viro traktas la edzinon aŭ edzinojn kiel ŝarĝbruton (6), nek ke li tenas por si la plej bonan manĝaĵon kaj ĵetas la intestojn al la edzino. Li skribas:—Mi kiel eble plej atente observis la indiĝenojn, sed ŝajne ĉe la manĝoj oni donis (2) porciojn al ĉiuj viroj, virino kaj infano sen ia favoro al kiu ajn krom tio, kompreneble, ke oni unuavice donis (2) al la viroj. Ofte en diversaj lokoj en Meza Aŭstralio kaj en la plej nordaj regionoj mi observis indiĝenojn, vivantajn (4) sub ordinaraj kondiĉoj en siaj kamploĝejoj, sed neniam mi vidis virinojn humile sidantaj (7) malantaŭ la viroj kaj ricevantaj (7) kiel sian porcion nur pece-tojn aŭ restaĵojn, kiujn ĵetis al ili la edzoj kaj mastroj.—(daŭrigota).

#### NOTARO 8.

1. En ĉi tiu kurso oni skribu numeralojn per vortoj pro sinekzerco je ĝusta legado.—2. Rimarku la frazkonstruon kun aktiva anstataŭ pasiva verbo por cviti kunmetitan verbtempon.—3. "kaŝita antaŭ" (aŭ "al" aŭ "for de"). Ne skribu "kaŝita de", ĉar "de" post pasiva participo ĉiam signifas "by". Ekz. 25/24.—4. Adjektiva participo. Notaro 1/6.—5. "tiel sama", similar. (Ekz. 28/3)—6. Akuzativo, ĉar oni subkomprenas "oni traktas"—7. Nominativo, ĉar la participo ĉi tie estas predikata. Cox 107b. Notaro 7/9.—8. Akuzativo, ĉar "ol" ne estas prepozicio. La vortoj "ne multe pli ol 14,000" estas kvazaŭ unu nepreciza numeralo.—9. "iuj" aŭ "certaj".—10. "ĉi ties", the latter's.

#### TAKTO.

Usono senatano sidis apud franca diplomato ĉe festeno. —Vuli vu, e-e-sivu plej, e-e-e...li balbutis, provante paroli france.

—Sinjoro, diris la diplomato afable, —mi petas, ke vi ne ĝenu vin paroli france. Via akcento estas tiel pariza, ke ĝi preskaŭ min nostalgias.

### NEW ZEALAND SECTION. (N.Z.E.A.)

#### 3rd Official Bulletin.

In accordance with a decision of the N.Z.E.A. its official bulletin will henceforth be published thrice annually as part of "La Suda Kruco." This step should ensure closer co-operation between N.Zld. and Australia. The journal will be mailed monthly to members paying the full subscription (5/- yearly, to "La Suda Kruco," Box 731 F, P.O., Elizabeth-st., Melb.).

#### Last Year's Work.

Reviewing the results of the first year's operations of the N.Z.E.A. one finds the Association strongly established and well organised; the membership at the close of the year numbered 210, located in 76 localities; a deputation from the Association presented a petition on behalf of Esperanto to the Minister of Education, and the Director of Education, in reply, notified that teachers might form Esperanto classes in New Zealand schools after school hours; the First N.Z. Congress was successfully organised and held; two numbers of the "Official Bulletin" were issued, and 3,000 copies of a specially compiled propaganda leaflet published; several lectures were given in Rotary Clubs and from the Y.A. stations, and many feet of propaganda and other matter placed in the columns of the Press. At the end of the financial year the receipts of the Association exceeded expenditure by about £10. A very busy year.

#### The New Year.

The N.Z.E.A. is now traversing its second year, commenced in a manner that betokens an increase in the usefulness and activity of the Association during 1930-31. Already over 70 renewed subscriptions and 15 from new members have been received. Included among the former is the subscription of Mr. R. Wright, M.P., and ex-Minister of Education, and among the latter is that of Mr. F. Combs, M.A., a Wellington primary school headmaster and recognised education authority. As during the past year, good support is given this year to the Association by members of the teaching profession.

#### Important Undertakings.

After completing a volume of work resultant from the first Congress, the N.Z.E.A. has steadily pushed forward its policy of gaining, on the one hand, recognition for the language in educational circles and in public opinion, and, on the other, of affording assistance to the movement and to Association mem-

bers. Towards the end of January last, the N.Z.E.A. conveyed to the Minister of Education (Mr. Atmore) a resolution passed by the Auckland Esperanto Club asking that primary-school teachers be given the option of teaching Esperanto in preference to a foreign language. The Minister said that as Esperanto is not recognised as a subject for the University Entrance and the Professional Examinations he was not able to see his way to include the teaching of Esperanto in the public school syllabuses. This intimation was submitted, together with a copy of the petition previously presented to Mr. Atmore, to the Registrar of the University of New Zealand, who was requested to place the matter before Senate. The Executive Committee (University) considered the question and referred it to the meeting of the Academic Board in November next. So far so good!

With a view to obtaining a definite authority to which to refer occasional critics and opponents of Esperanto (one or two still exist!), the Secretary of the Department of Scientific and Industrial Research (Dr. Marsden), at Wellington, was then communicated with and requested to investigate the claims of Esperanto through a competent body such as the British Association for the Advancement of Science. The Department has taken the necessary action, and its pronouncement is awaited with interest.

The N.Z.E.A. accepted the opportunity afforded by the departure during April of the three New Zealand delegates to the Geneva Labor Conference arranged by the International Labor Office, to present an Esperanto textbook and literature to each of those gentlemen, in this manner bringing the claims of Esperanto before them in a practical way.

#### For the Movement.

An appeal for the Vienna Deficit Fund, made in the last issue of the "Official Bulletin" and to club secretaries, brought a generous response from members. The fund already

benefits to the extent of £3/10s., and other sums have been promised; and at the time of writing two clubs have yet to forward their collections.

In an effort to increase the number of U.E.A. delegates and members in New Zealand, the N.Z.E.A. has been collaborating with the energetic U.E.A. delegate at Wellington (Mr. L. Dust, 20 Chelsea-st., Miramar), whose services during the past two or three years in the interests of the U.E.A. are outstanding. It is pleasing to note that Dargaville—in the past an Esperanto stronghold—will shortly have its delegate in the person of Mr. A. Gregory, one of the earliest Esperanto pioneers in the Dominion.

Congress-members will recall that during the First Congress the question of establishing a New Zealand Esperanto Examination Committee was raised and discussed, it being then decided that the N.Z.E.A. Executive combine with the Board of Examiners which has been operating, for the purpose of exploring the matter. The question has proved a difficult one, and investigation is still proceeding. The present examination procedure—obtaining examination papers from London, returning the answers for marking, then finally receiving a result notification by post—necessitates a lengthy time of waiting, which should be, if possible, much shortened. It is hoped an improvement will be effected.

#### A Special Request.

Members not yet having renewed their subscriptions for the current year (2/6) to the N.Z.E.A. are enjoined to give the matter their early attention. The amount may be forwarded either direct to the secretary (7 Brook-st., Wellington), or paid to club secretaries at the different centres.

#### An Energetic Club Secretary.

One of the most energetic Esperanto secretaries that one can find anywhere in the Esperanto world is probably the secretary of the Wellington Esperanto Club—Mr. Bertram Potts, whose activities in great measure are responsible

## HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

## Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.  
Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

for the continued development of the club.

Always to be relied on to undertake work for Esperanto, Mr. Potts is a tower of strength to his club. One of the features of the Club's evening programmes has always been his weekly address, delivered in fluent Esperanto, covering such diverse and educative subjects as: "Volapuk kaj Ĝia Interesa Historio," "Mark Twain-Lia Vivo kaj Humoreco," "La Ĉina Sistemo de Ideografa Skribado," "Beethoven-Tragedia Vivhistorio," "La Teorio de Wegener pri la Migrado de Kontinentoj," "William Harvey kaj la Eltrovo de la Cirkulado de la Sango," "Socrates kaj Plato-Ilia Influo al Greka Filozofio," "Je la Rando de la Biologio," "La Progreso de Psikologia Scienco," "La Astronomiaj Eltrovoj de Copernicus, Tycho Brahe, kaj Galileo," "Kapitano Scott kaj Lia Antarktika Esplorado," "La Triumfo de Malnova Egipta Arkitekturo," "La Horologio-la Scienco de Tempmezurado," kaj "Kiamaniere la Parolfilmoj Parolas." These are only a representative selection of Mr. Potts' addresses which have been appreciated by both students and experienced Esperantists attending the club.

### THE LANGUAGE OF PAN-EUROPE.

I would have hesitated to publish those thoughts which for a long time have been mine, had it not been for the fact that at Oxford, before the University Union, a body devoted to the study of problems affecting the League of Nations, it was again recognised that the chief obstacle to the pacification of Europe is the multiplicity of European idioms.

Sir Clive Morrison Bell, M.P., expressed himself as follows: "Imagine the astonishment that would be felt in Great Britain were we to hear that, in the interests of international unity, we must renounce our splendid language and adopt say French or Russian. If, on the other hand, the United States of Europe should be constituted without our participation (and this seems to me very probable, for if Great Brit-

ain moved towards federation it would be a federation of those nations that compose the Empire), then imagine the feelings of the French people, were it one day decided that German henceforth should be Europe's international tongue."

Mr. A. Meillet, professor of the College de France, has estimated that there are in Europe 66 distinct languages, of which 12 alone are spoken by more than ten million people. How exasperating it is on arriving, for example, at Budapest, to realise that your brain-racking study of French English, German, Russian, yes, and even Japanese, has gone for nothing, because in the Hungarian capital you find that it still pleases its citizens to speak Magyar! Furthermore, let us note that it is the small nations that are the most fanatically attached to their idioms. They try to make up for their feebleness by shouting at the universe in sounds that no-one but themselves can understand! Is it not high time to put an end to this imbroglio?

Let us suppose that beginning with the year 1932 every schoolchild in Europe shall study as a compulsory subject, besides their national tongue and for the same length of time each week, the European language, and that certain manuals, printed in that tongue, shall spread everywhere the same principles, based on justice, white-race solidarity and pacificism. Only then will it be possible to say with truth that the foundations of a unified Europe are being well and truly laid.

(From the French of Ludovic Nau-deau, in l'Est Republicain.)

### ESPERANTO AND EDUCATION.

The secretary of the Royal Society of Arts, the largest examining corporation, announces that from April, 1931, the R.S.A. will hold examinations in Esperanto.

The recent brochure "Esperanto in the School" contains a press error. The number of Esperanto teachers is 4478, not 447. The number now reached, however, is almost 5500.

## SUBTENU LA SAMIDEANAJN METIISTOJN !

PERCY HOLMES  
Elektristo Kaj Radiisto.

Lumiloj, glädiloj, purigiloj, motoroj, ventumiloj sperte instalitaj kaj riparitaj. Se via radia aparato ne bone funkcias, tuj sciigu al P. Holmes, 212 Noone str., Clifton Hill.

Memoru—Por ĉio elektra.

Telefonu: JW 4017.



**Lingvaj respondoj.**

(1) Kion signifas "lui"?

"Originala Verkaro" 248: "Lui" signifas nur "preni lue"; "doni lue" estas "luigi" (Zamenhof). Ĝenerale oni trovas, pro pli facila komprenebleco, "lupreni," "ludoni."—Simile: "prunte doni, prunte preni."

(2) La servisto hejtas la fornon, kaj la forno hejtas la ĉambron.—Ĉu en ambaŭ frazoj la verbo "hejti" estas uzebla?

Ne; la forno ne hejtas la ĉambron, sed varmigas ĝin.

(3) Oni diras "la ekstera flanko"; ĉu oni rajtas paroli pri "la ena flanko"?

Se la esprimo plaĉas al vi, uzu ĝin; sed—ĉu oni komprenos vin samfacile kiel oni komprenos, se vi diras "la interna flanko"? Cetere, ni adjektivigas multajn prepoziciojn: anstataŭa, antaŭa, apuda, ĉirkaŭa, duma, ekstera, kontraŭa, kroma, kuna, pera, posta, suba, supera, sura, transa.

(4) Kia diferenco ekzistas inter "trouzi" kaj "misuzi"?

La prefikso "mis-" havas la sencon de malĝuste, malbone. Mi misuzas apogseĝon, se mi uzas ĝin kiel glitveturilon (tion mi faris kiel infano!); mi trouzas la pardonemon de mia patro, se mi konscie agas kontraŭ lia volo ĉiutage, pensante: li ja pardonos! "Trouzi" estas uzi super la kutima, ordinara mezuro, "misuzi" estas uzi en maniero, kiu ne estas ĝusta.

**CONGRESS ON SEXUAL REFORM.****Wien, Sept., 1930.**

We have received from the committee for the above a programme in German, French, English and Esperanto. It contains the order of lectures, advice to those attending the congress, and a statement of the aims for which the World League for Sexual Reform stands. Havelock Ellis is one of the presidents. Postfach 63, Wien 1/15.

"La Internacia Medicina Revuo" (No. 3, 1930) contains a long and interesting speech by Dr. J. Leunbach at the congress of this league in London, 1929. Every Esperantist doctor of medicine should subscribe to this excellent review. Address: D-ro Kempeneers, 20 rue aux Laines, Bruxelles (Belgujo).

Cinikulo estas homo, kiu konas la prezon de ĉio kaj la valoron de nenio. Kaj sentimentalulo estas homo, kiu

vidas absurdan valoron en ĉio kaj ne konas la foirprezon de iu unuopa aĵo. (Oskar Wilde).

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd. Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Societo.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinlando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. J. E. Duff, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 122 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 Aŭgusto 1930.

## THE WORLD—AS ARRANGED BY EDITORS.

The "Sunday Express" (London) recently published an extraordinary article under the title, "The World Will Soon Speak Nothing But English," by Mr. James Douglas. With editors and newspaper proprietors trying to rule the world, as they are nowadays, we are not certain whether to read this in the indicative or the imperative mood.

Mr. Douglas tells us that English is "destined to become the universal language of mankind" and that "no other language has a chance of becoming the international language of the human race." Further, that "one day the world will be one, and all men will speak and write English as they speak and write their mother tongue" (which we may point out in passing, is in many cases rather badly). Mr. Douglas seems a little uncertain whether English is to become "universal" or merely "international"; but we may leave that point to him. He trips up badly in another statement, to the effect that "all attempts to invent an artificial language have failed." He asserts that "there is no future for Volapuk or Esperanto or any other concocted form of international speech"—so that, although a newspaper editor, he is evidently one of the people who have remained in the dark as regards the progress of Esperanto. Let us hope that he will go to the Oxford Congress in August and judge for himself. But in the meantime, perhaps he will enlighten us as to the justification for another of his statements, that "wherever you travel in foreign lands you find English spoken, written and understood. You can go anywhere on English and English alone." He might also tell us why, in that case, there is such a large market for foreign phrase books; why it is

that so many foreigners persist in writing letters to English correspondents in French and other alien tongues; why they so often seem to forget their English directly they land in England; why the people of Quebec, British though it be, still speak French; why the League of Nations allows French as well as English as an official language for its debates; and why at ordinary international congresses there are two or three further official languages. Again he tells us that "no other language has the power to grow as English grows. The other languages are regionally rigid and frigid." We can only say that this is not our experience with foreign tongues, which appear to assimilate, with surprising ease, new words in such quantities as to be most embarrassing to those of us who learnt one or another of them some years ago. We do not know what our foreign friends would like to say to Mr. Douglas on this point—but we are quite certain that they would repudiate his claims for English, and the idea that it is going to kill their own languages as he suggests.

We fear that in most of Mr. Douglas's dogmatic statements "the wish is father to the thought"!

("International Language.")

## ELECTRO-TECHNICAL INSTITUTE accepts Esperanto.

The famous Electro-technical inst. of the University of Grenoble (France) has decided to use Esperanto in its widespread foreign advertising.

We have to hand from them a finely printed folio in Esp., giving an outline of the multifarious organisation of this many-sectioned seat of learning.

Turn to Direktoro de Politeknika Inst., 46, avenue Felix-Viallet, Grenoble, France.

**CHE - INSTITUTE OF  
ESPERANTO**  
Founded in The Hague.

"Heroldo de Esperanto" announce a very important step in the Esperanto movement, the founding of an institute for the large-scale diffusion of Esperanto throughout the world by means of courses conducted by instructors trained in the methods of the young Rumanian pedagogue whose dazzling successes in Sweden and Holland have sent thrills of coming victory through every Esperantist.

The disciples of Andreo Che have practised and are practising his methods with success equal to their Master's. For the last two years large courses have finished with the pupils sincerely regretting the close of the tuition given by such as MM. Seppik, Moriariu or Mdme. Pahl. These highly encouraging results have served to banish from the mind of Pastor Che the depressing thought enplanted there by what he modestly deemed to be fulsome flattery, that the success of his teaching methods was to be explained by his personality alone.

The scene of this move, fraught with so much significance for the Esperanto world, and, indeed, we hope for the world in general, was the hotel De Twee Steden (The Two Towns) in Den Haag, where on 24 May the public inauguration of the Che-Institute took place, before the assembled representatives of the Press and an interested public. Many influential citizens attended by invitation.

The Institute will train a constant stream of Esperanto teachers on an international scale, and serve as a central office for the direction and regulation of the newly-made armies of Esperantists.

A call is made for monetary support. Foundation life members are accepted on payment of £40; supporting life members, £8; active members are those who devote themselves to labor for the Institute, and pay only an entry fee of 10/- to Julia Isbrucker, Oostduinlaan 32, The Hague.

**NORTH AMERICAN ESPERANTO  
ALMANAC.**

Here is our American friends' first year-book, happy augury of increased activity and forward drive on the part of the Yankee and Canuck Esperantistaro. Mr. J. Sussmuth edited it, and packed in the 112 pages a wealth of informative matter for English-speaking Zamenhofans. Dr. Lehman Wendell's fine article, "What is Esperanto,"

covers a lot of ground concisely. Then there's an outline of the activities and organisation of Esp. Ass. of Nth. America, a chapter on the Esp. World Movement, an explanation of what the Sennacieca Asocio Tutmonda stands for, Twenty-five Methods of Esp. Propaganda, each good, a full list of names and addresses of E.A.N.A. members, and so on.

Paper is fine-quality, but press errors jolt the eye here and there, even in big ads. Turn to The Esp. Ass. of Nth. America, Fort Lee, N.J., U.S.A.

**LUNA LUMO.**

(Claire de Lune"; de Paul Verlaine.)

La blanka lun'  
en bosko lumas;  
sub ĉiu branĉ'  
ia voĉo zumas  
el foliaro....  
Ho, koramato!  
En lago rebrilas  
(profunda spegul')  
la nigra konturo  
de l' nigra salik',  
kie ploras la vento...  
Ni revu: jen tempo.  
Ia vasta kaj dolĉa  
pacema sent'  
nun ŝajnas flui  
de l' firmament'  
per astroj iriza...  
Jen hor' Paradiza.

—Tradukis A. Delsudo.

Iriza: kiu vidigas kolorojn kiel tiujn de ĉielarko: iriza perlamoto, iriza kvarco.

**ABBREVIATIONS.**

For the benefit of those to whom the frequently recurring contractions and abbreviations in the European Esp. papers give trouble, we publish the following suggestive rather than **complete collection of the commonest.**

I.a. inter aliaj; k.a. kaj aliaj; k.c. kaj ceteraj; t.e. tio estas; k.s. kaj similaj; anst., anstataŭ; ekz., ekzemple; k. sekv., kaj sekvantaj; rim., rimarko vd., vidu; kp., komparu; Rusl., Ruslando; el- kaj eniri, eliri kaj eniri. k.d. kaj diversaj; k.t.p. kaj tiel plu; ĉ. ĉirkaŭ; div. diversaj; k.m.a. kaj multaj aliaj; p. personoj; lern. lernantoj. In Russian gazettes one often meets such clipped compounds as "profunio" (profesia unio, unuiĝo); komjunularo (komunista junularo); "labrondo" (laborista rondo). These forms are no hindrance to the regular readers of such publications, as on their first appearing in the text they are accompanied by an explanation. The constant



need to express these objects or ideas, and the desire to save time and space in setting, prompt the use of these truncated roots.

### TRANSLATING A HARSH EXPRESSION.

Do the English words "dam, damned, damnable, damning," call for the introduction into Esperanto of the root "damn" (L. damnare)? The root is found in French (damner), Ital. (dannare), Port. (damnar), and Ger. (verdammen), and has been availed of by several writers, including Grabowski, Baghy, Kalocsay, "Egruho" (translator of "La Ŝipĉarpentisto") and the translators of "All Quiet." But its use by translators on every occurrence of the root in an English text is not warranted. Perhaps these innovators have felt that the root "kondamn" expresses primarily the sense of moral reprobation, or the legal idea resident in the verb "to sentence" (a prisoner), while the forcible injunction "eniru inferon!" often carries with it a note of defiance to be distinguished from the anger or bad temper that generally prompts the imperative use of the verb "damn." The following sentences may provoke thought. "That traffic is a damnable one" (Tiu fikomerco estas diabla). The curse can be rendered, "Estu kondamnita" (Venecia Komercesto 76/1). "The evidence against him is damning" (La atesto plene pravas lin kulpa). The loose expression "It's a damned shame!" means little more than "Maljustege!", "Maljusta afero!". Here are a few examples from Zamenhof. "La diablo ĝin prenu." G. Dandin 9/13 (Damn it; Devil take it). "La diablo ĉion prenu." Revizoro 61/6. (Damn it all). "Estu malbenita; malbenita vi estu; malbeno al vi. (Damn (curse) you). Rab. 36/4, 19/12, 49/16. "Al la diablo; kio, al la diablo (Damn it. Devil take it) Rab. 49/10, 81/1; Batalo de l' Vivo 9/4. "Beata" is seen now and then in the work of good authors, used in relation to the saints—"la beata Virgulino," "la beataj apostoloj." Would not "malbeataj" mean "the damned"? (Robo.)

### Hindujo kaj la angla lingvo.

La kvalito de la angla lingvo parolata de universitataj diplomitoj en Hindujo estas multe malpli bona ol ĝi estis antaŭ 20 jaroj. Tiame angloj instruis la lingvon, sed nuntempe tion faras hindoj, kiuj mem uzas ĝin nur nelerte. (S-ro Wilbur Keblinger, usona konsulo en Aŭst.)

### QUERY CORNER.

B. in Tom. Place of adverb. (Cox 88, 59a) "Estas vere necese." It is really necessary. "Estas necese vere." It is necessarily true.

Bop. in H. Atendi, to await (with expectation, or certainty, or hope). One cannot translate by "atendi" every signification of the Eng. "expect." For ex., "Mi ricevis ordonon atendi lin ĉi tie, sed mi pensas (aŭ opinias), ke li ne venos" (I don't expect him). "Mi atendas la alvenon de la vagonaro", but "Mi ne antaŭsentis (aŭ antaŭvidis) tian skuon." I didn't expect such a shock (or shaking). "Ekspekti" seems quite unnecessary. Every meaning of "expect" is translatable by means of our present provision of word material.

Ilisto en Y. Don't use -ul with participle nouns. Write "ŝanĝito," "kapitulo."

F. in Kor. Yes. "It seems to me quite possible—probable even—that an artificial language to be universally used will be agreed upon." (Herbert Spencer, "An Autobiography," 1843).

Deko in L. There are two Esperanto lesson-books in Icelandic, published 1906 and 1909.

Germ. in D. "Ekzakta" is now an "official" word. But compare "La Rabistoj" p. 37/29: Oni ja alkondukis la pretigadon de venenoj preskaŭ al la rango de bonorda scienco (exact science).

No All. "Plaŭdi per la manoj," to clap the hands (not always to applaud!); "plaŭdi," to give out a sound as of water when beaten by the hand, an oar, etc. "Aplaŭdi," to clap the hands in applause; (fig.) to express approval.

### ESPERANTO KAJ ROMKATOLIKOJ.

Ni ricevis de Budapest 62, Postafio 203, belan kongreso-murreklamon kaj broŝureton pri sankta Emeriko, filo de sankta Stefano, kiu fondis la sanktan kronon de Hungarujo. Sta. Emeriko estas patrono de la hungara junularo, kiu ĝojos akcepti aŭguste nunjara la romkatolikan junularon tutmondan, por festi kun ĝi la memoron de sia granda patrono. La 15a Katolika Kongreso okazos 16/20an de aŭgusto, kaj en la solena procesio sur la Danubo veturos inter la ŝipoj de ĉiuj nacioj, ankaŭ la ŝipo de la Esperantistoj.

## OKSFORDA KONGRESO KAJ LA KABLOSERVO.

Brave! Ĉu por la unua fojo aperas ĉefpaĝe kablita novaĵo pri Esp. mondkongreso? Pictorial World Cables servis al la melburna "Sun," granda tagjurnalo, dekseplinian raporton pri okazonta kongreso Esp-a ĉe Oksfordo. Sub rubriko "Ĉi tie neniŭ Babelo—Esperanto. Delegitoj el 40 landoj parolas unu lingvon," la kablito informis pri alveno de sep aŭstralianoj en Londonon, envoje al Oksfordo, kaj trafe kontrastigis la lacigan procedon ĉe la interparlamenta konferenco kun la facila irado ĉe Esperanto-kongresoj.. Gratulon al tiuj instigintaj la kabloservon, tiel bone kaj juste informi la mondon pri jam grava afero.

### OUR TENTH BIRTHDAY.

To those who sent us congratulations on having seen a decade through, we express thanks and heartily reciprocate the warmth of encouragement shown. Specially do we appreciate the kind letter sent by the members of the Melbourne Esperanto Society, who assured us of their keen interest in the welfare of the S.K., and hoped to see it loyally supported by every E. club in Australasia.

### FINNA TRADUKO DE ESPERANTA LIBRO.

Ankoraŭ unu Esperanta verko reaperis en nacilingva traduko. La konata verko de niaj samideanoj sinjoroj Lauri Laiho kaj Antoni Delsudo (Maurice Hyde), "Aŭstralio: Lando kaj Popolo," eldonita antaŭ du-tri jaroj en Leipzig, estas tradukita en Finnian lingvon de sinjoro Laiho kaj eldonita en Porvoo de la firmo Werner Soderstrom.

La ekstera aspekto de la libro estas tre simila al tiu de la Esperanta eldono, frapanta kun sia ruĝa koloro, blankaj steloj de la suda kruco kaj karakterizaj bildoj de la Aŭstralio vivo. Noto sur la unua paĝo klarigas, ke la verko estas traduko el Esperanta originalo.

Ne estas bezone, insisti pri la grava signifo de tia apero. La fakto, ke en Esperanto aperas verkoj sufiĉe gravaj por meriti tradukon en nacian lingvon, estas pruvo pri la serioza valoro de nia lingvo. Kiel Aŭstralianoj, ankaŭ, ni povas ĝoji pri la dissemado de fidindaj kaj freŝaj informoj pri nia malmulte konata lando.

Ni gratulas al niaj samideanoj Laiho kaj Hyde pri ĉi tiu nova sukceso, kaj esperas, ke pluaj tradukoj en aliajn lingvojn baldaŭ sekvos.

## AL NIAJ SUBTENANTOJ.

El la redakcia koro flugis dankosago, kiam alvenis ĉiu abonajo aŭ donaco ĉi tie kvitancata. Al la fideluloj la S.K. esprimas sian altan ŝaton.

S-ino A. Carter, 4/6, majo, '31; G. Jelas, 5/-, julio, '31; J. Sneddon, 5/-, julio, '31; per vendo, 3/8; M. Ravelich, 5/-, majo, '31; kolektita de s-ro M. Ravelich, 25/-; f-ino H. Dawes, 4/6, julio, '31; G. Gordon, 5/-, junio, '31; J. Hodges, 5/-, junio, '31; per s-ino Sainsbury vendo, 5/-; pastro A. Lambton, 4/6, julio, '31; f-ino H. Batchelor, 5/-, junio, '31; f-ino E. Chisholm, 4/6, aprilo, '31; f-ino G. Marshall, 4/6, junio, '31; f-ino A. Hopton, 4/6, junio, '31; C. Dornbusch, 5/-, julio, '31; J. Dobrich, 5/-, aŭg., '31.

### KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro George Gordon, F.B.E.A.; sekretariŭno, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melbourne, E.10.)

#### TRADUKO 9

### LA AŬSTRALIA INDIGENO (daŭrigata)

Ankaŭ erara estas (1) la tre ofta diro, ke la viroj, forirante la kamploĝejon, igas la virinojn marŝi post ili kaj porti ĉiujn pezajn ŝarĝojn. Vere estas, ke la viroj ordinare iras antaŭe, portante nur siajn lancojn, lancjetilojn kaj ŝildojn, sed ili tion faras simple pro tio, ke ili devas esti ĉiam pretaj por ĉasi kanguruojn (2), dromajojn (2) kaj aliajn ĉasaĵojn, de kiuj la familioj dependas por nutro. Por tion sukcese fari, estas necese, ke ili ŝtelire proksimiĝu al la ĉasoto (3), kaj la bruado ordinare farata de granda aro de indiĝenoj fortimigas bestojn. Ofte la viroj ja portas tiel pezan ŝarĝon, kiel la virinoj krom tio (4), ke virino ordinare portas junan infanon, se ŝi tian (5) havas, kaj tia kutimo ja ne estas stranga eĉ ĉe blankuloj.

Sir Baldwin ankaŭ celas forigi ankoraŭ unu (6) eraron nome, ke la indiĝena infaneto estas mizera, nesufiĉe nutrata kaj senespera. Li diras, ke, se sezono estas bona kun abundo da manĝaĵo kaj akvo, la juna Aŭstralio sovaĝulo havas neniel malfeliĉan infanetecon. Ĉirkaŭrampante kvarpiedule ĝi estas la centro de intereso por la plenaĝuloj ĝuste tiel, kiel estas blankula infaneto samaĝa. La indiĝeno ja estas tiel amema kaj milda al siaj infanoj, kiel estas blankula patro aŭ patrino (7) al siaj. Sir Baldwin diras:— Ĉe ĉiuj triboj, kun kiuj mi intime rilatis, certe ne estas bezono por "Societo por malhelpi Kruelecon al Infanoj."

Aparte (8) interesaj estas iuj komentarioj pri rilatoj inter la blankaj kolonianoj kaj la landidoj. Li diras:—En la fruaj jaroj de la koloniado la tipa blankulo en Aŭstralio, precipe (8) en la malproksima internolando—kvankam felice ekzistis multaj esceptoj—opiniis tre malfavore pri la nigruloj, kiujn ordinare li ne, eĉ la plej malmulte, penis kompreni. Kiam la blankulo venis, okupis la landon kaj paŝtis sur ĝi brutarojn, li tre nature mortpafis la dromajojn kaj kanguruojn, kiujn manĝadis la indiĝenoj. Ankaŭ nature la nigrulo pensis, ke, ĉar la blankulo mortigas kanguruojn, la indiĝeno rajtas (9) mortigi bovojn. La afero laŭ sia vidpunkto estis nur pagopreno. Malfeliĉe la blankulo posedis fusilon (2) kaj la indiĝeno nur lancon kaj bumerangon (2); kaj ĉar la nigrulo ne povis skribi al la gazetoj por meti sian plendon antaŭ la publikon, kaj ĉar, kompreneble, li ne povis pli ĝuste distingi inter tia kaj alia (10) blankulo, ol povis blankulo distingi inter tia kaj alia (10) nigrulo, li simple konsideris ĉiujn blankulojn malamikoj, kaj siamaniere faris laŭpove por revengi kaj por gardi sin, siajn virinojn kaj infanojn. Eksterdube estas, ke, kiam okazo favoris lin, la nigrulo iufoje faris tion, kio, laŭ la vidpunkto de la blankulo, estis supermezure abomena, tamen la abomenaĵoj, kiujn faris la nigruloj, estis kvazaŭ nenio en komparo kun tiuj de la blankuloj.—(daŭrigota).

### NOTARO 9.

1. En la Angla teksto la subjekto ("description") de la frazo estas malproksime de la rilatanta verbo ("is"). Estas bonstille konstrui la Esperantan frazon tiamaniere, ke la subjekto kaj la verbo estu proksime al si.—2. Vorto de Verax.—3. Substantiva participo. Cox 210.—4. "save" (except). Ne uzu "escepte" sed "esceptinte" aŭ "krom tio," ĉar "escepte" signifas "exceptionally" aŭ "as an exception." Mill.—5. "one" ĉi tie en la Angla estas pronomo. Komparu "Mi ne estas haringo! kaj ĉar mi ne estas tia (one) estas do afero tute simpla." (Marta 52/7), kaj "Se mi estus tio (one)". Rab. 81/11.—6. "ankoraŭ unu," another, one more, yet another. Oni ankaŭ povus uzi "plua." Notu, ke "alia" signifas "another" (not the same)—7. Esperanto ne havas vorton por "parent," sed "parents" estas gepatroj. — 8. "especially," "particularly." En tiu senco ne uzu "speciale," kiu ĉiam enhavas la ideon de celo, intenco aŭ destino. Ekz. 19/7.—9. "rajtas" ne "rajtis." Cox 220, 221.—10. "tia kaj alia," this and that. Komparu

F.K. 292/29, Ham. 58/26, Bat. de l'Vivo 68/28.

### EN OKCIDENTO NENIO NOVA.

Dolorkrio de la simpla soldato.  
Tradukita de s-roj Teo Jung, Jos. Berger, W. Hoffmann kaj d-ro Hans Ellinger.

Eldonita de "Heroldo de Esperanto."  
Prezo, kartonite kvin, tole bindita sep ŝilingoj.

"Terura libro pri terura afero," nomis ĝin iu angla publicisto. Tiu kerneco ne sufiĉas. Teruranta ja ĝi estas....sed ankoraŭ pli. Ie kaj ie la aŭtoro helkolore pentras tiujn naŭze hontigajn scenojn generitajn de la bestfaranta spirit-haladzo de l' organizita hombuĉado; sed ankaŭ mult-multon, kiu gloron pri radias sur la vole-nevole ĝin partoprenantaj. El koro flamanta flagre eliras ĉi tiu denunco al la sanga frenezo de l' nacioj. El koro homeca elvenas plenkonstruite purblanka monumento al la kamaradeco, la amo ferliga inter tiuj frontantaj la fajrosputojn el la Infero. Jen krudigitaj homtigroj vadas tra sanga koto, pri kiu ili fi-ŝercas; jen la samaj riskas la vivon sub hajlopafado, alportante savon al amiko trafita. Realisme sincera elverŝo de bildoj, pentritaj de inkub-regata animo; neforviŝeblaj skizoj de tiu plejbela floro de l' militjaroj—oferama kamaradeco.

Lingveroj de la aŭtoro, Erich Remarque, al multaj iugrade ofendas. La sentemaj legantoj ŝokiĝas sajne pro neplena aŭ tutnen-ia scio pri la vomiga vero, kion la homa esprimovo, ne troigante, pene celas priskribi. Plue, povas esti ia hipokriteco en tio, ke la ofenditoj, kvankam ili scias la koncernajn faktojn, tamen la vortojn ĉastule ŝajnigas eviti. Tiaj uloj preferas fermi la okulojn kontraŭ la malhomigaj flankoj de l' afero, kaj samtempe babili banalaĵojn pri naci-gloro, soldata bonhumoro, elporteco ktp.

Cetere, modereco markas la verkon de la tradukinta kvaroj. La diskutitaj paragrafoj estas lerte manovritaj en sian novan lingveston per plumoj jam nun donintaj al la mondo entute glatlegeblan respegulon de la originalo.

Ankoraŭ venas verkatakoj de la romantika skolo literatura, kaj de certaj profesie militistaj rondoj. Iu armeoficira asocio en Germanujo akuzis la aŭtoron, riproĉante, ke li kalumnias la sialandan soldataron. Devas esti, ke la koleraĵoj militistoj-sinjoroj aŭ ignore tralegis aŭ malĝuste komprenis la verkon. Remarque mem respondu: "Ni ne estas venkitaj, ĉar kiel soldatoj ni estas pli taŭgaj kaj pli spertaj; ni estas



simple dispremitaj kaj returnŝovitaj de la multobla pliforto." Vere, li montras angore sur la malfortikiĝon kaj finan kolapson de la germana rezistovolo, kaŭzitan de la mortlaco, korpkonsumiĝo kaj malespero. Jam la malamikaro superege disponas amasojn da armitoj kaj montojn da materialo—kaj "niaj freŝaj taĉmentoj estas anemiaj kaj kadukaj knaboj, kiuj... facile mortas."

Se Remarque iamaniere deprenas de la sialanda armeo ian por ĝi rajtan honoron, tion ankaŭ faras por la sia la dramaŭtoro Sherriff, per "Journey's End" (La fino de l' vojaĝo), en kiu li prezentas la timon de du anglaj oficiroj antaŭ la militinkubo.

Ĉu ne pliĝuste dirite, ke tiaj verkistoj malligas la langon al la mutaj amasoj da siaj dolorantaj samsortanoj, povigante ilin vortigi sian korŝirantan demandon al ĉielo, "Kial?"

Por ke la libro aperu ĝis la nasktago de l' amita Zamenhof, kvar kompetentuloj entreprenis la tradukon. Pro ĝusta stil-unuecigo ne estas eble, trovi kie komencas aŭ finas la malsamaj plumoj.

Oni bezonus almenaŭ du kolumnojn de tiu ĉi gazeto por oportune pritrakti la lingvan flankon de la traduko. Menciataj estu nur plej atentindaj neologismoj: apelo, lazareto (kvarantenejo), dizerti, rami, eĝo, rodi, stafedo (stafeto, Verax), pufro (A. puff, malpeza kukaĵo?), piero (pontkolono), depoto, simuli. La tradukintoj ne tre zorge evitis duobligi konsonantojn. Kelkloke "ĵus" misuziĝas. "Propradire" sonas strange (verdire, ĝustadire) Sesfoje nebona elaso de la pronomo; (ili) estas anglaj ŝuoj. Presentante (proponante) cigaredon. Neĝuste "ne jam" (ankoraŭ ne). Kio signifas "Na"? Intermiksito (a) 40/3. 149/2 ord(ig)i, 42/13 ekzerci (sin). La kunmetoj kun "fajro" estas ne ĉiam klaraj. Ekz. 58/12 "fajroatako." Provi (ĉu ne "peni"?). Stranga uzo de "opini" 60/28 k.a. kie oni devus traduki per "volas diri." "Ĉasistoj" (chasseurs, jaegers). Neklara paragrafo sur p. 71. 75/6 eltrumpetas. 87/22 drink' (trink'). 89/1 minĵetilo (bomb-?). 112/8 tiel ke (tial). 152/16

nome (nominale): piedumoj, 124/22 (vindgamaŝoj). 113/17, 144/23, pozicia batalo (A. trench-warfare) kaj "proksimbatalo". 143/18, 188/3 (ĉemana batalo?) ne klaraj. 239/16 "spirale ruĝaj"? "ŝildoj" (A. sentries!); vertico (limo, silueta rando?). ĵursimile (riproĉe), radikale (dolaregige), unuarange celita (bontrafe c.). Loke en la pli meditecaj partoj la penso nebuliĝas ĉe la leganto, kaj certaj radikoj uziĝas en maniero iom por ni novaj.

La libro abundas je teknikaj militesperimoj kaj terminoj soldatfakaj. La Esp-istaro kelkajn akceptos en la komunan lingvon, aliajn sugestiajn sed ne sufiĉe precizajn aŭ klarsignifajn ili elekteme adaptos polurante, aŭ rifuzos eniron per simpla neuzo.—(Robo.)

### Wear a Star !

It seems a matter for regret that so many Esperantists and partisans of Esperanto through indifference or timidity wear no green star. A pretty little brooch or stud can be bought for 1/6d. through your club, and forms an inextinguishable font of opportunity for presenting our language to enquirers. "Vir-samideanoj" should take the precaution to sew their stud-star in the lapel, otherwise it may fall out. To those who, while enthusiastic in furthering Esperanto, yet speak it with difficulty, we counsel that they learn some half-dozen key phrases very well, in order to direct foreigners to the club, or to the address of an Esperantist able to meet the position. But always wear the star !

### VIZITO DE F-INO E. A. SINNOTTE AL JAPANUJO.

F-ino E. A. Sinnotte, aŭstralia samideanino kaj aŭtorino de la originala novelo „Lilio“, vizitis japanujon, la 27-an de marto. Ŝia vizito estis ĝustatempa por admiri la belajn kaj mondfamajn ĉerizflorojn.

Alveninte al Kioto, ŝi demandis al la direktoro de la hotelo. ĉu li konas iun Esp-iston en la urbo, kaj tiun vesperon vizitis ŝin kelkaj samideanoj. La sekvantan tagon ili gvidis ŝin tra la

**PERCY HOLMES**  
**ELEKTRISTO KAJ RADIISTO.**  
212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvojn. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via !

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.

urbo, vespere akompanis ŝin por rigardi belan japanan dancon kaj multe amuzis ŝin. En Tokio s-roj Okamoto kaj Hirasaŭa vizitis ŝin kaj post kelkaj tagoj oni havis bonvenigan kunvenon por ŝi. Dume ŝi esploris la rekonstruitan modernan urbon kaj vizitis Nikko, fama pro la belega sanktejo. Ĉio estis mirinde bela por ŝi.

La 14-an de aprilo kunveno por bonvenigi f-inon Sinnotte estis okazigata samtempe kun la Zamenhofa festo en la konstruaĵo de Junulara Kristana Asocio.

Kunvenis ĉirkaŭ 60 gesamideanoj. Post la vespermanĝo f-ino Sinnotte parolis pri la impresoj, kiun ŝi ricevis en nia lando. Ŝian parolon sekvis salutoj de s-roj Aguro, Ŝimizu, Kuraĉi kaj Sasaki. Ankaŭ estis kelkaj donacoj.

Klara Rondo, rondo de Tokiaj Esp-istinoj, aranĝis kunvenon por la sama celo en la 13-a. Ĉeestis 16 samideaninoj, inter kiuj estis ankaŭ f-inoj Alexander kaj Casy. Kiel memoraĵon, oni donacis al la gastino folion, sur kiun ĉiuj subskribis. Ankaŭ 7-jara filineto de s-ino Sasaki lerte subskribis.

Ŝi adiaŭis nian landon la 17-an. Ŝia restado estis mallonga, sed ŝi havis multajn okazojn vidi japanajn gesamideanojn kaj ĉefajn famlokojn. Se ŝi ne apartenus al nia anaro, estus certe, ke ŝi ne ricevus tiun ĝojon, kiun nur Esp-istoj sentas.

Baldaŭ ŝi rehejmiĝos kun diversaj memoraĵoj; ĉiufoje kiam ŝi vidos ilin, ili refreŝigos al si la memoron kaj invitos ŝin al refoja vizito. Ni esperas, ke la revizito, kiun ŝi promesis al ni, nepre efektiviĝos.

(El "Orienta Revuo.")

### PLEZURIGE

estas, anonci ke s-roj J. Lauder, Georgo Day, kaj E. Clark, ĉiu ĉe Aucklando, N.Z., kaj s-ro A. Dewar, ĉe Masterton, N.Z., sukcesis ĉe la B.E.A. diploma ekzameno. Plej grave kaj kontentige estas, ke ĉe el la novaj diplomitoj estas aktive laboranta Esperantisto, estante oficisto en la klubo sialoka.

### NEKROLOGO.

(Kav. J. G. Ward, P.C., C.C.M.G.)

Kiam la veterana Novzelanda ŝtatisto

## HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

kaj dufoja ĉefministro, Kavaliro Jozefo G. Ward, trankvile kaj pace forpasis de tiu ĉi mondo en frumatena horo la 8an de Julio, tiam la Novzelanda Esperanto Asocio bedaŭrinde perdis unu el siaj altrangaj patronoj, kaj la Esperantistoj adiaŭis helpeman amikon.

Kvankam la mortinta ĉefministro ne scipovis Esperanton, li estis tre simpatia al la lingvo internacia dum multaj jaroj, akceptinte la patronecon de la antaŭa Novzelanda Asocio, fondita en 1904, kiun oficon li plenumis ĝis la Asocio ekdormis dek jaroj poste. Pro sia elkora amikeco al Esperanto, Kavaliro Jozefo Ward estis unuvoĉe elektita, kiel patrono de l' nuna NZEA ĉe la nacia kunveno de Esp-istoj okazigita ĉe Wellington en Januaro, 1929a. Li akceptis grandaplezure; kaj per sia okupo de alta oficiala posteno kaj per sia reputacio kiel sperta kaj saĝa ŝtatisto, li faciligis la laboron de samideanoj establi kaj popularigi Esperanton inter la Novzelandaj publiko.

En la nomo de sia agkomitato kaj membroj, la NZEA kuŝigis sur la ĉerkon, dum tiu restis ĉe Parlamenta Domo, belan girlandon, kiel esprimon de kondolenco kaj respekto por la mortinta patrono. Restu li pace.

### KRONIKO.

**Brisbano:**—La 27 majo la societo bonvenigis sinjoron F. Simon, el Sidnejo, kiu de nun loĝos inter ni. En la nomo de la societanoj, la prezidanto (sinjoro Hyde) esprimis la grandan ĝojon, kiun ili sentas, havante inter si tiel fervoran batalanton por nia movado, kaj la esperon, ke sinjoro Simon trovos agrabla sian restadon en Brisbano kaj partoprenos kun siaj kutimaj sindono kaj vikleco nian movadon ĉitien.

Sinjoro Simon dankis por la akcepto, kaj parolis pri la urĝa bezono restarigi la Aŭstralazian Esperanto-Asociacion, por ke la Aŭstralio kaj Nov-Zelanda samideanaro povu en gravaj aferoj agi unuope kaj paroli per unu voĉo. La ĉeestantoj aŭskultis kun vigla atento.

La 22 junio la societanoj havis kampfeston en Ashgrove. Pro pluvo tamen la anoj disiris kaj poste rekunvenis en la hejmo de nia samideano sinjoro N.

## Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

G. Mills, en Moorooka, kie oni finis agrablan tagon.

La 24 junio la societo konsideris la proponon de la Sidneja societo pri restarigo de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio laŭ la projekto prezentita de ties sekretario (sinjoro Pfahl), pri kio la anoj montris intereson sed ne entuziasmon.

**Melbourne, Victoria.**—La jarkunveno de la Melb. Esperanto Societo okazis frue en julio, kiam jenaj ge-sroj reakceptis oficon:—Prez. s-ro P. Hudson; vic-prez-oj, f-ino L. Irwin kaj s-ro P. Holmes; sekretario, f-ino V. Cox; kasisto, s-ro E. Cox; bibliotekisto, s-ro S. Bishop.

La monata dancfestoj, tre ĝuata, okazis la 7an de julio. Verda-j steloj brile sidis sur ĉies brusto, kaj premion gajnis la tenanto de bonŝanca stelo.

S-ro Hudson ankoraŭ rakontis pri sia vojaĝo en Burmo. Suririnte riverboaton ĉe Mandalay, li veturis sur rivero Irawadi ĝis Bhamo. La rivero fluas tre rapide, do la veturo okupis tri tagojn. Ambaŭborde de la rivero mallume etendiĝas densejo. Post du tagoj li revenis al Mandalay, tie restis 5 tagojn kaj faris multe da ekskursoj ĉirkaŭaĵe. Sep mil pastroj servas en la granda templo tiu-urba, kaj dum deĵorado forrazas la hararon kaj portas flavajn robojn. Krom servi entemple, ili ankaŭ instruadas. Kutime la pastroj dediĉas ne la tutan vivon al templa servado, sed laŭ arango faras tion por 4-5 aŭ pli jaroj. Post la difnita tempo ili liberiĝas el tiu deĵordevo kaj rajtas labori je la komerco aŭ alia okupo. Por atingi la supron de Mandalay Hill oni devas grimpi 999 ŝtupojn, sed rekompence por tio oni vidas belan okulĉarmilon de la urbo kaj 700 temploj. De Mandalay s-ro Hudson iris al Prome, apud rivero Irawadi.

**Sidnejo.**—La 10a de julio s-ro I. Seriŝev alparolis la klubanojn pri la "Granda Iluzio de Homoj de la Kosmo." La 17an d-ro F. Williams, nia eksprez., vizitis la klubon, kio ĝojigis la koron de ĉiu ano. Li parolis pri sia vivo kaj laboro en Papua, kien li intencas reiri kun la familio post mallonga libertempo en Melbourne. La 26an okazis la monata danco kluba, kaj la 2an de sept-o oni prezentos la jaran Balon de la Ligo de Nacioj en Sidnejo. Tiu ĉi estas vere internacia balo, ĉar ĉiuj konsuloj (proks. 54) ĉeestis kun dancistaro, kaj ĉiuj nacioj promenos spektakle ĉirkaŭ la balĉambro. La Esperantistoj,

kiel kutime, ankaŭ havos parton en tio. La guberniestro de N.S.K. estas prezidanto de la afero. Lastan jaron pli ol 2000 personoj ĉeestis.

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu mardo je la 7.30a horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinlando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.





# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 123 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Australio. 10 Septembro 1930.

## LET'S GO DUMB—

And be better understood!

A short article under the head "A Universal Language" appeared in the "Age" of 16 August. Prof. Daniel Jones, there advocating sign language as an international language medium, breaks no new ground. In "Bibliografio de Internacia Lingvo" (Geneva 1929), an attempt to classify all works written for the past 300 years on the problem of international language, one may see a list of 33 writings on sign language and similar projects, dating from 1614 to that of the recently published plea of P. Korpov (Moscow 1926) for a universal sign language. None of the theories intended to surmount the barrier of language diversity has ever received the breath of life that only usage can confer. True it is that the redskin "nations" used sign language somewhat extensively, but the primitive wriggling that sufficed for the savages' simple needs would not serve to illuminate a modern audience on bitumen road construction, or the philosophy of G. B. Shaw.

Further, a sign code (for a system of communication in which the tongue is not used should not be termed a language) would be useless for radio broadcasting and international telephony, where the need of an inter. language is ever more keenly felt. The interflow of international thought by the printed word and the founding of that World Literature dreamed by Goethe evidently have no place in the mind of Professor Jones.

Man is a loquacious animal, and strangely susceptible to the thrill imparted by impassioned oratory. It is hard to conceive of an international gathering being moved to enthusiasm by dumb gesturing. The surge of inspiration that flushes the hearts of the assembled throngs from the earth's four

corners when "La Espero", the Esperanto anthem, is sung at the world-congresses, is no small factor in generating the Esperantist's well-known will to carry the battle abroad to the indifferent.

It would seem the counsel of despair to suggest that mankind should accept the pitiable limitation of the unfortunate speechless as a means to wider inter-comprehension. This state of mind would surely be dispelled were the well-meaning academician to abandon his attitude to Esperanto, and enter on an examination of its frankly defined claims.

## KURSO PER TRADUKADO.

Kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A.,  
Sek-iino: f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av.,  
Surrey Hills, Melb., E.10.

## TRADUKO 10

## FORMORTANTA RASO

La Aŭstria indigeno.

Sir Baldwin diras, ke kvankam oni ofte parole nomas (1) la indigenojn nigruloj aŭ "niggers", kiu ĉi lasta (10) vorto en la Angla lingvo estas vulgara nomo de la Afrikaj negroj, tamen ili ja ne estas negroj laŭ raso nek laŭ koloro, sed estas longkapaj Kaŭkazuloj. Admirinda trajto en la karaktero de la indigeno estas lia malavareco. Li havas le emon dividi kun siaj kunuloj sian manĝaĵon kaj kian ajn alian havaĵon. Verŝajne tiu karakteriĝo iufoje estas la kaŭzo de mortigado de la blankulaj bovoj. Pro tio, ke li kutimas dividi sian manĝaĵon kun aliaj, li ne komprenas, ke la blankulo, kiu posedas multon da bovoj, ne volas donaci el ili al la nigrulo. Krom ĉe (2) la adeptigaj ceremonioj kaj la puno je certaj (3) krimoj, la indigenoj kondutas inter si tre bonkore—kompreneble se nur ili estas anoj de amikaj grupoj. Sir Bald-

win Spencer diras, ke la indiĝenaj viroj traktas la virinojn laŭ maniero, kiun oni ne povas nomi tre severa. La virinoj devas fari grandan parton sed ne ĉiom de la laboro de la loĝejo. En bona sezono tio ne estas multa, kaj en malbona sezono la viroj kaj virinoj egale suferas, kaj da kiom troviĝas da manĝaĵo la virinoj ricevas justan porcion. La vivo de indiĝena virino kaj la traktado al ŝi de la viroj estas tre supera ol la sorto de miloj da virinoj en kvartalaĉoj de Britaj urboj. Tamen se viro suspektas, ke lia edzino krimis kontraŭ la leĝoj pri edzineco, tiam certe lia traktado al ŝi estas abomene kruelega. Ne estas moro de la indiĝenoj mortigi maljunulojn kaj kadukulojn; kontraŭe ili estas aparte (4) bonkoraj al tiaj homoj kaj donas al ili porcion el (5) la manĝaĵo, kiun tiuj ne povas mem akiri.

Trege interese en la libro estas la priskribo pri la sociaj sistemoj kaj tri-baj ritoj. Dum longa tempo Sir Baldwin ne konstatis, ke la rilatoj de indiĝeno al liaj parencoj tute diferencas de la rilatoj de blankulo al ĉi ties (6). kunvivado, kaj la lingvoj ne havas apartajn vortojn por patro, patrino, Ĉe (2) la indiĝenoj ne estas familia edzo kaj edzino. Ĉe (2) civilizitaj popoloj ĉiu el la vortoj edzino, edzo kaj patrino individue nomas unu personon, sed Arunta viro nomas la edzinon Anua, kaj virino same nomas la edzon, kaj ambaŭ nomas Anua dudekajn da aliaj viroj kaj virinoj, ĉar ĝi estas nomo de grupo. Estas certaj (3) viroj el kiuj kaj sole el kiuj povas virino laŭleĝe edziniĝi, kaj estas tiel sama leĝo pri la edziĝo de viro. Ĉiuj laŭleĝaj edzinoj kaj edzoj havas saman nomon, kiel ankaŭ havas ties patro kaj patrino, se ĉi tiuj (7, 8) laŭleĝe geedziĝis. La grupa, ne individua, parenceco estas karakteriza de preskaŭ ĉiuj el la Aŭstraliaj triboj. La elpensado de tiuj leĝoj, kiuj estas tre komplikaj, atestas pri inteligento neniel (9) malalta. Eble la originala celo estis gardi kontraŭ interparenca pariĝo. (daŭrigota).

#### NOTARO 10.

1. Rimarku konstruon de la frazo por eviti kunmetitan tempon.—2. "ĉe," in the case of.—3. "certaj" aŭ "iuj." Ling. Resp. pĝ. 54.—4. "aparte." Notaro 9/8. 5. Neniam uzu "la" post "da." L.R. pĝ. 72.—6. "ĉi ties," the latter's.—7. "ĉi tiuj," the latter.—8. Zam. diras, ke uzi intervortan streketon ĉe "tiu ĉi" aŭ "ĉi tiu" estas erare. L.R. pĝ. 54.—9. "neniel" aŭ "tute ne."—10. "kiu ĉi lasta," which latter.

#### KRONIKO.

**Perth, W.A.**—Dum kelksemajna tempo nia interamikiga komitato vigle klopodis aranĝi festvesperon. Lastan jaŭdon ni ja ĝuis rezulton de ĝia entuziasma laboro.

Nia prezidanto trafvorte bonvengis la gastojn; proksimume 50 ĉeestis. S-ro Saar sukcese gvidis aferojn. Ĉiu gasto portis sprite verkitan titolon de bone konata libro. Tial ni rapide konatiĝis unu la alian, dum ĉiu cerbstreĉis diveni la titolojn.

S-ino Phillips, f-inoj Gibson, Byatt, s-ro Sainsbury kantis, kaj s-ro Phillips plaĉe ludis la violonon. F-ino Griffin bone deklamis "La Franco kaj la ratoj." F-inoj Miller kaj Byatt ludis unuaktan komedion "Don't jump at conclusions." S-roj Clydesdale kaj Casey prezentis kelkajn ŝercajn deklamojn Esperantajn. F-ino B. Miller bonvoĉe legis "Du Fratinoj," kaj s-ro Saar tradukis angle.

La tute afero kontentegige sukcesis; post noktomanĝo, provizita de la sinjorinoj, la ĝojriĉa vespero finiĝis per kanto de l' Espero.

Ankoraŭ nia Societo progresas. Ni akceptis afablan inviton de la ĉefastronomo, viziti la ĉitiean observejon. Pasiĝis instruplena vespero, dum kiu la anaro teleskope rigardis multajn stelojn belajn. Nuntempe la koncerna komitato sin okupas, por aranĝi festvesperon en la klubĉambro, dum la venonta monato.

Vizitis nin ŝipestro Claxton de la plej suda marbordurbo, Albany. Ni kore lin bonvenigis. Dum Septembro okazos, ĉe Perth-o, ekzamenoj por la D.B.E.A. kaj la Prepara Atesto.

**Wellington, Novzelando.**—Kun pli ol 50 da financaj membroj, la loka klubo bone floras, plejparte pro energia laboro de la kluboficistoj. Jene traduko de unu el la ordinaraj klubraportoj, kiuj aperas regule en la taggazetoj ĉi-tieaj por regali samideanojn kaj interesigi varbotojn:—

La ĉiusemajna kunveno de la Wellington'a Esperanto-Klubo okazis je mardvespero (12.8.30) en la Y.M.C.A., s-ro E. C. Jack, prezidis. Instruklasoj okupis la unuan parton de la vespero, post kiam plezurdonata programo prezentigis.

F-ino C. Smythson parolis en Esp-o pri "La Besta Regno," kaj s-ino H. M. Steffens sekvis kun legado "Kion Janko faris."

Originala monologo en Esp-o, "La Negocisto diktas Leteron" estis prezentita de la klubsekretario, s-ro B. Potts. F-ino K. M. Steffens legis en

Esp-o pri "Bona Konsilo," post kiu la kasisto, s-ro L. E. Dust, paroladis al la klubo je la temo "La Astronoma Signifo de la Luno," desegnante surnigra-tabulajn diagramojn.

Unu-scena komedio originala "Serĉante Loĝdomon" estis prezentita en Esp-o de f-inoj E. Duguid, G. Carty, kaj K. M. Steffens.

La komedio estis sekvata de plua unu-scena komedio, "La Domo de Shakespere." F-ino C. Smythson, s-ro Dust kaj s-ro Potts estis la roluloj.

La finaj programeroj konsistis el parolado en Esp-o de s-ro Jack je "La Bildo," kaj klarigo de la sekretario pri "Certaj Punktoj de Elparolado."

Por la unuafojo jam de kelkaj jaroj aperis en la Wellington'aj taggazetoj mallonga kablogramo pri la 22a Universala Kongreso ĉe Oksfordo. Kvan-kam nur maldetala, la raporteto estis sufiĉa por elvoki multe da publika intereso.

**Khandallah, N.Z.** — La starigo de novo klaso ĉe Khandallah, apud Wellington, pli fortigas la Esp-movadon en Novzelando. Anstataŭ kvin, ses grupoj aŭ kluboj nun laboras.

La unua kunveno de la klaso, kiu konsistas plejparte el geknaboj, okazis je la 30a de Julio, kiam s-ro W. King, NZEA sekretario, kun s-ro W. McGuigan, vizitis nian lokon por helpi rilate al komencaj taskoj.

Malgraŭ neagrabla vetero, ĉeestis 15 personoj; post kelkaj vortoj, s-ro King kaj McGuigan donis la unuan lecionon, je kio la geklasanoj montris entuziasmon.

La klaso kunvenos ĉiun merkredon, kaj s-ro J. Sneddon kaj M. Ravelich ĉin gvidos. Ties penado portu sukceson!

**Melbourne, Vict.**—Invitite al kunveno de la Melb. Esp. Societo je 29a de Julio, f-ino E. A. Sinnotte, kiu antaŭ ne longe revenis de vizito al Japanujo, afable konsentis paroli pri spertoj tie. Tre ĉarme ŝi rakontis kiel amike akceptis ŝin la japanaj gesamideanoj, kaj kiel bone ili regalis ŝin dum restado tie. Tre interesa estis la priskribo pri vizito al la Kiboŝa Eldonejo, pri la belaj ĉerizfloroj, la rekonstruitaj modernaj urboj, kiujn ŝi esploris, kaj la ĉefaj famlokoj. F-ino Sinnotte montris al la anoj kelkajn pentritajn menuojn, memoraĵojn de la japana ŝipo, kaj donis japanajn gazetojn.

Je la 12a de Aŭgusto, s-ro C. Ballard faris paroladon pri angla verkisto, George Borrow, kiu naskiĝis en la jaro 1803. La Borrow familio estis malriĉa, sed spite de la malfacilaĵoj li profitis je ĉiu okazo eduki la talentojn, kiujn li posedis, kaj, ĉe lernejo, loĝado en Kim-

rujo, kaj vojaĝoj en aliaj landoj, li lernis la latinan, grekan, francan, kimiran, germanan, hispanan, danan, kaj italan lingvojn. Pro amikiĝo kun la ciganoj li ankaŭ lernis ilian lingvon. En la jaro 1840 li edziĝis, kaj post vojaĝoj en Hispanujo li verkis (1843) la bonekonatan libron "La Biblio en Hispanujo." En la jaro 1851 eldoniĝis la aŭtobiografia romano "Lavengro" kaj poste "Romany Rye" kaj aliaj. Pro tiuj verkaĵoj li sufiĉe riĉiĝis kaj ne plu maltrankviliĝis pro vivrimedoj.

Je la 19a de Aŭgusto, s-ro P. Hudson plue parolis pri sia vojaĝo. Li denove vizitis Rangoon, kaj, antaŭ ol lia foriro, li promenis en la belega publika ĝardeno, vera paradizo. Ankaŭ la zoologia ĝardeno estas vidinda. La sinjoro montris ekzempleron de la cigaroj, per fabrikado de kiuj okupas sin la virinoj. Alveninte en Georgetown en Penang, li loĝis en la luksa A. & O. hotelo. Estas sidloko por proksimume 2 mil manĝantoj en la vasta manĝoĉambro, kiu donas vidon sur belan ĝardenon apud la marbordo. Duono de la loĝantaro estas ĥinoj, kiuj estas tre riĉaj pro kulturado de kaŭĉuko, kaj komercado en muskatoj, kariofiloj, k.t.p. Post kvartaga restado en Penang li veturis al la kontinento ĝis Ipho, ĉefurbo en Perak, kie oni kreskigas rizon, kaŭĉukon, kaj kokosajn palmojn. Li vizitis ankaŭ la stan-minejojn. Troviĝas en la distrikto kavoj el kalkŝtono, kiujn la ĥinoj uzas kiel temploj. Ipho estas malgranda, tamen bela urbo, kaj la pli bonajn kaj luksajn domojn posedas la ĥinoj.

**Brisbane (Kvinslando).**—La societo havis du bonajn festojn: en Ashgrove la 22 junio kaj en Zillmere la 20 julio. Dum la festo en Ashgrove pluvis, afero neofta en nia vintro, kaj la festantoj pasigis ceteron de la tago en la hejmo de gastama samideano sinjoro N. Mills. La feston en Zillmere partoprenis 23 personoj; la vicprezidanto, sinjoro C. Kidd, sindone disponigis al la anoj sian hejmon; oni multe babilis en Esperanto.

Parolo pri Esperanta poezio, kun legado de specimenoj, estis farita la 8 julio de nia prezidanto, sinjoro Hyde.

Nia sekretario, fraŭlino Carrick, afable gastigis la anojn en sia hejmo la 4 julio, kie ili plezure renkontis s-ron M. Dobrilla, el Melbourne, kiu nun loĝas en Brisbano. Oni havis agrablan vesperon per ludoj kaj babilado, en Esperanto kaj aliaj lingvoj.

La 22 julio s-ro F. Simon faris parolon en la societejo pri bezono reorganizi nian movadon, kaj pli efike aplikadi niajn fortojn. Precipe s-ro Simon akcentis tion, ke antaŭ ĉio ni



devas plene posedi nian lingvon; sen bona scio de nia lingvo ni ne estas veraj Esperantistoj, sed nur senutila balasto ĉe la movado.

La societo malfermis novan kurson kun 12 lernantoj, kies progreso estas ĝis nun tute kuraĝiga. La kurson gvidas nia malnova samideano, sinjoro Sycamore, al kiu estas eble denove partopreni aktive nian agadon.

**Sidnejo.**—Je la 31a Julio, la S.E.K. monata festvespero okazis, kiam oni dancis kaj partoprenis en vortludoj. Ĉeestis kelkaj alilandaj vizitantoj, el Finnlando, Rusujo kaj Latvio, kiuj interesiĝis pri la internacia lingvo, kaj je la proksima kunveno de la Societo estis tre kontentige vidi, ke ĉiuj ĉeestas kurson por komencantoj, kiujn gvidas s-ro L. Thomson, per rektmetodo de instruado.

Fino F. Smith, s-roj Winter kaj Worrall, membroj de S.E.K., sukcesis ĉe la ekzameno por la diplomo de la B.E.A. Gratulojn.

### NEKROLOGO.

#### Kavaliro Robert Stout, P.C.

La morto de ankoraŭ unu el la tri patronoj de la Novzelanda Esperanto-Asocio, nome, Kavaliro Roberto Stout, P.C., okazis la 19an de Julio—nur de kunu tagoj post la morto de Kavaliro Jozefo Ward, eks-ĉefministro kaj ankaŭ patrono de NZEA.

Kavaliro Roberto Stout travivis okdek ses jarojn kaj estis unu el la plej bone konataj kaj saĝaj Novzelandaj ŝtatistoj kaj advokatoj. Krom bone servi la landon tiusfere, li interesiĝis kaj agis sur kelkaj aliaj kampoj, notinde magistrato kaj universitato. La nacia konferenco de Esperantistoj, okazigita ĉe Wellington, N.Z., en Januaro 1929, elektis lin patrono, kiun oficon li afable akceptis. Kvankam li ne prenis aktivan parton en la disvastigado de Esperanto, li helpis la NZEA'n ĉu donace, ĉu nome. Scion de Esperanto li ja posedis; tralegi Esperantajn gazetojn ĉiufoje donis al li grandan plezuron.

Ĉiuj sekcioj el la socio funebri la forpason de famega kaj eminenta sinjoro, sed tion faris precipe Novzelandaj samideanoj, kiuj ja perdis ankoraŭ alian amikon.

### "A WIFE BY PROXY."

#### Esp. translation in book form.

"Heroldo de Esperanto" announce publication of "Anstataŭa Edzino" (A Wife by Proxy) in book form. The prices are 3/- and 4/6 for soft and hard covers. Order through A.E.A.

### ESPERANTO KAJ KULTURO.

Jen traduko de "Das Esperanto ein Kulturfaktor." de prof-o R. Trogel verkita por klarigi al "kleruloj inter la malestimantoj de Esp." pri la vivanteco de Esp-o kaj la vera celo de ties misio.

En la enkonduko li trafte atentigas la germanan sciencistaron pri jama vastuzado inter la franca, angla, kaj precipe la japana grandfamularo, kiu tute ne konsideras dignon-ofenda lernon de la helplingvo. Ekzistas feliĉe germanaj esceptoj. Tri ĉefaj elirpunktoj de la malamika atako estas (1) la artefariteco, sekve "nevivipovo" de Esp-o, kaj la "mondlingva destino" de l' angla. (2) la Esp-ista "popolecaĉo, minacanta la germanan naciecan senton." (3) la "maltaŭgeco de Esp-o por ia kulturcelo."

Sur teoria kampo Schuchardt, Baudouin de Courtenay kaj Jespersen jam plene pruvis la unuan malvera. Malgraŭ evidenta vivpulsanta Esp-o, modernaj Don Kihotoj ne vidas, ke la de ili kondamnita lingvo evoluas vivece, "scnas per plimulte da langoj ol kelka idiomato de malgranda tribo, kies rajto pri honora titolo de lingvo estas por ili ekster ĉiu dubo." Vorto "artefarita" signifas malsame ĉe la por- kaj kontraŭ-esperantaj partioj. E-tistoj tute ne neas tiun "artefaritecon," sed per arteca lingvo ni komprenas "artverkaĵon, kiu leviĝas kiel vortfariĝinta logiko super ĉiujn naturkaŭzitajn popollingvojn." Zamenhof estas lingvokreinto samsence kiel Luther kaj Dante. "Kiu asertas, ke Esp-o estas senanima, tiu neniam spertis la efikon de la emocia fakto, kiu prezentigas en la Biblio kiel pentekosta miraklo. Povas nei la miraklon nur tiu, kiu staras ekster la kulturunio, kiun prezentas jam la lingvanaro de Esp-o." La aŭtoro pledas uzon de la "sola ĝusta nomo: internacia neutrala helplingvo."

La duan aserton, nome, ke Esperant(ism)o celas starigon de ia supernacieco, kaj ŝablonigon de la homaro, la aŭtoro refutas kun science verkita 2a ĉapitro. Volante per plipreciza lingvaĵo faciligi la esplordemandon, li plendas la intermikson de ideoj raso, popolo, ŝtato; kaj postulas precizajn difinojn. La ideoj nacieco kaj internacieco ne estas malakordigeblaj; li citas subtene por tio germanajn intelektulojn, kiaj Goethe, Herder ĝis Naumann. Li skizas evoluon de la germana popoleca sento, celante pruvi, ke nur "per opaj popoloj, kiuj ja devas esti diversaj, montriĝas la homaro," kaj atentigas pri tio, ke oni prezentas en popolece nacia Germanujo pli da fremdaj ol enlandaj

verkoj. Tiu ĉapitro forte malkredigas pri taŭgeco de l' angla lingvo okupi rolon de internacia. "Tute senkaŭza estas la timo, ke Esp-o malutiligas la germanan lingvon kaj ties prestiĝon. Se ĉiu fremda lingvo efektive estas la esprimo de fremda popolspirito, ĉi tiu danĝero minacas plikredeble per la naciaj lingvoj ol per tiu, kiu estas konscie elpensita kaj efektivigita de sia kreinto kiel neŭtrala lingvo."

Tria aserto, ke Esp-o nur indas roli maksimume kiel helpa signaro, netaŭga por kulturcelo. La tiu- ĉapitra refuto, cetere brila, ŝajnas ne tre ĝuste respondi la demandaĵon, kaj povus esti kunfandita en la unuan sekcion.

Bone tradukita de J. Schroder. Prezo 1 ŝil. (kvar resp. kuponoj) ĉe "Heroldo de Esp.", Koln.—(Robo).

### VERA SERPENTA ANEKDOTO.

La "Guardian" (Bowraville, N.S.K.) citas jenan :

"Ni ofte aŭdas, ke serpentoj tre ŝatas lakton, kaj ankaŭ, ke oni ilin povas logi al morto per subtasado da lakto metita apud iliaj truoj aŭ kaŝejoj. Sed verŝajne oni neniam aŭdis pri pli rimarkinda ago de serpento tiurilate, ol tiu, kiu okazis ĉe la farmbieno de s-ro Usher de Bowraville antaŭ kelke da tagoj.

S-ro Usher estis melkanta, kaj fininte melki la bovinojn jam en la melkejo, iris eksteren, por enpeli la ceterajn. Tiam li ekvidis grandan nigran serpenton, kiu sin alfiksis sur mampinto de unu bovino. Malgraŭ tio, la bovino ankoraŭ remaĉis kontente, kvazaŭ neniel ĝenata de la okazo, kaj jen sur ŝia mampinto pendis tiu mortiga reptilio !

S-ro Usher reeniris la melkejon, kaj haviginte al si bastonon, iris ataki la serpenton, kiu forglitis. Li tamen sukcesis ĝin mortigi, kaj, disbatinte la korpon, vidis la lakton ensuĉitan de la reptilio disfluigantan surteren."

La gazeto aldonas: "Ni povas garanti la veremon de s-ro Usher—kaj li ne drinkas."—(trad. Ĝodoko).

### Public Library, Hobart, and "La Suda Kruco."

Mr. K. Simmons, of the State Taxation Department, Hobart, informs us that the authorities of the above library have consented to receive the "S.K." as a donation.

We sincerely thank Mr. Simmons for his generosity and good service in forwarding so effectively the interest of our paper and of the Esperanto movement generally.

### REMITTING MONEY.

Would subscribers kindly remember always to make money orders, postal notes or cheques payable to R. Baham. Thank you.

### AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni sincere dankas al ĉiu sube nomita pro fidela reabono kaj sindona helpo al nia amata gazeto dum ĉi-nuna tempo, por multaj el niaj batalistoj sufiĉe malfacila porvivkondiĉe.

F-ino D. Black, 5/-, julio, '31; D. Hitchcock, 5/-, junio, '31; f-ino C. Hannaford, 4/6, junio, '31; s-ro Dewar kaj Masterton Grupanonco, 4/6, 5/6, julio kaj aprilo, '31; J. Girdwood, 4/6, junio, '31; s-ino M. Purnell, 4/6, junio, '31; s-ino Sainsbury (vendo), 2/-; H. Pudney, 30/- anonco, aŭg., '31; K. Simmons (por Hobart biblioteko), 4/6, aŭg., '31; E. Cox, 4/6, junio, '31; f-ino D. Bell, 4/6, julio, '31; H. Love, 4/6, junio, '31; N. Gaye, 5/-, sept., '31; D. Munro, 5/- donaco kaj 5/-, sept., '31; f-ino E. Anderson, 9/-, nov., '31; G. Bird, 9/-, aŭg., '31; A. Serpell, 18/-, sept., '34; S. Udjur, 10/-, aprilo, '30; N. Thomas, 5/-, julio, '30; s-ino F. Tondut, 4/6, junio, '31; f-ino E. Sinnotte, 10/-, dec., '31; R. Fitzgerald, 4/6, sept., '31.

### ELTERIGO DE INDIĜENA ĈEFO.

Ĉe Dubbo (N.S.K.) oni elterigis skeleton de indiĝena ĉefo eble enterigitan antaŭ ducent jaroj. En sia vivo la ĉefo devis havi admirindan korpoformon. La krur- kaj femurostoj estis colojn pli longaj ol tiuj de ordinara homo. Kiam la indiĝeno paŝis la teron, ties alto tre verŝajne estis sep futoj, kaj lia granda eminenteco estas konsatebla el tio, ke oni lin enterigis dek futojn profunde. Pro tio, ke la kranio havas fendon ĉe unu flanko, oni rajtas aserti, ke li falis mortfrapite en batalo. Verŝajne la malsupra makzelosto estis rompita, sed la dentaro perfekte bonstatis, kvankam glatiĝinta pro uzado, kio elmontras, ke ilia posedinto mortante estis homo mezaĝa. Oni akiris por surmontro ĉe ambulancaj klasoj tiujn ostojn, kiuj ne polviĝis pro tempo, kaj kiuj ĝuste kunfortikigite faras preskaŭ perfektan specimenon de skeleto.—(Trad. Ĝodoko.)

### ERARO EN U.E.A. JARLIBRO.

Ni altiras atenton de ĉiuj al eraraj linioj en la ĵus eldonita jarlibro. La Suda Kruco estas ne suplemento al "Inter. Lang.", kaj havas ne du sed ok paĝojn. La eraro estis kaŭzita pro tio, ke certa nia nuliga letero atingis la U.E.A.-an oficejon tro malfrue. Ni petas afablan represon ĉe frataj gazetoj.

### ADAPTOJ DE ANGLAJ PROVERBOJ.

A cat would fain fish eat, but she is loth to wet her feet.

Kato manĝi fiŝojn volus, se ĝi seka kapti povus.

Don't cut off your nose to spite your face.

Ne detranĉu la nazon por puni vizaĝon.

A stitch in time saves nine.

Unu kudrero ĝustatempe farita, naŭ-  
obla laboro antaŭŝparita.

One man can lead a horse to water, but ten cannot make it drink.

Al akvo unu homo povas bruton venigi, dek homoj ne povas ĝin trinki devigi.—(G. go).

### BATTLING IN BABEL.

Translators of French literary works are rarely above suspicion, says Mr. Arnold Bennett: "The majority of English translations from the French demonstrate two things about the translators. First, that they do not really understand French, and particularly French idioms and proverbial phrases. Second that they cannot write English."

Says Mr. R. Richie, M.A., in his "Translation from French": "The official English translation of the Allied Note answering Germany's first offer of peace in 1917 renders "pretendu" by "pretended," where it clearly means, as generally, "alleged." Such absurdities have been so rife throughout the war, that the future historian who describes the state of education in this country at the present time will scarcely be able to compliment our journalists and public officials on their knowledge of French." The same writer gives many examples of the prevalence of inaccuracy in newspaper "translation", due in great part to the deceptive similarity between French and English and bewails the general lack of good models, although "French works have been translated into English since the Norman Conquest."

### PRI MALLONGIGOJ.

S-ro Skurrie lastatempe tiris atenton ĉe la societejo sur la artikoleton "Abbreviations" en aŭgusta Suda Krucio, kaj esprimas malaprobion pri kreskanta emo de eŭropaj Esperantaj gazetartikolitoj uzadi mallongigitajn formojn. Per tio, li asertis, tiuj homoj tre ofte elmetas neklare verkitajn tekstojn malfacile legeblajn, precipe por legantoj. Li ankaŭ konsilis simplecon kaj pli fidelan imiton al la modeloj donitaj de la Majstro. La societo sen-  
iis al la redaktoro leteron, per kiu ili kolektive kondamnas la mallongigadon.

(Rimarko de la redaktoro: Rilate la stilan simplecon li kore aldonas al la opinio de l' estimataj samideanoj-societanoj la sian tute saman; al tiu pri la mallongigoj li ne absolute povas aldoni propran kondamnon. Ĉu li devas kompreni, ke la societanoj senesceptante ne volas ian mallongaĵon (s-ro. k.t.p., ekz.)? Ja verege la redaktoro ĉiel kontraŭas vastiĝon de la ruseca kutimaĉo detranĉi radikpartojn el fundamentaj vortoj. Tia fi-agado estas rekta malfidelo kontraŭ la brava konservantaro nialingva, jam forpasinta de surtero. Ĝi estas krome danĝera enrompo en la sanktan fundamenton, unu fojo por ĉiam metitan de la amita majstro. Sed ĉu ne vere, ke kelkaj trebonaj lernolibroj (ekzemple, "First Steps," Butler lasta eldono) enhavas liston de tre vaste uzataj mallongigoj, facile kompreneblaj por ĉiu iom progresinta? La tradukistoj de belverkoj ne hezitas uzi interalie "rim. de l' reĉ"; ili ne pensas, ke tia formo aŭ simila eĉ iomete makulas la paĝon. Zamenhof ekuzetis mallongigojn jam en 1888. Sekvus lian ekzemplon ankaŭ la redaktoro, inklinata al tia modera uzado de tempo- kaj spacoŝpara mallongigado, almenaŭ en la leterskribo kaj en porprogresintaj gazetoj. Tamen, respekte je l' voles-  
primo de legantoj, aperos surpaĝe de "La S.K." nenia plendinde diskutibla vorttranĉaĵo.)

### WIESBADEN.

From s-ro L. Jstel, Universal Esperanto Association delegate at Wiesbaden, Germany, since 1908, there comes to us

### PERCY HOLMES

ELEKTRISTO KAJ RADIISTO.

212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezantas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvoj. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via!

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.



surely one of the most beautiful and artistically produced guides ever issued in Esperanto. In immaculate text we are shown over this thermal paradise whereto resort for healing those of the world's ailing whose bank accounts are not.

Not only is Wiesbaden world-famed for its baths, but also for its huge State theatre, Museum, Casino, parks and sport-centres. The photographic reproduction of these places is excellent.

This is the fourth guide booklet issued in Esperanto by the Wiesbaden Traffic Office, which, it would seem, is convinced by results of the value of the interlanguage as a means of reaching the non-German world with its particular message. The publication may be had free on request from L. Jstel, Wiesbaden, Wilhelmstr 1/1.

### ARTIFICIALITY AGAIN.

In a recent letter to the "Morning Post", London, Professor A. H. Sayce calls up that old bogey, artificiality. "The attempt to create one (an international language) artificially is like an attempt to create an orange blossom artificially; not only is the scent wanting, but the living individuality as well. It is either a new language to be added to the multitude already existing, or a mere list of arbitrary signs, like the signs of algebra."

The metaphor is good; but there is another equally good. Technically the rose is an artificial flower, but its scent, colour and beauty are everywhere admired; and while we are not quite clear what "a living individuality" means, we do not doubt the rose has this as well.

Professor Sayce would have us adopt a national language, preferably "literary English, or a simplified form of it," and refers to the neutral tongue as "a mere list of arbitrary signs." He overlooks the fact that even the most refined and "literary" English would be "a mere list of arbitrary signs" if it were not daily employed for the purposes of a people. It is use which transforms the "signs" into a vigorous, sensitive language; and Esperanto has been in such

daily use for forty years. It has been used for all the purposes of man, from cataloguing to love-making, and by him has been given life.

The reference to "a new language to be added to the multitude already existing" is so beside the point as to be beyond comment.

—"International Language."

### ESPERANTO WORKS!

(1) In the "Pola Esperantisto" for June, Aleksy Lasinski tells the world how Esperanto enabled him to bridge the language gulf. He recently translated the "Memoirs" of Biesiedowski, which task called for a footnote concerning a certain ex-deputy of the Albanian parliament. Failing to find in Polish any information on the point, he addressed himself to the delegate of the Universal Esperanto Association in the village of Tirane, Albania, one Cuk Sirtoni. An answering letter gave him all the light he wanted.

(2) M. Blassberg, a Polish doctor of medicine, sent his Japanese friend, Dr. Nishi, in Tokio, an Esperanto translation of the Polish novel "Marta" (Orzeszko). Sometime afterwards he was informed by the recipient that the famous work in which Orzeszko describes the impoverishment and degradation of the unfortunate Marta is now purchasable in a Japanese translation, made from the Esperanto of Zamenhof, and that it finds many readers among the womenfolk.

Furthermore, a cinema company has undertaken to film the story, under the title "Look on this Woman", in which, it is said, Irie-Takako, one of the most popular Japanese film stars, will be cast as Marta.

These instances are only two of many such that could be culled from the pages of the hundred or so gazettes that chronicle Esperanto's world-wide activity.

### LIBROJ RECENZOTAJ.

Du Majstraj Noveloj. Theodor Storm. Trad. H. Heitmuller. Heroldo de Es-

## HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

## Specialisto pri Fontanplumoj

noveco. Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

peranto, Koln, 252p. Broŝ. 2.40 Germ. Mk.; Bindita 4.

La Mortado, parolado de d-ro H. Nothnagel. Trad. B. Selzer. Unu Germ. Mk. Esperanto Societo "Progreso", x Ettenreichgasse 4/31, Wien.

Juneco kaj Amo. Originalo de Ed. Payson. Esperanto Pub. Co. 1/6.

Esperanto por Infanoj. Gladstone Solomon. Sama eldonejo. 1/6.

Viktimoj (dua eld.) Julio Baghy, 4/-, 5/-, 6/6, ĉe BEA. La Junulino el Stormyr, de Selma Lagerlof, trad. O. Frode. Eldona Soc. Esperanta, Stockholm. 1½ sveda kr. Broŝuro de L. Sinha, eld. de sama.

### ĈIES SERVANTO— NENIES SKLAVO!

„Heroldo de Esperanto“, la super-nacia, superpartia ĉiusemajna ĵurnalo de Esperantujo, aperas jam dek jarojn, regule kiel horloĝo, en granda formato, kun bonaj informoj pri la Esperanto-movado kaj el ĉiuj sferoj de la tutmonda vivo. Bonstila redaktita, riĉe ilustrita. Sendependa de iu ajn organizacio, sed servanta al la tuta movado. Petu senpagan specimenon, kune kun senpaga riĉenhava „Katalogo de Libroj“!

Administracio de Heroldo de Esperanto  
Koln, Brusseler Strasse 94,  
Germanujo.

### Full collection of S.K.

Messrs. George Gordon of Christchurch, and N. Gaye of Ascot Vale, Melb., have informed us that they have the S.K. from No. 1. Doubtless there are several other foundation subscribers who have conserved every number of our little organ.

### LETTER LOST!

We are sorry to inform the unknown correspondent who placed a missive addressed to "Editor S.K." in the letter box of Miss Blyth, Surrey Hills, that it has been lost. Would the sender kindly get into touch with her at once.

### TUTMONDA KOLEKTANTO.

Organo por filatelo kaj interŝanĝado de objektoj.

Specimenan numeron sendas senpage:

A. Praxzak, Jablonne n. Orl.  
Ĉeĥoslovakujo.

### KORESPONDO.

Ĥinino, fininte la rusan ĵuran fakul-

taton de univ. de Ĥarbin, petas aŭstralian plumamikon. S-ino Chaza Sun, Pochtova str. 55, kv 27, Uĝol Dumaska, Ĥarbin, North China.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu mardo je la 7.30a horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinlando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penĉoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 penĉoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 124 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 Oktobro 1930.

## VIZITO DE F-INO SINNOTTE AL JAPANUJO.

Antaŭ mia mallonga sed neniam forgesota vizito al Japanujo, mi devis diradi, ke la malmultaj japanoj kun kiuj mi interparoladis ne bone estris la anglan lingvon. Ili mikse uzadis la "l" kaj la "r", "he" kaj "she" k.t.p. Tial mi nun konfesu, ke veturonte Japanujon, mi sentis timon, ke la Japanaj Esperantistoj neklare kaj nekorekte parolos ankaŭ Esperanton.

Mi aparte, la karan lingvon jam de longe mi ne uzis buŝe kaj pro tio sciis, ke la lango mia, kvazaŭ rigidiĝinte, ne facile elformadas la Esp. parolerojn. Trovante *min inter areto da turistoj*, el kiuj mi sola estis Esperantisto, mi do severe detenis min uzi la lingvon antaŭ ili, ĉar vere mi ne volis ĝin ridindigi per hazarda renkonto kun fremdlandanoj, ĉe kiuj mi eble fuŝbalbutos en la int. lang.

Tamen mia antaŭtimo estis tute senbaza. Ĉu ne vere, ke jam en kelkaj landoj eŭropaj mi libere babiladis Esperante? Ĉu mi ne efektive forgesis, ke mi paroladas en lingvo ne l' patra? Sed tiuj verdamikoj de antaŭaj tagoj ne estis el Oriento. Kiun ĉi fakton ankoraŭ pripensante, mi malsage fortenis min de ia feliĉa kultura kunuleco, ĝis atingis mi fervoje Kioto.

Ĉe tiuurba hotelo mi demandis, ĉu eble kontaktiĝi kun ia Espisto? Samvespere mi ricevis informon, ke jam atendas min naŭ sinjoroj kaj unu sinjorino samideanaj. Emocio kaj lingva malekzerco nepovigis min alparoli ilin aŭ klare aŭ flue, sed ilia vera plezuro renkonti alilandan Esp-iston, ilia deziro senĝenigi min, ankaŭ mia elkora ĝojo ilin vidi, rapide forigis ĉian embarason. Ni pasigis feliĉan horon ĉiu dubo for, ĉar vere la frazoj facile fluadis elbuŝe kaj amikseno unueca perfekte regis inter ni. Unu estis eldonisto, unu arkitekto, unu inĝeniero, unu kuracisto,

kaj kelkaj studentoj. Antaŭ ol disiĝi, mi akceptis inviton ĉeesti bonvenvesperon ĉe restoracio. Tio ja donis al mi plezurriĉan tempon; muzikante; babilante kaj interŝanĝante radiojn de l' vera kamaradeco, ni ja sentis la forton de la Zamenhofa spirito. Donacojn ili plenmane ŝutis al mi ardore.

Malvarmumon mi suferis kaj la okuloj brulume flamis; tial unu gasto, fama okulisto, d-ro Ĉ. Nakano, esprimante netrankvilon pro tio, petis permeson ekzameni ilin jam tuj. Rezulte el tio, en la sekvanta mateno mi sidis en lia kabineto por submeti kuracon. Post nur minutoj la doloro faciligis, kaj la specialisto min informis, ke sek-vante lian instrukcion mi baldaŭ ricevos normalajn okulojn. La bonkora homo rifuzis akcepti honorarion, kaj aldonon faris al sia sindoneco, en tio, ke li gargarigis al mi la gorgon. Ĉiuvorte en Esperanto!

S-ron Ŝuzi Nakahara, eldonisto, mi renkontis la sekvantan tagon. Li aliĝis al nia kunularo iranta al la vaste konata te-rito kaj ĉerizflordanco. Babilante Esperante ni preskaŭ forgesis, ke ne-Esperantistoj ekzistas, jen voĉo angla: "Pardonu min, sinjorino; ĉu vi parolas japane?" Ridete mi respondis: "Ne, Esperanton! Mia sinjora alparolato nur balbutetas angle, kaj mi tute ne japane." "Kio?!" diris frapite la sinjoro. "Mi do devas pli sciigi pri ĉi tiu mirindaĵo. Mi estas eldonisto el Nov-Jorko alveninta por negoco, sed mi tute me povas progreson fari! Malfacilege al mi estas, kompreni japanbuŝan anglaĵon, kaj ĉilandanoj reciproke min ne komprenas. Kie mi serĉu informon pri tiu ĉi lingvo Esperanto? Mi devas ĝin lerni." Fiere mi respondis, ke la sinjoro kun kiu mi ĵus parolis ankaŭ estas eldonisto, kaj ke li volonte donus ĉian informon; eĉ pli fiere mi interpretis la aferon. La du sinjoroj inter si donis nomkartojn, poste mi sciigis, ke ili



havas komunajn konatojn en la eldonista mondo.

En Tokio trafis min ĉia bonesprimo. Tri sinjoroj vizitis min pro Esp. societo, inviton portante al bela konstruo Y.M.C.A. (junvira kristana asocio). Almenaŭ 60 Esp-istoj alestis, kaj ni multe interplezuris.

Iun dimanĉon dekduo da Esp-istinoj bonvenigis min ĉe apartamento de unu. Ili ĉiuj estis progresemaĵoj pensuloj, praktikantaj ian profesion aŭ metion, kun escepto de patrino de sepjara etulino, kiu ĉi ankaŭ parolas Esperanton. "Lumi" (ŝia nomo) grandanime donacis al mi unu sian pupeton.

Ĉiuj parolis flue, korekte. Bonvolege ili plenumis ĉian deziron mian. Esp-riminte sopiron vidi la mondkonatan verkiston kaj soci-bonfaranton, Tojohiko Kagawa, ili tuj respondis: "Ni aranĝos intervjuon por vi; li estas nun en Tokio." Sed ho ve, mia vizitlisto estis plenplena, kaj mi ne povis ne agi laŭ antaŭaranĝo. Mi vizitis popollernejon, kaj interese observis la infanknaban klason ĉe laboro. Gepatrojn oni invitas ĉeesti la instruadon, por kunlabori kun la lernejgvidantoj. La anglan lingvon oni devige instruas altlerneje kaj universitate.

La instruiteco estas tre ĝenerala en Japanujo, tial kiom grava por nia afero estas la fakto, ke tiel kon-hava kaj lert-pensa popolo fervore uzas Esperanton.

Per Esperanto mi trakondukiĝis la du plej grandajn eldonejojn en Tokio. La Asahi estas la plej kolosa en Oriento; ĝia tagjurnalo havas la plej altan vendciferon inter la japana gazetaro. Tie ankaŭ uziĝas eĉ la vidradio. La multetaĝa konstruo estas pli riĉe ekipita ol tiaspecaj en Usono kaj Germanujo. La redaktoro, s-ro Zenmara Toki, estas Esperantisto. Mi vizitis ankoraŭ eldonejon Kiboŝa, el kie fluadas kvin gazetoj kaj revuoj, inkluzive unu Esperanto - Japanlingva kaj unu brajla. Entute ili vendiĝas en miliono de ekzempleroj. Ĉiu oficisto devas lerni Esp-on, kaj antaŭ 200 mi alparolis nialingve en granda lekcihalo. Aliloke en la konstruo, en "laborlernejo," knabinoj lernas i.a. Esperanton, duontage okupataj per manlaboro, la ceteron de l' tago per mensa.

Mia verda steleto montriĝis esti vera malŝlosilo al koroj kaj hejmoj de tiuj amindaj homoj, kun kiuj Esperantomanka mi ne povus esti eĉ iomete interkonatiĝinta en vera senco de l' vorto.

Adiaŭante la grandetan anaron alvenintan por voĉe deziri al mi bonvojaĝon, mi sentis sinceran bedaŭron pro

deviga forlaso, kaj korinklinan estimon al miaj japanaj samcelanoj. — Feliĉe, ke mi povis respondi ne per fina "adiaŭ" sed per sopirata "ĝisrevido" al brava lando de l' suno leviĝanta.

—(f-ino) E. A. SINNOTTE.

## KRONIKO.

### Brisbano (Queensland-Kvislando).

Doktoro F. Williams trapasis nian urbon survoje al Samarai (Papuo, Nov-Gineo), kie li tenos la oficojn de delegito de UEA kaj distrikta kuracisto. Kelkaj ĉitieaj samideanoj (la prezidanto, sinjoroj Behncken, Hutton, Simon k. a.) havis la plezuron viziti la afablan kaj ageman kunbatalanton sur la ŝipo "Morinda" kaj diri "ĝisrevido" ĉe la forveturo.

La 30 aŭgusto multaj societanoj kaj iliaj amikoj kunvenis en la domo de sinjoro N. Mills, laŭ lia afabla invito, kaj tie havis gajan vesperon per muziko, ludoj kaj komedioj. Fraŭlinoj Gertrud Carrick kaj Littleton kaj sinjoro Littleton bone ludis amuzan komedieton de pensiona vivado... en angla; ĝi meritas tradukon kaj reludon en Esperanto. Sinjoroj Behncken, Mills kaj Hyde legis en Esperanto la komedion "Roza-lilio."

La 24 aŭgusto la nova fonografo akirita de la societo estis unuafoje ludata ĉe la kunveno, kiam oni prezentis kelkajn Esperantajn diskojn: "La Leterportisto," "Samideana Trinkanto," k. a. La societo mendis pluajn diskojn, kaj esperas, ke tiu ĉi metodo tre utilos al komencantoj.

En la sama vespero nia vigla kaj viveca samideano sinjoro Hutton alportis oficejan fonografon "Ediphone"; kaj la aparato elparolis al ni saluton de la sinjoro; poste, diversaj anoj faris proprajn "fonogramojn" kaj tuj reaŭdis la proprajn voĉojn... kaj pri ili ŝajnis ne tute kontentaj!

Wellington, N.Z.—La tria ĉiujara kunveno de la loka klubo okazis la 26an de aŭgusto. S-ro E. Jack prezidis antaŭ granda nombro da geanoj.

La jara raporto kaj bilanco adoptitaj atestis, ke la klubo estas en tre kontentiga pozicio. Kvindekunu personoj membre enskribiĝis dum la jaro.

Elekto de kluboficistoj por la nova jaro rezultis en tio, ke la antaŭa agkomitato tutunuvoĉe re-enoficiĝis, nome, prezidanto, s-ro E. Jack; vic-prez., f-ino C. Smythson; kasisto, s-ro L. Dust; honora sek., s-ro B. Potts. Sekvante akcepton de speciala rezolucio, la agkomitato plifortigis sin per elekto de

du pliaj anoj—s-inoj C. Leck kaj B. Potts.

Fine de la negoca kunveno, s-ro W. Edmanson, honora dumviva prez. de la klubo, deklamis en Esp-o The Seven Ages of Man (Shakespeare), kaj s-ro Jack rakontis amuzan anekdoton La Blinda Viro. Ambaŭ programeroj multe plaĉis.

**Perth, W.A.**—Sabaton, 13an Septembro, okazis la ekzamenoj por la unua kaj diploma atestoj de la B.E.A.

Pro la afabla permeso de Profesoro Whitfield, la Vic-Kanceliero, ni uzis du ĉambrojn ĉe la Universitato. Tiukaze kvar anoj faris la unuan kaj du, la diplomon. Post laboro ĉiuj kuntemanĝis kune, kaj bone ĝuis la okazon.

**Melbourne, Vic.**—Sub la aŭspicioj de la Melb. Esp. Klubo, tre ĝuebla dancfestado okazis je la unua de Septembro, kaj allogis la dancantojn inter la Esperantistaro.

Dum la unua semajno en Sept. okazis en la urbdomo amatora radio ekspozicio. Nia energia samideano, s-ro P. Holmes ricevis permeson fari malgrandan paroladon pri Esperanto ĉe la urbdomo, de kie amatora stacio elsendis programojn dum la semajno. La disdonadon de propagandaj folietoj ankaŭ entreprenis s-ro Holmes.

En Aŭgusto, ĉe la kunveno de la M.E.Soc., f-inoj Irwin kaj Cox kaj s-ro Holmes legis tri-aktan komedion, kiu estis tre ŝatata de la anoj.

Je la 16a de Sept., s-ro Hudson finis la rakonton de sia vojaĝo, al kiu, dum kelkaj monatoj, la anoj plezure aŭskultis. De Ipho en Perak li iris al Kuala Lumpur, kiu havas 90,000 loĝantoj. Li vidis la stanminejojn, kie li renkontis du Aŭstraliajn inĝenierojn, kiuj bonkore montris al li ĉion interesan. Li ankaŭ priskribis detale la manieron eltiri la kauĉukon el la arboj. Reveninte en Singapore li vidis la akvujon, kaj ĥinan templon ĉe la zoologia ĝardeno kaj ankaŭ rimarkis, ke la policanoj, kiuj kontrolas la veturilaron ĉe la kruciĝoj de la vojoj portas sur la dorso karton kun la sola vorto "Haltu," kaj sur la brusto similan karton kun la vorto "Iru." Li sin turnas al la veturiloj se li volas, ke ili ekiru. La sinjoro poste vizitis Baku Jahore, la ĉefurbo en Jahore, kie li vidis grandajn ananasplantejojn. En la ŝipo "Nieuw Zeeland" li lasis Singapore kaj atingis Batavia kie la ŝipo restis kelkajn horojn. Li vizitis Samarang kaj iris aŭtomobile al Sourabaya. Lasinte Batavia-on la ŝipo vojaĝis ĝis Macassar en la Celebes Insulo.

Vidinda akvofalo troviĝas kvardek mejlojn de la marbordo, kaj la ŝipo estis restonta nur du horojn ĉe la insulo, tamen, per aŭtomobilo la vojaĝantoj vidis la akvofalon kaj trafis la ŝipon! La ŝipo preterpasis Jaŭdan Insulon kaj poste atingis Brisbanon.—Pli suden ĝis Sidnejo, kaj poste li revenis Melburnon post kvinmonata foresto.

**Sidnejo, N.S.K.**—La 2an de sep-o, la jara balo de la Ligo de Nacioj brilis ĉe la Palais Royal; ĉeestis 1250 personoj el ĉiuj nacioj. En verdstela Esp. kostumo partoprenis dek geespistoj, el kiuj du — s-ro E. Pryke kaj f-ino J. Orr—reprezentis Esperantujon en la spektaklo de l' nacioj, kiu promenis ĉirkaŭ la balĉambron. Tiun ĉi jaron oni prezentis novaĵon en la spektaklo—grupojn, kiuj montris la diversajn aferojn en la mondo jam internaciaj, ekz. La Muziko, Literaturo, Scienco, Industrio. La guberniestro prezidis la balon.

#### Mondvagistoj vizitas!

La 11an de sep-o vizitis la klubon s-roj Kotulsky kaj Masluk el Latvio, ambaŭ Esp-istoj, kiuj motorbiklete ĉirkaŭvojaĝas la mondon. Ili trafis en Esp-klubojn en ĉiu granda urbo, de ili trapasita dum lastaj deksepmonatoj, de kiam ili forlasis la hejmlandon. Kelkaj el la landoj de ili travagataj estas Arabio, Persujo, Hindujo, Nederland-Hindujo.

La S.E.K. monata dancvespero okazis ĉe klubejo la 25an de sep-o, kiam ĉiu travivis plezurriĉan vesperon.

**KURSO PER TRADUKADO.**  
(kondukata de s-ro G. Gordon, F.B.E.A. sekretariino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melbourne, E.10.)

#### TRADUKO II.

Multaj paĝoj de la libro temas pri la ceremonioj kaj korobroj (tiu ĉi lasta vorto estas transliteraĵo de la indiĝena vorto "korobra"—nomo de la ritaj, festaj kaj antaŭ- kaj postmilitaj dancadoj de la indiĝenoj). Pri ili estas preskribitaj (1) ritaro kaj procedo. Iuj korobroj daŭras kelke da (2) tagoj, kaj la Engŭura, la plej solena el la Aruntaj ceremonioj, daŭras kvar monatojn. Mirinda (3) estas la memoro de la indiĝenoj pri la mil detaloj de la ceremonioj kaj pri la faroj kaj vagadoj de iliaj prapatroj. La scion pri tio ili parole pasigadas de unu generacio al la sekva, kaj ĝi atestas pri tiel tenema memoro, ke simila memoro ĉe blankulo estus laŭdata. Iuj el la ceremonioj

estas graciaj, aliaj estas groteskaj, tamen ĉiuj estas interesaj. Notinda estas tio, ke ĉe la ceremonioj en kazo de vizito de unu tribo al alia, la vizitantoj marŝas ĉirkaŭ la kamploĝejon alten levante la genuojn laŭ la maniero de la Prusa "anserpaŝado."

Lastatempe iuj bonintencaj personoj proponis la izoladon de la indiĝenoj en unu granda regiono rezervota por ili. Sir Baldwin Spencer diras, ke tio estus kruela, ĉar kvankam la vivo de indiĝeno estas ĉiamdaŭra baraktado kontraŭ malfavoraj kondiĉoj, tamen li tute ne deziras forlasi la landon loĝitan de siaj prapatroj. Ĉiu natura trajto estas kunligita en lia menso kun iu prapatro, kiu ne nur vagadis tra la lando sed ankaŭ efektive kreis la ekzistajn sablajn altaĵojn, rokojn kaj arbojn, kaj for de tio li estus mizera.

La libro de Sir Baldwin Spencer estas la plej plena traktado ĝis nun publikigita pri raso rapide formortanta.

(fino)

### NIGRA JAŬDO.

La sesan de Februaro en la jaro dekokcent-kvindek-unua kuregis de unu ekstremo de la ŝtato al la alia pli terura brulego ol iam antaŭe aŭ poste okazis en Viktorio.

Rolf Boldrewood (elp.: bolderŭud), tre konata pro sia romano "Robbery under Arms" (t.e. Rabado kun Armiloj) kaj aliaj fikciverkoj (4), kiu en tiu tempo loĝis en Western District (elp.: ŭestern distrikt) postlasis al ni tre vivan priskribon de tiu memorinda tago. Li diras:—En la daŭro de kelke da (2) antaŭaj semajnoj la somera vetero estis varmega kaj seka. Mirinde estis, ke eĉ ĉe la marbordo mankis la ordinaraĵoj tieaj pluvetoj. La fatala mateno estis nenormala, premaera, sen spireto de vento. La vaporplena ĉielo fariĝis flamstriita, malhela, minaca. Pluraj (4) teruritaj vidantoj pensis, ne senkaŭze, ke venis la lasta tago de la mondo. La tuta kolonio (6) Viktorio samtempe brulis. Brulis kulturbienoj kaj brutpaŝtejoj ĉe Portland kaj Port Fairy (elp.: fejni). Ĉe la rivereto Upper Plenty oriente de Melbourne ĉirkaŭ tricient mejlojn (7) mortbruliĝis la edzino kaj infanoj de ŝafisto. Malproksime sur la maro pasaĝeroj mire kaj time rigardis densan nigran nubon, pendantan super la linio de la marbordo kaj similantan al la kvazaŭa ĉerktuko, kiu probable (4) superpendis la entombigatan urbĉon Pompeii, kiam la vulkano eljetis sian vomadon de flamanta lafo. Malproksime cindroj dense falis sur la ferdekon de proksimiĝantaj

ŝipoj.

Pri unu el la brutpaŝtejoj en Western District li diras:—Post kvarono de horo estis flamantaj ĉiuj bariloj kaj konstruaĵoj de la bone ekipita bien-domaro. Tiel forta estis la varmego, ke forkurinte (8) el la domo la domanoj trovis neeble reeniri ĝin. El ĝia enhavo oni povis savi nenion krom skribtablo kaj pentraĵo. La domanoj rigardante (8) ĉirkaŭen vidis sovaĝajn birdojn mortfalintaj (9) de sur la arboj, kangurojn pretersaltantaj (9) kun brulolekitaj aŭ brulantaj haŭtharoj, dum bovoj blekegante (8) pro timo kaj konsterno galopegis al la bordo de la rivero.

—(daŭrigota)

### NOTARO II.

1. "preskribi," to prescribe. Kp.: 2 Kron. viii, 14.—2. Zam diras, ke estas diferenco inter "multaj" kaj "multe da." "Multaj homoj" signifas "diversaj homoj" (ĉiu aparte); "multe da homoj" signifas "granda nombro da homoj (kune)." Estas tiel sama diferenco inter "kelkaj" kaj "kelke da." Ankaŭ notu, ke "multe da jaroj" (aŭ horoj, ktp.) signifas, ke la jaroj (aŭ horoj, ktp.) estas kunaj (t.e. sinsekvaj), sed "multaj jaroj (aŭ horoj, ktp.) ne estas nepre sinsekvaj. Bedaŭrinde tre ofte iuj verkistoj ne observas la diferencon. Anstataŭ "multe da" oni povus egale bone skribi "multo da." Ekz. 32.—3. Rimarku la vortordon, kiu ebligas, ke adjektivo "mirinda" estu proksima al la substantivo "memoro" kaj ne kiel en la tradukata teksto.—4. Vortoj aprobitaj de Lingva Komitato: "fikcio," fiction; "pluraj," more than one; "probable," probably.—6. Ne metu "de" inter "kolonio" kaj "Viktorio."—7. Akuzativo, ĉar "ĉirkaŭ" ĉi tie ne estas prepozicio sed parto de la nedefinita nombro "ĉirkaŭ (aŭ "proksimume") 300".—8. Adverba participo. Cox 211.—9. Predikata participo. Cox 209b. Oni subkomprenas "esti" antaŭ la vorto. Oni povus egale bone skribi "mortfali," "pretersalti."

### ESPERANTO ON THE MARCH.

Since last issue we have learned—

That at present the sale of "International Language" is about 4,600 copies monthly.

That "l'Eclairer de Nice," widely read on the Riviera, has a regular column of Esperanto in its Sunday evening edition.

That they have sold over 1000 Kompleta Gramatiko (Fruictier's book revised by Grenkamp-Kornfeld) at 5/- a copy.

That Capt. Eckner, the famous con-



ductor of the Graf Zeppelin, regards Esperanto as a "highly cultural instrument, a valuable time saver, and a potent aid to international amity."

### AL TORENTO.

#### La unua sveda originalo.

Kun miksa sento oni forlegas lastajn liniojn de ĉi tiu romaneto. Plaĉas al ni la flugebla simpleco de la lingvaĵo, samtempe kre-talenta, sed ni bedaŭras la mankon de sufiĉe grava temo. Lia belstilo meritas vesti pli impone ellaboritan verkon.

Ĝi estas ĉapitro el vivo de arbara junulo malsatanta la vivoplenan urbon Torento; li rekontas enparke knabinon; ŝi, jam perfidita de aliulo, korinklinas al la junulo volanta tion; sed nur poste ŝi konfesas al li sian naskontecon. La junulo animdolore foriras, por militservi, fine revenas, por amprotekti la patrinon kaj infaneton.

Vidinte la majstran lertecon de la aŭtoro, oni bedaŭras, ke li ne donis la plenlibron de iu homa vivdramo. Tre esperinde estas, ke la tempopaso montratos, ke Stellan Engholm posedas ankaŭ kapablon, interese rakonti en multĉapitre riĉenhavan romanon la sortojn de kelknombra personaro. Lia moderne-psikologia traktmaniero kunigita kun la riĉe provizita plumo de iu Bulthuis devus rezultigi por la Esperantistaro veran ĉefverkon.

Lingvaĵo estas preskaŭ senmakula. Sed 8, "sovaĝa marŝo" (?); 41, "benindaj" (pridankindaj?); 64, "suspiro, trista"; 70, "Li vidis ŝin iranta(ĉ) ...okupita(n)"; 73, "ekzistas unu po dekmilo" (...po unu en ĉiu dekmilo); 7/15 "partoj" (partioj?); 13, "onies." Se tio estas bona, ĉu ne ankaŭ "ĝies, ŝies, lies" k.c.? 28, "emis" (deziris); 32, "heziteme"; kial nenecese uzi -em? 40. Verax envortarigis "transmisiiloj." 52/1, 60, 88, "konfid" (fid). "Tutopo" (aggregate).

Prezo 18p. ĉe Heroldo de Esp., Koln.

—Robo.

### MOVIE MONARCH INTERVIEWED.

#### Carl Laemmle and Esperanto.

Mr. Joseph Scherer, delegate of the Universal Esperanto Association in Los Angeles, recently interviewed, on the subject of the talking films and Esperanto, the head of Universal Films, Mr. Carl Laemmle, who was director of "All Quiet on the Western Front." Mr. Laemmle readily answered all questions put to him by our fervent propagandist, who sent a full report, together with a splendid photograph

of himself and the "Napoleon of the Film Industry," to the Geneva organ, "Esperanto."

—Mr. Laemmle, do you believe in the utility of Esperanto for the talking-film?

—Certainly! I expressed an opinion to that effect four years ago, and today I am even more convinced of it.

—Is not the making of films in different languages very costly?

—Very! Because the English-speaking films are not liked in Europe owing to the language difficulty, several talkies are being re-"shot" in Spanish, German, and French, but I am very much afraid that their high cost will make their success, from a financial point of view, doubtful.

—Mr. Laemmle, do you know that Esperanto can be learned in a very short time?

—Certainly I do! Show me that gazette, you will see how much I understand of the language.

Good, Mr. Laemmle, here's "Esperanto," the official organ of the U.E.A., and here's our big-page weekly, "Heroldo de Esperanto."

Mr. Laemmle read from the papers: Renesanco—En la mondo venis nova sento—grandaj progresoj en Svedujo, and so on. Yes, he understood, and pronounced the words splendidly. It was a rare pleasure to Mr. Scherer to hear the world-famous producer wax eloquent over the idealistic element in the Esperanto movement, and over the simple structure of the language. I am certain," went on Mr. Laemmle, "that Esperanto is the best artificial language, and"—here he revealed the idealistic in his own character by his softened voice and sparkling eyes—"I don't doubt that it will be the most effective instrument of world-peace, and that Esperanto talking-films will be one of the means to that noble end."

—Do you know that Esperanto "talkies" already exist?

—Yes, I read with great interest that Paramount has made an Esperanto talking-film and shall study the result with even greater interest, because much will depend on that film.

By these words Carl Laemmle implied that other film companies, besides his own, would undertake this branch of production.

He showed to the world his sympathy with, and interest in, the Esperanto movement by having the interview photographed, and promising copies to every newspaper that reports it.

**LAFCADIO HEARN.**

Lafcadio Hearn havis strangan personecon. Filo de irlanda patro kaj greka patrino, li naskiĝis en 1850 sur la insulo Leucadia, en la Mediteranea Maro. Tiu gepatreco povus supozigi, ke en la ido aperos karakteraj apartaĵoj iom tre frapaj. Sed la knabo estis malieliĉe gepatrita, ĉar en lia sepa aĝjaro la patrino forkuris kun amaĵisto, kaj la patro reedziĝis.

En Kimrujo vizitadis lernejon. Li perdis vidpovon de unu okulo, kio ankoraŭ pli malbeligis lin, jam sen tio ne tre bonaspektan, ĉar li estis malaltstatura kaj korpe ne forktika. Post siaj lernjaroj li envagis Londonon, kie li devis en malriĉeco barakti, gajnante nur mizeran porvivon. Irinte Usonon, li laboris en Nov-Jorko kelktempe por stratvendisto de speguloj. Tiam li sensperte entreprenis raporti por ĵurnaloj, sed antaŭ ol fariĝi tridekjara, li gajnis por si kreskantan famon kiel verkisto.

Hearn estis malbonhumorema, facile incitata de ĉia kontraŭstaro, kaj amare sentis sian korpan malforton. Li povis nenium anikon altiri al si, tial, ke eĉ la plej malgranda nekonsentaĵo lin flamiĝis ĝis kolero kaj maldolĉa humoro.

Li studis la literaturon avide kaj senlace. La francan lingvon li memlernis. Tri jarojn li vivis sur Martinique, kie li skribis kelke el siaj plibonaj libroj. La influo de Pierre Loti troviĝas en lia verkaro. "Zouma" prezentas studon de la vivo en Martinique antaŭ 1840, en kiu jaro ribelis la negroj.

Reveninte Nov-Jorkon en 1889, Hearn profundigis en mizeron, ĉar lia naturo tute ne povis elteni la streĉon de la konkurado en modernaj urbegoj. Legante en lia bele simpalingva "Interpretoj de la Literaturo," verko bazita sur lia anglalingva lekciaro al japanaj studentoj, oni povas ekkoni ie kaj ie lian akran suferadon pro la kondiĉoj de la nuntempa vivo.

Kun celo lin savi el malsatmortiĝo oni aranĝis lin sendi al Japanujo, por ke li verku libron. Li do iris al tiu lando, kie li trovis amikojn kaj vivon

de li ŝatatan. Li fariĝis instruisto ĉe japana lernejo, adoptis Japanujon kiel propran landon, edzigis kun japanino, kaj finfine fariĝis pli orienteca ol la japanoj mem, tamen li ne plene posedis ilian lingvon.

Lia facile flamema naturo kondukis lin dum tuta lia vivo en multajn malfacilaĵojn, sed ŝajnas, ke en Japanujo li atingis sian ĝiseblan limon de feliĉo, kaj en la socia vivo, arto kaj literaturo de lapopolo, li trovis ĝuatan studmaterialon. Kiam profesoro de angla lingvo ĉe Tokio li komencis serion de lekcioj destinitaj lin famigi, kaj el tio kreskis verko kompilita el notlibroj de liaj aŭskultintoj.

Kun vera ĝuo oni legas la verkon, kiu plejparte ricevas sian ĉarmon pro la nepra neceso klarlingve interpreti la okcidentan pensadon kaj literaturon antaŭ liaj studentoj. La ĉarmo kaj simpleco de la lekcioj unikigas ilin kiel klarigojn pri la literaturo okcidenta. Kolektante materialon por siaj alparoloj, li esploradis vastajn legkampojn, kaj la rezultaj studaĵoj estas pike freŝaj kaj originalaj. frukto de izolula studado en stranga lando de homo neinfluita de la samtempa pensado.

Lafcadio Hearn amis Japanujon per tuta animo, sed estis destinita restadi soleca homo, neniam ĝuste taksata dum sia vivo. En 1903 oni lin eksigis el la universitato, sed li feliĉe trovis peramike okupi alian katedron. Lia karierkaj vivfino tamen devis baldaŭ sekvi tiun enoficiĝon. En 1904, skribinte longan, vervan leteron al japana ŝipkapitano, li surpaŝis la verandon de sia dometo. Subite li terenfalas, kvazaŭ estingiĝis en li la vivoflamo. Tiel li mortis.

Li estis belpura animo, havanta fervoron por la belo en la literaturo, el kies interpretistoj li estis unu el la plej bonaj. (El la angla trad. Robo.)

**AŬSTRALIA LITERATURO.****Proponata katedro por tio.**

Profesoro G. Copling, okupanta la katedron de la angla lingvo en la universitato de Melbourne, dubas pri tio,

**PERCY HOLMES****ELEKTRISTO KAJ RADIISTO.**

212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvoj. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via!

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.

la nuno estas ĝusta tempo en kiu starigi katedron de aŭstralia literaturo. Devus esti destinita al tiu celo 25,000 funtoj sterlingaj, kio, pro la nebona stato de la landkaso, tre ŝajnas afero neplenumbla. Plue, kiom da studinda naciverkaro ni efektive havas? Kie, ekzemple, troviĝas ia aŭstralia dramoriginalo? Ĉu vere ni produktis sume pli ol seson de romanoj, kiuj povus pretendi klasikan rangon? Tre dubinde estas, ke studentoj donus tempon ol objekto, kiu, pro materiala mizero, devus esti tre limita? Laŭ lia scio, katedroj de la amerika literaturo ne ekzistas en Usono. Oni tie studas la anglan literaturon, komence la verkojn de Chaucer, Milton kaj Shakespeare kaj aliaj klasikuloj, poste tiaj verkistoj, kiaj Longfellow kaj Washington Irving, laŭ ĝusta vicigo. La profesoro opinias tion la plej sekvinda maniero. Aŭstralio devas atendi siajn Shelley-ojn kaj Dante-ojn. Niaj estontaj verko-kreuloj siatempe trovos rajtigitan lokon en la studplano de la angla literaturo, kaj la universitato tre volonte donos al tiuj eniron en la kursprogramo.

**PRILINGVAJ DEMANDOJ.**

Gim. in T. Zamenhof kaj Baghy preferas "sovjeto". Pĝ 60 Rabeno de Baĥarah. "Ĥinuĵo" estas la formo donita de la L. Komitato.

R.C. in Rand. Laŭ la S.A.T. tut-esperanto vortaro "respektiva" signifas "aparte rilatanta al nur unu el la pri-traktataj objektoj."

Roto in B. Ni ne konsentas kun s-ro H. Boucon (pĝ 10 Heroldo de Esp.) pri "oferi," kaj ankaŭ pensas, ke la signifo de -em donita en la Univ. Vortaro estas klara. "Oferi" laŭ la fundamento ne havas la signifojn diritajn de s-ro B. En U.V. la Franca estas "sacrifier," kaj la Germana "opfern" kaj tiuj vortoj havas la Biblian sencon de "to sacrifice."

M. in Y. La S.A.T. tut-esperanta vortaro ne donas tiun signifon de "eksprese," sed Wuster ja havas "speciale, eksplicite" (la germanaj difinvortoj estas tradukitaj proksimume en Esp., ĉar la vortaro estas Esperanto-

germana). La Oficiala Klasika Libro, eld. de la Lingva Komitato, kaj enhavanta ĉiun oficialan radikon, speciale avertas anglalingvanojn kontraŭ erara uzo de "eksprese" per traduki "expressly." Nia opinio, tiuj tredetalaj vortaroj, kiuj principe notas ĉian uzmanieron, eĉ la tut-eraraĵn, devus nepre meti nigraŝtelon apud la malimitindaĵon, por ke la erara uzo ne fariĝu ĝenerala.

"Ti-kiuj." La germana Esp. gramatiko de Christaller (1921) uzas la formon anstataŭ "tiuj, kiuj." Multe da rusoj kaj certaj eksterrusujaj Esp. anaroj favoras la novaĵon kaj ties plietandan aplikon, ekz., "ti-kiom," "ti-kie," ktp. Laŭ nia opinio tiaj estas danĝera rompo de la Fundamento, kaj tute ne imitindaj. Radikpartoj de fundamentaj vortoj estas sankte konservendaj.

M. in T. La uzo de komoj laŭ la Zamenhofa metodo multe helpas al simpla konstruo kaj senpena legado. Bedaŭre, tre ofte la verkistoj ignoras la majstran modelon tiurilate.

N. in Tom. Jes, tre konsilinde, ke ĉiu, kiu citas biblian frazon, ĉerpu ĝin rekte el la Esperanta Biblio eldonita de la B.F.B.S.

**AL NIAJ SUBTENANTOJ.**

Ni esprimas koran dankon pro ricevitaĵoj kaj donacoj. Per fidela dediĉo de aparta monsumeto en ĉiu jaro, kaj akurata sendado de tio en nian kason, la ĉi-landaj Esperantistoj diskonigas tutmonden konstantan raporton pri loka batalado kaj antaŭeniro; krom tio, sentas pens-fratan ligecon kelkcentoj da vaste dissemitaj samideuloj, kies nura Esperanta legmaterialo estas tre ĝenerale La Suda Kruc.

F-ino P. McCabe, 4/6, junio, '31; s-ro Martinek, 4/6, junio, '31; s-ino F. Trewin, 4/6, sept., '31; per s-ino Sainsbury, 2/-; f-ino P. Abbott, 5/-, julio, '31; s-ro F. Halliday, 9/-, julio, '31; s-ro E. Jack, 5/-, junio, '31; s-ro J. Zidich, 5/-, sep., '31; kaj donaco 2/-; s-ro H. Byatt, 20/- donaco; Sydney Esp. Club, anonco, 5/6. (Entute:—£3/8/-).

**HAROLD PUDNEY**

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

**Specialisto pri Fontanplumoj**

noveco. Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

**7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.**



**"ESPERANTO-KIBOSHA."**

El Japanujo venas rimarkinda raporto, preskaŭ nekredibla, ke nova E. revuo "Esperanto-Kiboŝa" jam havas 4697 abonantojn post nur trimonata varbo, kaj ke ĝiaj eldonantoj antaŭkalkulas 30000 jam ĉe la jarfino.

La Kiboŝa estas unu japana sociobonfara movado, la Societo Espera, penante disvastigi kleron kaj kulturon. Ĝi havas pli ol miliono de membroj, por kiuj oni ĵus eldonis la supretitolitan E. revuon, parte japanlingvan, lernigan kaj propagandan. Belpresita, artpapere, malkara por japanoj legaĵo, nur du ŝiljare. Eldonejo Kiboŝa, 458 Nisiookubo, Tokio.

**WHAT'S IN A NAME?**

The citizens of Bialystok think there's a lot in one. It was in this small town near Warsaw that Babel's conqueror was born. After a lengthy agitation, the Polish Esperantists, aided by no small body of the local press, succeeded in presenting to the town council a petition signed by no fewer than 23,522 adults in Bialystok, praying that the street not known as Dzikan should be renamed Zamenhof. Even should this petition be set aside by a narrow-visioned clique of human anachronisms it would for ever remain a rich tribute of popular admiration for Poland's big-souled son.—(Pola Esp-isto).

**QUERY CORNER.**

Bat. in M. Generally, the East-European Esp-ists incline to simplicity in the matter of affixes. Digno, justo, pio, belo, faro, instead of digneco, justeco, pieco, beleco, faritaĵo, and that is quite regular if the sense is clear.

Donna. "I went to the theatre for a change." "Mi vizitis teatron (nur) por min distri"; or "Post sufiĉe longa nevizitado mi eniris teatron." Depends on the exact meaning you wish to convey. The dictionaries of Fulcher and Long, and of Rhodes have no definition of the word "change" used in this sense. Rhodes has "change of air, etc."—*ŝanĝo de ĉirkaŭaĵoj.*

L. in G. "Eventually" is often misused in English with the sense of "finally," "at last," but its right meaning is "in the event," "in the final result or issue," and that is the meaning of Esp. "eventuale." Eventuala,—*"Povanta okazi, depende de necertaj cirkonstancoj"; la eventualaj profitoj de la afero "Eventuale" may mean also "if necessary"; "skribu, eventuale telegrafu."*

Ĝisostulo en H. Even prof. Cart, conservative as he is, writes "en la ĉi posta listo" (in the list that hereunder follows).

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury. "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu mardo je la 7.30a horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President. Mr. E. C. Jack; Vice-President. Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. J. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 125 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Australio. 10 Novembro 1930.

## NOTE ON THE GLORY OF WAR (and its relation to the Interlanguage problem).

In "The Age" of 23rd September the world is told that during the retreat from Mons Sir John French called to see General Lanrezac. "Neither could speak the other's language, and the meeting was a fiasco, for which the armies paid the penalty."

If ever example of the urgent need for an auxiliary world-tongue were sought for surely one would go no further than this.

Two men, each of whom, we may presume, was for years the recipient of costly scholastic attention, are seen in a moment of sharpest crisis to be utterly impotent to express themselves even in outline one to the other. Need it be again said, that in this age of internationalisation, of crumbling race barriers and shrinking space the call is urgent to provide in the schools of the world that mental panoply designed to equip fully the International Man? A neutral auxiliary world-tongue would be the basic element in such an education.

To return to France and Democracy's saviours of 1914. Were the consequences limited to the above farcical contretemps one might be pardoned for chuckling at the blustering embarrassment occasioned the gentlemen concerned; but the significant line that tells how the armies paid for this lack of common language divests the scene of humor and makes the thoughtful sigh as they ponder History's bitter truth that our poor blundering humanity perceives the successive footholds in its travail up the Mount of Destiny only slowly, hesitatingly, and with anguished eyes blinded with blood.

[The lingual disharmony in the Allied armies, drawn from the four quarters of the earth, contrasted sharply with the unity reigning in the troops under the German High Command, who used one language from Ostend to Caporetto, from Riga to the Bukowina. This was an advantage, the strength of which has not yet been adequately recognised by students of the titanic struggle.

Is it not true to say that in some respects the central African savages occupy a higher level than we? Through the Dark Continent run certain widely-used regional languages that enable the tribes to surmount their difficulties of dialect and to carry on their simple business. Benguela, the language used by the different peoples of the Congo, Urdu or Hindustani, the master-language that carries one through a hundred dialect-territories, Mandarin Chinese, and Chinook, the Esperanto of the American Indians, are all standing reproaches to Babel-scourged Europe.—Ed.]

### RADIO.

#### Grava anonco!

After much effort on the part of a few of the Melbourne Esp-ists arrangements have been made with the amateur radio transmitters to help in propagating nia kara lingvo.

We now require the help of all samideanoj in Australia. We want you to listen in to the transmissions and send your reports to the stations concerned. The more reports received the better will be our chance of retaining the interest of the amateur transmitters. We have started the ball rolling, now it is up to you to keep it going.

Sam-o C. A. Hughes havas la sendstacion V.K.3.C.A. kaj elsendas jen-

tempe:—Lundo, merkredo, jaŭdo, 17-30 ĝis 18a horo, dimanĉo 9a ĝis 10a, 17a ĝis 18a horo. Ondiongo estas 80 metroj.

By the time of going to press it is expected that several stations on 200 metres will be transmitting Esperanto. Listen in to the amateurs every Sunday. For further information send stamped envelope to P. Holmes, Sekretario Int. Radio Asocio., Box 751F, P.O., Eliz-st., Melbourne.

#### N.Z.E.A. SECTION. 4th Official Bulletin.

Since the 3rd Official Bulletin was forwarded to members, the New Zealand Esperanto Association has suffered the regrettable loss (as already reported in these columns) of two of its highly esteemed patrons—Sir Joseph Ward and Sir Robert Stout. The loss was the more severe in that the deaths of these distinguished gentlemen occurred within the short period of eleven days. Condolences of the NZEA membership were conveyed to the bereaved relatives; and while the body of Sir Joseph Ward lay in state at Parliament House, a beautiful wreath was placed on the casket as an expression of the membership's sympathy. Sir Robert's funeral was private, without flowers, by request.

#### Membership Strength.

At 25th September the NZEA membership numbered 177, including 28 new members for the year. Four members with commendable fidelity paid their subscriptions for the forthcoming (1931-32) year in advance; but approximately 60 have yet to give attention to the matter of renewing their subscriptions (2/6) for the current year. The Executive is hopeful of concluding this year with a numerical increase; and, as most of the clubs have reported an increased number of students, this should be quite practicable. Eight NZEA members are known to have travelled overseas: Mrs. and Miss MacQuarrie, Mr. Gibbs to Britain, Messrs. P. Dean and J. Majstrovich to Jugoslavia, Mr. R. A. Lochore to Germany, Miss Weaver to Samoa, and Mr. C. McDonald, now employed as an engineer on an oversea steamer. Esperanto in practice?

The following donations to the NZEA funds have been received since 1st May, and are acknowledged with thanks:—Mr. R. A. Wright, M.P., 2/6; Miss L. Corkhill, 6d; Mr. P. Sunde, 8/-; Mr. J. Keay, 2/6; and Mrs. K. W.

Lovell-Smith, 17/6. Total, £1/11/-. In addition, Mrs. Lovell-Smith has generously guaranteed the NZEA an annual donation of 10/-.

#### Propaganda Activities.

In July last the NZEA Executive rightly approved the proposal to circulate in the interests of Esperanto the editors of all New Zealand newspapers. A copy of the propaganda leaflet specially compiled by the NZEA for use in the Dominion was accordingly mailed under cover of a suitable explanatory memorandum, at a cost not exceeding £1/10/-, to 250 editors; and excerpts submitted to the NZEA from various parts of the Dominion indicate that this effort, the result of which indeed may be far-reaching, was not in vain. Our faith in this is strengthened by the fact that new NZEA members came forward, and several enquiries for textbooks were received. The Association also supplied letters to the correspondence columns of the Wellington daily papers, which circulate freely through the governmental departments, on the subjects "Madrid Urological Conference," "Learning and Languages," "Talkie Troubles," and "N.Z. Trade Missions Abroad." Each letter stressed the advantages of utilising Esperanto in each separate field.

#### International Co-operation.

In accordance with the decision made at the meeting of U.E.A. delegates at the First N.Z. Esperanto Congress held at Wellington in January last, the NZEA opened a contribution list to raise funds to assist in removing the deficit of the Universal Esperanto Congress held at Vienna, and the sum of £4/3/-, comprising the following amounts contributed by New Zealand club members and isolated Esperantists, was collected: Wellington Club, 14/6; Christchurch Club, 5/-; Masterton Club, £1/1/-; Auckland Club, 5/-; Mr. S. Andrew, 10/-; Mr. J. McGuigan, 2/6; Mr. W. McGuigan, 2/6; Mr. O. Babich, 2/6; Sennomulo, £1. After meeting incidental expenses of 4/-, the NZEA remitted the sum of £3/19/- to the fund organiser, Mr. P. Blaise, London. Cordial thanks are expressed to all who contributed to New Zealand's portion in the effort to wipe off the only debt existing in the Esperanto movement.

In May the General Secretary of the International Central Committee, Geneva wrote requesting a supply of the NZEA propaganda leaflets, stating the



flets would assist his Committee in its publicity work. In forwarding the desired supply the NZEA appreciated the high tribute paid its propaganda activities by the acknowledged "hub" of the Esperanto movement.

An international petition—copy of which had been sent from Geneva to the Dominion's Postmaster-General—urging all postal administrations to consider the utility of Esperanto, forwarded by the International League of Esperantist Post and Telegraph Officers (ILEPTO), was translated for and duly appeared in "The Katipo," the official organ of the New Zealand Post and Telegraph Officers' Association, comprising over 7000 members.

#### Examinations.

The question of examinations has been receiving serious consideration since the First Congress accepted a resolution authorising the NZEA Executive to investigate the position; and progress was made to a point where a round-table conference was necessary in order to arrange certain details. A meeting was accordingly held at Wellington, on 22nd August, Messrs. W. L. Edmanson, E. C. Jack, L. E. Dust, Bertram Potts, and W. H. King, appointed by the Executive to discuss the position, taking part. A resolution to the NZEA recommending the Association to introduce an oral test in Esperanto was agreed to by three votes to two, the dissentients favouring a written test in conjunction with the proposed oral one. A further meeting was held on 19th September, when suggested empowering rules, together with a proposed scope of the test were framed for submitting to the NZEA Executive and to the Second Congress.

#### Second New Zealand Congress.

The First Congress resolved that the Second Congress should take place during Easter, 1931, and that Auckland be the venue. Anticipatory to the realising of this resolution, members are reminded that the NZEA rules require three months' notice to be given of intended amendments to rules, of nominations of officers for the ensuing year, and of proposed questions for placing on the agenda paper. Such notice must reach the Honorary Secretary (7 Brook Street, Wellington), not later than 31st December, 1930.

(W.H.K.)

#### KRONIKO.

Wellington, Nov-Zelando.—Jam de post sia starigo la loka klubo ĉiumarde

funkcias sen interrompo; altkvalitaj programoj enhavadas intereson por ĉiu alestanto, ĉu komencula, ĉu sperta. La vigla sekretario, s-ro Bertram Potts, F.B.E.A., ĉiusemajne finigas la laboron per trafa raporto en tagĵurnalo. En kunveno de 7a de oktobro membro s-ro Vernon Lecaldano, en parolado "de Parizo al Vieno," rakontis spertojn el sia vizitiro al Eŭropo, de kie li antaŭnelonge revenis. Li klare montris sur la avantaĝojn uzeblajn en fremdlandoj pere de Esperanto.

Konvinkiga raporto (naŭcola) pri la 22a Kongreso ĉe Oksfordo aperis en ĉi-tiea tagĵurnalo "The Dominion," la 7an de okt-o. Provizita de la NZEA al la redaktoro, la raporto, elĉerpita el "International Language," enhavis resume la ĉeffaktojn pri la granda kunveno de trideknacia samcelanaro; kaj estos mirinde, se iuj, kiuj tralegis la artikolon, ankoraŭ tenos plu dubon pri la ĉiufanka taŭgeco, utilo kaj jam firma establo de nia kara lingvo. Espereble alilokaj samideistoj, kiuj abonas al "I.L.," same faris.

Masterton, N.Z.—Speciala kunveno de la Masterton'a grupo de NZEA okazis je 15a de okt. S-ro B. Johns prezidis antaŭ iom multe de geanoj. De s-ino L. Payne ili ricevis leteron, kiu sciigis pri ties ekŝigo el la ofico de hon. sek-iino de la grupo pro malbonsano. Kun akra bedaŭro la ekŝigo estis akceptita, kaj la grupo rezolucie dankis la s-inon pro sindona servado al ĝi de post starigo. Ili enoficigis s-ron H. F. ranks (38 Worksoy Rd.) kiel sektion por la jarcetero. Nova membro estis akceptita en la registrolibron—grava afero por nia grupo—kaj s-ino Payne kaj s-ro A. Dewar enskribiĝis grupdecide kiel dumvivaj membroj.

Loka taggazeto enhavis raporton pri kongresfaroj ĉe Oksfordo, represitan el brita ĵurnalo "Perthshire Advertiser." Aperis la 7an de okt. en la "Wairarapa Daily News" longa artikolo eduka, "Esp. kiel krom-okupo," verĵita de grupinstruisto s-ro Dewar.

Melbourne, Vict.—Je la Societa kunveno, la 23an de Sept., s-ro Ballard parolis pri la Usona verkisto, Washington Irving, kiu naskiĝis en Nov-Jorko en la jaro 1783, kaj kiu nomiĝas la "patro de l' literaturo" en Usono. En sia parolado s-ro Ballard diris, ke en juneco la verkisto estis iom maldfligenta, eble pro nebona sano. Li vizitis Eŭropon, kaj post dujara restado tie, revenis al Nov-Jorko kaj verkis kun

sia pli juna frato, ĵurnalon "Salmagundi." Lia unua libro eldoniĝis en 1809. Dum kelkaj jaroj li laboradis kun siaj fratoj kaj pro negocaj aferoj vizitis Anglujon, sed la firmo poste bankrotis kaj Irving turnis sian atenton al literaturo. "La Skizlibro" aperis en 1819, kaj poste aliaj libroj. Dum kelka tempo li loĝis en Hispanujo, kaj reveninte Usonon, kie oni akklamis lin geniulo, li acetis bienon apud la bordoj de l' rivero Hudson. En la jaro 1855 aperis lia lasta verko la "Vivo de Georgo Washington." En 1859, Washington Irving mortis.

Je la 30a de Sept, f-ino Irwin kaj s-roj Ballard, Skurrie, kaj Holmes legis triaktan komedion, per kiu la vespero pasis tre feliĉe.

Vizitis la Melb. Societon la du mond-vagantoj, s-roj Kotulsky kaj Masluk el Latvio, kaj okazis tre amika interbabilado. La anoj enskribis la nomojn en ilian aŭtografilibron, kaj aĉetis kelkajn el la fotografaĵoj.

## ESPERANTO EN LERNEJOJ.

### Grava Alvoko.

Por la statistiko, kiun ni faras por International Auxiliary Language Association in the United States, Inc., New York, rilate la temon "Esperanto en lernejoj," ni nepre bezonas ankoraŭ materialon. Estas necese, konstati, en kiuj lernejoj de la mondo dum la lasta kvaronjaro de 1930 Esperanto estas instruata.

Ni kore petas, ke ĉiuj gekolegoj, kiuj dum ĉi tiu tempo instruas Esperanton en siaj lernejoj, sciigu nin pri tio. Ili estas petataj:

- 1.) doni sciigojn pri la koncerna lernejo, sciigante ĝian nomon en sia nacia lingvo (per latinaj literoj) kaj samtempe doni la nomon kaj la gradon en Esperanto,
- 2.) doni sian precizan propran adreson kaj
- 3.) aldoni notojn, kiuj ŝajnas necesaj por klarigi la situacion.

Estas tre grave, ke ni povu liveri kiel eble plej kompletan materialon, grave por nia kunlaborado kun IALA kaj same grave por nia Esperanto-propagando.

La rezulton ni transdonos al nia Esperanto-gazetaro.

"Kunlaborado de IALA en New York kaj de la Instituto J. J. Rousseau en Geneve kun la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko en Leipzig."

D.ro Dietterle.

N.B.—Bonvulu sendi la materialon al

la sekretariino de "Kunlaborado" f-ino Martha Moelke, Brandenburgische Str., 5, 1, Berlin-Sudende (Germanujo) -plej malfrue ĝis fino de l' jaro 1930.

## TO THOSE WHO SUPPORT

We give thanks for the following. It is hoped that the briefness of the list may impress its full significance on those many who are still withholding from us strength that they should give. The sum does not even cover a quarter of the cost of this month's issue.

Melb. Esp. Soc. (anonco) 5/6 aŭg. '31; s-ro T. Polich 4/- aŭg. '31; s-ro N. Mills 4/6 julio '31; vendo al f-ino Sinnotte 6/-; Total 20/-.

## ZAMENHOF STREET!

(see last issue)

Our Polish friends have gained at last a well deserved victory, in that the town council of Warsaw, after consideration of their petition, signed by 23,522 adult citizens of Warsaw, has decided to change the name of Dzika-Street to that of Zamenhof. We regret that the matter was somewhat wrongly reported on page 217, as for many years the Bialystok street in which Zamenhof was born has taken his name. Ulica Dzika is situated in the Jewish quarter of Poland's capital. There Zamenhof lived from 1898. We heartily congratulate all those who so patiently organised for this happy result.

## ESPERANTO LITERATURE

### A Pithy Presentation.

A young English bibliophile, writer of reviews and articles, on the staff of "International Language," one K. R. C. Sturmer, has by his booklet provided a ready means whereby much learned ignorance may be dispelled.

Strange it is that so many people otherwise well-informed are yet unaware that "Hamlet" has for years been translated into Esperanto. Mr. Sturmer, with keen literary sensitivity expressing itself in well-chosen phraseology, here sets out to enlighten such enshadowed mentality by a most interestingly compiled survey of the most noteworthy Esperanto works from 1887 to 1930.

Mr. L. N. Newell contributes an article on "A New Poetry," which reveals keen discernment in appraising the work of those French, Russian, German, Polish, Czech and Hungarian writers who, in a so-called artificial

tongue, outbreathed the many-mooded movements of their spirits, or transferred the rich coloring of the "Chanson de Rolande" and "Pan Tadeus" from their native gardens to another. The work of Kalocsay, says Newell, is characterised by a technical skill greater even than Baghy's, and certain of his work has no need to fear comparison with anything in the national literatures.

Only the brevity and incompleteness of the booklet will engender in the reader a sense of disappointment. One must, however, regard it as a first attempt to present in English some idea of the 40 years' literary output of Esperanto, as an introductory sketch to the board-bound volume of to-morrow, which will be either a sequenced and complete treatment of the unfolding of our literature through the years, or an embracive symposium, covering all the departments, philosophy, science, religion, belles-lettres, each chapter of which will be written by a recognised authority. Price, 8d. at B.E.A.

(Robo)

**KURSO PER TRADUKADO**  
(kondukata de s-ro G. Gordon,  
F.B.E.A., sekretariino, f-ino B. Blyth,  
10 Victoria-av., Surrey Hills,  
Melbourne, E.10.)  
**NIGRA JAŬDO**  
(finita)

Rolf Boldrewood eraris nomante (7) ŝafisto (1) la patron de la viktimoj ĉe la rivereto Upper Plenty. Li estis George McLelland (pron. ĝorĝ makleland) prosperanta, diligenta bienhavanto (2). Li kaj liaj (3) edzino kaj kvin infanoj estis en la kabano. Sinjorino McLelland rigardis eksteren tra la pordejo, sentis la varmegon de la proksimiĝanta brulo, kaj post unu minuto la kabano estis en flamoj. Sinjoro McLelland, terurita, fortege penis savi la (4) familion. La plej juna, okjara filo mortis en liaj brakoj dum li kuregis tra la flamoj al la rivereto. La edzino kaj la aliaj kvar infanoj pereis en la brulego kelke (5) da metroj for de la kabano, kaj la preskaŭ frenezigiĝinta McLelland apenaŭ (6) savis al si la vivon rifuĝante (7) en la rivereto.

En la sama distrikto alia homo tiel grave brulvundiĝis, ke post unu semajno li mortis en la hospitalo en Melbourne.

Ĉe Barrabool (pron. barabul) pereis ankoraŭ unu (13) viro. Tiel la sumo de mortoj de homoj estis ok.

Grandega estis la nombro de mortperditaj brutoj (8). Unu vidinto pris-

kribis la teruran scenon de kadavroj de ŝafoj kaj bovoj, amasiĝintaj en fluejoj de riveretoj, kune kun aliaj brutoj duone mortintaj kaj suferantaj teruran doloron. Apud Westernport la edzino de bienhavanto havis spiritpretecon por malfermi la stalpordojn, por ke la ĉevaloj sin forsavu, tamen la brutoj estis tiel teruritaj, ke ili kure reeniris la stalojn kaj mortbruliĝis.

En Gippsland la fumo estis tiel densa, ke la tago estis tiel malluma kiel nokto, kaj unu homo senseligante (7) sian ĉevalon ne povis vidi la bruton. La mallumo daŭris tutan tagon kaj akompanis ĝin krakbruegoj de tondro. La varmego ĉi tie, kiel ĉie, estis intensa. Boldrewood diras, ke ĝi atingis cent tridek gradojn laŭ la Fahrenheita skalo (55 laŭ la Centigrada) sub la suno. Termometro ĉe strato Collins en Melbourne registris cent dek sep gradojn Fahr. (47 Cent.) en la ombro kaj cent dudek naŭ gradojn Fahr. (54 Cent.) sub la suno. Aferoj en la Alta Juĝistarejo en Melbourne ĉesiĝis je tagmezo. La kurado de la brulego haltis nur tiam, kiam ŝanĝiĝis direkto de la vento. La sekvantan tagon (9) pluvo falis en iuj distriktoj.

En tiu tempo ekzistis nek telegrafo nek kamparaj (10) fajrobrigadoj nek rimedoj por rapide transporti homojn por batali kontraŭ brulego, tamen en ĉiu okazo (11) ili nur nemulte helpus kontraŭ la furioza kurado de kampara (10) brulego. Tion instruis la brulego ĉe Noojee (pron. nuĝi) antaŭ du jaroj.

Estas dirite (12), ke la kaŭzo de la brulego en "Nigra Jaŭdo" estis tio, ke apud Diamond Creek (pron. dajmond krik) du kondukistoj de bovoj forirante (7) de sia haltejo lasis bivakan fajron subbruladi. Tiun teruran lecionon oni ankoraŭ ne lernis.

(Fino)

#### NOTARO 12.

1. Predikata substantivo. Cox 109.—2. Oni devas traduki vorton laŭ ĝia signifo en la teksto. Ĉi tie la aŭtoro skribante "settler" volas komprenigi, ke la homo ne estis "hired man" sed "landowner." —3. "liaj" ne "siaj." Cox 135. Se oni skribus "kun" anstataŭ "kaj", tiam "siaj" estus ĝusta.—4. "la" anstataŭ poseda pronomo. Cox 100.—5. "kelke da." Notaro 11/2.—6. "apenaŭ" aŭ "preskaŭ ne".—7. Adverba participo. Cox 211.—8. "brutoj" t.e. kvarpiedaj hejmaj paŝtobestoj (bovoj, ĉevaloj, ŝafoj, porkoj, ktp.)—9. aŭ "en la sekvanta tago." Cox 68b.—10. "bush" en Aŭstralio ne ĉiam signifas "arbar-



ego" sed laŭ la kunteksto povas esti "kamparo" aŭ "vasta, sovaĝa (aŭ nekulturata) regiono.—11. "en ĉiu okazo," in any case. Kp. Rab. 24/8—12. "Estas dirite" (Cox 210b) aŭ "iuj diras."—13. "ankoraŭ unu." Notaro 9/6.

### YOUR SUBSCRIPTION?

Having ever in mind the necessity for economic administration of The Suda Kruco, the Redakcio earnestly asks readers to kindly cooperate with it by renewing subscriptions in the month in which they fall due. Such a practice would obviate the sending of reminder slips, which at the present high postal rate represents no small charge on production.

There is another matter which we trust will come under the eyes of those concerned. There are several lapsed subscribers to whom the "Suda Kruco" has been sent regularly, **with no acknowledgment**, since 1928, in some cases since 1927. The Redakcio, not wishing to deprive these good people of any service the paper could render them, has kept their names on its books in the hope that such a course would prompt eventually some encouraging response from them. These lines are penned with the object of bringing them to a sense of their moral obligation at least of informing us of their position relative to the paper.

### LOK- KAJ URBNOMOJ DE NOV-ZELANDO.

Kredeble estas, ke iuj samideanoj ekster Nov-Zelando foje sentas scivolon pri la strangaj eĉ teruraspektaj lok- kaj urbnomoj nov-zelandaj, ekvidante tiujn, ĉu gazete, ĉu poŝt-stampe.

La indiĝenoj de Nov-Zelando, la Maorioj, donis nomojn al multaj lokoj, kaj dum la jaroj ĝis hodiaŭ la nomoj daŭris, kaj ŝajne estas akceptitaj nun jam por ĉiam. Krom la indiĝenoj, la unuaj maresploristoj kaj (dum la antaŭa jarcento) pioniraj koloniistoj respondicis pri granda nombro de la nomoj komune uzataj en la lando.

Esplorvojaĝante ĉirkaŭ la nov-zelan-

daj marbordoj en la 18a jarcento, kapitano Cook (elp.: kuk) donis nomojn al lokoj laŭ la cirkonstanco en kiu li alvenis ilin. Li nomis Hick's Bay (gol-feto de Hick) honore al unu el siaj leŭtenantoj, Hick, kiu kiel la unua ekvidis la lokon; Kabo Farewell (kabo adiaŭ) ĉar ĝi estis la lasta loko de Cook vidita antaŭ ol li ekreturnis Anglujen, okaze de sia unua vizito al Nov-Zelando; Bay of Plenty (gol-feto de abundo), ĉar tie li ricevis sufiĉege da manĝaĵo de la Maorioj; Kabo Runaway (kabo forkuro), ĉar tie la Maorioj forkuris, kiam Cook surbordiĝis; kaj Kabo Kidnappers (Kabo de Homŝtelistoj), pro tio, ke grupo de indiĝenoj penis forŝteli nigrulan knabon for de la ŝipo de Cook. La fama landeltrovinto neniam donis al loko la nomon de sia naskurbo, sed tion faris pli postaj koloniistoj.

Fruaj alvenintoj diverskiale provizis multajn nomojn, plejparte pro deziro porĉiamigi nomojn de admirataj eminentuloj en diversaj kampoj, kaj pro amo al tiu urbo aŭ loko el kiu ili elmigris. La plej grandan nov-zelandan urbon, Auckland, nomis la unua guberniestro, Hobson, memore al lordo Auckland; kaj la ĉefurbo, Wellington, tiel nomiĝis pro honoro al la fama angla militisto, la duko Wellington. Enmigrintoj sub la aŭspicioj de la ŝtateklezio de Anglujo entreprenis koloniadon de Christchurch, kaj provizis al la provinco la nomon Canterbury (elp.: kanterberi) respektive al la tiunoma episkopo; stratojn en la urbo oni nomis laŭ tiamaĵ episkopecoj de la Anglikana (ŝtata) eklezio. Ĉe Dunedin simila cirkonstancaro regis: alvenis el Skotlando koloniistoj subaŭspicie de la "libera eklezio de Skotlando," prenantaj planojn por urbkonstruo verkitajn en Edinburgh—jen la nomo Dun-Edin. (ĉu homonime "Dun"—"done" (farita), do "planoj faritaj en Edinburgh"? Red.). Multaj lokoj ĉirkaŭ Dunedin nomiĝis laŭ loknomoj skotlandaj: Stirling, Portobello, Bannockburn kaj Dumbarton estas ekzemploj de la frua skota influo.

Respegulo de la nomoj de eminentuloj vidiĝas ĉe la jenaj: Marlborough (la duko Marlborough); Gisborne

## HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

## Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

ĉiam kolonia sekretario de Granda Britujo); Nelson (admiralo Nelson), kiun lokon la Maorioj nomis Whakatu, signifanta "sendanĝera ankraĵo"; Feilding (kolonelo Feilding-soldato en la maoriaj militetoj); Masterton (s-ro Masters-pionira koloniisto, kiu mortis en 1874); Tasman, Golfeto Tasman (Tasman - maresploristo); Wakefield (kolonelo Wakefield-koloniisto de 1839); Russell (grafo Russell-brita Ĉefministro en la tempo, kiam la loko koloniĝis); Hamilton (kolonelo Hamilton-soldato en la maoriaj militetoj); kaj Ranfurly, Greytown, Hobsonville, Fitzroy, tiel nomiĝis en honoro kaj admiro al iamaj guberniestroj novzelandaj. Tamen ne en ĉiu okazo estis necesa la nomo de famulo.

La urbo New Plymouth (Nova Plymouth) ricevis nomon laŭ la angla urbo Plymouth; kaj Blenheim, ĉefurbo de provinco Marlborough, tiel nomiĝis laŭ la batalo Blenheim-en kiu la angla Duko de Marlborough partoprenis. Multaj el la anglaspektaj nomoj okulfrape priskribas la lokojn, kiuj portas la nomojn: Half-moon Bay (Duonluna Golfeto), Longbeach (Longa Marbordo), Five Rivers (Kvin Riveroj), Island Bay (Insula Golfeto); aliaj lokoj nomiĝis pro diversaj kialoj, ekz., Miranda, la nomo de ŝipo, kiu portis nombron da koloniistoj al Novzelando; Meeanee, tiel nomita de soldat-koloniistoj post loko en Ĥinujo, kie ili servis soldate. Berhampore, Miramar, Bombay, kaj Khandallah estis aliaj Ĥinuaj nomoj donitaj al Novzelandaj urbetoj kaj lokoj.

Oni povas diri certece, ke plejparte la Novzelandaj lok- kaj urbnomoj konsistas el nomoj de maoria deveno. Tiuj maoriaj nomoj, kiuj al multe da homoj prezentas elparol-malfacilaĵojn kaj sensignifojn, enkondukiĝis aŭ pro ia frapa okazaĵo aŭ por iom priskribi la lokon. Ekzemploj de la unua estas la nomo Whakatane, kiu urbo, tiutempe nur loko, tiel nomiĝis ĉar iutage, kiam pirogo (kanoto) komencis forflusi de la marbordo, maoriino, irante por religi ĝin, ekkriis, "Kia whakatane ake ahaŭ" (mi staros same kiel viro); kaj Waipiro

Bay (golfeto Waipiro), ĉar tie maristoj al maorioj donis bieron, kiun la indiĝenoj nomis "waipiro" — wai (akvo), piro (forte odora). Te Mata, nune vilaĝo, signifas "loko, kie loĝas maoric kun kuglo"; dum Taringamotu, farmbiena regiono, signifas maorilingve "perdis orelon," Waitakaruru, "strigo falis sur la akvon," kaj Kaitaia, "Mangajo detruigis per diluvo," ĉar iufoje la terpomoj de la maorioj estis tiamaniere detruitaj.

Same kiel la fruaj koloniistoj provizis nomojn por priskribi naturan aspekton, aŭ apartan trajton de iu loko, tiel ankaŭ faris la indiĝenoj. La jenaj estas tipaj de nomoj el la tuta lando: Paekakariki, "la hejmo de la verdaj papagoj"; Onekaka, "varmega sablo" (kio troviĝas en la loko); Paengaroa, "longa ebenaĵo"; Akaroa, "longa golfeto"; Wanganui, "granda golfo aŭ haveno"; Otira "el la sunlumo" (valego multe kovrita per montombro); Ararimu, "vojo al la arbo nomita rimu"; Ĥunua, "kaŝita" aŭ "kaŝanta" (ĉar vilaĝo estis kaŝita malantaŭ monteto); Kaihere, "ĉeriza mangajo" (kai mangajo, "here" ĉerizo en la loko estis ĉerizarbaro); kaj Waiwera "varmega akvo" (tie troviĝas bolakvaj fontoj kuracigile uzablaj). Ĉar la maorioj uzis certan lokon, kiel mangodeponejon, ili ĝin nomis Kaiapoi; nune urbo vaste konata tra la mondo pro siaj lanfabrikaĵoj altkvalitaj; kaj ĉar abunde kreskis enlandaj arboj "kawakawa" ĉe ankoraŭ alia loko, la koncerna (kie nun sidas grava urbeto sannoma) ricevis la nomon de sia karakterizanta kreskaĵo. Hukerenui tiel nomiĝis, ĉar maorio, Huke, kutimiĝis aŭdi tie strangan fajfadon de la vento, kaj nur pro fakto, ke troviĝis "malnova indiĝena forno" tie, kie nun staras Paraparaumu (multe vizitata marborda urbeto apud Wellington), tiu stranga nomo vivos tra la jaroj por balbutigi ĉiun, kiu ĝin renkontos por la unua fojo.—(W.H.K.).

### LA MORTADO.

#### Disertacio de fakulo.

En 1900 ĉe Vieno prof-o d-ro Herman Nothnagel donis publikan paroladon pri la kaŭzo kaj naturo de la

## PERCY HOLMES ELEKTRISTO KAJ RADIISTO. 212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvoj. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via!

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.

mortado. Ĉi tiu traduko sciigas al la Esp-istaro, ke la nomita homo estis kaj altpensulo kaj bril-lingva oratoro. "Nur bona homo povas esti bona kuracisto."

Opiniante la Esp. verkaron ankoraŭ neriĉa el popular-sciencia vidpunkto, la Viena E. Societo "Progreso" eldonis tiun ĉi juvelon de la germana sciencia literaturo, per tio ja donante al la mondo frape interesan pritrakton pri tiu universala fenomeno, pri kiu diris Schiller, "Tio (la morto), kio estas absolute universala, devas esti nepre bonfara."

La doktoro asertas, ke vere natura morto, tio estas, morto de homo defalanta de la Viv-arbo, kiel flave velkinta folio, pro nur multaĝo kaj sen ia patologia anomalia, estas treege malofta. Ankaŭ, ke "la Naturo estas tre multe pli kompatema ol la homo—se ĝi sole kaj ĉiam povus efikadi, kaj se la homaro alvenus ĝis la natura fino de la vivo, vere, oni povus pri la mortado pensi tiel, kiel laculo sopiras la dormon.....ne fizike turmenta estas la mortado—turmenta estas la anima mortangoro."

Strange estas la interstreketigado ĉe simplaj negativ-vortoj kaj prefiksitaj ĝenerale, ekz., ne-grava, tra-esploro. 3. "senmezure dolorŝargito," formo jam iom tre ofte uzata, sed ĉu gramatike defendebla, krom per tio, ke la adverbo modifas la verbecon de la participa substantivo? Kp. 13. "Falinto sub la akvon." "Lia vivo estis objekto (temo, motivo?) de tragedio de Goethe." 4. homa gento, (homaro). "noktonaskita problemo" (? germanismo). Sur pp. 11, 18/23, 16,5/6 troviĝas germana frazkonstruo, kiu estas neinternacia, kaj devigas multajn legantojn halti por analizi la frazon. 13/6 lukt' (boks'). Neologismoj: drast', ascend', sublim', eksplik', retrograd', progresiv', k.a.

Malgraŭ la iome fizikfakeca lingvaĵo la libreto tre povas alporti al multaj lernindajn konojn pri la efikado sur la homan organismon de tiu eterna potenco, kio finlulas la homojn en la lastan dormon.

Tradukita bone de Bernard' Selzer elgermane.

Prezo unu ŝilingo ĉe 10, Ettenreichgasse 4/31, Wien, Aŭstrio.

(Robo).

Dr. Stamatiadis, president of the Greek Esp. Assoc., informed the general meeting of that body that Esperanto is

taught to over 1,500 pupils in the grammar schools of Athens and the Pireus.

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.





# LaSuda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 126 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Australio. Decembro 1930.

## NEKROLOGO.

Sinjoro J. G. Pyke.

Je la 15a de oktobro, revenante de la Oksforda E. Kongreso, nia kara samcelano perdis la vivon de sur la ŝipo Balranald ie en la Mediteranea maro. Li havis la aĝon de 55 jaroj.

Li estis eble la plej bone konata Aŭstralia Esperantisto en Eŭropo, kien li vizitis tri fojojn. Ĉien li portadis, kiel veran vigligilon, sian ĉiamfreŝan spritecon kaj bonhumoron, sian facile verŝan fluon da spertrakontoj.

Sed kune kun tiu facilcoreco kaj gaja ekstero sidis en li pura sentemo, volo strebi al la idealo. Forte li sentis la maljustecon, ĉu inter nacioj, ĉu inter sociaj klasoj. Dum vizito al Germanujo antaŭ du monatoj li sentis akran doloron, kiam li vidis kiel mizeraj estas la kondiĉoj sub kiuj vivas multaj laboristoj. Liaj plezuroj estis plej simplaj: marŝo tra la kamparo kun amikoj, legado de literaturaj libroj, ĉeesto ĉe prelegoj artotemaj, kaj eble antaŭ ĉio la teatro, kiun li pasie amis. Dum la ĵuspasinta vizito al Anglujo li preskaŭ ĉiutage alestis prezentadon. Laŭ mieno ĉiuj lin bone konis. Nature gaja kaj preta fari ion ajn por amuzi la samideanaron, li, tamen, kiel ofte okazas ĉe tiaj homoj, de tempo al tempo serioziĝis; nubo kovris lian frunton, kaj li fariĝis neparolema. Neniam li povis kaŝi sian malaprobos, kaj persono, kiu pekis kontraŭ li, tuj sentis aŭ frostotremas malvarmecon aŭ kolereguranon, sed ambaŭ rapide forpasis.

Dum la 12-jara vivo Esperanta de s-ro Pyke, li plejgrandparte okupis la prezidantan seĝon en iu aŭ tiu Esperanta Asocio. Societo aŭ Klubo.

Neforgeseblaj por la klubanoj estas la monataj kampfestoj, kiuj okazis ĉe la fruktarbejo de lia nevo ĉe Ringwood. La promenoj en la arbaro, la gajspritaĵtemaĝoj, la plezuro de l' danco laŭ-

takte de eluzita gramofono disko, la rideksplodoj de tiuj, vidantaj por la unua fojo s-ron Pyke, kiel ŝaradiston!

S-ro Pyke ĉeestis la unuan Aŭstralian E. Kongreson ĉe Adelaide, la duan ĉe Melburno, la trian ĉe Sidnejo, kaj la kvinan ĉe Melburno.

Esperanto ĉiam kroĉis kare al la koro de nia perditulo. En 1922, kiam starigis Pyke's Bookshop, ĉe 212 Swanston-str., li tuj decidis doni al ĝi subtitolon "Esperanto Book Supply," kaj sur la ekstera muro en grandliteroj li metis avizon "Esperanto Books." Kiom Esperanto ŝuldas al tiu butikisto malmultaj scias. Esp-istoj el aliaj ŝtatoj kaj landoj trovis en Melburno centran lokon, kie ili povis havigi al si helpon kaj ĝui konversacion internacilingve. Vizitantoj el kamparo kaj studentoj, kiuj ne povis ĉeesti la klubon, venis por konsilo kaj ekzerco je la lingvo.

Ĉe la Helsinki kongreso oni decidis fari monokolekton por starigi monumenton sur la tombo de Zamenhof. S-ro Pyke iĝis oficiala kolektanto por Aŭstralio, kaj kiel rezulto de lia energia laboro ĉi tiu lando okupis duan lokon sur la listo de donacintoj. Granda Britujo estis la sola lando, kiu pli malavare donis. En 1927 s-ro Pyke havis la honoron fari la unuan parolon ĉe la malkovro de la monumento en Warsaw.

Pro sia amo al la teatro estas komprenebla tio, ke s-ro Pyke ("Ezoko") kelkafoje sin okupis verkante drametojn en Esperanto. La plej konata el liaj verkoj estas "La Amigilo," kiu, krom kelkfoja prezentado en Melburno, ankaŭ estis ludita ĉe Kopenhago kaj Parizo. Inter la Esperantaj trezoroj ĉe la hejmo de s-ro Pyke estas karto, per kiu la geaktoroj, kiuj partoprenis la prezentadon ĉe Kopenhago sendis salutojn. "La Amigilo" estis presita en "La Revuo," eldonita en Parizo sub redaktoreco de d-ro Zamenhof. Aliaj

teatraĵoj prezentitaj en Melburno estas:—"La Akvo de l' Forgeso," "La Koro de Maria," "Iun Belan Tagon," "Balboni, Mansield kaj Vojecek, Bankieroj." S-ro Pyke ankaŭ kunlaboris kun s-ro A. L. Sullivan en verkado de "Dum Ŝi Vivis," melodramo prezentita multfoje, kaj nepre venigante proridajn larmojn al okuloj de la aŭdantaro. "Dum Ŝi Vivis" estis tradukita en la anglan kaj ludita sub la titolo, "As Long as She Lived, or Twice Killed."

En 1921 li vizitis, kune kun s-ro Rawson, la 13an Int. Kongreson ĉe Praha. Antaŭ kaj post la kongreso li iris en Nederlando, Germanujon, Ĉeĥoslovakion, Hungarujon, Aŭstrion, Svisujon, Francujon, kaj Danlandon, revenante al hejmo tra Kanado. Duan vojaĝon li faris en 1927, kiam li reprezentis Aŭstralion ĉe la Danciga kongreso. Antaŭ la kongreso li aliris Svedujon, Norvegujon kaj Finlandon, kaj post ĝi li vizitis al Pollando, Rumanujo, Bulgarujo, Turkujo, Sudslavio, kaj duafoje al Germanujo. En junio nunjara li forlasis la hejmlandon, akompanate de s-ro Hussey, por reprezentinti nin ree ĉe Oksfordo. Sed pro siaj propraj klopodoj li okupis pli gravan rolon ol antaŭe, ĉar krom la Esp-istojn li reprezentis ankaŭ la ŝtatan edukan departementon de Viktorio. Postkongrese li aliris en Germanujon por la tria fojo kaj por la dua Svisujon kaj Francujon.

En leteroj el fremdlando li diris, ke la vojaĝo denove montras neceson havi internacian lingvon, kaj taŭgecon de Esperanto por tiu rolo. Ĝis la tago antaŭ ol li forlasis Anglujon li okupis sin pri Esp-aj aferoj. S-ro Hughes ricevis leteron kaj gazeton pri radio, s-ro Rawson artikolon pri la lingvo verkitan de prof-o Collinson. Eĉ surŝipe li laboris. Amikino kun li vojaĝanta diris, ke li donis al ŝi jam kelkajn lecionojn. Esperanto estis nedisigeble teksiĝinta en lian vivon. Jen la sekreto de lia entuziasmo. La Esperantistaro jam alte taksas sian perdon, sed ĉu plene, ĝuste? Estas dubinde. Nun ili sentas la foreston de bonkora, aminda kunulo; kun la forto de la tempo ili sopiros arde la energion de tiu trankvile flama laboranto por nia sankta celo, ĉiam preta helpi, ĉu konsile, ĉu mone.

Tiuj, kiuj persone konis s-ro Pyke, ne povas ideo malasociigi lin de la klubo. Mil aferetoj konstante rememorigas nin pri li. Tial la klubo estu

lia monumento. Ni laboru, por ke ĝi estu inda je tiu viro.

### IN CONDOLENCE.

With great regret we have to record the passing, on 4th September, of Mr. John Byatt, of Hawthorn-grove, Hawthorn, secretary of Ridley College, and formerly senior inspector of the Education Department. The late Mr. Byatt was aged 67 years, and was educated in London. For two years he was a useful member of the Melbourne Esperanto Society, which body, in company with all who knew him, expresses its sincere condolence to his widow, his daughter (Miss Alison Byatt), his son (the Rev. Frank Byatt) and to his brother, (Mr. J. Byatt, president of the Westralian Esperanto Society).

### KRONIKO.

**Masterton, N.Z.**—La grupo antaŭeniras forte sub gvido de senĉese laboranta s-ro A. Dewar, D.B.E.A.

S-ro Tooley, el Christchurch, vizitis nin ĉe kunvenoj, kaj instrue helpis. Vizitantoj ĉiam estas bonvenaj.

Pro tregrava malsano de s-ino L. Payne, nia antaŭa sekretariino la grupo, pro respekto, ne okazigos sian festvesperon jarfinan.

La du ĉi-urbaj taggazetoj enhavis en la unua dusemajno de novembro 48 colojn pri Esperanto. Unu artikolo perlume de s-ro Dewar estis represita kiel cirkulero kaj disdonita al interesatoj.

Ses ges-roj vizitis la grupon en oktobro.

**Perth, W.A.**—La ĉi tiea societo ankoraŭ bone funkcias, spite al la tielnomitaj financaj malfacilaĵoj. Kvar novaj anoj aliĝis la lastan kunvenon; nune tri grupoj, gvidataj de s-roj Miller, Saar kaj Byatt, studas nian lingvon. Lastatempe ĵurnalo "Sunday Times" presigis artikolon pri Esp. kaj la Oksforda kongreso, ankaŭ la "West Australian" enhavis pri la Islanda miljara festo interesan artikolon, tradukitan de nia sekretariino, s-ino Sainsbury. Tiel oni sciigas al la homoj, kiel taŭgas nia lingvo por disvastigi novaĵon el malproksima mondparto. Tiel oni al-tiras publikan atenton al tio, ke oni ja uzadas Esp-on en la ĉiutaga vivo.

Pasintmonate ĉe kunveno de anoj de U.E.A., s-ro Caine abdikis sian oficon kiel delegito por Perth. Antaŭ dekunu jaroj s-ro Caine alprenis delegitecon, kaj de tiu tempo ĝis nun agis vigle

kaj fidele. La anoj unuanime petvokis s-ron Saar esti anstataŭanto; s-ro Casey kaj Byatt, nome de la anaro, elkore dankis al s-ro Caine pro sindona laboro lia, kaj multe gratulis s-ron Saar pro enoficiĝo. Ĉiuj opinias, ke la nova delegito streĉe faros la eblon varbi ankoraŭ novajn subtenantojn al la U.E.A.

**Sidnejo, N.S.W.**—S-ro Rutland kaj ges-roj Hart jam revenis de vojaĝo al Eŭropo. La klubo ilin bonvenigis per speciala festvespero, ĉe kiu ili rakontis al membroj pri la kongreso en Oksfordo.

En novembro vizitis la klubon s-ro Maurice Hyde, el Brisbano, kaj s-ro C. W. Ballard, el Melburno.

Klubanoj nun havas korespondan fakon kaj kuniĝas dum duonhoru el la ordinara klubkunveno, por montri unu al la alia leterojn, p. kartojn ktp., kiujn ili ricevis, kaj por disdoni alilandajn adresojn.

**Melbourne.** — Lastmonate s-ro P. Hudson faris interesan paroladon pri la kotona industrio. Priskribinte la kreskigon kaj aspekton de kotonarboj, li detale klarigis la fabrikadon, informdonis pri la landoj taŭgaj por ĝia kulturo, kaj ĝia komerca valoro en la merkato.

De la 11a de nov-o la Melburna Esperanto-Societo kunvenas en nova ĉambro, nome ĉe Scots' Church Hall, 97-101 Russell-str. Tute taŭga, oportuna, kaj komforta, la nova renkontejo tre plaĉas al klubanoj.

#### KURSO PER TRADUKADO

(kondukanto, s-ro G. Gordon, F.B.E.A.; sekretario, f-ino Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melbourne, E.10.)

#### TRADUKO 13

**KAPITANO CHARLES STURT,**  
aŭtoro kaj landesploristo.

(de L.G.L. en "The Age," Melbourne, de la 31a de Majo, 1930a.)

Se laŭdado de la posteularo aŭdiĝas trans la tombo, ĝi estas la unua honoro ricevita de multaj herooj. Kapitano Sturt oferis (1) la plej bonajn jarojn de sia vivo al la esplorado de la internlando de Aŭstralio je la kosto de siaj sano kaj vidado (2), tamen ĝis lia morto oni ne alte taksis lian laboron.

Charles Sturt naskiĝis (3) en malgranda vilaĝo nomata Chunar Ghur la dudek-okan de Aprilo en la jaro dek-

sepcent-naŭdek-kvina (4) Kiam li estis kvarjarulo, lia patro, juĝisto en la servo de East India Company (5), sendis lin al parencoj en Angiujo, kaj tie li ricevis instruon, unue en privata lernejo en Astbury kaj poste en gimnazio en Marrow. Estante apenau dek-okjara li elektis militistan karieron kaj fariĝis "ensign" (duaranga leŭtenanto) en la tridek-naŭa regimento de la infanterio. Tiu regimento batalis jen en Kanado jen (6) en Eŭropo kaj poste estis sendita en Irlandon por subpremi ribelon de la "Whiteboys" (pron. hŭajtbojs). Servante (7) tie li renkontiĝis kun John Harris, soldat-servisto, kaj tiu poste akompanis lin en ĉiuj liaj esploradoj en Aŭstralio.

En la jaro dek-okcent-dudek-sesa Sturt, jam kapitano, ŝipveturis kun taĉmento de sia regimento, eskortanta (8) pune transportatajn (8) krimulojn al Nova Sud-Kimrujo. La unua impresio sentita de Sturt pri Aŭstralio estis, ke ĝi estas (15) lando sunbruligata (8) pro senpluveco, lando de velkinta (8) terofruktaro, mortantaj (8) brutoj, senkuraĝiĝintaj (8) kolonianoj, kaj grandaj riveroj malaperantaj (8) neniu scias kien. Senesperigantaj (8) kolonianoj sugestiis ekspedicion por trovi la grandan internlandan (9) maron, ĉar teoriistoj asertis, ke devas esti tia komuna buŝo de ĉiuj riveroj fluantaj (8) internen. Oni donis la estrecon de la ekspedicio al Sturt kaj la subestrecon al Hamilton Hume (pron. hjum).

Kompare kun pli modernaj ekspedicioj por landesplorado tiu de Sturt estis tre malbone ekipita. Krom la estroj ĝi konsistis el du soldatoj, ok punlaboraj krimuloj, dek kvin ĉevaloj, dek bovoj kaj boato sur radoj. La dudek-sesan de Julio de la jaro dek-okcent-dudek-oka la ekspedicio pasis preter la monto Harris kaj daŭrigis la vojaĝon sur malalta vasto de marĉa dezerto ĝis kiam danĝeraj ŝlimaĵoj kaj pikaj kanoj malebligis ĝin iri pli antaŭen. En la bruliganta Decembra varmeĝo de Meza Aŭstralio Sturt (10) penege marŝis tra alternajn zonojn (11) de arbeto kaj marĉo kaj fine trafis (12) rivereton, kiun li nomis New Year Creek (pron. nju jir krik, t.e. Novjara Rivereto). De tie li marŝis al kruta, izola monteto, esperante (7), ke de sur ĝi li havos grandan perspektivon al la okcidento. De la supro de la monteto, kiun li nomis Oxley's Tableland (pron. okzlejs tejbeland, t.e. Altplataĵo de Oxley)



li vidis nur sunbruligatan ebenaĵon sin etendantan (8) ĝis la horizonto. Senkuraĝiginta pro la senakva dezerto, Sturt iris returne (13) al New Year Creek kaj dum kelke da tagoj marsis laŭflue de tiu rivereto. Oni imagu liajn senliman ĝojon kaj miregon, kiam li neatendinte trovis, ke la rivereto fluas (14) en grandegan riveron, kiun li nomis Darling. Lia ĝojo mallonge daŭris, ĉar la akvo estis sala. Post kelke da tagoj da esplorado en la ĉirkaŭanta tero nesufiĉeco de trinkebla akvo devigis lin iri returne (13) al la monto Harris, kie atendis lin novaj provizaĵoj. La sepan de Marto li ree ekvojaĝis sekvonte (7) la sekan fluejon de la rivero Castlereagh (pron. kasel-rej).

#### NOTARO 13.

1. Figura uzo de "ofer".—2. Vidado aŭ vidpovo aŭ vidkapablo.—3. La vortoj en la teksto nur signifas "was born".—4. aŭ mil - sepcent - naŭdek-kvina.—5. Ne esperantigu nomojn de modernaj personoj, firmoj, kompanioj, gazetoj, ktp.—6. jen....jen, sometimes.... at other times. Cox pĝ 344 aŭ 356. Mill.—7. Adverba participo, Cox 211.—8. Adjektiva participo, Cox 209b.—9. Ne uzu "enlanda" en tiu senco, ĉar ĝi havas nesaman signifon.—10. La teksto lasas dubon ĉu de tie Sturt marsis sola aŭ akompanata de la aliaj ekspedicianoj.—11. Akuzativo, tial ke li eniris ĉe unu flanko kaj eliris ĉe kontraŭa flanko.—12. trafis, came upon, struck.—13. Kvankam la prefikso remultloke troviĝas en la senco de "back," tamen estas bone distingi inter "re-" (again) kaj "returne" (back).—14. "fluas" (ne "fluis"), Cox 220, 221. Oni notu, ke en Cox 221 la vortoj "of speaking" devas esti "spoken of".—15. "estas" (ne "estis"). Vidu noton 14.

#### TO THOSE WHO SUPPORT

We again give our thanks. How welcome is their help! We earnestly appeal to all lapsed or due subscribers in the hope that they will, at the eleventh hour, save the Suda from the embarrassment of a further deficit at the year-end. There is a sum of some £20 outstanding—owed by persons regularly receiving the gazette. Were this to be paid this month, the S.K. would appear in 12 pages through 1931.

F-ino M. Krass, 4/6, julio, '31; s-ro A. Grieser, 5/-, sept., '31; s-ino M. Dunne, 4/6, majo, '31; f-ino M. Helm 6/6, dec., '31; s-ro J. Rogers, 4/6 junio, '31; s-ro J. Lawson, 9/-, aŭg., '31; s-ro

F. Lunning, 5/-, dec., '31; f-ino J. Pollock, 5/-, julio, '31; s-ro J. Skurrie, 4/6, feb., '32; s-ro F. Bury, 4/6, dec., '31; s-ino G. Livy, 13/6, dec., '30; kaj 6p. donaco. Ensume: £3/7/-.

#### LA SUDA KRUCO

##### As a Christmas Present.

Have you an Esperantist friend who is not a subscriber to La Suda Krucio, and to whom you customarily send some small token of remembrance at Christmas? We believe you have. Why not surprise him or her by arranging to have a copy sent every month in 1931? By so doing you would at once bestow an acceptable little gift, and render sorely needed service to the only Esperanto organ in the Southern Hemisphere.

##### TO CONTRIBUTORS.

All literary contributions to us must be accompanied by the name and address of the sender, whether for publication or not. It is impolitic to print matter the author of which could not, in case of necessity, be traced. Of course, pen names may be appended to the lines or they may appear over no signature at all, but the Redakcio must know the truth as to their origin.

#### ACCOUNTANTS & ESPERANTO.

The International Accountants' Corporation and Bookkeepers' Institute, "established by membership of some 3000 in nearly every country on earth, with 83 registrars' offices throughout the world," has adopted Esperanto.

The Council feels that it should do more than formally accept the language; so five of the officers and staff out of twelve on the permanent staff at the International Head Office (Capitol Bldg., Melb.) are learning Esperanto. The language will be used considerably in the head office.

The Institute's gazette, "International Accountants' Journal," circulates in 60 countries. Its editor hopes at a later date to publish a regular page of Esperanto each month. The Sept. number contains a fine article by Bernard Long on the educational value of Esperanto, reprinted from "International Language."

#### THE STORY OF ANDREE in Esperanto!

Through La Eldona Societo Esperanta, Stockholm, the story of the Andree North-polar tragedy of 1898 will appear in Esperanto, simultaneously

with versions in nine other languages. The book, in the main a translation of Major Andree's diary, is priced at about ten shillings, and should prove to be an imposing volume. Inquire at B.E.A.

### SKANDERBEG: THE ALBANIAN NATIONAL HERO.

Skanderbeg (a Turkish corruption of the name of Prince Alexander—Iskander—Skander Beg) is the subject of the first book in Esperanto to be printed in Albania. It is being published privately by the author in Scutari at the price of 2.50 Swiss francs for 144 pages. It is an inspiring story of a remarkable man, whose life reads like fiction, so numerous and exciting were his adventures as the champion of Albanian Christianity against the Moslem Turks. The book is enriched by a graceful tribute to the internationality of Esperanto, in the form of a foreword by a Czechoslovakian, Professor Lukas.

### ESPERANTO IN NEW YORK CLINIC.

Dr. Robert Rubinstein (New York) says a little learning is a useful thing. He writes to the "Internacia Medicina Revuo" as follows: In New York's foreign quarter the patients of our clinic are for the most part indigent and uneducated, and so, as may be expected, language difficulties present themselves almost daily. This results in the loss of much valuable time before we can obtain sufficient personal information to make a satisfactory diagnosis. Many tongues are heard in the clinic. Often we must use some other patient as an interpreter, but not always successfully. I have found Esperanto of frequent help, especially with Spanish and Italian visitors; for example, they always understand me when I say to them "Respiru profunde," or "Stomakdoloro?" or "Apetito bona?" or "Dormas dum la nokto?". They never fail to answer intelligently. The world may think that the English language is all-sufficient in North America. Hard facts prove the contrary.

### DU MAJSTRO-NOVELOJ de Theodor Storm

trad. elgermane H. Heitmüller  
eld. "Heroldo de Esp.," Koln.

Estus helpdone kaj interese, se la tradukantoj metus antaŭparole la nomojn de tiuj nacilingvoj, en kiujn la koncerna verko jam tradukiĝis. Ekzemple, ĉu en la angla estas trovebla ĉi-duo de

noveloj de Storm, verkisto tiel ŝatata de germanoj?

Li ne apartenas al iu ultramoderna literatura skolo; el jaroj 1817-88 li altiras, penas tiratente rememorigi nin pri sia skribepoko, pri tagoj antaŭ ol floris la animesploremaj romanistoj, la prilumistoj palpe serĉantaj la kavernojn de l' homa psiko.

Storm rakontas la historion de Haŭke Haien, studama knabo, kiu leviĝis ambicie ĝis tio, ke li okupis la enviatan oficon de digografo. Kontraŭstarantojn li devas rebati; liaj ideoj naskas disputojn inter lokanoj. Sur sia blanka ĉevalo li kaj la familio, pro rampiĝanta digo, malaperas finfine en la manĝavindan faŭkon de l' maro. Inter frizonoj floris el tio stranga lredo nome, ke blankĉevala vizio kun akompanantaj misteroj aperas iam kaj iam ĉe la diga marbordo.

Ĝi estas leginda vortbildaro de frizona vivo, de konstanta devo vigli kontraŭ la eterne minacanta maro norda. La persista Haŭke elpuŝas el ni admiron al sia forta karaktero. Ni feliĉas kun li en ĉia sukceso. Plaĉe estas, ke lia virbrava koro amvenkas la beletan Elke, ke li meritante akirprenas digografan oficon honorindan! Lerte desegnitaj skizoj el simpla popolo, vivanta apud komuna malamiko, la Marmoloho. Ludas sinsekve sur la intereso-sento la "Geest"-konkurso, la paganmoro enterigi vivaĵon ĉe digfondo, kaj la rakontferma tragedio de l' inundo.

La stilo estas plejparte bona, tamen oni kelkajn teksterojn povus pli lerte reverki, en kiuj kolormanke ĝi treniĝas aŭ estas karakterizata de nebona frazkonstruo. Bonelekte uzante adverbojn kaj adjektivojn la tradukinto evitis trouzon de -eg sur paĝo 114. "...la besto rapidegis tien. La ventego blovegis el la flanko, Kelkfoje la ekpuŝegoj premis tiel furioze, ke ili preskaŭ ĵetegis ĉevalon..."

Ni volas protesti tamen kontraŭ dono al fundamentaj radikoj ankoraŭ alian signifon, "gest", "marŝ". "Konfid" misuzata. Tro da kunmetitaj verbenpej. "Holandan lingvon ambaŭ ne scipovis (...scipovis nek unu nek la alia); Nebona ellaso de personaj promoj kaj korelativoj:—Li ekkonis, ke (ĝi) estas ŝi. Li strangolis ĝin (tiel). ke ĝiaj okuloj elkaviĝis"; 33/3. "Li aŭdis, kiel ...la kokoj kriis (krias). Denove la stranga gramatikaĵo, "antaŭe nomito" (antaŭe nomita); "ĵus enterigito" (ĵusa, aŭ enterigita). "Avancigi" (Zamenhof, "promocii"),

aliloke la trad. uzas la plibonan "grad-alt". 51/1-4. Neklara tradukero. 67/32 "tiel ke" (tial); "frakturo"?; 93, memstare sidis? Tro ofta entrudo de sufikso -em. Domaĝ' (difekt'); ne jam (ankoraŭ ne); "la alia mateno" (la sekvanta mateno). Interpunkcio sur unuaj naŭ paĝoj laŭ Zamenhofa metodo sed ne poste.

La dua rakonto atentotiras pro edziĝ-problemo. Unuinfana vidvo prenas al si denove edzinon. Ne prosperas al ĉi tiu amigi al si la edzidinon (edzan filineton). La viro konsilas la amatinon, "ne postuli de la infano ion kontraŭnature." Li diras, aldone, ke ŝi povus esti vera patrino nur al infano de ŝi naskita. Argumente le virino rebatas, ke ŝi ja fariĝis sia amrajta patrino en tiu sama grado, kia ŝi fariĝis lia amrajta edzino. Se la unua ne estas vera, la dua ankaŭ ne!

Valora kontribuo al nia literaturo. Prezo: 2/6 ĉe B.E.A.—(Robo).

### MASARYK

#### Malriĉa knabo, kiu gloriĝis.

La ĉeĥoj amas sian prezidanton, paĉjon de ilia lando. La supretitolita libro donas ankoraŭ ateston pri la popola volo elesprimi la sentatan adoron al tiu vere kuraĝa kaj talenta ŝtatogvidanto, kiun Lloyd-George nomis "la plej granda politikisto en la nuna Eŭropo." La aŭtoro, d-ro J. Herben, bildigas rakonte lian vivhistorion ekde infaneco. Filo de veturigisto, li fariĝis, dank'al sia akra moralsento kaj alta vivcelo, profesoro, aktivulo por la formiĝanta ĉeĥa ŝtato, kaj finfine ties aklamata ĉefministro.

Ho se eldonistoj ĝenerale bindus tiamaniere, ke la folioj ne dis-eriĝas pro nura tuŝo. Estas ĝene, serĉi subtable forflugintajn librerojn! La stilo estas bona, sed preseraroj iom tre ofte makulas. La tradukintoj, Moraviaj Esperanto-Pioniroj, devis fari la laboron kun multe da rapideco, celante finon jam ĝis la nasktago de la ŝtatprezidanto; la preskorektisto samkiale ne sukcesis laboro tiel precize, kiel ĉe la dramo "R.U.R."

Tiu ĉi interesa kaj valora libro 136-paĝa indas duan eldonon, sed nepre nur unuecigite el vortuza flanko (forigo de duoblaj formoj, kiaj orienta, orientala, socia, sociala), kaj kelkloke glatigite ĉe iom nekompreneblaj frazoj. Prezo 2/6 ĉe B.E.A.—(Robo).

### JUNECO KAJ AMO

#### originalaĵo de Ed. Payson.

S-ro Payson, malgraŭ sia honorinda multjareco, estas laŭspirite juna kaj ankoraŭ klare tenas memore la rozojn kaj dornojn de l' vivburĝono, ĝiajn ravojn kaj dolorojn. Jen "legendo el Venecio," libreto en kiu la okuloj vagas paĝon post paĝo tra melodilingva priskribo de orlumata blu-marita, pitoreska kanalaro flankita per malnovmondaj loĝejoj; aŭdiĝas plaŭdo muzika de la gondolista braklaboro, la elfingrita gitarvoĉo de amanto.

La temo de tiu ĵus eldonita originalo kaj ties varmsanga pritrakto rajtigas nin supozi, ke iu amrevanta dekoksomerulo verkiste elpuŝas krion de seniluziĝo pri ino perfidinta. Gratulon al nia enviinda idefrato, jam konata Esperantronde pro siaj ĝue legataj tradukaĵoj.

Verkita en tre laŭdinde klasika stilo, la dek ĉapitroj formas tragedion pri iom tre ofte uzata temo. Du amikoj. Unu forlogas de la alia la belulinon ligitan de l' amŝnuro nesufiĉe forta. Sangobolo, venĝosoifo, morto de unu el la persontrio. Kiu?

Nepaĝnombrita. Bele broŝurita el forta papero, la verketo estas de The Esperanto Publishing Co. eldonita. Prezo 1/6p.—(Robo).

### ĈU TEORION Aŭ PRAKTIKON?

En Ĝenevo (20-3—2-4-30) kolektiĝis certaj famaj filologoj, laŭ la invito de International Auxiliary Language Association..., por honeste esplori la demandon pri internacia helplingvo. Eble, vi kredus, ke ili faris miraklojn. Absolute ne! Tiuj 19 altgradaj kompetentuloj, post dusemajna debato kaj peniga diskuto, konsentis ellabori deklaron, kaj koron en paco, ĝin prezentas al la

## HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcianta fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiĝinto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 **EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.**

## Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiuj specoj ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—



publiko.

Ni eltiros por niaj legantoj la 3-an punkton de la deklaro, kiu, certe, provokos justan proteston, flanke de ĉiu Esperantisto. Tralegu tiun ĉi gemajon:

Ili (la 19 kompetentuloj) opinias, ke ĉiu sistemo (artefarita lingvo) prezentas certajn proprajn bonaĵojn, sed neniu povas pretendi je perfekteco, sekve de kio iu decido celanta determini definitive la lingvon internacian de l' estonteco ŝajnas esti ankoraŭ tro frutempa.

Jen kian geniaĵon ellaboris tiuj famuloj teoriistoj. Ili konsideris tiun gravan demandon aŭ facilanime aŭ kun troa prudento, sen ia ajn logika penso. La tuta punktaro de la deklaro estas ridinda kaj nete sensenca. La kulminacio de sensenco, tamen, enteniĝas en la supra citaĵo. Kio povas pretendi esti perfekta? Kaj kiam oni imagas, ke unu el la ses (jam ses! kiom la fabrikado de artingvoj estas alloga!?) sistemoj atingos perfektecon? La naciaj lingvoj, vivantaj jam centojn da jaroj, ne ankoraŭ atingis perfektecon kaj tian ili neniam havos, kiel ĉiu surteraĵo. La definitiva determino de la estonta lingvo internacia ŝajnas esti ankoraŭ tro frutempa!? Se ĝia sorto estus en la manoj de tiaj parolistoj, ĝia determino ŝajnus esti ankoraŭ tro frutempa en la 3030-a jaro.

Feliĉe, la 19 deklaroj kaj ilia deklaro povas neniel influi la daŭran venkmarŝon de Esperanto, kiu disvastiĝas kaj fine triumfos sen ilia opinio aŭ konsento. Kaj kian utilon havus Esperanto, eĉ se ili rekte fiksus ĝin internacia? Tute nenian! 19 personoj povas nenion fari per siaj vanaj paroloj kaj eternaj teorioj. Malkonsideri nian lingvon, estas afero malserioza kaj precipe, stulta. Ignori la praktikon, estas nepardonebla ago por personoj, kiel niaj 19 juĝistoj, kiuj faris nemenditan laboron.

Ĉar ne estus eble, ke personoj povu fabriki tian ridindan deklaron, se ili scius, ke Esperanto jam vivas dum preskaŭ duonjarcento, ke ĝin parolas

miloj kaj miloj da personoj, ke ĝiaj ĵurnalaro kaj literaturo rimarkinde kreskis kaj pliriĉiĝis, ke, entute, la nura praktiko de la lingvo mem kapablis formi ĝian tiom longan historion. Ne, nenia teorio valoras la praktikon. Ne estas do necese maltrankviliĝi pro la senbaza decido de tiuj multsciintoj. Post la dorso de Esperanto staras la granita persisto kaj fera kredo de ĝiaj adeptoj—ili formas la popolan voĉon, kiun oni obeos.

Estas tre bedaŭrinde, ke el la 19 teoriistoj troviĝas tri esperantistoj, kiuj akceptis subskribi tian sensencaĵon, spite al la praktika valoro de nia lingvo, kies spiriton ili eble ne konas.

V. M. SIŠKOV, en "Oomoto Internacia."

### PRI INDIĜENA "OSTOMONTRADO."

La internolandaj indiĝenoj de Aŭstralio ankoraŭ praktikas la sorĉarton. En Adelaide, ĉefurbo de ŝtato Sud-Aŭstralio, indiĝeno efektive restas en dumviva mallibereco pro mortigo al "lubra" (indiĝena virino), kion li faris, revenĝante pro "ostomontrado" (minaca gesto aŭ celo al iu per ostoj). Sendube li estas forte konfuzita pro la konfliktaj leĝoj. Lia faro estas tute permesata—laŭ tria leĝo, kaj verdire li ne sciis pri ia alia. Ostomontrado estas kutimo ĝenerale praktikata ĉe la triboj, kaj konsistas en ago, montri ostojn al individuo al kiu oni volas malbonon. Tre povas esti, ke la celito malsaniĝos kaj mortos,—precipe se tiu suspektas ian sorĉaĵon. Parenco de mortinto tiam venĝas perfortege. Laŭ leĝo de la indiĝeno, tio estas justa homomortigo, sed laŭ blankula leĝo, ĝi estas krimo meritanta punon.—Trad. Ĝodoko.

### RUZE!

Ĉu via filino jam kutimiĝis al la okultvitroj?

Bedaŭrinde, ne! Ŝi ilin tute malamas! Dumtage mi neniel povas konsentigi ŝin surporti ilin; tamen, feliĉe estas, ke, tuj kiam ŝi endormiĝas, mi piedpinte ŝtelmetas ilin al ŝi sur la nazeton.

## PERCY HOLMES

### ELEKTRISTO KAJ RADIISTO.

212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvojn. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via!

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.

**PRI "MORTIGI".**

En "La Rivista Italiana di Esp-o" prof-o Mazzolini volus anstataŭigi "mortigi" per "morti" (p. 16 Fund. Krest.). Evidente li ne scias, ke Zamenhof intence donis la formon kun -iĝ kiel mezformon inter aktiva kaj pasiva. La tuta frazo klare montras tion. Oni uzas la pasivon, kiam la aganto estas montrata, sed la formon kun -iĝ, kiam la aganto ne estas montrata aŭ ne estas vivanta aŭ estas ne-grava. Oni diras aktive "Johano mortigis Karlon" kaj pasive "Johano estis mortigita de Johano," sed en la citita frazo de Ekzercaro la kaŭzo de la morto de la onklo estis la falo sub....., kaj oni ne pensas pri la radoj kiel aganto. Oni ne diras "li estis mortigita de radoj." En la angla oni diras "he was (got) killed"—li mortigis. Oni diras "li mortigis en batalo"—he was (got) killed in battle, ne "li estis mortigita de malamiko en batalo." Rimarku plue: Li falis de sur arbo kaj mortigis"—He fell from a tree and was (got) killed. (Ne estas aganto). Tiel same pri "sciigi" kaj aliaj.

**RECENZO.**

"Kaj ĉio restas penso sed ne faro." bagatela broŝureto de L. Sinha, eld. de Eldona Societo Esperanto, Stockholm, pri preskaŭ forfrotita Esp. -temo, iom tre nebone lingvovestita. Kontribuas nenion novan al la koncerna penskampoj.

Eraroj kaj nebonaĵoj: p. 4/14, Budhistaj monaĥoj alportis iliajn (siajn) evangeliojn; Hindujo estis ekkonata al (de) la Okcidenta mondo; larĝa en areo (granda, ampleksa); insuloj, pri kiu(j). 5. La rilato ne songita antaŭe fondiĝis (ne antaŭe songita fondiĝis). 6. La aŭtora tradukero biblia ne superas la modelan tekston; 8, 9 verbtempoj fuŝe uzitaj; ignoro (nescio); opiumo (opio). 12, lia inspiro ne limigas al iu aĝo kaj raso (—ne limigas al iu historia tempo aŭ raso?); 13/2, 3, 4, iliaj (siaj); tiel certa kiel (tio), ke Dio estas Dio. 15 estonto (estonteco).

**PRI "RESPEKTIVE".**

El "Heroldo de E." (n-ro 30(578) en 2a kaj 3a kolonoj de pĝ 1 okazas la vorto, ŝajne en la senco "or," sed dubinde estas, ke tia uzo estas aŭtoritata. "Konstanta sekretario, respektive sekretariino, kontrolas la gazetojn pri novaĵoj." "Sube estas citita la nomo de la verkinto, respektive tradukinto." Ĉi tie "respektive" ŝajne havas la senco

"or.....as the case may be."

**WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY** kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbano Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinlando (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralic Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.